

LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO“

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
 ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 1,50 NED. GULDENO AŬ EGALVALORO.

Por progresintoj.

POST LA GRANDA MILITO (1915)

(Partoj el „Alvoko al la Diplomatoj“, de d-ro Zamenhof).

„..... Ĉu vi komencos simple refaradi kaj flikadi la karton de Eŭropo? Ĉu vi simple decidis, ke la terpeco A devas aparteni al la gento X kaj la terpeco B al la gento Y? Estas vero, ke tiam laboron vi devos fari; sed ĝi devas esti nur negrava parto de viaj laboroj; gardu vin, ke la refarado de la karto ne fariĝu la tuta esenco de viaj laboroj, ĉar tiam viaj laboroj restus tute senvaloraj, kaj la grandegaj sangaj oferoj, kiujn la homaro elportis, restus vanaj.

Kiom ajn vi volos kontentigi la popolojn, kiom ajn justaj vi penos estis kontraŭ diversaj gentoj, vi nenion atingos per refarado de la karto, ĉar ĉiu ŝajna justeco koncerne unu genton estos samtempe maljusteco koncerne alian genton. La nuna tempo ne estas simila al la tempo antikva; sur ĉiu disputebla peco da tero laboris kaj verŝis sian sangon ne unu gento, sed ankaŭ aliaj gentoj; kaj se vi decidis, ke tiu aŭ alia terpeco devas aparteni al tiu aŭ alia gento, vi ne sole ne faros agon justan, sed vi ankaŭ ne forigos sur tiu terpeco la kaŭzon de estonta batalado. La „liberigo“, kiun vi donos al tiu aŭ alia terpeco, estos nur sofismo, ĉar ĝi signifos nur, ke al tiu aŭ alia gento vi donos la rajton, eŝi sur tiu terpeco

mastroj super homoj de aliaj gentoj, kiuj ankaŭ tie naskiĝis, laboris kaj superis kaj havas koncerne sian patrujon la samajn naturajn rajtojn, kiujn ĉiu infano havas koncerne sian patrinon. Estas vero, ke tiu gento, kiun vi privilegias, entuziasme krios: „Vivu la diplomatoj!” kaj se tiu gento sur la koncerna terpeco prezentos la plimulton, ĝi per teroro silentigos la aliajn, kaj ĉiuj gazetoj en la mondo diros, ke „la tuta loĝantaro de la terpeco A sentas sin tre feliĉa” Sed tio estos mensogo, simpla mensogo, kiun la mondo ne komprenos nur pro tio, ke la ĝemado de la terore silentigitaj prematoj, de homoj, kiuj en sia patrujo fariĝis „fremduloj”, ne venos al ĝiaj oreloj.

Transdonante ian terpecon al la homoj de tiu aŭ alia gento, vi ĉiam faros maljustaĵon kontraŭ aliaj homoj, kiuj havas la samajn naturajn rajtojn koncerne tiun terpecon. La sola efektive justa decido, kiun vi povas fari, estas: laŭte proklami kiel oficialan, firme interkonsentitan kaj plene garantiitan decidon de ĉiuj eŭropaj regnoj la sekvantan elemente naturan, sed ĝis nun bedaŭrinde ne observatan principon:

„Ĉiu lando morale kaj materiale plene egalrajte apartenas al ĉiuj siaj filoj.”

Sinjoroj diplomatoj! Post la terura eksterma milito, kiu starigis la homaron pli malalten ol la plej sovaĝaj bestoj, Eŭropo atendas de vi pacon. Ĝi atendas ne kelktempan interpacigon, sed pacon konstantan, kiu sola konvenas al civilizita homa raso. Sed memoru, memoru, memoru, ke la sola rimedo, por atingi tian pacon, estas: forigi unu fojon por ĉiam la ĉefan kaŭzon de la militoj, la barbaran restaĵon el la plej antikva antaŭcivilizacia tempo, la regadon de unuj gentoj super aliaj gentoj.

El „Originala Verkaro ” (III, Traktaĵoj).

Pensante pri la Majstro.

Kiel samlandano de nia majstro mi havis la honoron koni lin persone, kaj mi deziras rakonti kelkajn impresojn pri lia brila personeco.

Parolante kun li oni tuj rimarkis lian eksterordinaran modestecon, preskaŭ ĝenon, per kiu li, kiu per sia koro kaj menso estis pli supera ol aliaj homoj, volis kvazaŭ kaŝi tiun superecon, kvazaŭ li hontis pri ĝi Ĉiam, kiam li estis inter multaj homoj; li restadis silenta, parolis tre malmulte, kvazaŭ vagante kun siaj pen-

soj malproksime ĉe siaj idealoj pri interfratiĝo de popoloj

Mi estis ankaŭ kelkfoje ĉe li, kiel paciento. En la atendejo amasego da malriĉuloj kun okuloj ŝvelintaj kaj bandaĝitaj. — Ili ne sciis, ke la afabla, bonkora doktoro, kiu ofte rifuzadis monon, estas samtempe la glora bonfarinto de l' homaro, kiu streĉas siajn fortojn por forpreni la obstinan katarakton de la okuloj de l' blinda mondo.

En lia laborĉambro oni povis admiri multajn interesajn aĵojn: la belan arĝentan florpoton (donacon de la rumana reĝino Carmen Sylva), la arĝentan modelon de iu katedralo (donacon de la Papo Benedicto, kiu plurfoje sendis ankaŭ sian benon al li), belgajn bildojn, ktp. Sed plej valora kaj interesa estis la biblioteko kun kelkaj miloj da volumoj kaj manuskriptoj.

Tiu granda modestulo ĝuis ja reĝajn honorojn: En Cambridge venis lin renkonti la senato de la fama Universitato, kiel estis kutimo nur dum vizitoj de reĝoj. En Antverpeno la entuziasmaj studentoj forigis la ĉevalojn de la kaleŝo en kiu troviĝis la majstro, keĵ mem ektiris la ekhontantan Zamenhof tra la urbo. La salminejoj Wieliczka dum la kongreso en Krakovo estis honore al li lumigitaj same kiel dum la vizito de la aŭstra-hungara imperiestro. Li estis la dua homo en la mondo kiu havis monumenton dum sia vivo. Staras monumentoj por li en Franzesbad, Danzig, Michigan (Ameriko), k.a. Stratoj kaj bulvaroj en tre multaj urboj de la tuta terglobo portas lian nomon. Multaj registaroj honoris lin per plej superaj ordenoj. Li estis kavaliro de la franca Honora Legio kaj posedis la plej altan hispanan ordenon de Isabella Katolika.

El ĉiuj tiuj objektoj kaj memoraĵoj restis nun ruinoj kaj cindro. La barbaraj hordoj faŝistaj kiel pesto flugis tra Eŭropo, lasante post si morton, ploron, ruinojn. La domo ĉe str. Królewska 41 en Varsovio, kie mortis la majstro kaj poste loĝis lia filo, brulis kun ĉio. Ĉiuj tri infanoj de la majstro: Adam, Sofia kaj Lidia estas buĉitoj de germanaj sovaĝuloj

El ruinoj kaj larmoj, el suferoj kaj mizero devas ekstari la travivintoj kaj des pli energie eklabori por la fina venko de nia ideo, ĉar ĝi indas sian Kreinton.

Ing. E. Rodan (laŭ „Informa Bulteno" de Rumana Esp. Societo).

Ni deziras al ĉiuj ĝeamikoj bonan kaj prosperan novjaron!

**Kial mendi viajn esperantaĵojn ĉe TJO-Centro?
Ĉar vi tiel subtenas la junularmovadon!**

Ree ni staras ĉe la komenco de nova jaro. 1947 estas jubilea jaro por Esperanto — sed ankaŭ por „La Juna Vivo”. La unuan de julio 1934 ja aperis la unua numero de nia revuo. Ĝi do festas sian kupran jubileon.

Estis malforta vivo, kiu naskiĝis en la simpla instruista domo en West-Graftdijk, en tiu somero de 1934. Nur dank' al la sindona amo de la redakcio kaj la vartado de kelkaj fidelaj helpantoj, ĝi restis vivanta, kaj ekkreskis. Sed jam baldaŭ trafis ĝin la sortobatoj: perdiĝis preskaŭ ĉiuj geamikoj en Japanujo, Germanujo, Hispanujo, Aŭstrio Malgraŭ ĉio la eta vivo kréskis. En 1938 ĝi havis tiom da geamikoj, ke povis okazi la unua Internacia Junular-Kunveno en Groet (Nederlando).

Tio estas mejlfosto en la historio, ĉar tie fondiĝis la „Tutmonda Junular-Organizo”, la nuna hejmo de „La Juna Vivo”. Gojiga fakto ankaŭ estis la dua Internacia Junularkunveno, en Tervuren (Belgujo), en 1939. Sed pli kaj pli disvastiĝis la milito, kaj fine, en 1941 oni enkarcerigis ankaŭ „La Junan Vivon”. — Nur en septembro 1945 ĝi ree aperis: tute alie-aspekta, kaj tre maldika. Grandajn ŝanĝojn la revuo travivis: el la sekura domo de gesinjoroj v. Veenendaal ĝi transiris al la „Tutmonda Junular-Organizo”. Sed iom post iom ĝi alkitimiĝis al la novaj cirkonstancoj, kaj en aŭgusto 1946-a ree okazis internacia TJO-kunveno. Kvankam ĝi ne estis tiel granda, kiel la kunvenoj en Groet kaj Tervuren, ĝi bonege sukcesis. Kaj nun „LJV” ekzistas 12½ jarojn. Tio estas nur modesta jubileo, sed tamen menciinda. La jaroj montris, ke la revuo havas ekzistorajton, kaj ke ĝi fariĝis kara al multaj legantoj.

Sed forta „La Juna Vivo” ankoraŭ ne estas. Tia ĝi fariĝos nur kiam ĝi havos almenaŭ 2000 abonantojn!

Do, geamikoj, se la revuo estas al vi kara: varbu abonantojn!

Se ĉiu leganto de „La Juna Vivo” okaze de ĝia jubileo varbas unu abonanton aŭ TJO-anon, nia revuo estos sekura!

Ek al la laboro! Al 2000 abonantoj!

Cu vi ŝatus ricevi belan Esperanto-libron? Bonvolu do partopreni nian konkurson! Jen via tasko: Skribu al nia Radiostacio: (Ostrava, Ĉeĥoslovakujo): 1. Kion vi opinias pri Ĉeĥoslovakujo? 2. Kio vin interesas el la nova vivo en la Ĉeĥoslovaka Respubliko? — Interesajn leterojn ni publikigos en la ĉeĥa gazetaro. Oni skribu tute sincere, sed la respondoj estu mallongaj kaj klaraj. Sendu multajn leterojn, por ke ni pruvu la praktikan uzeblecon de Esperanto.



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

En Ipswich (Britujo).

Ĝi okazos en aŭgusto, se eble de 16-23. Ni ne dubas, ĉu la kunveno sukcesos: Nur legu la ĉi subajn partojn el letero de s-ro Heath, la organizanto, kaj vi certe entuziasmiĝos:

„..... Mi preparolis la TJO-Kunvenon en 1947 en Anglujo kun la estro de la Porjunularkonsila Komitato, s-ro Ridley, kaj la organizantino por Porjunularaj Aferoj, f-ino Collingwood. La unua afero, kiun ni pridiskutis, estis la konstruaĵo uzota. Post longa diskuto, ni decidis, ke la Gimnazio „Northgate” (Norda Pordego) tre taŭgas. Ĝi estas sufiĉe nova kaj moderna konstruaĵo, staranta en sia propra ludkampo. Meze estas granda halo, kaj ambaŭflanke estas lernejoj — dekstre tiu por 600 knabinoj, maldekstre por 600 knaboj. Oni momente konstruas novan kantinton, do estos facile prepari manĝaĵojn. La lernejo havas propran naĝejon, tenisejon, ktp. Estas sufiĉaj kaj taŭgaj lokoj por sinlavado kaj kompreneble, ĉar ĝi estas lernejo por ambaŭ seksoj, estas taŭgaj necesejoj.

Pri la dormlokoj: Mi klarigis, ke en pasintaj tendaroj multaj devis dormi sur pajla sternaĵo. S-ro Ridley respondis, ke ni almenaŭ provizu litojn por la inoj.

Alia grava afero estas la manĝaĵoj. Vi nepre devas scii, ke eĉ nun ni havas sufiĉe severan porciumon kaj s-ino Prance, kiu prizorgas la lernejajn kantinojn, trovas ĝin nefacila temo. Vi povas helpi nin tiurilate. Mia opinio en la kunvenoj en Groet kaj Tervuren vi havis matenmanĝon, malgrandan manĝon tagmeze kaj vespere la ĉefmanĝon. Ĉu vi opinias, ke tio estas la plej bona aranĝo? Aŭ ĉu ni aranĝu la ĉefmanĝon ĉirkaŭ la unua horo tagmeze? Estas angla kutimo, vi sciu. Mi ankaŭ opinias, ke ĝi estos la plej facila aranĝo por la kuireja stabo. S-ino Prance jam komencis pritrakti la temon kun la loka porciuma oficejo. Tuj kiam ŝi scios pri la manĝaĵoj, kiujn oni permesos al ŝi, ni povos decidi pri la manĝaĵkosto.

Ni faros nian eblon kolekti kiom eble plej multe da mono por helpi al vi. Jam mi dissendis la unuan cirkuleron, kaj mi intencas dissendi ilin ĉiumonate.

Pri ekskursoj: Bro la monmalfacilaĵoj mi sugestas:

1. Aŭtobuse al Londono. Tio kostus proks. po 7 ŝ 6 p.
2. Aŭtobuse al la marbordo ĉe Felixtowe, sufiĉe proksime al Ipswich. Kostus po 1 ŝ 6 p.

3. Estos facile aranĝi „Piknikojn” ekz. ĉe la bela erikejo Foxhall, 2 aŭ 3 mejlojn for de la Gimnazio.

Eble, kelkaj deziros resti pluan semajnon ĉe amikoj en tiu-ĉi lando. Ni petos al la anglaj samideanoj, ĉu ili povos provizi loĝejojn.

Ni klopodos aranĝi tiel, ke estos disponeblaj por la tendaro kuĉacisto kaj flegistino, se necesus ...”

Nu, ĉu vi kontentas pri la planoj? La britaj geamikoj faras ĉion por kiom eble plej bone akcepti nin. Se ni kunportos bonan humoron ni certe havos belegan semajnon, en kiu ni ĉerpos novajn fortojn!

Jam nun enstudu programon, por ke ĉiu helpu en la prizorgo de la amuzaj kunvenoj!

Anoncu vin ĉe: S-ro Jack Heath, 74 Dales View Rd., Ipswich Suffolk, Anglujo. — Faru ĝin baldaŭ, ĉar ni atendas multajn partoprenontojn!

Jam anoncis sin jenaj nederlandanoj:

1. F-ino Jansma (19-j.) en Petten; 2. Corrie de Leeuw (25-j.) en 't Zand; 3. Wim de Leeuw (19-j.) en 't Zand; 4. Guda Meysen (18-j.), Spijkerboor; 5. G. Schoon (21-j.), Starnmeer; 6. H. Schoon (19-j.), Starnmeer; 7. Dick Broekhuis (18-j.), Oost-Grafdijk; 8. Tiny Timmerman (12-j.), den Helder; 9. Greta Smit (16-j.), den Helder; 10. Bets Wit (22-j.), West-Grafdijk; 11. Gerrit Schoemaker (11-j.), West-Grafdijk; 12. Rika Leegwater (20-j.), W. Grafdijk; 13. Janny Langendoen (16-j.), Driehuizen; 14. Siem de Geus, Heiloo; 15. Heleen Schoneville (25-j.), Nieuwlande; 16. Vok Willig (12-j.), Starnmeer.

Internacia Kunveno en Svisujo en Reutsperre (2-8 aŭg. 1947).

Por plenaĝaj esperantistoj Walter Kobelt luis la naturamikan domon „Reutsperre”, ĉe Meiningen (Bernera Oberland). Entute li mendis 65 lokojn. Jam anoncis sin esperantistoj el Anglujo, Svisujo, Svedujo kaj Nederlando. Mi kopias parton el lia letero:

„La naturamika hejmo „Reutsperre” staras en tre bela regiono, kiu certe plaĉos al la eksterlandaj geamikoj. En la dormĉambro No. 3 estas loko por ĉirkaŭ 40 personoj (sur matracoj). Oni ricevas bonajn lanajn litkovrilojn. La tranoktado kostas 7.80 sv.fr. (f 4,80) por la tuta semajno. Ankaŭ estas rezervitaj la ĉambroj 4 kaj 5, kiuj havas lokon kune por 25 personoj. Ĉar tiuj ĉambroj estas pli bonaj, ili kostas 10.80 sv.fr. (f 6,40). Laŭ mia scio estas 2 belaj ĉambroj por kunveni, kaj kuirejo, en kiu ĉiu laŭdezure povas kuiri siajn manĝaĵojn. Mi proponas kuiri komune, por ke ni ĉiuj manĝu el unu „familia poto”. Mi kredas ke ĉiuj kontentos, kvankam oni ne dormos en multekostaj hotellitoj. Mi scias, ke oni bonege ripozas, kaj agrable sonĝas sur tiuj matracoj. Ne ĉefas la komforto, sed la spirito!”

La celo de ĉi tiu kunveno estas interŝanĝi pensojn pri gravaj temoj, sed ankaŭ fari belegajn ekskursojn en la montaro. Anoncu vin baldaŭ, ĉar la nombro da lokoj estas limigita! Petu informojn ĉe -sino v. Veenendaal, Limmen, Nederlando (Aldonu poŝtmarkon aŭ respondkuponon).

ZORGOJ.



Dum la rakonto de Felipo Patro revenis. Ankaŭ li ricevas kakaoN kaj biskvitojn. Ili babilas dum mallonga tempo kaj post tio ankaŭ Luiza kaj Felipo iras al la dormejoj.

„KioN vi faras nun?” demandas Patro al Patrino. Ŝi ridas. „Mi kudras pupoN el ĉifonoj por Gracia. Ĉu vi desegnos la kapoN?”

Nun Patro laboras. Per plumo kaj inko li desegnas okulojnN, brovojnN, nazonN, buŝon kaj orelojnN sur la pupa kapo. Fine la pupo estas preta.

Patrino rakontas al Patro, ke sinjoro Bonavento

ne estas kontenta pri la instruado al Pio.

„Pio estas tro granda por la elementa lernejo,” diras Patro, „Kaj apartaj lecionoj estas tre karaj.”

„Ni ne edukas niajn infanojn bone,” diras Patrino. „Luiza tute ne ricevis instruadoN, Felipo ne lernis sufiĉe kaj Pablo kaj Anita ankoraŭ ne iras al la lernejo. La instruado estas granda problemo.”

„Luiza faras la laboroN en la domo, ĉar vi kudras. Felipo helpas miN en mia laboro. Ni ne havas la monoN por ekstra instruado. Kaj pri Pablo kaj Anita nu mi iros al pastro Lorenzo. Eble li aŭ fraŭlino Plumnova instruos la infanojnN.”

Patrino ne estas tre kontenta pri la solvo de la problemo.

„Ĉu ne estas bona lernejo por niaj infanoj?” ŝi demandas.

„Bonaj lernejoj estas nur por la infanoj de riĉaj homoj,” respondas Patro. „La impostoj kaj la lu-prezo de niaj(!) kampo kaj domo estas tre altaj kaj tre premas niN. Ni ne posedas la monoN por bonaj lernejoj, do ni dependas de la instruado de pastro Lorenzo.”

as
mi depend-as
vi desegn-as
ni eduk-as
ni hav-as
li instru-as

is
mi depend-is
vi desegn-is
ni eduk-is
ni hav-is
li instru-is

os
mi depend-os
vi desegn-os
ni eduk-os
ni hav-os
li instru-os

mi ir-as
ni posed-as
ili prem-as
ŝi rakont-as

mi ir-is
ni posed-is
ili prem-is
ŝi rakont-is

mi ir-os
ni posed-os
ili prem-os
ili rakont-os

apart-a
la brov-o
ĉifon-o
ebl-e
ekstr-a
element-a
fin-e

la impost-o
ink-o
la instruad-o
kap-o
la lu-o
la lu-prez-o
la mon-o

naz-o
la prez-o
problem-o
pup-a kap-o
la pup-o
la rakont-o
riĉ-a(j)

la solv-o
sufiĉ-a
sufiĉ-e
la vent-o
la zorg-o

Ekzerco. Analizu: La impostoj premas niN. La kapoN desegnas Patro. La fraŭlino instruas la infanojnN. Felipe helpas miN. La monoN ni ne posedas. Felipe rakontis rakontoN.

Gramatika enhavo: la estonta tempo de la verbo: os; ripetado: la rekta komplemento: N.

Leciono 24.

PRI PROFESIOJ.



Patrino ankoraŭ ne estas kontenta.

„Niaj infanoj ne lernas profesionN,” ŝi diras. „Mia patro estis kulturisto; li deziris, ke miaj frattoj kaj mi lernu profesionN. Gulio ankaŭ estas kulturisto, Jacinto estas maŝinisto kaj tio estas kudristino. La frato de mia patro — onklo Bernardo — estis instruisto. Li instruis miajn frattojN kaj miN.”

„Jes! vi ricevis bonaN instruadoN,” respondas Patro. „Sed en nia familio ni ne lernis profesionN. Ni aĉetas kaj vendas, tio estas sufiĉa. Mi aĉetas kaj vendas legomojnN kaj ovojnN: mi estas legomisto kaj ovisto. Post kelkaj jaroj Felipe kaj Pablo ankaŭ estos vendistoj. Kial ne? Kaj mi ripetas: ni ne povas pagi monoN por bona instruado aŭ por lerni profesionN; ni povas vivi simple, sed ni ne povas ŝpari kaj ni ne povas fari grandajn elspezojnN.”

La problemo do restis, kaj Patrino ankaŭ ne povis solvi ĝiN.

i	as	is	os
dezir-i	dezir-as	dezir-is	dezir-os
est-i	est-as	est-is	est-os
far-i	far-as	far-is	far-os
lern-i	lern-as	lern-is	lern-os
pag-i	pag-as	pag-is	pag-os
pov-i	pov-as	pov-is	pov-os
solv-i	solv-as	solv-is	solv-os
ŝpar-i	ŝpar-as	ŝpar-is	ŝpar-os
viv-i	viv-as	viv-is	viv-os

ist

La bakisto bakas	La buĉisto buĉas	La desegnistō desegnas	La fiŝisto fiŝas	La gardisto gardas	La instruisto instruas	La kudristino kudras	La kuracisto kuracas	La laboristo laboras	La masonisto masonas	La rabisto rabas
La bakisto vendas panoN	La bovisto prizorgas kaj gardas bovojn	La buĉisto vendas viandoN	La kulturisto kulturatas legomojn kaj fruktojn	La fruktisto vendas fruktojn	La laktisto vendas laktoN	La legomisto vendas legomojn	La ovisto vendas ovojn	La spicisto vendas spicojn		

bak-i	kultur-i	prizorg-i	la spic-o
buĉ-i	kurac-i	la profesi-o	ŝpar-i
dezir-i	mason-i	rab-i	la viand-o
la elspez-o	maŝin-ist-o	simpl-a	viv-i
fiŝ-i	la maŝin-o	simpl-e	
gard-i	pov-i	solv-i	

Ekzerco. Skribu la estantan, la pasintan kaj la estontan tempojN de la sekvontaj verboj: baki, buĉi, desegni, fiŝi, gardi, instrui, kudri, kuraci, labori, masoni, prizorgi, rabi, vendi.

Gramatika enhavo: la infinitivo (= la nomo de la verbo) i; la rekta komplemento: N post adjektivo plur. kaj post ĉiuj personaj pronomoj N; la sufikso ist.

Kelkaj korektoj el la antaŭaj lecionoj: En la 19-a leciono (paĝon 76, 12-an linion) staras: ĝardeno. Devas esti: gardo. Ĉe la 21-an lecionon (paĝon 87), la presisto erare metis bildon, kiu apartenas al la 25-a leciono. — Sur la 9-a linio oni legu: al la kinō (anstataŭ al kino). Sur paĝo 88 (16-an linion): panon d.e. pano. — En la 22-a leciono (3-an linion de malsupre) oni legu: ... forrajdis rapide kun la ĉevaloj.

Anoncante novajn aĵojn, oni bonvolu klare aldoni aĝon kaj sekson.

Por komencantoj.

Ne helpis.

Knabeto treege ploras. Maljuna sinjorino kompatas lin, kaj iras al li. „Kial vi tiom ploras?” ŝi diras afable.

„Mi — perdis — moneron!” singultas la knabeto.

„Ah, kompatindulo. Ĉu estis granda monero?”

„Dekcenda!”

„Jen, mi donas al vi alian moneron. Do ne plu ploru, kaj iru al via patrino.”

Sed nun la knabeto ploras ankoraŭ pli laŭte.

„Nu, kio nun estas al vi? Ĉu vi ne kuraĝas iri hejmen?”

„Jes — sed — se mi — ankoraŭ havus — mian propran moneron — mi nun havus du

Respondu al jenaj demandoj: Kion faris la knabeto? Kiu kompatis lin? Ĉu ŝi iris al li? Kion ŝi diris? Kia ŝi estis? Kion perdis la knabo? Ĉu la sinjorino helpis lin? Kion ŝi faris? Ĉu la knabo estis kontenta? Ĉu li tuj iris hejmen? Kial li ankoraŭ ploris?

La tri kondamnitaj.

La juĝisto kondamnis tri virojn je pendigo. Estis anglo, skoto kaj irlandano. Li demandis al la anglo: „Sur kiu arbo vi deziras pendi?”

„Sur kverko” respondis la anglo.

„Bone. Kaj vi, Mac Kormick?”

„Sur pino.”

„Bone. Kaj vi, O'Connor?”

„Mi preferas ribarbon.”

„Ribarbon? Vi ŝercas, ĝi ankoraŭ estas tro malgranda!”

„Se vi permesas, via juĝista Moŝto, mi atendendos ĝis ĝi estos plenkreska!”

(laŭ „La Verda Flamo”).

Vortklarigo.

Diru panjo, kion oni nomas „maldiskreta demando?”

„Tian demandon, mia fileto, kiu metas aliajn homojn en embarason.”

„Nun mi komprenas ĝin. Ankaŭ la sinjoro instruisto ĉiam faras al ni maldiskretajn demandojn.”

El „La Praktiko”.

Artisto.

„Rubens estis bonega pentristo! Per unu penika streko li povis ŝanĝi ridantan infanvizaĝon en plorantan!”

„Tion povas ankaŭ nia instruisto per sia kanbastono!”

Laŭ „Aŭstria Esp.-Revuo”.

Li povis pagi.

Parvenuo: Kiom da dentoj vi faros en mia nova dentaro?

Dentisto: Tridek du, sinjoro.

Parvenuo: Se vi volas, vi povas fari pli ol tridek du, ĉar mi bone povas pagi ilin!

Karuleto de paĉjo!

Instruisto: Nu, kion diris via patro pri via malbona atesto?

Knabeto: Li estis terure kolera. Sinjoro instruisto faros saĝe, se li provizore evitos renkonton kun li!

El „La Praktiko”.

Malbela virino.

Iu virino estis tre malbela, sed ŝi mem opiniis, ke ŝi estas la plej bela virino en la mondo.

Foje ŝi vidis spegulon, kaj ŝi vidis sian malbelecon. Tio kolorigis ŝin kaj ŝi frakasis la spegulon.

La tago estis varmega, kaj ŝi soifis. Ŝi iris al rivereto. En ĝi fluis pura kaj klara akvo. Ŝi sentis ĝojon, kaj komencis trinki la akvon. Tamen ŝi ree vidis sian malbelan figuron. Kiel kolerega ŝi estis! Ŝi prenis ŝtonon kaj ĵetis ĝin en la akvon. La akvo malpurigis, kaj la malbela vizaĝo malaperis. Tiam ŝi ektrinkis la akvon. Poste ĉiam, kiam ŝi volis trinki, ŝi antaŭe malpurigis la akvon.

El „Esperanta Revuo”, Organa de Ĉina Esperanto-Ligo.

Respondu al jenaj demandoj: Kia estis la virino? Ĉi ŝi mem sciis tion? Kion ŝi pensis? Kiel ŝi ekvidis sian malbelecon? En kio ŝi rigardis? Ĉu ŝi vidis belan vizaĝon? Kia ŝi estis? Kion ŝi faris? Ĉu la vetero estis malvarma? Kial la virino soifis? Kien ŝi iris? Ĉu la akvo estis pura? Kion faris la virino? Kion ŝi vidis? Ĉu ŝi satis tion? Kion ŝi ĵetis en la akvon? Kio okazis? Ĉu oni povas speguli sin en malpura akvo?

HISTORIO DE SUNFLORO KAJ DU HELIKOJ.

(fablo de Picirina Boranga).

Daŭrigo.

„Malantaŭen ni ne reiros antaŭ ol oni manĝis nin! Se la sunfloro ne lasas nin pasi, ni trovos aliajn vojojn al nia celo. Ho, ho!” ĝi kriis al florfolio, kiu pendis apud ĝia kapo, „venu malsupren. Mi apogos kontraŭ vi por rampi supren!”

„Cu vi estas freneza? Mi ne havas forton por subteni vin,” respondis la florfolio. „Krome, mi helpus krimulon. Mi bone konas vin, kaj mi scias, ke vi difektas niajn florojn. Vi venas ĉi tien por detruĵi la mielon de la bonaj abeloj.”

„Impertinentulo! Mi diras ankoraŭ unu fojon, ke vi lasu nin pasi, alie trafos vin malbona sorto,” kaj la heliko plilongigis la palpilojn por kapti la florfolion. Sed ĝentila venteto levis ĝin supren.

„Jetu almenaŭ ion al ni,” petegis la dua heliko. Ni ne manĝis de hodiaŭmatene!”

„Hontu tion demandi! Mi ne volas almozon!” interrompis la dua.

„Ho malfeliĉulo,” respondis la florfolio, „mi kompatas vin! Sed mi povas doni neniom eĉ al via kunulo, ĉar mi estas senfrukta.”

„Pli bone! Tenu ĉion por viaj kunuloj, fierulaĉo! Kiom vi pensas valori, vi senfruktaj floroj de la sunfloro? Cu pli ol la reĝaj servistoj? Kaj ĉu ni estas ŝtelistoj, he! Cu mi ŝtelisto? Vi multon punpagos al mi, mia ŝinjoro!”

Ĉi tiun minacon aŭdis ankaŭ la suno, kiu kaŝis sin inter la nuboj. Sed ĝi ne povis toleri, ke heliko ĵiel traktas ĝian fidelan kamaradon. Ĝi iom disigis la nubojn, kvazaŭ ĝi malfermus fenestreton por rigardi suben. Tra la fendo eliris varmega radio, kiu venis rekte al la sunfloro, kaj plene trafis la helikon. Ĉi tiu sentis la vundojn brulegi, kaj ĝi tuj komencis malsupreniri. La suno ree malaperis, sed ĝi donis kelkajn ordonojn al la vento. La dua heliko sekvis la amikon, kaj diris: „Vi pravas, ĉi tiuj floroj estas tro fieraj.” Kaj ĝi ĝojegis ĉar ĝi reiras al la tero. Malsupre, la helikoj tuj iris en siajn domojn.

Sed vespere la ĉielo subite mallumiĝis kaj malproksime grumbadis la tondro. La vento plenumis la ordonojn de la suno; ĝi densigis la nubojn kaj frapis ilin unu kontraŭ la alian.

La unua heliko aŭdis tion, kaj eligis la palpilojn. Malbona penso trakuris ĝian kapon. Ĝi iris el la konko kaj al la domo de la alia heliko. La amiko dormadis. Ĝi forte frapis sur la konkon: „Venu

tuj! Jam alvenis la momento de nia venĝo! La grandegulo baldaŭ falos!"

„Kiu grandegulo? Lasu min dormi pace!"

„Ĉu vi ne aŭdas, kiel bruegas la vento? Ni iru al la sunfloro! Imagu, kiam forta ventoblovo tuŝos tiujn altajn foliojn!"

„Estos sendube belege. Sed nun mi ne povos iri. Mi serĉis iom da kalko por mi. Vi scias, la aŭtuno ne estas malproksima kaj mi devas pretigi kovrilon por mia hejmo, kaj konstrui novan tavolon al la rando de la konko....."

„Sed ankoraŭ ne finiĝis la somero! Venu kaj amuzu vin iom, la okazo sin prezentas!" kaj ĝi puŝis la duan helikon el ĝia kaŝejo. Ambaŭ kaŭris sub briko, kiu elstaris el la muro. La vento muĝis, fajfis, suprenlevis nubojn da polvo.

La sunfloro ŝajnis kompatinda estaĵo; ĝia granda kapo peze balanciĝis tien kaj reen, kvazaŭ lace.

„Ĝi neas, kompatindulo," ekkriis la heliko,, sed estas senutile! Rigardu! Ĝi elradikiĝos! Vi tion meritas! Antaŭe al ni, kaj nun al vi malbona sorto. Atentu amiko, kiam venos forta ventoblovo eĉ ne unu folio restos!"

Sed..... kio estas? La folioj transdonis ordonon inter si. Ili kuntiris ĉiujn siajn nervurojn kaj tre lerte turnis sin al horizontala pozicio. Tiel ili povis pasigi la venton.

La dua heliko diris: „Estas nenio vidinda: ni iru hejmen."

La planto ricevis fortan skuon, ĝi tute krakis.

„Vi havas belan penon, miaj karaj folioj! Via trunketo, kun la armeo de siaj haroj kaj gardistoj ne povos rezisti: interne ĝi havas nur molan medolon."

Sed malsupre ĉe la radikoj rondiris en tiu momento precizaj ordonoj. La tuta densa reto, kiu etendis sin subtere, rigidigis kaj alligis sin per granda forto al la plej solidaj partoj. Se la aro da radikoj cedus ĉe unu flanko, la rezisto ĉe la alia estus pli forta.

„Kuraĝon! Forton!" kriis la unua heliko al la alproksimiĝanta blovo. „Batu ĉi tien! Bone!"

La blovo obeis, kaj eniris la ĝardenon.

„Tiel! Bone!" kriegis ankoraŭ la heliko. Sed pli ĝi ne povis diri, ĉar pro la ventego la briko falis. Ĝi mizere mortpremis ambaŭ helikojn!

El la itala lingvo tradukis (kun afabla permeso de l' verkistino kaj de l' eldonisto) la ok-jara knabeto Niĉjo Minnaja, Roma, Italujo.

La Naturo celas riĉigi homojn ne mone, sed mense kaj korpe.

S. P.

LUDOJ.

Por kantemuloj: La ludantoj sidas ĉirkaŭ tablo. Ĉiam kantante oni kaŝe (sub la tablo) transdonas ŝlosilon. Unu el la ĉeestantoj staras en angulo de la ĉambro. Kiam li fajfas, la ludanto, kiu en tiu momento havas la ŝlosilon, komencu novan kanton. La fajfinto nombras ĝis dek, kaj se oni en tiu tempo ne komencis novan kanton, la fajfinto eksidas, kaj vi certe komprenas, kiu devas iri al la angulo!

Por rakontemuloj: Ekzemple dek personoj sidas ĉirkaŭ la tablo, sur kiu kuŝas naŭ paperbuloj. Unu el ili rakontas historion, aŭ okazintajon. Antaŭe oni interkonsentis, ke, se li diras iun vorton, ekzemple „pano(n)”, ĉiu devas kapti bulon. Plej streĉe estas, kiam la rakontanto ĉiam alproksimiĝas la vorton „panon”. Li diras ekzemple: „Mi eniris bakejon kaj aĉetis farunon”, ktp. Kiam li diris la vorton „pano(n)”, ĉiuj kaptas paperbulon. Tiu, kiu malsukcesas, devas „rakonti”.

Generalaj sciigoj.

Esperanto en la lernejo: En Svedujo oni instruas Esperanton en popolaj lernejoj (libervole) en: Göteborg, Skovde, Uddevalle, Karlskoga, Vaxjö, Lund kaj Falköping. En Lund oni esperas aranĝi kurson por 55 infanoj. — La Sveda Kleriga Laborista Asocio aranĝos kurson por instruistoj en Brunnsvik, en 1947.

Dum la jaro 1945-1946 la angla Esp. Geinstruista Organizo ricevis rektan informon pri la instruado de Esperanto en la lernejoj al proksimume 1132 geknaboj inter la aĝoj de 5 kaj 18 jaroj. Dum la lernejaj tempoj oni instruis en 19 lernejoj, kaj post la lernejaj horoj en 9 lernejoj. — S-ro J. Heath (la organizanto de la TJO-Kunveno en Britujo) starigis kurson en Ipswich por instruistinoj, laŭ iliaj petoj, ĉe Moderna Duagrada Lernejo.

En la faka lernejo por knabinoj en Leiden, Nederlando, oni ekster la lernejaj horoj instruas Esperanton al 27 knabinoj. — En la provinco Groningen 25 instruistoj studas Esperanton.

Ankaŭ en lernejo en Utrecht Esperanto estas instruata ekster la lernejaj horoj.

En kvar lernejoj de Budapeŝto (Hungarujo) oni enkondukis la oficialan instruadon de Esperanto (105 lernantoj).

La ĉeĥoslovaka Radiostacio Ostrava, regule elsendas Esperantajn prelegojn pri la vivo en Ĉeĥoslovakujo, pri Esperanto, ktp. ĉiumarde kaj -vendrede, je la 22a horo 50 (laŭ mezeŭropa tempo), je ondlonge de 325 metroj). Esperantistoj bonvolu sendi dankleterojn!

Tutmonda Esperantista Jurnallista Asocio estas fondita. Provizora Sekre-

tariejo: Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg, Svedujo. La jar-
kotizo por 1947 estos 1 usona dolaro, aŭ samvaloro. Fakkunsidoj estas pre-
parataj dum la IEL- kaj SAT-kongresoj.

Fondiĝis en Nederlando „Faka sekcio por Terkulturistoj kaj Agronomoj,
kun jenaj celoj: a. Grupigi kiom eble plej grandan nombron da Esperan-
tistaj kamparanoj, interesitoj pri kamp- kaj terkulturo. — b. Kolekti nomojn
kaj adresojn de alilandaj samfakuloj, por fortigi la internacian kontakton
per korespondado kaj eventuale vizitado. — c. Starigi fakan terminaron.

Agronomoj, ĝardenkulturistoj, brutbredistoj, kaj ĉiuj, kiuj iel interesiĝas
pri tiuj fakoj, aliĝu al la nove fondita faka grupo. La kotizo por 1947 estos
gld. 3.— Provizora fakestro por Nederlando estas Jac. Smit, J. Pz. Coen-
str. 13. Hoorn (NH).



KORESPONDADRESOJ

*Ciu abonanto unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian ko-
respondadreson. La saman rajton havas grupoj, kies gvidanto estas
abonanto.*

Brazilo: Se vi interesiĝas pri leterkontakto kun la membroj de Kristana
Asocio de Junuloj (YMCA), skribu al: Kristana Asocio de Junuloj en Rio
de Janeiro, Brazilo.

Britujo: 21-jarulo, dez. kor. kun gejunuloj, kiuj ne povas paroli angle,
kiujn li povos renkonti dum la Univ. Kongreso en Svislando, S-ro D. P.
Faux, The Bungalow, Painswick (Glos).

Bulgarujo: Grupo da junaj lernantoj (13-27-j.), dez. kor. kun Nederland-
anoj. Resp. garantiata. Skribu al: Kojčo K. Koev, Skobolevo, Kazanliško.

Finnlando: Grupo da komencantoj el la superaj klasoj de liceo kaj grupo
da progresintoj (inter kiuj 4 instruistoj) serĉas korespondantojn. Adr: Liceo
Yhteiskoulu, Somero.

Francujo: Por fari propagandon inter la membroj de la „Internacia Ami-
keca Ligo“, skribu al jena adreso, se vi dez. kor.: Mlle Odette Libot, 51 Brd
de Lorraine, Clichy, Seine.

La Junulgastejanoj el ĉiuj landoj, kiuj deziras krei internacian Esperanto-
agadon en la junulgastejoj sin turnu al s-ro A. Albault, 49 rue de Cal. Bat-
testi, Reims.

Kiu emas korespondi kun francan(in)o? Turnu vin al Koresponda Servo
(SAT), 9 rue des Murs, Reims.

Nederlando: Miaj lernantoj (12-15-j.) dez. kor. kun geamikoj en ĉiuj lan-
doj. Skribu al s-ro M. Lendekamp, Instruisto, Roden (Dr).

Janny Langedoen (16-j.), Driehuizen (NH), post Zd. en Nrd. Schermer,
deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

F-ino G. Schoon (21-j.), Starnmeer, n/b Oost-Grafdijk, dez. kor. kun
britaj geamikoj.

Lernantoj de la mezgrada burĝa lernejo en Alkmaar dez. kor. kun ek-
sterlandaj geamikoj. Skribu al s-ro de Koning, Kerkelaan 3, Bergen (NH).

Al ĉiuj miaj konatoj en Anglujo mi deziras feliĉan Novjaron! Fino Y. Kuperus, Berlikum (Fr).

S-ino J. Soeteman, Sportveld, Kerkelanden 16, Hilversum, dez. kor. k.ĉ.l., ev. interŝ. monatajn organojn, il. poŝtk., desegnaĵojn, fotojn ktp.

Afabila peto: Al tiuj, kies abono finiĝis je la 31-a de decembro, ni urĝe petas kiom eble plej baldaŭ pagi la kotizon por la nova jaro. Kiu ne deziras daŭrigi la abonon, bonvolu tion sciigi al la landa ĉefperanto aŭ rekte al la TJO-Centro.

La britojn ni ankoraŭ atentigas (laŭ peto de la ĉefperantino), ke la TJO-jarkotizo estas 5 ŝil., por ĉiuj anoj pliaĝaj ol lernejanaj.

NIA STOKO.

Jus aperis: „Vivo de Zola”: Aŭg. de Silva — el la portugala lingvo tradukita de Manuel de Freitas.

Ciu esperantisto nepre posedu la biografion pri la fama franca verkisto Zola!

Prezo: f 1,65

La Vivo de l' Eskimoj: Prof. Aŭg. da Silva — el la portugala lingvo tradukita de M. F.

Prezo: f 0,35

La Ponto: Angel Karalijĉev, el la bulgara lingvo trad. N. Vasilov.

Prezo: f 0,15

„La Juna Vivo” — binditaj jarkolektoj — enhavas abundon da legaĵoj: rakontojn, ŝercojn, anekdotojn, ludojn, kantojn, enigmojn, ktp. Aĉeteblaj estas ankoraŭ la binditaj kolektoj de 1934/1935 kaj 1936/1937.

Prezo: f 1,—

Internacia Kantaro „La Juna Vivo”.

Prezo: f 0,50

Vortaroj por nederlandanoj: Schidlofvortaro.

Prezo: f 2,25

Blok-vortareto: Prezo f 0,20

TJO-Poŝtpapero: 50 leterfolioj kaj 50 kovertoj:

Prezo: f 2,—

Ĉiuj prezoj estas ne-afrankitaj.

Varbu Esperantistojn per nia simpla skriba kurso. Prezo f 4,— (inkluzive korektado!). Menu ĉe TJO-Centro.

M.E.B.-Libretoj — Malkaraj libretoj prezo po 0,35 guld.

1. La grandaj Filozofoj kaj la Universala Lingvo.
2. Rusaj Noveloj.
3. De Muheddin ĝis Mundilatin.
4. Tra Usono kun ruliĝanta hejmo.
5. El la klasika periodo de Esperanto.
6. La Kongresaj Paroladoj de d-ro Zamenhof I-a parto.
7. La Kongresaj Paroladoj de d-ro Zamenhof, II-a parto.
8. La Avo.
9. La Jusnaskito.
10. La Jubilea Kongreso de Esperanto 1912.
11. La Ora Jubilea Kongreso de Esperanto 1937.
12. Nordnordaj Fabeloj.
13. En la Vagono.
- 14-15. La Problemo de Lingvo Internacia.
16. Rozinjo.
17. El la Londona Skizlibro.
18. Flugado Alimonden.
19. Patro kaj Filo.

Menu viajn librojn ĉe TJO-Centro!

LA JUNTA VIVO



MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO”

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 1,50 NED. GULDENDO AŬ EGALVALORO.

IPSWICH (la urbo de nia 4-a Internacia Kunveno).

La urbo Ipswich (prononcu: Ipsviĉ) estas la ĉefurbo de la graflando Suffolk kaj staras apud la rivero Orwell, 11 mejlojn for de la maro. Ĝi estas tre malnova urbo, kaj havas loĝantaron de proksimume 100.000. Por montri al la legantoj, kiel Ipswich estas kreskinta, mi povas diri ke, kvankam en la jaro 1841a la loĝantaro estis nur 25.264, post 50 jaroj ĝi kreskis ĝis 57.081, dum en 1931a ĝi denove pligrandiĝis ĝis 87.500. Oni do rimarkos, ke dum iom pli old 100 jaroj la loĝantaro kvarobligis sin. Tio ĉi estas mirinda evolurapideco, kaj estas pruvo de la kreskado de la Ipsviĉa industrio sub la gvidado de homoj, havantaj kaj entreprenemon kaj inventan genion.

La origino de la nomo „Ipswich” estas interesa. Oni povas diskuti la legendon, ke Ipswich estis konstruata de pajena reĝo, nomita Ippus: sed en la historia Juĝtaga Libro oni trovas kelkajn literumformojn, kiaj Gyppeswid, Gippeswiz, Gyppewycus kaj Gippeswic. Kvankam kelkaj homoj asertas, ke la nomo originis el la angla-saksa „Gipi’s wic”, t.e. la „wic” aŭ vilaĝo de Gipi (prononcu Jipi), oni kutime konsentas ke, pro la fakto ke Ipswich staras ĉe la punkto kie la freŝakva rivero Gipping kuniĝas kun la salakva rivero Orwell, la nomo signifas la „wic” aŭ vilaĝo ĉe la Gipping, do Gippes-wic aŭ Gippeswyk. Post la Normanda konkero la nomo ŝanĝiĝis al Yppeswyche, kaj grade al la nuna Ipswich.

La haveno estas la plej granda inter la rivero Tramben kaj la rivero Thames. Oni povas legi pri tiu ĉi haveno eĉ en la historio de la 9-a jarcento, kiam la danoj ŝipiris laŭ la rivero Orwell ĝis la vilaĝo kaj prirabis kaj bruligis ĝin.

Ce la komenco de la nuna jarcento oni povis vidi multajn grandajn velŝipojn (angle „wind-jammers”), kiel la Joseph Conrad, la Abraham Ryberg, la Herzogin Cecilie, la Melbourne. kaj la Archibald Russel, ĉiuj plensargitaj de greno, konkursantaj en la „Grenkonkurso” de Aŭstralio ĝis Anglujo.

Antaŭ la milito duonmiliono da tunoj de la ŝiparo uzis la havenan ĉiujare por la alporto de miliono da tunoj da ŝarĝo. Ŝipoj nun alportas grenon el Kanado, fostatojn el Norda Afriko, lignon el Usono kaj Rusujo kaj petrolon el Meksiko, ktp.

La loĝantoj de Ipswich estas honŝancaj pri siaj parkoj. Pro la bonkoreco de riĉaj Ipswich-anoj, estas ses, al kiuj oni devas aldoni kelkajn publikajn ludkampojn kaj liberajn spacojn. Entute estas pli ol 650 akroj da parklando.

En la 20-a jarcenta Ipswich oni trovas refreŝigantan miksaĵon de la antikva kaj moderna stiloj — grandajn konstruaĵojn el ŝtalo kaj betono, kaj tujapude la domojn kaj butikojn, konstruitajn eble dum la regado de la reĝino Elizabeth, kaj interesplenajn kun iliaj nigraj traboj kaj netakseble malnova kverkligno. Multaj el la stratoj estas pitoreskaj kaj mallarĝaj, kaj je ĉiu flanko oni rimarkas la bele konstruitajn „lato kaj stuko”-domojn de la mezepokaj metiistoj.

Ipswich, kiel la ĉefurbo, estas fokuso de ŝoseoj, vojoj kaj fervojoj: ĝi estas vendeja urbo, enhavanta vendejojn por la vendado de greno, bovoj, porkoj kaj ŝafoj: plue estas vendejo por fruktoj kaj floroj.

(Daŭrigota).

Bedaŭrinde ni ne ricevis detalajn informojn el Anglujo pri la restadkostoj kaj dato. Ni nur povas sciigi al nederlandaj partoprenontoj, ke la marvojaĝkostoj verŝajne estos: por infanoj ĝis 17-j: f 40, por pli aĝaj personoj f 56 (tien kaj reen). Pli detalajn informojn ili verŝajne legos en la TJO-Bulteno de la nederlanda sekcio.

Nur aktivaj TJO-anoj povos partopreni.

Oni anoncu sin al f-ino N. Rees, Derwydd, Seven Sisters, Neath, Glam, Britujo. Bonvolu klare aldoni adreson, ktp.

Ekzemple: „Mi deziras partopreni en la TJO-kunveno en Ipswich.

Nomo: Annie Tuin — **Adreso:** B-strato, No. X, Limmen, Nederlando. — **Aĝo:** 15-jara. — **Sekso:** ino. **Grupo:** „.....” (Atentu bone, ke oni do ne anoncu sin al s-ro Heath, kiel staris en la januara numero!)

Partoprenontoj, kiuj ne mem povos akiri anglan monon, povos kalkuli je la helpo de TJO. Kondiĉo tamen estas, ke oni sufiĉe frue anoncu sin, kaj prefere oni samtempe pagu la kostojn. Lastmomente ni ne plu povos fari financajn aranĝojn!

Esperable ni baldaŭ povos doni detalojn!

Francoj (izolaj junuloj, grupgvidantoj, infanoj) kiuj deziras partopreni la internacian junularkunvenon en Ipswich (Anglujo), bonvolu turni sin kiom eble plej baldaŭ al la ĉefperantino. Faru la plej fortan propagandon en via ĉirkaŭaĵo por varbi partoprenontojn! Oni de nun klopodu organizi karavanon. Skribu al s-ino M. Turin-Montagnon, Trépot (Doubs).

Partoprenontoj: 17: Annie Tuin (15-j), Limmen (Ned); 18: f-ino D. de Graaf (17-j), Moerbeek (Ned); 19: F-ino A. Groet (17-j), St. Maarten (Ned). 20: Annie Jonker (12-j), O. Grafdijk (Ned.).

KIAL MI AMAS LA NATURON (de Joy Redgment).

La matena roso ankoraŭ estas multa sur la herbo kiam mi iras al mia malfermita fenestro kaj elrigardas. La malhela lumo malrapide heliĝas, kaj ombroj, envolvitaj de nebulo, grade eliĝas kiel arboj. Ĉiu folio brilas en la malseka aero. Kelkaj tonoj de la birdkanto eksonas tra la trankvilo. Sur la herbo kuniklo kviete manĝas, paŭzante kelkmomente por ĉirkaŭrigardi, kun atentaj oreloj kaj brilaj okuloj. Estas profunda sento de harmonio sur la tero.

Mi opinias ke en tio kuŝas mia amo al la naturo. Estas neniam akra sono en ĉiuj diversaj specoj de la vivo en la sovaĝejo. Estas beleco supermezura, kaj neesprimebla paco. Eĉ la morto ŝajnas esti harmonia en la naturo. La kreitoj de la sovaĝejo estas sendependaj de la homaro. Ili estas tiaj, kia la homaro devus esti, sed ne estas: belaj, kuraĝaj, lojalaj, memsufiĉaj. Ili kapablas profundan amon kaj malamon, kiel la homo — sed en la sovaĝejo la malamo malpli evidentiĝas ol la amo. Sovagaĵoj mortigas por akiri manĝaĵojn, aŭ pro sindefendo, aŭ por defendi siajn idojn. Ili ne

estas konscie kruelaj. Estas nenia ruzo en la sovaĝejo, nenia hipokriteco kaj nenia ŝajnigo. Estas nenia malpureco aŭ avareco aŭ aĉeco, kiel estas en multaj homaj vivoj.

Kaj tamen — nenio el ĉi ĉio respondas la demandon: „Kial mi amas la naturon?”

La amo al la sovaĝejo estas profunde en mi, — parto de mia ekzistaĵo. Estas io en mia animo, kio estas parenca al ĉiuj kreitoj etaj kaj molharaj, ĉiuj estaĵoj sovaĝaj kaj liberaj. Kiam mi rigardas en la okulojn de sovaĝa besto, mi vidas mian propran animon tie spegulita, kaj mi sentas komprenon, kiun mi ne sentas kun homoj. Neniu belaĵo homkreita povas emocii min tiel forte kiel la spektaklo de birdino, trankviligante sur siaj ovoĵoj; familio de junaj kuniklidoj aventurantaj sur la juna herbo; aŭ la larĝa etendaĵo de la rivero brila kaj arĝenta inter la verdjunkaj bordoj, trankvila, kun nepentrebbla indeco.

La amo al la sovaĝejo estas elementa. Ĝi etendiĝas al la plej malproksimaj profundaĵoj de la koro. Por tiuj, kiuj lernis scii kaj kompreni la naturon, la „plezuroj” de la tago ŝajnas esti malplenaj sencelaĵoj, vibrantaj sur la menso; kaj mi ĝojas foriĝi de vana babilado kaj malakorda sono, al la profunda silento kaj ĝoja muziko de la sovaĝejo.

„Scii kaj kompreni” — eble en tio kuŝas la ŝlosilo — ĉar rilate la Naturon, kompreni ĝin, estas ami ĝin. Lerni la signifon de ĉiu sono en la aero — rigardi en la sanktajn sekretojn de la sovaĝejo — tio estas la plej plena edukado, kiun la vivo povas doni.

Mi vivis inter homoj unuflanke, kaj inter sovaĝaĵoj aliflanke; — kaj la homoj ofte perfidis min kaj mankis en la horo de bezono; sed la naturo neniam mankis, kiam mi iris al ĝi kun ĝoja aŭ dolora koro. Ĉu mi ridis? — la birdoj kantis ĝojkantojn — Ĉu mi ploris? — la ĉielo ankaŭ ploris.

Do, kiam mi estas libera, mi forlasas ĉi tiun mondon de pene-gantaj, serĉantaj homoj, kaj iras al la solecaj etendaĵoj de la sovaĝejo. Tie, apud marĉoj kaj riveroj, en arbaroj kaj kampoj, mi trovas spektaklojn kaj sonojn sennombrajn por interesi min; belecon, kiu trankviligas mian animon, kaj plenigas ĝin per radianta gajeco; harmonion, kiu kuracas la ĉagrenojn de la tago.

Ĉar mi opinias ke nur en la vivo de la sovaĝejo, en la kvietaj solecaj lokoj, kie loĝas nur sovaĝaj kreitoj, estas paco sur la tero hodiaŭ kaj tio estas vere „la paco de Dio, kiu preterpasas ĉian komprenon.”

El „La Verda Folio”.



DIMANCO.

Je dimanĉo la familio matenmanĝas per oleokukoj kaj kakao. Post tio Patro kaj la kvar grandaj infanoj iras al la preĝejo en la vilaĝo. Patrino restas en la hejmo: Ŝi jam revenis de la preĝejo antaŭ la matenmanĝo, ĉar ŝi iris al la frua meso.

La kudro-maŝino denove aperas kaj baldaŭ Patrino laboras per ĝi. Ramono estas en la ĝardeno: li pilkludas per oranĝo. Gracia ludas per la pupo: la knabineto estas riĉa, ĉar ŝi nun posedas pupeton. Si ridas gaje.

„Gracia estas la suneto en nia domo,” Patrino ofte diras.

Dum la tagmanĝo Patro diras: „Pablo! ĉu vi povas promeni bone?”

„Ho jes! Patro!”

„Bone! Ĉu vi ŝatas iri kun s-ro Delmonto al Monte?”

„Ho jes! Paĉjo! Kiam?”

„Je mardo aŭ merkredo, tion mi ankoraŭ ne scias.”

„Ĉu morgaŭ, Paĉjo?”

„Ne, morgaŭ estos lundo, postmorgaŭ estos mardo, kaj post tio sekvos merkredo.”

„Kaj hieraŭ estis sabato, ĉu ne Paĉjo?”

„Jes! Kaj antaŭhieraŭ estis vendredo!”

Post la tagmanĝo venas la siesto. Patrino ne dormetos, sed ankaŭ por ŝi venas kelkaj horoj de ripozo. Ŝi sidas sur komforta seĝo en la ĝardeno, antaŭ la domo kaj rigardas al la homoj sur la ŝoseo. De tempo al tempo najbarino aŭ virino el la vilaĝo venas babilu, ĉar estas la horo de babilado, „la tertulia”.

Mendu viajn esperantajojn ĉe TJO-Centro.

Por komencantoj.

Vengo.

„En la urbeto New Britain en Usono, staris en iu butiko, en la elmontrejo, kristnaskvireto. Kvin jara knabeto preteriris, kaj subite li ĵetis ŝtonon al la pupo malantaŭ la vitro.

Lia patrino ektimiĝis, kaj demandis: „Kial vi faris tion?”

„Car li ne alportis al mi la biciklon, kiun li jam la antaŭan jaron promesis!”

Ne tute ĝuste!

Lernanto por la unua fojo devis detérmini la lokon sur la maro, kie la ŝipo troviĝis.

Li longe mezuradis kaj kalkuladis. Fine la kapitano demandis pri la rezultato.

La lernanto diris sian solvon.

La ŝipestro respondis: „Do demetu vian ĉapon, ĉar laŭ vi ni estus meze de la Westminster-Preĝejo!”

Tro multe da gastoj.

Malriĉa hispana nobelo estis tre fiero. Iam li vagadis tra Francujo. Iun vesperon li alvenis en malgranda vilaĝo. Ventegis, kaj torente pluvis. La sinjoro estis tre laca, kaj malseka ĝis la haŭto. Fine li trovis gastejon, la solan en la vilaĝo. Li frapis sur la pordon, sed ĝi restis fermita. Finfine malfermiĝis fenestreto en la subtegmentejo.

„Kiu estas tie, kaj kion vi deziras?” sonis la voĉo de la mastro.

La fierulo respondis: „Mi estas Don Juan Pedro Fernandez Rodriguez di Villa, grafo de Malaffra, sinjoro de Santiago kaj Aliandaro, kaj petas tranoktejon!”

„Por tiom da sinjoroj mi ne havas ĉambrojn!” respondis la gastejestro, kaj li ĵetfermis la fenestreton.

La alta sinjoro devis pasigi la nokton ekstere.

Respondu al jenaj demandoj: Tra kiu lando vagadis la nobelo? Al kiu nacio li apartenis? Kien li iam venis? Kia estis la vetero? Kial la sinjoro serĉis gastejon? Ĉu estis multaj gastejoj en la vilaĝo? Ĉu la sinjoro povis:

malfermi la pordon de la gastejo? Kion li faris? Ĉu oni tuj aŭdis lin? Ĉu oni malfermis la pordon? Kie aperis la mastro? Ĉu la nobelo simple petis tranoktejon? Kial la gastejestro ne malfermis la pordon? Kie la sinjoro devis dormi?

Muzikŝato.

Doktoro Johnson (prononcu Ĝonson), angla aŭtoro de la dekoka jarcento, ne tre ŝatis muzikon. Tamen lia amiko, doktoro Burney (Berni), muzika historiisto, kondukis lin en koncertejon. Lerta violonisto ludis malfacilegan komponaĵon. Johnson aspektis malatente, kaj por interesi lin, Burnley atentigis lin pri la malfacileco de la muziko.

„Sinjoro,” respondis Johnson, „mi dezirus, ke ĝi estu neebla!”

Leonard Waite, Whitstable (Brit.).

Trovita.

Maljuna sinjorino: „Ĉu vi perdis la vojon, bubeto?”

Ploranta knabeto: „Ne, sed mi trovis straton, kiun mi ne konas!”

La „spertulo”.

Sinjorino: Ĉu mi momenton povus paroli kun la ministro de terkulturo?”

Sekretario: „La ministro momente estas tre okupita. Pri kio vi deziras paroli kun li?”

Sinjorino: „Mi volas peti lian konsilon. Mi havas geranion, kiu estas mortonta!”

Li ne fumis.

En bretona vagonara kontrolisto rimarkis en kupeo por nefumantoj sinjoron, kun granda pipo en la buŝo.

„Vi ne rajtas fumi ĉi tie,” li diris al la vojaĝanto.

„Ĉu mi fumas?” respondis la viro.

„Vi havas pipon en via buŝo!”

„Jes, efektive!” rebatis la alia. „Mi ankaŭ havas ŝuojn sur miaj piedoj. Ĉu mi marŝas pro tio?”

(laŭ „La Verda Flamo”).

LUDOJ (Aero, tero, akvo).

La ludantoj staras en rondo, ĉirkaŭ la gvidanto. Ĉi tiu rigardas al unu el ili, kaj diras ekzemple: „aero”. Samtempe li malrapide fetas pilkon al la konkerna persono. Ĉi tiu tuj devas diri la nomon de birdo kiu flugas en la aero, kaj kapti la pilkon. Se li ne kaptas la pilkon, aŭ ne sufiĉe baldaŭ scias bonan nomon, li ricevas „kontraŭ-poen-ton. Kiu havas 3 „kontraŭ”-poentojn, ne plu rajtas kun-ludi.

Se la gvidanto diras la vorton „tero”, oni diru la nomon de besto, kiu vivas sur la tero, kaj ĉe la vorto „akvo” la nomon de akvobesto. Kiam la gvidanto diras „fajro” oni ne rajtas kapti la pilkon; kiu tamen faras tion, ricevas kontraŭ-poen-ton.

Estas konsilinde, ke la gvidanto antaŭe anoncu ĉi tiun ludon, por ke le lernantoj antaŭe lernu sufiĉe da bird-, fiŝ- kaj terbestaj nomoj.

II

Sur tablon oni metas ekzemple 24 diversajn objektojn, kaj kovras ilin per tuko. Kiam la ludantoj envenas la gvidanto forprenas la tukon, kaj dum unu minuto ili rajtas rigardi la objektojn Tiam la ludgvidanto ree kovras ilin, kaj la ludantoj en kvin minutoj devas noti ĉiujn nomojn de la objektoj, kiujn ili memoras. Kiu havas la plej multajn nomojn, estas la gajninto.

Nia trezorejo.

P. D.: f 2,80; s-ino M. en N. Y.: f 0,73 (ambaŭ en Usono); N. N. en H: f 2,50; L. en L.: f 1.—; J. J. R. en S.: f 2,52; B. en G.: f 2.— (ĉiuj en Nederlando); H. A. en K. L.: f 0,26; F. A. en W.: f 0,52; R. D. L. en T.: f 0,52; F. R. en D.: f 0,52; J. H. en B.: f 5,20; H. T. en D.: f 2,60 (ĉiuj en Britujo). (Raporto de septembro ĝis januaro).

Korekto: Abonanto de „LJV” (ruso) atentigis nin pri kelkaj eraroj en la letero de d-ro Zamenhof al Borovko, kiu aperis en la novembra numero de „LJV”: Ne estas konditorskaja, sed konditerskaja. — Ŝvejcarskaja signifas: pordistejon (ne drinkejon).

Se vi ankoraŭ ne pagis vian kotizon, bonvolu tuj fari tion! Kiu deziras finiĝi sian abonon, tion scilgu al ni.

NIA TUTMONDA FAMILIO.

..... La celo de TJO: „tutmonda interfrateco“ devas venkil
Por tiu celo devas labori ĉiu Esperantisto, kaj precipe la junularo
kaj junaj homoj

Ivan Steinberger, Klagenfurt (Aŭstr.).

..... Bedaŭrinde ni ne povos partopreni en la kunveno en
Ipswich. Ni tre ĉagreniĝas pro tio, ke ni ne povos akompani vin
al Anglujo, por kanti nian karan himnon, kaj ni envas tiujn, kiuj
povas fari tion. Tamen, ni spirite akompanos vin, kaj ni deziras
al vi feliĉajn tagojn kaj celtrafan kunvenon!

Esp. Rondo „La Vekigo“, Barreiro (Port.).

..... Mi neniam havis la grandan feliĉon partopreni interna-
cian Esperanto-kongreson, kvankam tio estas unu el miaj plej for-
taj revoj. Sed ankaŭ neniam antaŭe la revo tiel persiste regis min,
kiel nun, kiam estas en preparo la TJO-kunveno en Anglujo! Mi
preskaŭ ne plu havas mensan trankvilon pro la sopiro iri al Ips-
wich. Sed — ekzistas nur unu grava malhelpaĵo: la mono por la
vojaĝkostoj. Mi tro malmulte enspezas per mia laboro en oficejo.
Nur unu espero ekzistas: mi klopodos dungigi min kiel provizora
maristo en iu ŝarĝŝipo, veturonta de Finnlando al Anglujo. Mi
laros ĉion por efektiviĝi mian grandan revon!

Allan Mehtonen, Oulu (Finl.).

Opinioj pri „La Juna Vivo“: „La gazeto meritas abonon
pro siaj prilingvaj materialoj, sed estas dezirinde, ke ĝi tuŝu aktu-
alajn problemojn, kiuj fortege interesas la nuntempan demokratian
junularon

„.....“ Fine mi volas esprimi mian admiron pri la bela, tre
taŭga, instrua gazeto „LJV“. Ĉiam mi ĝojas, kaj legas ĝin tuj kaj
tute”

„.....“ Mi preferus ankoraŭ pli da interesaj artikoloj pri diver-
saj temoj

Volonte ni ricevos tian kritikon kaj dezirojn. Sed ankoraŭ pli ĝojaj ni
estus, kiam la junuloj mem iom verkus por „LJV“! Ni nur malofte ricevas
taŭgan materialon, kaj ĝenerale eĉ tio nur de pli aĝaj homoj. Juraj geamikoj,
se hontu, se vi ne estas spertaj verkantoj! Ja gravas la enhavo!

Red.

TJO RUBRIKO.

Adresŝanĝo: La adreso de Floor Meydam (la sekretario) nun estas: Lingedijk 28, Leerdam.

Novaj Ĉef-perantoj: Pro personaj cirkonstancoj la ĉefa TJO-peranto Jaromir Jermár ne plu povos plenumi sian taskon. Ni multe bedaŭras tion. Elkore ni dankas lin pro tio, kion li faris en la intereso de TJO, kaj esperas, ke lia anstataŭanto same sindone laboros por nia movado. Le ĉeĥoj do bone notu la adreson de la nova ĉefperanto: **Frant. Mašek, Karlovy Vary, Janáčkova 1.**

S-ro jaromir Jermar mem rekomendis lin, do ni certe plene povos fidi je li!

Ankaŭ en **Cinujo** anoncis sin Ĉefperanto. Ni tutkore bonvenigas lin kiel la unuan ĉinan TJO-anon. Certe lia tasko ne estos facila, ĉar ĝis nun TJO ne estas konata en lia lando. Li ofte devos labori memstare, ĉar la poŝtaĵoj al Cinujo devas longe vojaĝi, kaj provizore persona kontakto kun la estraro estos neebla. Tamen laŭ liaj leteroj li estas entuziasma junulo, kiu jam hardiĝis en la verda batalo!

Jen kiel li mem prezentas sin: **Nomo: Zekun. — Adreso: P. O. Box 77, Chengtu. — Aĝo: 21-jara. — Ano de: Cengtua E-rondo, Koresponda Ligo, Cengtua Filio de K.E.L., Cengtua Filio de Cina E-Ligo, Cina-Ligo, Cengtua-Ligo. — Postenoj: Direktoro de la Internacia Fako de Cengtua E-Ligo, Redaktoro de Cina Revuo, Instruisto de Elementa E-kurso, Gvidanto de „La Verda Stelo“-Ĥoro.**

Kiel la trian en la rondo ni prezenta al vi **Kaj Pedersen**, kiu akceptis la ĉefperantecon en **Danujo**. Jen lia adreso: Chr. Hansensvej 4, Holbaek. Espereble ankaŭ Danujo baldaŭ havos fortan TJO-sekcion, dank' al la vigla laboro de la nova ĉefperanto! Ĝis nun oni ne multe propagandis en lia lando, do kuŝas vasta tereno antaŭ li! Multan sukceson ni deziras!

GENERALAJ SCIIGOJ.

Esperanto en la lernejo. Dank'al la vigla laboro oni en Hungarujo akiras bonajn rezultatojn: La ministro de Komerco, Aleksandro Rónai, permesis ke Esperanto estos instruata kiel eksterordinara studobjekto en ĉiuj hungaraj mezgradaj komercaj lernejoj (por 14-18-jaraj studentoj). Oni komencos la instruadon, jam en la nuna lerneja jaro.

Similan sukceson oni atendas en la mediaj lernejoj. Sed la plej grava tereno estas la ĝeneralaj lernejoj (por 6-10-jaraj lernantoj). Jam oni havas la promeson de la kompetentaj instancoj ke de septembro 1947 Esperanto povos esti instruata en la kadro de libere elektblaj studobjektoj ekde la V-a klaso, por 10-11-jaraj lernantoj.

En katolika liceo en Venlo (Nederlando) oni instruas Esperanton al 40 knaboj.

Aŭstrio: En la jaro 1946a fondiĝis „Aŭstria Societo de Amikoj al Esperanto”, kiu celas atentigi la vastajn publikajn rondojn pri niaj lingvo kaj movado, kaj ĉefe pri la enkonduko de Esperanto en la lernejo. Certe sekvida ekzemplo!

La sideja adreso estas: Wien I, Neutorgasse 9.

Kio estas „La Verda Junularo”? Ĝi estas grupo da junuloj en Landeck Aŭstrio, parto de la loka Esperanto-Grupo (sekcio de AEF). La celo estas kreskigi la ideon de d-ro Zamenhof inter la junularo. La junaj anoj portas dum kunvenoj kaj ekskursoj blankajn ĉemizojn aŭ bluzojn, kun verda kravato, sur kiu verda stelo sur blanka fono. Dum la venonta somero ili organizos ĉiajn ekskursojn kaj tendumadojn. Kaj jam venis invito por TJO-anoj, por partopreni. Kiu do ŝatas iri al Tirol bonvolu turni sin al Alois Hilkersberger, Landeck, domo „Espero”, Tirol, Aŭstrio.

Fondiĝis „Universala Akademio de Kosma-Astrologia Regado”. La Akademio okupos sin pri la studado de okultaj sciencoj. La sidejo estas en Trieste, Via Carducci, 12/III p, Italujo, kie oni povas akiri ĉiujn informojn.

S-ro Pierre Delaire, direktoro de la Nacia Centra Esperanto-Oficejo en Orléans, sukcesis enkonduki Esperanto-kursojn ĉe la oficiala franca radio. Liaj kursoj okazas je 4317 m, ĉiumerkrede de 10.15—10.35, en la programo de la oficialaj instruaj elsendoj.

La Esperanto-Oficejo organizis naciajn konkursojn por francaj komentantoj. Al la tri sendintoj de la plej belaj leteroj en Esperanto, ĝi donacos senpagan vojaĝon al la Berna Kongreso. Gravaj ĵurnaloj anoncis tiun konkursojn. La sekvo estas la alfluo de miloj da aŭgpetoj al la perkoresponda kurso.

Esperanto-programo de Praha: Ĉiutage de 19.00—19.15, je ondlongoj de 31.41 m kaj 1961 m; ĉiutage de 23.00—23.15, je ondlongo de 49.92 m; lunde kaj ĵaŭde de 23.50—24.00, je ondlongo de 470 m (Praha I): Ĉiuj horindikoj estas laŭ mezeŭropa tempo. Post la 23-a de februaro '47 la stacio Praha elsendos unu horon pli frue, kaj dum la somera sezono (versajne de la 7-a de aprilo) du horojn pli frue. La horoj de la mallongonda programo restos samaj.

Fondiĝis Portugala Esperanto-Ligo. Ĉar la strukturo de la Ligo estas absolute supertendenca, ĝi akceptas ĉiujn esperantistojn neŭtralaĵn kaj laboristajn. P.E.L. kunligos ne nur izolitajn esperantistojn, sed ankaŭ Esperanto-rondojn. Adr: Apartado 125, Lisboa-N.

Pola Radio elsendas esperantlingvajn programojn je la 21-a h. 10, (Greenwich tempo). Danku al „Po'skie Radio, Warszawa, Koszykowa 8.

Sveda Junlarkunveno en 1947. La sveda TJO-sekcio kaj Esp. Fed. aranĝas somerkunvenon (tendkampon) en Jursla, apud Norrköping de 12-15 julio (tuj post la int. somerkurso en Skövde). Pri la programo kaj ceteraj aranĝoj ni informos poste. Por entuziasmigi la svedajn gejunulojn por vera Esp-laboro, necesas, ke venos eksterlandaj vizitantoj. Do — se iu volas veni al Svedlando ĉismere, bonvolu skribi al: Karl E. Andersson, Jursla 5, Aby, kaj li faros sian eblon helpi, se troviĝas malfacilaĵoj. Kompreneble vi restos pluraj tagojn en Svedujo!

RICEVITAJ ESPERANTAJOJ.

En Ĉinio batalanta: 100-p. libreto, verkita de japana virino (edzino de ĉino), kiu priskribas siajn travivaĵojn en Ĉinio dum la milito. Eldoniĝis en Chungking en majo 1945. Prezo neindikita.

Patrineto: 79-paĝa libreto, verkita de S.Y., el la ĉina lingvo tradukita de S. M. Chun. Aperis en Chungking en 1942. Ĝi estas priskribo de virina vivo en Germanujo en la jaroj 1933-1939. El „Rezistmilita Literaturo“, organo de l' antijapana Ligo de Ĉina Tutlanda Literaturistaro. Prezo ne indikita.

La Vera Historio de A.H.C., de Lu-sin, el la ĉina lingvo trad. S. M. Chun. 79-paĝa libreto, eldonita de Koresponda Esp. Lernejo, P.O. Box 175, Chungking, Ĉinio.

Reveno: — Milittempaj rakontoj. El la ĉina lingvo trad. S. M. Chun. Eldono de Heroldo de Ĉinio en 1942.

Heroldo de Ĉinio, novembro 1941, speciala eldono pro la arĝenta jubileo de s-ro Kuo Mo-ĵo, fama ĉina verkisto. Adm. adreso P.O. Bx 175, Chungking, Ĉinio.

Prospek'io „Literatura Mondo“, ricevebla de la adm: Röck Szilard u. 28, II. 18, Budapeŝt VIII, Hungarujo.

Esperanto-Tago.

S-ro M. C. Rodriguez, eksdelegito de UEA en Meksiko verkis artikoleon en „Renovigo“, en kiu li pledas por la enkonduko de speciala „Esperanto-tago“, kiun oni en la tuta mondo festos per ĝojaj kaj publikaj manifestacioj. Li rakontas, ke en Meksiko estas specialaj tagoj por solenigi aŭ memoriĝi diversajn okazintaĵojn aŭ personojn, ekz. estas specialaj tagoj por honori la fagon, la patrino, la majstron, la soldaton, la infanon, la arbon, ktp. Certe ĉiuj landoj havas siajn naciajn festotagojn. Kaj internacie ja estas konate, ke oni je la unua de majo honoras la laboron.

Li proponas, ke oni kiel Esperanto-tagon elektu ekzemple la 5-an de decembro (la naskiĝtago de Esperanto, 1878), aŭ, se oni opinias tion pli konvena, la 14-an de julio (la dato en kiu aperis la unua broŝuro de Esperanto).

Ĉiokaze ĝi estas sufiĉe grava propono, kiu meritas ĉies atenton. Esperable oni en la venontaj kongresoj serioze pritraktos la temon. El propaganda vidpunkto estas dezirinde, ke ni baldaŭ festu en la tuta mondo nian Esperanto-tagon, dum kiu el la domoj de ĉiuj gesamideanoj flirtados la verdaj flagoj.

KORESPONDADRESOJ

Britujo: S-ro Robert Harding, 30-j. lignajisto en Sipkonstruejo dez. intera. let. k. il. poŝtk. k. ĉ. l. Adr.: 8, Cuthert Tce, Jarrow, Durham.

Bulgarujo: Kostadin Otonov, 20-j, str. „Ferdinand I“, 79, Asenovgrad, dez. kor. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Resp. certa.

Franco: Roland Chaudron, 17-jara, deziras korespondantojn. Adr: Magné, Deux Sèvres.

S-ro G. Trémon (23-j.), Maison de Repos, Penne d'Argenais, Lot et Gne, dez. kor. Li bezonas por filatela ekspozicio propagandilojn: fil. afr. let. kaj bild., ĵurnalojn, aŝsojn, glumarkojn, ktp.

Hispanujo: S-ro José Ibers Jorner, Riegosy Fuerza del Ebro, Reus (Taraĝona), 24-j. inĝeniero, dez. kor. kun ĉiuj landoj.

Nederlando: 35 ge'ernantoj, 10-55-jaraj, dez. kor. individue, kaj 8 ge'knaboj (10-15-jara) dez. kor. grupe. Respondo certa. Skribu al la gvidanto: Jac. Vonk, Zuiddijk 302, Zaandam (NH).

P. M. Portegies serĉas korespondant(in)on en Milano aŭ ĉirkaŭajo. Adr.: Koningin Emmalaan 20, Leerdam (ZH).

S-no T. v. Altena-Visser, Breedpad 19, Heerenveen, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Interŝanĝas ilustritajn poŝtkartojn.

S-ino Jurriaans, Koningslaan 13, Bussum, deziras korespondi kun eksterlandaj virinoj pri aktualaj temoj.

Polujo: S-ro L. Gwiazdowski, Wroctaw, Politechnika, ul. Cypriana Nowoida, deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri hemio.

NIA STOKO.

Jus aperis: „Vivo de Zola“: Aŭg. de Silva — el la portugala lingvo tradukita de Manuel de Freitas.

Ĉiu esperantisto nepre posedu la biografion pri la fama franca verkisto Zola! Prezo: f 1,50

La Vivo de l' Eskimoj: Prof. Aŭg. da Silva — el la portugala lingvo tradukita de M. F. Prezo: f 0,35

La Ponto: Angel Karaliĉev, el la bulgara lingvo trad. N. Vasilov. Prezo: f 0,15

„La Juna Vivo“ — binditaj jarkolektoj = enhavas abundon da legajo: rakontojn, ŝercojn, anekdotojn, ludojn, kantojn, enigmojn, ktp. Aĉetebaj estas ankoraŭ la binditaj kolektoj de 1934/1935 kaj 1935/1937.

Prezo: f 1,—

Internacia Kantaro „La Juna Vivo“. Prezo: f 0 50

Vortaroj por nederlandanoj: Schidlofvortaro. Prezo: f 2,25

Blok-vortareto: Prezo: f 0,20

TJO-Poŝtpapero: 50 leterfolioj kaj 50 kovertoj: Prezo: f 2,—

Ĉiuj prezoj estas ne-afrankitaj.

Varbu Esperantistojn per nia simpla ŝkriba kurso. Prezo f 4,— (inkluzive korektado!). Mendu ĉe TJO-Centro.


Internaciaj ferioj por Esperantistaj infanoj. Dum aŭgusto 1947 kun proksimume tutmonata daŭro okazos „libertempa kolonio” aranĝita de G.E.E. (Grupo de Esperantistaj Edukistoj en Francujo) por 11-14 jaraj infanoj. Simila okazis pasintjare kun granda sukceso. Partoprenis, anglaj, francaj k. nederlandaj infanoj.

Grupoj kaj societoj, gepatroj: venigu infanojn! Per la infanoj Esperanto venkos. Pli detalajn informojn ricevos ĉiu, kiu sendos respondkuponon al la prezidantino de G.E.E.: f-ino Jeanne Dedieu, Profesorino, 3 rue Arzac, Toulouse, Francujo.

PERANTOJ.	TJO	LJV
Aŭstrujo: Johann Leopold Germela, Thongasse 5/3/12, Wien III/40.	8,65 \$	5,20 \$
Belgujo: C. Braet, Esscheboomstr. 1, Brugge, ĝiro 4770.86	40 fr.	24 fr.
Britujo: F.ino Rees, „Derwydd”, Seven Sisters, Neath, Glam. Wales	5 ŝil.	£ 3
Ĉeĥoslovakujo: Frant. Masek, Karlovy Vary, Janáčkova 1	50 kčs	30 kčs
Ĉinujo: S-ro Zekun, P. O. Box 77, Chengtu.		
Danujo: Kaj Pedersen, Chr. Hansensvej 4, Holbaek	4 kr.	2½ kr.
Finnlando: Allan Mehtonen, Oulu, Isokatu 67	125 fmk.	75 fmk.
Francojo: S.ino Turin, Instruistino, Trépot, Doubs. Ĝironumero 287.02, Dijon.	100 fr.	70 fr.
Hispanujo: Octavio de Diego la Rosa, Baltazar Gracián 12-3º, Zaragoza	12 pes.	7 pes.
Italujo: Prof. Camuffo Armando, v. Bartolomeo, d'Alviano 4 IV, Trieste	215 L	130 L
Portugalujo: A. P. da Silva, Quinta do Ferro, Rua B. No. 28—20 Dto, Lisbono	25 esk.	15 esk.
Svedujo: K. E. Karlsson, Upplandsgatan 69, Stockholm, ĝironumero 252674	4 kr.	2½ kr.
Svisujo: Eugen Klee, Brasselmühle, Rheineck	4 fr.	2½ fr.

<p>Abonu „Internacia Kulturo”, la progresema, demokrata revuo de la Balkanlandoj. Grandformata ilustrita revuo, enhavanta bonstilaĵojn, interesajn artikolojn. Abonkotizo por 16 numeroj: f 6.— Mendu ĉe TJO-Centro!</p>	<p>Mendeblaj antaŭpage ĉe f-ino A. H. C. Thewes, Kortemeesstr. 26, Bergen op Zoom (afrankite), por Nederlandanoj: Vivo de Zola: f1,50; La Araneoj: f 0,35; La Vivo de l'Eskimoj: f 0,35; Batalo pri la domo Heikkilá: f 0,50; La Fianĝigo-Lea: f 0,50; La Botistoj: f 0,75. Jarabono „Monda Revuo II.”: f 4.— Pagoj nur je poŝtĝirkonto sub nomo de f-ino A. Jansen, Bergen-op-Zoom, No. 399352.</p>
<p>Propagandu per la TJO-Poŝtpapero! Prezo: 50 kovertoj kaj 50 leterfolioj. 2.— guldenojn. — Leterkartoj: po 1½ c. 50 ekz. por f 0,65.</p>	<p>Kelkaj partoj de ĉi numero estas ne-korektitaj. Oni do bonvolu pardonu eventualajn preserarojn.</p>

LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO”

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
 ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 1,50 NED. GULDENO AŬ EGALVALORO.

Por progresintoj.

PARTO EL LA KONGRESA PARÓLADO DE D-RO ZAMENHOF EN CAMBRIDGE (12-17 Aŭg. 1907).

„..... En Esperantujo regas ne sole la *lingvo* Esperanto, sed ankaŭ la interna *ideo* de la esperantismo; en Esperantujo regas ne sole la oficiala ĝenerala esperantismo, — tie regas ankaŭ io alia, io ĝis nun ankoraŭ ne precize formulita, sed tre bone sentata de ĉiuj esperantistoj — tie regas la *verda standardo*!

Kio estas la verda standardo? Se por iu komercisto, kiu uzas Esperanton nur por vendi siajn komercaĵojn, aŭ por iu sportisto, kiu uzas Esperanton nur por amuziĝi, nia standardo estas simpla signo de nia lingvo, simpla interkonsentita dekoracio por niaj kongresoj kaj institucioj — ni, esperantistoj-batalantoj, certe vidas en nia standardo ion alian: ĝi estas por ni io sankta, ĝi estas la signo, sub kiu ni marŝas al nia paca batalado, ĝi estas la voĉo, kiu konstante memorigas al ni, ke ni laboras por Esperanto nur tial, ĉar ni esperas, ke pli aŭ malpli frue, eble post multaj jarcentoj

Sur neŭtrala lingva fundamento
 Komprenante unu la alian
 La popoloj faros en konsento
 Unu grandan roŝdon familian.

Ni konstante ripetadis, ke ni tute ne deziras nin enmiksi en la

„Nu, vi do diru ludeton, Pinjo-injo! Kion vi ŝatus fari?”

Kaj la eta Pinekinjo donis, inter du plorsingultoj, la mirigan respondon: „Pinekinjo — volas — plōri

Momenton la instruistineto staris senpova. Si tiom profunde sentis: Ĉi tie ne eblas helpi. Kiel oni povus helpi, se oni ne komprenas? Evidente do ankoraŭ ne daŭris sufiĉe. Ĉu povus esti bone haltigi ĉi tiun, tiel nepre sin eligantan ĉagrenon, kiel ajn sen signifan kialon ĝi eble havu laŭ plenaĝula vidpunkto? Ho, ŝi facile povus devigi la infanon kuniri. La vortoj jam puŝis sin al ŝiaj lipoj: Stranga infanjo! Ja tute ne estas kialo por plori! Jen venu do! Malantaŭ ŝi sonis ridoj kaj senpaciencaj sonoj de la al ludo sopiranta infanaro. Tie, dum la ludado, la larmoj certe baldaŭ forgesiĝos. Tamen ĉu estos helpo, forgesiĝi la ĉagrenon? Ĉu ne estos pli granda helpo lasi la infanon esti tia, kia ŝi evidente laŭ propra impulso devas esti ĉimomente?

Si altiris seĝeton.

„Nu, tion vi povas, Pinekinjo, se vi tiom ŝatas plori. Sed ek-sidu, tiam vi ne fariĝos tiel laca

Kun la aliaj ŝi ludis. Ŝiaj pensoj estis ĉe Pinekinjo, sola en la malplena klasĉambrego. Kion ŝi nun faras, la etulino?

Kiam ili ree envenis la infano sidis sur sia loko kaj desegnis ruĝajn, brunajn kaj flavajn rondetojn sur peco da nigra papero. La pluan parton de la mateno ŝi partoprenis en ĉio, silentema, pensema, kvazaŭ iu, kiun ĉiuj aferoj multe meditigas. Post la dekdua Pinekinjo rajtis „helpi ordigi”: la granda, granda honoro.

Dum la instruistino apartigis la kolorigilojn, kaj donis la skatoletojn al la infano, por meti ilin en la ŝrankon, ŝi diris pase: „Kiom ĉagrenitaj ni estis, ĉu, Pinekinjo?”

La manetoj restis senmovaj. La ĉiam serĉantaj okuloj fiksitis sin, kun profunda sopiro sur la alturnita vizaĝo.

„Ĉu ankaŭ vi trovas tion tiel ĉagrena?”

„Jes. Kion?”

„Ke ĉiuj belaj floroj, kaj ĉiuj folioj kaj ĉiu suno, kaj ĉiu bela somero estas for.” La voĉeto tremis.

„Jes. Kiom bedaŭrinde, ĉu? Sed ne povis alie.”

Brak' en brako ili iris tra la ventsusuranta aleo. La piedetoj de Pinekinjo paŝetadis apud la pli grandaj, firmaj paŝoj. Kaj kiam la infano jam estis hejme, la instruistino ankoraŭ trairis straton post strato kaj ne povis decidi eniri sian dompordon antaŭ ol ŝi trovis en si mem certan vojon, kiu havigos al Pinekinjo sekuran iron tra ŝia aŭtuna marĉo.

Tiun posttagmezon ŝi rakontis. Kaj rigardante al la vizaĝeto de Pinekinjo, kiu spegulis nuran, kaj intense streĉitan atenton, ŝi sciis, ke ŝi neniam antaŭe rakontis tiel bone. Estis vivo. La multaj burĝonoj kaj branĉetoj kaj folioj, la semeroj kaj floroj, ili ĉiuj ricevis por la infanoj figurojn kaj voĉon.

„Kaj kiam fine pasis la longa, bela tempo de floradō, jen, tiam la semeroj, kiuj el la floroj falis sur la teron, kaj la tre, tre malgrandaj burĝonetoj sur la nigraj branĉoj, kiujn oni apenaŭ povis vidi, ili ĉiuj komencis flustri unu kun la alia, kaj fari planojn. Tiajn belegajn planojn! Kaj la Suno, kiu malantaŭ la nuboj devis ripozi post tiuj longaj someraj tagoj, aŭskultis kaj notis ĉion, por poste rakonti al la Somero, kiam tiu revenos de sia longa vojaĝo”

Pinekinjo aŭskultis kun malfermita buŝeto, ruĝegaj vangoj kaj brilantaj okuloj. Subite ŝi eksaltis en sia benko kaj kriis:

„Morta ne estas morta, ĉu fraŭlino?”

Neniam dum la kvar jaroj de ŝia instruistineco estis en la juna virino, sidanta sur sia alta seĝo, kun ĉiuj siaj sindonaj idoj ĉirkaŭ ŝi, tia ĝojo, kia nun brilanta naskiĝis en ŝi, pro tiu simpla infana diro.

El „Als de windselen breken”, de M. Labberton.

MIA TRAJNO, PRAVE, MALPRAVE.

Nordokcidente de Londono du fervojoj — Metropolitan kaj Bakerloo (subtera fervojo) kuras unu flanke de la alia dum kelke da mejloj antaŭ ol ili apartiĝas sekve de la entuneliĝo de la lastnoma. Ĉi tiu estas la sceno de la sekvanta alegorio.

La du trajnoj ekiras el la stacidomo de kontraŭaj flankoj de la sama perono kaj veturas flankon ĉe flanko. Ni estis en la malgranda Bakerloo; tiu apud ni estis la granda Metropolitan, kiu iom gigantis kontraŭ ni. La homoj en la pli alta vagono rigardis malsupren al ni kun malmulta intereso kaj ni reciprokis senatente.

Tiumomente, mi supozas, la du veturigistoj ekrigardis unu la alian, kaŝe.

„Ĉu tiuj en tia liliputa trajno opinias, ke ili povas konkuri kontraŭ mi? Mi tuj montros al ili, kiu estas la plej potenca!” Kaj la veturigisto de la Metropolitan turnas la funkciigilon. La granda trajno komencis antaŭenrapidi kaj preteriri nin. Tiam io notinda okazis. La homoj en la pli alta vagono apud ni ekinteresiĝis, kaj ni sentis same. La ŝanĝo estis evidenta. Ili estis ĝojaĉantaj je ni!

senti, ke ĉi tie estas la juna Esperantistujo kaj ĉi tie estas la hejmo, ĉi tie oni ne nur renkontas nederlandanojn, francojn, anglojn, ktp, sed antaŭ ĉio gejunulojn-kamaradojn!

La sola terura afero estis, ke la tempo tro rapide forflugis. Oni fakte malĝojigis, kiam oni konstatis, ke nun ne plu daŭras tiu bela kunveno, ke oni devas veturi hejmen. Kaj restas nur la grandaj, belaj memoroj pri la kamarada kunestado, pri la agrablaj vesperoj, la kampfajroj, la ekskursoj, ktp. ktp. Dank' al Esperanto oni preskaŭ forgesis, ke oni iras sur fremda tero, en fremda, malproksima lando, per aliaj vortoj: Oni ne povas tro alte taksii la valoron de Esperanto; Ĝi estas potenca ilo!

Mi ofte komparas nian modelan laborkunsidon en la lernejo kun similaj internaciaj kunsidoj de ne-esperantistaj organizoj. Ni, junaj esperantistoj, estu fieraj pri nia granda ilo Esperanto!

Persone mi esperas, havi eblecojn viziti venontajn TJO-kunvenojn kaj denove ĝui kelkajn belajn tagojn.

Ni ĉiuj helpu, por ke la kunveno 1947, en Anglujo, estu grandega sukceso!

Finfine mi tre modeste volas transdoni oficialan dankon al ĉiu, kiu helpis min en mia malfacila vojaĝo al Belgujo, kaj precipe mi turnas min al kamarado Braet, s-ro Cortvriend, ges-roj Debaene, f-ino Kerstens, f-ino Alberte Debaene kaj s-ino Eveline Lannicof en Bruselo.

Vivu TJO! Vivu Esperanto!

K. E. Karlsson.

TJO-RUBRIKO.

La sveda ĉefperanto proponis starigi „skoltan rubrikon” en „La Juna Vivo”. — Hazarde venis simila propono de nia ĉeĥa ĉefperanto. — Volonte ni scios la opinion de niaj legantoj rilate tion!


En la februara numero staras la danaj kotizoj erare notitaj: devas esti: 5 kr. por TJO-anoj, kaj 3 kr. por abonantoj.

Jen nova adreso de la ĉeĥa ĉefperanto: S-ro Frant. Mašek, Karlovy Vary, Trida krále Jiriho 17.

La ĝironumero de la itala ĉefperanto estas P.ĉ.K. 11.5277.

Pri Ipswich: Bedaŭrinde ni ankoraŭ ne ricevis detalajn sciigojn el Britujo. — Tamen ni estas certaj, ke niaj britaj geamikoj streĉe laboras, kaj ni ne dubas pri la rezultato! Ja ne estas facile en la nuna tempo organizi grandan, tutsemajnan kunvenon! Vi povas helpi en tio, se vi sufiĉe frue anoncas vin al: F-ino N. Rees, Derwijdd, Seven Sisters, Neath, S. Wales (vidu la antaŭan Non de „LJV”). Anoncis sin ankaŭ 25 svedoj!

LA KAVERNO-LOGANTOJ.



Ili ankoraŭ supreniras. De tempo al tempo veturas aŭtomobilo kun turistoj preter ili.

„Cu ni nun estas en la montaro?” demandas Pablo.

„Ho ne!” respondas s-ro Delmonto. Ni estas en la mont-*et*-aro. Apud la urbeto San Mateo estas monto: „La Pico de las Nieves”. Vi vidos ĝin baldaŭ.”

Ili *preter*pasas la domar-*eto*N Atalaja (Atalaya). Ĝi konsistas el nur kavernoj: ĝiaj loĝantoj estas kaverno-loĝantoj. Ili montras la internoN de la loĝejoj al turistoj kaj petas almozojn. Ankaŭ nun ili faras tioN. Jen alvenas aŭtomobilo kun *gesinjoroj*. *Geviroj* kaj *geknaboj* kuras al ĝi, volas montri la kavernojn. La *gesinjoroj* rifuzas; ili nun petas monoN. Unu el la *sinjoroj* donas moneroN al knabo, sed ankaŭ la aliaj *geknaboj* petas kaj streĉas la manojN. La aŭtomobilo forveturas kaj kelkaj knaboj krias insultajn vortojN. Ili kriegas.

„Ili estas fi-knaboj”, diras Pablo. „Ili insultas kaj petas almozojn! Ba!”

ar

arb-o	arb-ar-o	insul-o	insul-ar-o
bird-o	bird-ar-o	mont-o	mont-ar-o
dom-o	dom-ar-o	mont-et-o	mont-et-ar-o
foli-o	foli-ar-o	ŝtup-o	ŝtup-ar-o
hom-o	hom-ar-o	vagon-o	vagon-ar-o
il-o	il-ar-o	vort-o	vort-ar-o

almoz-o	insult-i	pet-i	ŝtup-o
aŭtomobil-o	intern-o	preter	vagon-o
don-i	la kavern-o	preter-pas-i	vort-o
for-vetur-i	loĝant-o	rifuz-i	
insult-a(j)	moner-o	streĉ-i	
100 cent	199 cent	naŭdek naŭ	100.000 centmil
101 cent unu	200 ducent		1000.000 miliono
102 cent du	800 okcent		0 nulo
110 cent dek	950 naŭcent kvindek		
111 cent dek unu	1000 mil		
118 cent dek ok	1100 mil cent		1923 mil naŭcent
120 cent dudek	1700 mil sepcent		dudek tri
123 cent dudek tri	2000 dumil		
130 cent tridek	10000 dekmil		1934 mil naŭcent
170 cent sepdek	15000 dek kvin mil		tridek kvar

Ekzerco. Enmetu as aŭ i: Pablo pov.. kant... Gracia ŝat.. lud... La viro vol.. bat.. la hundoN. La instruisto pov.. instru... Ni lern.. danc... Felipo vol.. leg.. libroN, sed li ne pov.. leg.. ĝiN. Ĉu vi ir.. promen..? Ĉu vi vol.. skrib..? Ĉu vi pov.. kalkul..?

Gramatika enhavo: la nombroj: 100—1000.000; la sufikso: ar; la prepozicio: preter; ripetado: N, ge, fi, as-i.

Leciono 28.

BELEGAJ PANORAMOJ.



La domar-eto Atalaja estas malantaŭ ili. Ili supreniras belaN vojoN kun altaj arboj; kaŝtan-arboj floras, eŭkalipt-arboj odoras; en la foliaro kantas kanarioj kaj aliaj birdoj. Kaj floroj, multegaj floroj ĉie.

De tempo al tempo estas belega panoramo al montetoj kaj valoj. Sur la kampoj la viroj rikoltas la grenoN: la tritikoN, la hordeoN, la sekaloN kaj la maizoN. Ĉie ŝtaras garboj

Ili jam iras du horojN: la vojo estas longa multajn kilometrojn. „Jen”, diras s-ro Delmonto subite: „vidu: tie kuŝas nia granda monto.” Li montras per la

lingro al la „Pico de las Nieves”. „Ĝi estas alta mil naŭcent kvindek metrojnN.”

Ili atingas la urbetoN San Mateo. „Mi iras fari komisionojn”, diras s-ro Delmonto al la knaboj. „Ripozu duonaN horoN sur tiu benko; mi revenos baldaŭ.”

Li foriras kaj la du amikoj obeas: ili iras al la benko kaj ripozas. Baldaŭ s-ro Delmonto revenas; li aĉetis oranĝojn por ili.

N. (daŭrigo).

La N esprimas tempoN: La knaboj promenas du horojN.
La viro venos jaŭdoN.

La N esprimas mezuroN: La vojo estas longa naŭ kilometrojN.
La ĝardeno estas larĝa dek du metrojnN.
La arbo estas alta kvin metrojnN.
La puto estas profunda ok metrojnN.

La N esprimas prezoN: La oranĝo kostas dek centimojnN.
La libro kostas kvin pesetojn aŭ unu duroN.

La N esprimas pezoN: La sako pezas dek kvar kilogramojN.
La saketo pezas cent gramojN.

la appetit-o	flor-i	larĝ-a	la san-o
ating-i	garb-o	metr-o	la sekal-o
centim-o	gram-o	la mezur-o	tie
ĉie	la horde-o	odor-i	tiu
duon-a	kanari-o	panoram-o	la tritik-o
duon-o	kilogram-o	peset-o	val-o
dur-o	kilometr-o	pez-i	
esprim-i	komisi-o	la pez-o	
eŭkalipt-arb-o	kost-i	put-o	

Ekzerco. Traduku kaj reesperantigu:

Ni deziras al vi: BonaN apetitoN!
 ” ” ” ” BonaN matenoN!
 ” ” ” ” BonaN noktoN!
 ” ” ” ” (BonaN) sanoN!
 ” ” ” ” BonaN tagoN!
 ” ” ” ” BonaN VespereN!
 ” ” ” ” BonaN vojaĝoN!

Gramatika enhavo: la rekta komplemento (daŭrigo): la N en la difinoj de tempo, mezuro, prezo kaj pezo; la korelativoj: tiu, tie, ĉie; ripetado: ar, eg.

Korekto. En la januara numero, je paĝo 104, en la 19-a linio de malsupre, staras: profesion. Oni legu profesion.

La Skoltoj bezonas nian lingvon!

En multaj landoj nun okazas kursoj por skoltoj kaj oni atendas, ke multaj partoprenos la jamboreon en Parizo ĉi-jare. Ankaŭ TJO devas labori, por ke la skoltoj trovu intereson en la esperantista junulara movado!

POR KOMENCANTOJ.

La du maldiligentuloj.

Iu sinjoro havis du servistojn, kiuj estis tre mallaboremaj.

Foje, kiam ili devis labori en apuda ĉambro, la sinjoro kredis: „Karlo, kion vi faras?”

„Nenion, sinjoro.....!”

„Kaj vi, Jakobo?”

„Mi helpas Karlon, sinjoro!”

Fanfaronado.

Estis dimanĉo. Ĝardenisto kaj kuprajisto promenis al najbara vilaĝo. Ili preteriris ĝardenon, kie i.a. kreskis brasikoj.

„Vidu,” diris la kuprajisto, „kiom granda brasiko kuŝas tie sur la kampo! Tiom grandan mi neniam antaŭe vidis. Ĉu vi?”

Ĉi vi opinias ĝin vere granda?” estis la respondo, „Iam mi havis ekzempleron en mia ĝardeno, kiu estis multe pli granda. Ĝi estis tiel granda, kiel la porkejo, tie!”

„Nu, nu!” diris la kuprajisto, „Tiam ĝi estis vere giganta! Tamen mi scias pli multe pri kaseroloj. En mia laborejo ni iam faris kaserolon, kiu estis tiel granda kiel — jes, kiel la dometo tie!”

„Ho,” rediris la alia. „Nun vi iomete troigas, laŭ mi. Mi preskaŭ ne povas kredi. Por kio oni uzis tian kaserolon?”

„Tutsimple,” estis la respondo. „En ĝi oni kuiris vian brasikon!”

La ĝardenisto ruĝiĝis kaj baldaŭ ekparolis pri alia afero.

Respondu al jenaj demandoj: Kiuj promenis? Kien ili iris? Kion ili vidis? Kio kreskis en la ĝardeno? Ĉu estis granda brasiko? Ĉu la ĝardenisto opiniis la brasikon granda? Kiom grandan brasikon li iam havis? Ĉu la kuprajisto havis komprenon pri brasikoj? Pri kio li havis komprenon? Kion li rakontis? Ĉu la ĝardenisto kredis lin? Kion li demandis? Kion respondis la kuprajisto?

Li sciis!

Instruisto: Ĝis kiam Adam kaj Eva restis en la paradizo?

Knabo: Ĝis la aŭtuno!

Instruisto: Kial?

Knabo: Ĉar nur en la aŭtuno la pomoj maturiĝas.

„Kiu ja povas atenti ĉion?” diris la farmistino, kaj ŝi iris por melki sen siteloj.

Li ne ekzistis.

A: Kiu estas la plej aĝa loĝanto en la vilaĝo?

B: Tiu ne ekzistas, ĉar li ĵus mortis!

Tri enigmoj.

A: Kio estas tio? Ĝi estas nigra kaj ĉiu posedas ĝin.

B: Mi ne scias.

A: Tio estas paro da ŝuoj. Sed kio estas tio: Ĝi estas nigra, kaj ne ĉiu posedas ĝin!

B: Mi ne scias.

A: Tio estas du paroj da ŝuoj! Sed nun ankoraŭ enigmo: Ĝi estas blua, kaj kuŝas sub prunarbo.

B: Nun mi scias! Tio estas tri paroj da ŝuoj!

El „Gajaj horoj por Esperantisto”.

Trafa respondo.

Knabeto staras sur la ŝtupo de grandega domo kaj volas sonorigi. Li streĉas kaj streĉas sin, ekstaras sur la piedfingroj, sed — Joĉjo estas tro malgranda. Li ne povas atingi la sonorilon.

Hazarde pasas eksterordinare longa viro. Longegulo.

„Ho amiko”, krias Joĉjo, „Ĉu vi bonvolas helpi min?”

„Kompreneble”, diras la grandegulo, „Mi volonte faros tion!” kaj li sonorigas. Ridante li rigardas la vireton, kaj kiam li foriras, li diras: „Por kio do taŭgas tiaj etuloj?”

„Por serviĝi sin de la granduloj!” estas la trafa respondo de Joĉjo.

Historio.

La aŭtoro de Esperanto estas d-ro Zamenhof. Li naskiĝis en Bjelostoko (Polujo) je la 15-a de decembro en la jaro 1859a.

En Bjelostoko loĝis homoj de kvar diversaj gentoj (rusoj, poloj, germanoj, hebreoj). Ili parolis diversajn lingvojn, kaj pro tio ofte okazis konfliktoj.

La infano Zamenhof estis tre sentema, kaj suferis pro tiuj konfliktoj. Jam tre juna li revis pri lingvo, kiun li faros, kaj kiun li instruos al ĉiuj homoj en la tuta mondo. Kiel gimnaziano li faris projekton de internacia lingvo. Ĝi ankoraŭ ne estis perfekta, kaj dum siaj studentaj jaroj li ĉiam plibonigis ĝin. En la jaro 1885a la lingvo estis preta. Sed nur en la jaro 1887a d-ro Zamenhof publikigis ĝin, kaj tiam „nia lingvo” eniris la mondon.

LUDO.

Vojaĝludo: La ludantoj staras maldense en rondo, rigardante al la centro, kie staras unu el la ludantoj. Ĉiu en la rondo elektaŭ por si nomon de iu lando, aŭ mondurbo. La persono en la centro, la „vojaĝanto”, demandas al iu: „De kie kaj kien mi devas vojaĝi?” La demandito diras la nomojn de du landoj (mondurboj) ekz.: „De Francujo al Finnlando”. Tiam la posedantoj de tiuj ĉi nomoj tuj devas interŝanĝi siajn lokojn, kaj samtempe la „vojaĝanto” klopodas okupi unu el la liberigintaj lokoj. Kiu perdis sian lokon, devas esti vojaĝanto.

Kiam oni ludas en ĉambro, oni povas formi la rondon sidante sur seĝoj.

Allan Mehtonen, Finnlando.



KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto unufoje jare rajtas enp्रेसigi senpagan, dulinian korespondadreson. La saman rajton havas grupoj, kies gvidanto estas abonanto.

Britujo: Juna plenaĝulo dez. kor. kun ĉiuj landoj, ankaŭ hispanlingve, ruslingve kaj franclingve. William Latimer, 43, Brow Top, Workington.

Ĉeĥoslovakujo: S-ro Alojz Škerlik, Bardejov, Slovakujo, dez. kor. per leteroj kaj poŝtkartoj.

70 gekomencantoj (16-18-jaroj), glerantoj de Komerca Akademio, dez. kor. kun la tuta mondo. Adr: S-ro Eduard Tvarozek, profesoro, Trencin, Komerca Akademio.

Otokar Hoffmann, 40-jara fakinstruisto, dez. interŝ. poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn kun ĉiuj landoj. Li serĉas gekorespondantojn por siaj lernantoj 11—15-jaraj. Adr. Otrokovice, Morava.

Francujo: K-do R. Pillon, 1-bis, rue Gabriel Péri, Sainte-Savine, Aube, dez. kor. k. ĉ. l. por interŝ. div. aferojn. Respondo certa.

Hispanujo. S-ro José Martí, Trafalgar 76-3^a-2^a, Barcelona, dez. kor. internacie, interŝ. il. poŝtk. kaj poŝtmarkojn. Resp. certa.

S-ro Ramón García Pinol (35-j.); sanatorio Espiritu Santo; Sta Coloma de Gramanet, Barcelona, dez. kor. kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj; interŝ. poŝtmarkojn. Certe respondos.

Italujo: Prof. A. Camuffo, v. B. d'Alviano 4, Trieste, deziras korespondi kun francaj kaj nederlandaj gesamideanoj.

Pli ol 150 gelnantoj de Esperanto-kurso dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Adr: D-ro Mario Bonino, Via Saccarelli 31, Torino.

Nederlando: 17-jara fraŭlino deziras korespondi kun eksterlanda fraŭlo. Adreso: Annie Plas, No. 12, Middelle (NH).

Martha Kluff, 16-jara, deziras korespondi kun eksterlandaj geamikoj. Adreso: Oost-Graaftdijk (NH).

Koos Jonker, 16-jara knabo (bakisto), dez. kor. kun eksterlandaj geamikoj. Adr: Oost-Grafdijk (NH).

Gesinjoroj W. Stoffels-Bax deziras korespondi kun ne tro junaj personoj en ĉiuj landoj. Adr: Griffstraat 25¹²¹, Amsterdam.

„Esperantisto Slovaka“, gazeto de l' slovakaj esperantistoj kaj skoltoj. Aperas monate. Abono 68. — Kcs jare. Redaktas kaj eldonas Ernesto Vána, Zilina, Slovakujo.

GENERALAJ SCIIGOJ.

Esperanto en la lernejoj Esperanto estas enkondukita kiel nedeviga fako en la mezlernejo Beith Hakerem en Jeruzalem. Okazos kurso por 25 lernantoj.

La Ministrejo de Kultoj kaj de Nacia Instruado en Helena Reĝolando, eldonis jenan Cirkuleron pri la instruado de la Tutmonda Helplingvo „Esperanto“:

Al S-roj Generalaj Inspektoroj de la Elementa kaj Mezgrada Instruado, Direktoroj de la Pedagogiaj Akademioj kaj de la Eksperimentaj Lernejoj de la Universitatoj de Atine kaj Tesaloniki kaj Direktoroj de la Lernejoj de Mezgrada Instruado.

Konsiderante la gravecon, kiun akiras ĉiutage en la civilizita mondo la „Tutmonda Helplingvo Esperanto“, kaj rememorigante al vi niajn antaŭajn cirkulerojn pri la Tutmonda Helplingvo Esperanto al la lernantoj de la Gimnazioj kaj Pedagogiaj Akademioj de la Stato, ni petas, ke vi faciligu ĉiamaniere tiun ĉi instruadon, kiun akceptis fari senprofite Profesoroj Diplomitaj de „Supera Helena Esperanto-Instituto“ de Atine.

Estas oportune, ke S-roj Direktoroj de la suprecititaj (Alt-) Lernejoj klarigu, antaŭ la komenco de la Esperanto-kurso, la altan gradon, kiun atingis en la nuntempa civilizacio tiu ĉi Lingvo kaj rekomendu samtempe al la Lernantoj, ke ili sekvu akurate kun amo kaj intereso la instruatajn kursojn.

La Ministro A. Papadimos.

Pri la internacia lernolibreto „La Juna Vivo“.

„..... Dume mi volas sciigi vin, ke via lernolibreto tute sukcesigis mian kurson, malgraŭ tio ke mi havas nur unu libreton por gvidi la kurson. La lernantoj estas tre kontentaj ĉar ili povas lerni sen la ĝena gramatiko, kiu estas por ĉiuj malagraba io. — Do mi devas gratuli vin kaj deziri al vi egan sukceson kaj daŭrigon ebligi la facilan lernadon de nia kara lingvo“

Juan Bosch, Valencia, Hisp.

La 3-a eldono de la libreto ĵus aperis. Belaspekta, ilustrita, tre taŭga lernilo en komenckursoj f 0,50
Aparta vortlistoj por nederlandanoj „ 0,15

Aperis: Unua Katalogo de la Esperantaj Poŝtmarkoj. Ĝin kompilis S-ro G. Saget. Prezo: 2 Intern. respondkuponoj, sendotaj al s-ro Filliâtre, Acheres, S. et O., Francujo. Rabato pogrande.

EL NIA LIBRO-STOKO.


Negulino kaj aliaj fabeloj de fratoj Grimm, trad. de d-ro Kabe, ilustr. de A. Langeberg (94-paĝa)	f 1,50
Jimmie Higgins, de Upton Sinclair, el la angla trad. de Karl Fröding (broŝurita)	f 1,50
Skizo de Ekonomia Geografio, de J. F. Horrabin trad. de B. Ross (124-paĝa, bindita)	f 2,—
Homoj en Milito, de A. Latzko, trad. Ch. Minor (bind.)	f 2,90
La Botistoj, Komedio en 5 aktoj, el la finna lingvo	f 0,65
La Fianĉigo — Lea, du teatraĵetoj, el la finna lingvo	f 0,50
Batalo pri la domo Heikkilä, el la finna lingvo trad.	f 0,40
Spegulo Homarana, de J. H. Erkko, trad. de Vilho Setälä, tre belspekta libreto, humaneca poezio	f 0,75
La Dormanto Vekiĝas, de Wells, el la angla lingvo, tradukita de A. Frank Milward (bind. 190-paĝa)	f 3,—
Bela Joe, aŭtobiografio de hundo, verkita de Marshall Saunders, trad. de B'aikie kaj N. Hohlov, ilustr., bind.	f 1,75
Riĉa kaj Sen Mono, de Ph. Oppenheim, trad. de E. Wadham	f 2,75
Fanny, de Edna Ferber, trad. de Berno Fabo	f 2,75
Gaja Leganto per Esperanto, P. E. Schwerin (anekdotoj, ŝercoj, vortludoj, societludoj, demando, ktp.)	f 0,75
„Vivo de Zola”, Aug. de Silva — el la portugala lingvo tradukita de Manuel, de Freitas	f 1,50
La Vivo de l'Eskimoj, Prof. Aŭg. da Silva — el la portugala lingvo tradukita de M. F.	f 0,35
La Ponto, Angel Karalijčev, el la bulgara lingvo trad. N. Vasilov „La Juna Vivo” — binditaj jarkolektoj = enhavas abundon da leĝaĵoj: rakontojn, ŝercojn, anekdotojn, ludojn, kantojn, enigmojn, ktp. Aĉeteblaj estas ankoraŭ la binditaj kolektoj de 1934/1935 kaj 1936/1937	f 1,—
Internacia Kantaro „La Juna Vivo”	f 0,50
Vortaroj por nederlandanoj, Schidlofvortaro	f 2,25
Blok-vortareto	f 0,20
TJO-Poŝtpapero, 50 leterfolioj kaj 50 kovertoj	f 2,—
TJO-Poŝtkarto, 50 ekz.	f 0,65
Ciuĵ prezoj estas ne-afrankitaj.	
Varbu Esperantistojn per nia simpla skriba kurso	f 4,—
(inkluzive korektaĵ!). Mendu ĉe TJO-Centro.	

Baldaŭ aperos „Sep Fratoj”, la ĉefverko de la finna verkisto Aleksis Kivi. La libro estas eldonota de Vilho Setälä en Helsinko. Ĝi estos 360-paĝa romano pri sep junuloj, kiuj en la dezertaj arbaregoj de Finnlando bataladas kontraŭ preskaŭ nevenkeblaj malfacilaĵoj. — Oni povas antaŭmendi la libron kontraŭ favoraj prezoj, kiuj validos ĝis 1 majo.

Ĝis tiu dato la prezo de broŝurita ekzemplero estas f 4,75, de binditaj ekz. f 5,25. — Post 1 majo la prezoj estos 50 % pli altaj! — Antaŭmendojn akceptas TJO-Centro.

MENDANTE VIAJN LIBROJN ĈE TJO-CENTRO, VI SUBTENAS LA INTERNACIAN JUNLLAR-MOVADON!

LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO”

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 1,50 NED. GULDENO AŬ EGALVALORO.

Por progresintoj.

RESPONDOJ AL AMIKOJ.

(El „Gazetartikoloj”, verkitaj de d-ro Zamenhof).

Al s-ro L. V. en T. — Vi plendas, ke en via urbo ĝis nun neniu ankoraŭ ion scias pri la lingvo Esperanto! Nu, kiu estas kulpa? Se la amikoj en T. anstataŭ ion fari kaj vastigi nian aferon atendas, ke oni laboru energie, ke oni faru la aferon pli konata en ilia urbo — tiam nia afero neniam progresos en via urbo. Vi demandas min kial nia afero estas ankoraŭ malmulte konata en via urbo! Ne forgesu, ke en nia afero mi estas nur unu el la laboristoj, kaj se mi devas mem kaj sola fari la tutan aferon, kiu devas esti farata de multaj lokoj, tiam nia afero estus perdita.

Al s-ro R. en Moskvo. — Sinjoro B. estante ankoraŭ en Varsovio, havis ĉiam la kutimon, paroladi „ni laboris”, „ni faris” k.c. Sed efektive li absolute nenion ankoraŭ faris, li ne alportis ankoraŭ eĉ unu novan amikon al nia afero, kaj eĉ sian propran „promeson” li ankoraŭ ne alsendis. Mi ripetas, ke ĉiŭ, kiu ne faras al si en la fino de ĉiu monato la demandon „kiom da novaĵ amikoj mi alportis al la afero”, tiu ne povas sin nomi amiko-laboranto de nia afero, se li eĉ tute bone ellernis la Rngvon.

El „Originala Verkaro”.

Kie regas amo, tie regantoj estas superfluaĵ.

LA VOĈO.

Okangula ejo, en kiu brilas ruĝa lampeto: La Eterna Lumo.
Malgranda, nigre-marmora ĉerko, en oraj literoj portanta la vortojn:

Jen mi kuŝas
Unu el ni.

Kaj floroj, multaj floroj, asteroj, en ĉiuj koloroj, antaŭ ĝi, kiel saluto. Kaj en la muroj la nomoj de tiuj, kiuj, plej ofte junaj, perdis sian vivon.

Unu el ni.

Unu el la sennombre multaj, kiuj falis kiel detranĉataj floroj en la milito.

Unu el ni ĉiuj, parolante:

„Gardu la pacon en via animo, en via vivo, en viaj ĉambroj kaj domo.”

Tie komenciĝas la milito.

Ankaŭ la paco.

Eble ĉi tiu silenta voĉo, parolante nome de unu el ni ĉiuj, konvertos iun homon, por ĉiam.

Ĉar la kongresoj kaj konferencoj por la paco, kie oni tiom multe parolas, tiuj tion ne faras.

Vere ne.

Sed ke mi kuŝas tie ĉi.

Unu el ni ĉiuj, iam juna kaj floranta, tio helpos, eble.

Ĉar plej grandan amon havas tiu, kiu lasas sian vivon, kaj silente atestas.

El „Voetsporen” de Tony de Ridder.

Cu malamikoj?

Robert Johnstone mortis en la batalo kontraŭ la japanoj sur Luzon. Lia plej lasta deziro estis, ke liaj gepatroj de la asekursumo, kiu estas pagata al la postrestintaj parencoj de amerikaj soldatoj (f 10.000) metu stipendion je la dispoŝo de junaj japanoj. Robert opiniis, ke militoj povas esti malhelpataj, kiam la homoj de diversaj nacioj pli bone lernos kompreni unu la alian. Ĉi tiun stipendion oni aljuĝis al japano, kiu iam kiel ano de la malbonfama Kamikaze-trupo ĵuris mortigi kiom eble plej da amerikanoj. Momente li estas interpretisto ĉe la amerika garnizono en Tokio kaj li studas ĉe la Lafayette College, kie Robert Johnstone estis enskribita kiel studento.

LERNEJO DE SENMOTORA FLUGADO.

Ne ĉiuj lokoj taŭgas por lernejo de senmotora flugado. Ne nur ebena tereno estas necesa, sed ĝi nepre prezentu specialan eblon sur vasta plataĵo kun abruptaj randoj, ĉar la flugado postulas vertikalaĵajn aerfluojn kaŭzitaĵajn de vento ordinare horizontale sed vertikalgita de forta deklivo. Ekzistas ankaŭ vertikalaj ventoj, sed ili ne sufiĉe regule blovas por ebligi ĉiutagan flugadon. Nur vento de deklivo tion permesas. En la jaro 1938a Francujo havis nur du lernejojn pri senmotora flugado, kie la kondiĉoj estis tute taŭgaj. Unu el ili lokiĝis apud la urbo Nancy super la larĝa valo de la bela rivero Moselle. La estraro konsistis el kompetentaj homoj: kuracisto ekzamenis la lernantojn, lignajisto riparis la aparatojn kaj instruistoj gvidis la fluglecionojn. La oficistaro disponis pri bona materialo, t.e. pri diversmodelaj flugaparatoj kaj aŭtomobiloj, konservataj en grandaj lignokonstruaĵoj. La lernantoj venis el ĉiuj partoj de Francujo kaj konsistigis tri kategoriojn, nome tiujn de la novuloj, de la komencantoj kaj de la progresintoj. Ili ne nur lernis flugadi, sed ankaŭ ripari sub la gvidado de la lignajisto kaj funkciigi la aŭtomobilojn. Ili aŭskultis kursojn por rekonii la favorajn kondiĉojn de facila flugado aŭ male tiujn de danĝero. — Nia atmosfero estas vasta kampo, senĉese mova kaj ŝanĝiĝema. Kvankam aero estas nevidebla, ekzistas tamen multaj signoj, kiuj permesas kompreni ĉiujn moviĝojn de tiu fluaĵo kun siaj fortoj kaj direktoj.

La lerantoj loĝis diversmaniere laŭ sia riĉeco, kelkaj en hoteloj, aliaj en domo, kiu antaŭe estis kazerno, kie ili trovis dormĉambrojn, kuirejon kaj ludĉambron. — Ĉiutage tre frue la lernantaro kuniĝas sur la plataĵo. La grupoj ne laboras aparte, sed ĉiam kune. — Ĉiuj helpas al ĉiu. Pro tia organizo la vivo en la lernejo fariĝas tre agrabla. La progresintoj flugas malofte, nur por sin perfektigi. Plej ofte ili gvidas kaj helpas la aliajn. Precipe ili funkciigas la maŝinojn, kiuj tiras la flugaparatojn per ŝnurego. Tiuj maŝinoj estas simple fortaj aŭtomobiloj, kies malantaŭaj radoj estas levitaj por turniĝi ne antaŭenpuŝante la veturilon. Unu el tiuj radoj portas bobenegon por la ŝnurego, kiu estas pli longa ol cent metrojn. — Tiel estas tirataj la aparatoj, malrapide tiuj de la novuloj, kaj rampas mallerte sur la tereno, penante por konservi ekvilibron. — Iom pli rapide iras la aparatoj de la komencantoj. Tiuj ĉi flugas je maksimume tri metroj super la tero kaj ili restas daŭre tenataj de la streĉita ŝnurego. Nur pli malfrue ili rajtas uzi la

graciajn aparatojn, kiuj supreniras rapide al la ĉielo, ĝis la momento, kiam la ŝnurego vertikala dekroĉiĝas de la aparato. Tiam la fluganto estas sola mastro de la aparato. Li devas atente klopodi por malsupreniri sen akcidento. — KREDU MIN, junaj amikoj, tiu minuto estas mirinde valora. Ĝi havigos al vi tute novajn sentaĵojn kaj nediskuteblan venkon. — Dank' al la sperto de la kondukistoj de la tirmaŝinoj kaj pro la bonaj konsiloj de la instruistoj, ankaŭ pro la taŭga konstruo de la aparatoj la danĝero estas tre malgranda. Dum tuta monato mi vidis multajn faladojn, sed neniam gravajn akcidentojn. Generale rompiĝas nur la rado el ligno, sur kiu la aparato kontaktiĝas kun la tero. Kelkfoje ankaŭ flugilo difektiĝas. Eĉ unufoje mi vidis aparaton tute disigitan, tamen la flugistino eliris sen grava vundo, kaj ŝi petis, ke oni fotografu ŝin meze de la aparateroj.

Diplomoj rekompencas la gelernantojn, kiam ili estras sufiĉe lerte flugaparaton. La unuan oni povas havi post dek kvin tagoj, kiam oni sukcesas flugi senhelpe dum tuta minuto rektlinie. Oni ricevas la duan post senhelpa flugado kun du kompletaj turnoj, la unua deksfren, la dua maldekstren. — Nur por la tria oni bezonas la vertikalan venton de la rando de la plataĵo. — Tiam oni devas flugadi dum kvin minutoj, irante laŭ larĝaj kurbelinioj same kiel la rabobirdoj. Kelkfoje la flugisto ne sukcesas realteriĝi sur la plataĵon. Li malrapide malsupreniras al la valo ĝis la kampo de la bovinoj. Li revenas post longa tempo piede; laŭtaj mokridoj akceptas lin, kaj li ricevas insignon, kiu montras belegan bovinĉapon. Li devas aŭdi multajn ŝercaĵojn ĝis kiam li invitas ĉiujn por trinki glason da ĉampano. — Post la tria elprovo la flugistoj lernas alteriĝi sur malgrandan terenon jam antaŭe limigitan, kaj ili fariĝas spertuloj. Ili rajtas konkuradi por rekordoj de daŭro kaj alteco. — Ofte tiaj famuloj sukcesas flugi dudek, eĉ sesdek kilometrojn kaj atingi altecon de trimil metroj. — Vi komprenu bone, ke mi parolas pri oftaj flugvojaĝoj sed ne pri eksterordinaraj malfacilaĵoj.

Mi ne diris, kiamaniere revenas la aparatoj sur la linion de forflugo. Jen la simpla metodo: lernanto, novulo aŭ komencanto, iras aŭtomobile ĝis la punkto, kie la aparato alteriĝis. De tie la aŭto tiras ĝin kaj dum la reveno la flugisto kuras apud la flugaparato tenante flugilon per sia mano. Tio estas saniga sporto, ŝvitiga peno, per kiu la fluginto pagas sian venkon kontraŭ la aero.

Kaj nun, kamaradoj, mi deziras al vi eblon praktiki senmotoran flugadon.

Marto 1947.

G. Turin' (Trepot, Francujo).

IPSWICH (daŭrigo).

..... Kompreneble, en urbo tiel malnova kiel Ipswich, oni atendas trovi multajn antikvajn kaj historiajn konstruaĵojn. Du, tri el la plej famaj tuĵ-venas en la kapon, ekz. la „Christchurch Mansion” (Kristpreĝeja Domego) en Christchurch-Parko, meze de la urbo. Tiu ĉi domego estas konstruita dum la regado de reĝino Elizabeth, eble ĉirkaŭ 1548—1550. Estas interese noti, ke en 1732 oni vendis la domegon (kiu en tiu tempo staris en privata bieno) al la filo de Hugenota rifuĝinto, nomita Jonuereau (el La Rochelle, Francujo), kiu fuĝis en ĉi tiun landon post la nuligo de la Edikto de Nantes. Depost la komenco de la nuna jarcento oni akiris la domegon por la Ipsviĉa Magistrato, kaj fondis £ 20.000-an doton. La enspezon el tiu sumo oni uzas por la aĉetado de artaĵoj kaj aliaj objektoj: do la domego nun estas kaj muzeo por hejmantikvaĵoj kaj ekspoziciejo de artaĵoj.

Alia vidinda konstruaĵo estas la tiel nomata „Ancient House” (Antikva Domo), nun uzata kiel librovendejo: Oni konstruis ĝin en 1567 por iu s-ro Sparrowe, kaj eĉ nun oni foje nomas ĝin „La domo de Sparrowe”. La familio Sparrowe estis lojale reĝana dum la periodo en kiu Cromwell bataladis kontraŭ Lia Reĝa Moŝto Charles II (La Interna Milito): Kaj laŭ onidiro Karlo II kaŝis sin en sekreta ĉambro post la batalo de Worcester. Oni montras al vizitantoj falpordon en la malnova familia kapelo, tra kiu, oni asertas, la reĝo forkuris.

Kardinalo Wolsey, kies renomo etendiĝis ekstere de nia lando, naskiĝis ĉe Ipswich, verŝajne kiel filo de buĉisto. Kiam li eŝtis ĉe la zenito de sia potenco kiel ministro de la reĝo Henriko VIII, li komencigis (ĉ 1528) la konstruadon de loka altgrada gimnazio, por fari el ĝi unu el la plej gravajn lernejojn en la tuta lando. Bedaŭrinde, antaŭ ol li povis fini la konstruaĵon, lia potenco komencis malpliigi (ĉefe pro la malsukceso de la traktado rilate al la eksgeedziĝo inter la reĝo kaj Katarino de Aragono) kaj en 1530 la laborado por la „Kolegio de Sankta Mario ĉe Ipswich” ĉesis: kaj en la nuna tempo nur restas la pordego, la sola parto, kiu ne estis detruata laŭ la ordono de Henriko VIII.

Kardinalo Wolsey estas nur unu el la multaj famuloj, kiuj naskiĝis, aŭ havis sian hejmon, en Ipswich. Mi nur havas lokon por mencii la du konatajn Suffolk-ajn pentristojn Thomas Gainsborough kaj John Constable, kiuj ambaŭ loĝis en la ĉirkaŭaĵo. Constable skribis al amiko: „Ĝi estas la plej rava pejzaĝo por pentristo. Mi imagas ke mi povas vidi Gainsborough je ĉiu heĝo kaj kava arbo”.

(daŭrigota) J. Heath.

uj¹⁾

banan-o	banan-uj-o	banan-arbed-o	unu-op-e
fig-o	fig-uj-o	fig-arb-o	du-op-e
granat-o	granat-uj-o	granat-arb-o	tri-op-e
kaŝtan-o	kaŝtan-uj-o	kaŝtan-arb-o	sep-op-e
migdal-o	migdal-uj-o	migdal-arb-o	dek-op-e
oliv-o	oliv-uj-o	oliv-arb-o	dudek-kvin-op-e
orang-o	orang-uj-o	orang-arb-o	mil-op-e
pom-o	pom-uj-o	pom-arb-o	
roz-o	roz-uj-o	roz-arbed-o	
vinber-o	vinber-uj-o	vinber-arbed-o	

on (la frakcioj).

$\frac{1}{2}$	du-on-o	0,11	dekono
$\frac{1}{3}$	tri-on-o	0,25	dudek kvin centonoj
$\frac{3}{4}$	tri kvar-on-oj	0,73	sepdek tri centonoj
$\frac{7}{10}$	sep dek-on-oj	1,009	unu kaj naŭ milonoj.
$\frac{5}{12}$	kvin dek-du-on-oj		

administrant-o	fest-o	konstru-o	roz-o
ale-o	frakci-o	konstru-aj-o	tia
la am-o	la gazon-o	migdal-o	tri-op-e
arbed-o	granat-o	neniam	la vol-o
balkon-o	Hispani-o	nuks-et-o	
la citiz-o	jasmen-o	papag-o	
la feliĉ-o	kaĝ-o	pom-o	

Ekzerco. Skribu per literoj: $\frac{2}{3}$; $\frac{5}{8}$; $\frac{7}{9}$; $\frac{4}{11}$; $\frac{6}{17}$; $15\frac{23}{32}$; 0,9; 0,34; 0,69; 0,876; 12,007; 102,046; 165,158.

Ekzerco. Uzu jenajn korelativojn en frazoj: kiu, tiu, ĉi tiu, kio, tio, kia, tia, kie, tie, tie ĉi, ĉie, kial, kiam, ĉiam, neniam, kiel.

Gramatika enhavo: la frakcioj; la sufiksoj: uj, op, on; la korelativoj: tia, neniam.

¹⁾ vidu ankaŭ lecionojn 11 kaj 38.

POR KOMENCANTOJ.

La kato mem tiris!

La patrino: Joĉjo, mi jam malpermesis al vi tiri la voston de la kato!

Joĉjo: Mi ne tiras, Panjo. Mi nur tenas la voston. La kato fortiras ĝin!

Jean Pottier (Quimper, Franc.)

MENDANTE VIAJN LIBROJN ĈE TJO-CENTRO, VI SUBTENAS LA INTERNACIAN JUNULAR-MOVADON!

La deveno.

La instruisto: „Nu, etulo, ĉu vi povas al mi diri de kie venas la lano?”

„De la dorso de la ŝafoj, sinjoro!”

„Bonege! kaj kion oni faras el lano?”

„Mi ne scias, sinjoro.”

La instruisto, palpante la pantalonon de la infano: „Kaj, ĉi tio, el kio ĝi estas farita?”

„El la malnova pantalone de paĉjo, sinjoro!”

Jean Pottier (Quimper, Franc.)

Vilhelm Tel.

„Sed Petro, kion vi faras! Ne pafu al la ventro de Karlo!”

„Kial ne, patrino? Ni ja ludas Vilhelm Tel'on!”

„Sed Vilhelm Tel ja ne pafis al ventro!”

„Ne, sed Karlo mangis la pomon!”

*Allan Mehtonen, Oulu (Finnlando).

La fungoj.

„Ĉu la fungoj ĉiam kreskas en malsekaj lokoj, patro?”

„Jes, mia karuleto!”

„Ĉu do pro tio ili estas tiel similaj al pluvombreloj?”

Allan Mehtonen (Oulu, Finnlando).

„Propagando”.

Abstinencula societo aranĝis grandan propagandan manifestacion tra la urbo.

Poste la fileto de tre konata advokato en la urbo venas hejmen, kaj rakontas entuziasme, ke ankaŭ li partoprenis.

„Bone,” diras la patro, „kaj ĉu vi ĝuis?”

„Kompreneble!” krias la knabo, „estis ja agrablege!”

„Kion do vi faris?” demandas la patro.

„Ho, oni surmetis sur min tre malnovajn vestojn, kaj paron da ŝuoj kun multaj truoj, kaj mi portis grandan tabulon, kaj sur ĝi staris: „Mia patro estas drinkemulo.”

Respondu al la demandoj: Kion oni aranĝis? Kiu aranĝis tion? Kiu ankaŭ partoprenis? Kio estas la patro de la knabo? Kia li estis? Ĉu la gepatroj sciis, ke la knabeto partoprenas? Kiam li venis hejmen? Kion demandis la patro? Kion rakontis la knabo? Kio staris sur la tabulo? Ĉu tio estis agrabla por la patro?

La humoristo.

Sinjoro A renkontas sian amikon kaj diras al li. „Kiom malbonhumore vi aspektas! Ĉu okazis al vi malagrablaĵo?”

„Vi ja scias, ke mi estas humoristo! Hodiaŭ mi havas liberan tagon!”

Tion li ankoraŭ ne lernis!

Frico estas ankoraŭ tre malgranda. En la lernejo li solvis la unuan kalkulproblemon. Hejme li fiere rakontas al la patrino:

„Panjo, kiam mi havas 4 pomojn, kaj mi ricevas ankoraŭ 2 pomojn, tiam mi havas 6 pomojn!”

„Tre bone, knabeto! Sed kiam vi havas 3 pirojn, kaj mi donas al vi ankoraŭ 3, kiom da piroj vi tiam havas?”

„Tion mi ne scias, ĉar pri piroj mi ankoraŭ ne lernis!”

Tutsimple!

Jonatan Swift estis fama pro sia belega stilo. Iam oni demandis al li, kiel li sukcesis akiri tian eksterordinaran stilon.

„Nu,” li respondis, „Mi ĉiam metas la ĝustan vorton en la ĝustan lokon!”

Li „pensis”.

—Pri kio vi pensas, kiam vi fiŝas dum la tuta tago?

Tiam mi pensas: „Ho, ke fine fiŝo mordu!”

Kaj kion vi pensas, kiam fiŝo mordis?

Tiam mi pensas „aha!”

LUDOJ.

Vortludo. Ĉiu flustras al la persono, kiu sidas apud li (ŝi) nomon de iu objekto. Iu komencas la ludon, dirante verbon konforman al sia objekto, ekzemple: „Mi veturas per veturilo.” La sekvanta ludanto uzas la saman verbon kun sia objekto, ekzemple: „mi veturas per balailo”, ktp. Kiam ĉiuj uzis tiun verbon, alia ludanto diras novan verbon, konforman al sia objekto.

Laborludo. Tri el la ludantoj unue faru jene: laŭvice ili iras al ĉiu ludanto, kaj flustras: la unua ian laboron, la dua laborilon, kaj la tria laborejon. Sed ili faras tion tiel mallaŭte, ke nur la koncerna persono ĝin aŭdas. Kiam ĉiu ricevis la tri nomojn, ili laŭvice diru kion ili faras per sia laborilo en sia laborejo. Ofte oni aŭdas kombinaĵojn.

Allan Mehtonen, Oulu (Finnlando).

NIA TUTMONDA FAMILIO.

..... Por junuloj necesas junulaj artikoloj. Vi mem petis tiajn en la februara numero de LJV. Bonege! sed kion skribi? Kion prezenti al la junuloj por interesigi ilin? Ĉu sporton? sciencon? kuriozaĵojn? geografion? ĉu artikolojn pri lingvoj, pri turismo? komerco? ekonomia vivo? malfeliĉoj de la milito? Eble kantojn? sciigojn pri artoj, lernejoj, universitatoj, urboj, kamparoj, tendaroj, filatelio, ŝiparo, aviado? La temoj ne mankas, nur mankas la verkistoj..... kaj scio pri la deziroj de la legantaro.

Kiel leganto mi ŝatas krucvortenigmojn kaj scii pri vojaĝoj, landoj, aliaj studentoj, industrio kaj scienco, geografio kaj nuntempa vivo de alilandanoj. Mi ne estas ĵurnalisto, nek lerta Esperantisto: nur 18-jara, sed mi volonte provus verki ion por „La Juna Vivo”. Kaj multaj junuloj devas fari tion, el multaj landoj, por ke ni fariĝu internacia junulara familio, kun „nia” gazeto. Miaj fakoj? Mi studas por abiturieco, sciigis pri ekonomio en Francujo, pri filatelio, sed ne pri sporto. Do vidu ĉu io interesas vin. Mi ne estas skolto, sed aliulo povus paroli pri tiu temo, interesa por ĉiuj junuloj, ĉar oni scias, ke la jamboreo okazos en nia lando post kvin monatoj..... sed ĉu multaj el ili estos esperantistoj? Kaj kiom da skoltoj esperantistoj estas en la mondo?

Jn. Pottier, Quimper (Fin), Francujo.

Responde al nia peto en la februara numero envenis diversaj leteroj. Iom post iom ni publikigos partojn el ili en la rubriko „Nia tutmonda familio”. Espereble multaj ankoraŭ sekvos, ĉar tiu ĉi rubriko nur povas fariĝi interesa, se estas sincera kontakto inter la redakcio kaj la junularo. Honeste diru vian opinion! Prefere tamen ne nur kritiku: Ankaŭ konstruu! Ni ne ofendu, sed instruu unu la alian!

Montriĝis multa intereso por skolta rubriko. Ĉu infer niaj legantoj estas skolto-kompetentulo por prizorgi tian rubrikon? Li bonvolu anonci sin!



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

Ipswich, Britujo, 17-23 aŭg. '47.

Restadkostoj: Por personoj pli aĝaj ol 16-j.: 30 ŝil. plus 15 ŝil. por la du ekskursoj. — Por malpli aĝaj partoprenantoj 30 ŝil. plus 7 ŝil. 6 p. por la ekskursoj. — Se eble, la ekskursoj por ne-britaj partoprenantoj estos senpagaj. Oni tiucele kolektas monon en Britujo! Se tio sukcesos, la partoprenantoj ricevos la 15 ŝ (aŭ 7/6 ŝ)

kiel „poŝmonon”, dum la kunveno. Restas do la vojaĝ- kaj restad-
kostoj. — Bedaŭrinde estas sufiĉe multekosta afero, kaj pro tio
multaj junaj infanoj ne povas partopreni. Tial ni volus instigi la
„riĉulojn” en nia movado, ke ili sendu mondonacojn por nia vo-
jaĝkaso! En Nederlando oni sendu la donacojn rekte al la TJO-
kasisto: M. v. d. Horst, Johan Idastr. 32, Rotterdam, ĝironumero
330139. Al li la nederlandanoj povas pagi ankaŭ la restad- kaj
vojaĝkostojn.

En la ceteraj landoj oni pritraktu la aferon kun la ĉefperantoj.

Pri la anoncado: La lasta dato por aliĝo estos **1 junio**. Prefere
oni pagu la plenan sumon antaŭ tiu dato. Anoncadreso: F-ino N.
Rees, Derwydd, Seven Sisters, S. Wales. Klare aldonu aĝon, sek-
son!

Provizora programo.

Dimanĉon, la 17-an: Renkontiĝa tago: programo aranĝota.

Lundon: Matene: vizito al la urbo. — Posttagmeze: promenado
laŭ la rivero Orwell. — Vespere: lumbildprelego, dancado, komu-
na kantado, ktp.

Mardon: Tuttaga ekskurso al Felixstowe. Vespere: kiel lunde.

Merkredon: Matene: vizito al la Kristpreĝeja Parko, ktp.

Posttagmeze: pikniko sur la erikejo Foxhall. Vespere: koncerto,
komuna kantado kaj aliaj amuzadoj.

Ĵaŭdon: Tuttaga ekskurso al Londono.

Vendredon: Matene: libere. — Posttagmeze: promenado elek-
tota, vespere: koncerto, dancado, ktp.

Sabaton

Lunde, kelkaj danaj aŭ nederlandaj junulgastejanoj, kiuj jam
libertempis en Anglujo, tranoktos ĉe la Felixstowe-Junulgastejo.
Ni esperas inviti ilin kune danci kun ni, antaŭ ol ili marde reiros
al sia hejmlando.

Mardvespere ni klopodos aranĝi prezentadon de malnovaj ang-
laj dancoj; kaj dum la semajno ni aranĝos prezentadon de popol-
dancoj. — Vendredvespere reprezentantoj de la Ipsviĉaj kaj Fe-
lixstowe-aj junulgastejanoj vizitos nin.

Poste ni informos vin pri la eminentuloj, kiuj vizitos nin dum
la semajno.

Tria listo de partoprenantoj: 21-22: ges-roj Turin-Montagnon, Trepot
(Francujo); 23. f-ino J. Guidet kaj 24. F-ino A. Guidet, ambaŭ en Besancon
(Francujo). 25-39: anglaj knaboj el Dagenham: Loy Bayford (14 j.), John
Bays (12-j.), Roy Bristow (12-j.), John Blomfield (13-j.), Ronald Bull (13-
j.), John de Naeyer (12-j.), Ellis Edmund (13-j.), Ronald Horrigan (12-j.),

Robert Keep (12-j.), Alan Libby (12-j.), B. R. Marshall (12-j.), Arthur Moore (12-j.), Ronald Redgewell (12-j.), Anthony Smith (12-j.), H. G. Toms (gvidanto).

Nederlandanoj: 40-41: ges-roj v. d. Horst, Rotterdam; 42. Corrie v. d. Horst (10-j.) R'dam; 43. Koos Jonker (16-j.), Oost-Grafdijk; 44. J. C. Kreffer, (18-j.), Scheveningen; 45. F. H. Kat (19-j.), Leeuwarden; 46. Trynie Klomp (21-j.), 47. Nelie Klomp (25-j.), 48. Piet Coeverd (20-j.), 49. Wim Schipper (25-j.), 50. Jo Geus, ĉiuj en Koedijk; 51. Koos de Haan (23-j.), W. Grafdijk.

52-62: s-ro Bonamy, Batz-sur-Mer (Francujo) kun 10 lernantoj.

TJO-RUBRIKO.

Jen ree du novaj ĉefperantinoj, kiujn ni de ĉi tie tutkore bonvenigas!

Brazilo: F-ino Maria Angélica de Oliveira, Rua Haddock Lobo 58, Rio de Janeiro.

Egiptujo: S-ino Schmidova, 3, Rue Caïd Gohar, 3, Alexandrie.

Svisujo nun havas alian ĉefperantinon: F-ino Mon, Hauptstr. Rheineck.

GENERALAJ SCIIGOJ.

ESPERANTO EN LA LERNEJO. Nederlando: Sekve de la vigla propagando de s-ino v. Veenendaal per la TJO-filmoj, 16 instruistoj en den Helder komencis lerni Esperanton.

La oficejo „**Esperanto ĉe la Instruado** (C. Krusemanstr. 43¹¹², Amsterdam-Z) prezentis petskribon kun klarigo al la ministro por la Instruado, Artoj kaj Sciencoj. En ĝi estis petate: „fari ĉe la pritraktataj reorganizado kaj renovigado de la instruado tiajn aranĝojn, kiaj necesas por fruktodona enkonduko de Esperanto en la instruadon.” Lia moŝto persone akceptis tri reprezentantojn kaj rakontis, ke iam li iom studis Esperanton kaj ke li ne emas tute rifuzi niajn dezirojn. Tamen akcepto de Esperanto kiel fakultativa fako signifus pli ol teknikan ŝanĝon de la leĝo, kio eble kunportus multajn konsekvencojn. Li tamen estis preta konsideri la eblon ion fari ĉe la konceptado de diversaj novaj leĝoj. Finefika motivo laŭ li devus esti la ĝeneralaj disvastiĝo kaj uzado de Esperanto.

Post la demando ĉu lia moŝto eventuale estus preta iniciati klopodon starigi interŝtatan interkonsenton pri samtempa enkonduko de Esperanto, li petis la delegitaron skribi prezenti ĉi tiun demandon.

Tio dume okazos, kaj la oficejo esploros en sia unuevenonta laborkunsido, kio plu estos fareda rilate la temon.

Aŭstrio: D-ro Felix Hurdes, la ministro pri instruado subskribis du por Esperanto tre gravajn dekretojn: 1. dekreton pri enkonduko de Esperanto kiel nedeviga instrufako en la mez- kaj ĉeflernejoj de tuta Aŭstrio. — 2. dekreton pri restarigo de la „Stata Ekzamenkomisiono pri Esperanto”.

Estante la direktoro de ĉi tiu Stata Esperanto-Ekzamenkomisiono de la instru-ministerio, mi oficiale petas vin, Esperanto- eminentuloj kaj Esperanto-organizo en ĉiuj landoj de la mondo, ke vi bonvolu certe baldaŭ skribi al mi, kia estas la stato de la Esperanto-instruado en viaj landoj, kaj precipe, kiuj ŝtataj eminentuloj (ministroj, ne-esperantistaj organizoj ktp) en viaj landoj estas favoraj al Esperanto. Sed miaj plej gravaj demandoj estas:

1. Kiaj estas la ŝancoj por Esperanto en viaj parlamentoj kaj ĉe viaj registaroj? — 2. En kiuj ŝtatoj la situacio estas sukcespromesa, se mi oficiale en la nomo de nia instru-ministerio turnas min al la instru-ministerioj de viaj ŝtatoj rilate komunan enkondukon de Esperanto kiel deviga instrufako en la lernejoj?

Nur per komuna samtempa enkonduko de Esperanto en vico da ŝtatoj ni atingos baldaŭ la venkon de Esperanto!

Laŭ la spertoj rilate la lernadon de fremdaj lingvoj en Aŭstrio, kie nuntempe tiom la lingvoj estras(!), ni Esperanto-instruistaj fakuloj proponus la enkondukon de Esperanto en la lastaj klasoj antaŭ la mezlernejoj (ĉe ni en la 3-a popollerneja klaso en kvazaŭ-ludmaniero por 8-jaraj geknaboj, — kaj poste en la 4-a popollerneja klaso kiel regula instruado de Esperanto, por ke la geknaboj jam sufiĉe bone scipovu Esperanton, kiam ili komencos en la mezlernejoj la studadon de la angla aŭ franca, aŭ rusa aŭ ĉeĥa aŭ latina lingvoj). Laŭeble kaj laŭbezone mi mem (aŭ, en mia nomo, alia Esperantisto estonte) kune kun la Esperantaj eminentuloj de la koncernaj ŝtatoj — iom post iom persone vizitos la instruajn kaj aliajn ministrojn en tiuj ŝtatoj, kiuj laŭ via sciigo estas favoraj al Esperanto, por ke nia instru-ministerio en taŭga buŝa maniero povu speciale inviti la diversajn registarojn al komuna laboro.

Bonvolu baldaŭ respondi al mi! — D-ro Maximilian Fuhring, Direktoro de la Ŝtata ekzamenkomisiono por la instruado de la mondhelplingvo Esperanto ĉe la publikaj mezaj lernejoj, Unterrichts Ministerium, Minoritenplatz 5, Wien I, Aŭstrio.

La sveda ministro de instruado apogis proponon de la regna budĝeto por 1947-1948, asigni en la kadro de la instruministeria budĝeto por 1947-48 sumon de 5000 kronojn por la aranĝo de perfektigaj Esperanto-kursoj por instruistoj.

Sveda ŝtatministro deklaris dum interparolo kun la prezidanto kaj sekretario de Sveda Esperanto-Instituto ke li volonte subtenas la ideon aranĝi de la ŝtato pagitajn instruistkursojn en Esperanto, ĉar li deziras subteni ĉiujn kulturrilatojn inter la popoloj.

Franĉujo: S-ro Vincent Auriol, la prezidanto de la Franca Ŝtato subskribis la petskribon por UNO.

Prezidanto Leon Blum promesis doni helpon al Esperantistoj.

S-ro Delaire, 2 rue de Vauquois, Orleans (Loiret), eldonis portreton de d-ro Zamenhof. Formato 40/50 cm. Bela papero. Prezo afrankite 120 fr.fr. (aŭ 12 intern. respondkuponoj). Ĉe mendo de almenaŭ 10 ekz. 20 %-an rabaton.

Ĉeĥoslovakujo: La ĉeĥoslovaka gimnasta federacio SOKOL propagandasian XI-an Olimpiadon ankaŭ per Esperanto. Mallonga informilo jam aperis. Ĝe venos multaj petoj, oni eldonos ankaŭ pli detalan ilustritan broŝuron. — „Sokolfestoj en Praha 1948” estas la titolo de informilo en Esperanto, kiun oni senpage povas peti de Sokolsky slet, Praha III, Tysuv dum. Petu samtempe pli detalan, ilustritan Esperanto-broŝuron!

Nederlando: Delegito de la Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio, estas s-ro H. L. Hartog, Kathammerstr. 68, Volendam. Interesuloj petu de li sciigojn.

Radio:

Pola Radio, Varsovio III, ondlongo 49,06 m. de nun disaŭdigos programojn en esp. lingvo ĉiumerkrede je la 21-a h. 10 min. laŭ Greenwich-tempo. Programo: kulturaj, politikaj, ekonomiaj, esperanto-prelegoj kaj informoj pri la nuntempa Polujo. — Aŭskultu niajn disaŭdigojn kaj nepre skribu al: Pola Radio, Warszawa, Koszykowa 8. Ni respondos viajn leterojn buŝe kaj skribe.

Radio Wien sendas jenan Esperanto-programon: merkrede 06.35—06.45 (MET), Wien I, 506,8 m: Esperanto-Kurso; jaŭde 17.50—17.55 (MET), Wien II, 31 m, 41 m kaj 228.6 m: Informservo.

Nepre sendu leterojn pri la sendaĵoj al RAVAG, Wien 30-a, Argentinierstrasse, Wien IV, Aŭstrio.

Internacia kunveno en Reutspierre (Svisujo) 2-8 aŭg. '47.

Jam anoncis sin esperantistoj el Svisujo, Belgio, Nederlando Aŭstrujo, Francujo, Anglujo. La restadmonoj estos f 17 (£ 1-12, 24 sv.fr.), kondiĉe ke vi kunportu semajnan porcion da fromaĝo, butero kaj sukero. Kaj se eble surprizon por kontentigi nian frandemon! — Jam anoncis sin kelkaj por fari prelegojn. Ni kantas el „La Juna Vivo“-kantaro, kiun la partoprenantoj ricevos senpage. — La celo de ĉi tiu kunveno estas kolekti la universalajn pensojn, kiuj iom post iom enradikiĝis en la animo de la Esperantistaro. — Ĉiuvespere okazos do prelego pri grava temo, poste interŝanĝo de pensoj. — Dumtage ŝi ekskursos, kantas kaj muzikos. — Mi esperas, ke ni en Reutspierre sukcesos fondi firman bazon sur kiu ni povos konstrui la domegon por nia tutmonda familio. Anoncu vin baldaŭ al s-ino v. Veenendaal-Bouwes, Limmen (Nederlando). — Tiuj, kiuj pli longe deziras resti en Reutspierre pagos 3 gld. tage. Sciigu baldaŭ, kiom da tagoj vi restos, menciante la datojn. La restadmonon oni pagu antaŭ 1 majo, por ke ni havu sufiĉe da tempo por ŝanĝi la monon.

E. v. Veenendaal.

Karaj Geamikoj.

Dum la milito mi instruis en la mezo de Germanujo, kaj mi esperas baldaŭ reiri tien. — Mi intencas verki novajn lernolibrojn por la germanaj lernejoj. — Ili enhavos rakontojn el ĉiuj landoj, kaj estos helpilo por pli bona kompreno inter la diverslandaj junularoj. Por tiu celo mi petas la helpon de la instruistoj kaj esperantista junularo. Sendu al mi, tradukitajn en Esperanton (kun la originalaj tekstoj): Rakontojn (pri la naturo, popolo, kutimoj, infanoj ktp. en via lando), infanajn poeziaĵojn, infanajn anekdotojn. Mi tradukos ĉion en la germanan lingvon. Volonte mi ricevos ankaŭ ilustraĵojn kaj fotojn. Ne sendu ŝovinistajn aŭ plenaĝajn rakontojn! Ankaŭ artikolojn pri homoj, kies laboro estis grava por la tuta mondo, estos bonvenaj. Ĉio por lernantoj de 10-14 jaroj.

Mi jam antaŭdankas pro sendotaĵoj. Jan Aørse, Pretoriusstr. 13^a, Amsterdam. Nederlando.

Gazetoj bonvolu represi la peton!

KORESPONDADRESOJ

Ciu abonanto unufoje jare rajtus enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson. La saman rajton havas grupoj, kies gvidanto estas abonanto.

Cehoslovakujo: Pri ĉiuj temoj dez. kor. 18-j. studento Frant Naider, Mladé apud C. Budejovice, Havlicek-str. 51. Respondo certa.

Franco: S-ro Jozefo Roche, Cité Rocher D 2 Cenon s/Vienne (Vienne), hispana rifuĝinto, dez. kor. pri politikaj, sindikataj kooperativaj temoj.

S-ro Raymond Wengler, Chateau des Sources, Cenon s/Vienne (Vienne), teknika desegnisto, dez. kor. k.ĉ.l. pri ĉ.t., precipe pri sia metio.

S-ro Robert Haudry, Nantré Les Barres (Vienne), desegnisto, dez. kor. kun la tuta mondo pri politikaj kaj teknikaj aferoj.

Germanujo: Jenaj junuloj deziras korespondi:

Herbert Rahvenburg, Hannover-Ricklingen, Gerdenerstr. 7 (20-jara);

Love Hofmann, Hannover-Linden, Noltestr. 9 (19-jara);

Käthe Kaütz, Hannover-Ricklingen, Mansfeldstr. 9 (19-jara);

Horst Kliemann, Hannover-Ricklingen, Hugo-Preussstr. 56 (18-jara);

Heinz Leinemann, Hannover-Ricklingen, Heinrich-Meister-Allee 12 (20-jara);

Hans Rodewig, Hannover-Ricklingen, Ricklinger Stadtweg 87 (18-jara);

Esperanto-verkisto (44-jara) dez. kor. kun ĉiuj landoj. Respondo certa. Friedrich Hahn, Bremen, Beginenland 20.

16-jara junulo (lernanto) dez. kor. kun ĉiuj landoj. Skribu al: Otto Georg Celze, Hamburg-Rahlstedt, Eichenallee 15.

Nederlando: S-ino J. de Roo, v. d. Heimstraat 59, Delft, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo. Ĉiam respondo.

Al ĉiu, kiu sendas karton de ventmuelilo, mi resendos ventmuelikarton el mia regiono (ankaŭ al Ned-anoj). E. v. Walsum, Fop Smitstr. 69, Alblisserdam.

33-j. librotenisto dez. kor. ankaŭ hispanlingve kun Hispanujo, Hisp.-Ameriko, pri ĉ.t. Interŝ. gaz. Resp. certa. G. Maronier, Lisbloemstr. 31b, Rotterdam. Hillegersberg.

Polujo: Asocio de Esperantistoj, Gdansk-Wrzeszcz, ul. Potokowa 29, aranĝos letervesperon je la 30a de majo '47. Gesamideanoj el ĉiuj landoj sendu leterojn, il. poŝtkartojn, ktp. Respondo garantiata.

Sud-Afriko: Studento dez. serioze korespondi pri l'imm-aj filmoj, kaj eble interŝanĝi. Robin Farquharsson, 262 Lovedaystr. Pretoria.

Svedujo: Grupo de 20 knaboj (12-13-j.) deziras interŝanĝi bildkartojn kaj poŝtmarkojn. Adresu al jenaj du kamaradoj: Peh-Gunnar Bjerkén, Djupedalsvägen 3, Skövde, aŭ al Sture Larsson, Henriksbergsgatan 21, Skövde. Vi certe ricevos respondon.

Mi serĉas gekorespondantojn (aĝo 11-14-j.) por infanoj en mia klaso. S-ro Albert Bjornemo, instruisto, Kolsva.

F-ino D. Lind, 30-j. artistino dez. kor. k.ĉ.l. kaj interŝanĝi desegnaĵojn, poŝtm. kaj diversajojn. Viby Löt, Mantorp.

STUDENTA FRONTO


Internacia studenta gazeto en Esperanto. Eldonas Studenta Esp. Sekcio „Progresiva Studentaro“ ĉe OSNS (GPSU), Agronomia Fakultato, Sofia, Bulgarujo.

Redakcia adr. str. Car Ŝiŝman !1, Sofio, Prezo 1 ekz.: 1 resp. kuponon.

— Petu specimenon, de TJO-Centro.



LA JUNNA VIVO



MONATA ORGANO 'DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO”

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
 ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 1,50 NED. GULDENO AŬ EGALVALORO.

NOVAJ PLANOJ.

Estas printempo! Cio en la naturo reviviĝas, ĉie ni aŭdas kaj vidas junan vivon.

Volonte ni prezentus ankaŭ la majan numeron de nia revuo en gaja printempa vesto, kun freŝaj koloroj. Bedaŭrinde tio pro ĉiaj cirkonstancoj ankoraŭ ne eblas. Tamen — la printempo vekis ankaŭ en ĝi novan vivon! Anoncis sin ja tre kompetenta kunlaboranto: Rogiero. Aliloke en ĉi tiu numero li mem prezentas sin. Li per specialaj metodoj instigos la junajn legantojn al aktiveco. La gazeto per tio multe gajnos, ĉar junaj kaj pli aĝaj legantoj certe streĉe atendos la rezultatojn. Kaj per tio plifortiĝos la familia vivo en TJO.

Geamikoj, jen bona okazo por varbi novajn aĵojn!

La printempo donas al ni novajn fortojn! Uzu ilin en la intereso de nia Idealo!

Per la nova rubriko „La Juna Vivo” nun estos taŭĝa ankaŭ por lernejaĵ grupoj, do propagandu ĝin inter la geinstruistaro!

De nun nia revuo enhavos skoltajn sciigojn, do, skoltoj: Alportu vian brikon!

Kvankam estas nur modesta komenco, envenis artikoletoj de junuloj. Geamikoj, daŭrigu tion! „La Juna Vivo” estu kaj restu interesa por kiom eble plej da homoj! Sed ne sendu ŝovinismajn aŭ politikajn verkaĵojn! Ĉiam memoru la celon de TJO:

NIA TUTMONDA FAMILIO.

Jen artikoleto de juna ĉeĥo: Kia estas la junularo?

Se ni volos solvi la junularajn aferojn, ni devas konstati, kiel la milito influis junajn homojn. Multaj junaj homoj batalis en ĉi tiu milito kaj multaj devis labori kiel sklavo en fabrikoj. Ili vidis multe. Ili travivis multajn danĝerojn kaj ekkonis malbonon kaj suferon. Ĉu en tiuj homoj restis amo al la homaro? Ĉu la milito senmoraligis la junularon, aŭ ĉu ĝi fortigis ilian volon al batalo por pli bona, pli feliĉa estonto? Ĉu ĉi tiu junularo ne malamas la maljunan socion? Ĉu ĝi ne penos krei novan, progreseman, senmilitan kaj senhipokritan socion? Ĉu la hodiaŭa junularo estas sufiĉe kapabla kaj forta por konstrui novan mondon laŭ progresemaj ideoj? Kion faras la junularo hodiaŭ?

Mi povas diri al vi, kion faras la junularo en Ĉeĥoslovakujo. En ĉi tiu ŝtato ĉiu progresema kaj kapabla junulo kuniĝis en SCM (Asocio de ĉeĥa Junularo) kaj SSM (Asocio de Slovaka Junularo). Kial unuiĝis ĉi tiuj junaj homoj? Ĉar ili scias, ke la dividado de homoj en politikaj partioj celas al malharmonio, kaj malharmonio al milito. La ĉefaj celo kaj laboro de SCM estas unuigi la junularon, prizorgi la edukadon kaj prepari sin por la tasko, kiu atendas la junularon en la ŝtato, popolo kaj socio. Ĉar la respubliko donas al la junularo la eblecon ekreski, la junaj homoj helpas ĝin en la rekonstruado. Nunjare oni konstruos loĝejojn por la ministoj ĉe la urbo Most. En la programo de SCM estas ankaŭ plano por batalo kontraŭ alkoholaĵoj. La Asocio de la Ĉeĥa Junularo estas tre vasta. Ĝi havas lokajn grupojn en ĉiuj vilaĝoj. Ĉijare SCM aranĝos feston de monda demokrata junularo. Ĉar la junularo tiel vikle partoprenas en ĉiu utila laboro, ĝi havas reprezentanton en la parlamento.

Nun vi scias multe pri la ĉeĥoslovaka junularo, sed ni ĉeĥoslovakoj ne scias kion faras la junularo en la ceteraj ŝtatoj. Ni volas interŝanĝi niajn opiniojn kun la junularo de la tuta mondo, ĉar ni volas konatiĝi kun illaj laboroj, eblecoj, amuzoj kaj malĝojoj.

Ladislav Koptik, Semily 11/202. Ĉeĥoslovakujo.

De lernantoj de ŝtata gimnazio kaj komerca lernejo en Gdynia en Pollujo, ni ricevis okaze de junularsemajno belege ilustritan saluton al la Tutmonda Junularo. Estas tre bedaŭrinde, ke ni ne povas enpresigi bildon de la bela ilustraĵo, kiu estas subskribita de ĉiuj instruistoj kaj lernantoj. Sed ni kunportos ĝin al la TJO-Kunveno en Ipswich!

ESPERANTO INTER LA JUNULARO.

Post la milito la simpatio por nia helplingva laboro grave altiĝis. Oni ne nur private kaj oficiale esprimas tian simpatian, sed oni ankaŭ pli akre atakas nian propagandon. Kaj tiu lasta fenomeno certe akcentas, ke la esperanta movado atingis la nivelon sur kiu oni ne plu povos ignori ĝin. Cio montras, ke ni nun vivas en evolua periodo, en kiu ni povos atingi konsiderindajn rezultatojn; eble mi povos diri ke tiu periodo estas decida por la disvastiĝo de nia lingvo dum multaj jaroj.

Tia konstato devigas nin eluzi ĉiun eblecon por centriĝi nian laboron. Por la „fina venko” ni bezonas „la grandan amason”, kvankam oficiala enkonduko internacie nur povos okazi per la potenculoj. Sed tiuj nur decidus favore, se la puŝo de sube estas sufiĉe forta. Tiun forton ni neniam atingos en proksima tempo, se ni ne entuziasmigis la junularon por niaj ideoj.

Antaŭ kelkaj tagoj mi vojaĝis vagonare. En la plena kupeo mi estis la ununura esperantisto. Ni babilis pri la temo: internacia lingvo. Ĉiuj konsentis pri la neceso de tia lingvo, eĉ pri Esperanto, SE nur ĉiuj ĝin lernos. Kaj tiam oni devos instrui ĝin en la lernejo!

Cu oni antaŭ dek jaroj estus dirinta la samon?

En la lernejo, kiel kutima fako per la kutima klasinstruisto. Por puŝi tiun fakon tien, sur la lernejan programon, ni bezonas la kunlaboron inter la personoj, kiuj rilatas la lernejan medion: instruistoj, aŭtoritatuloj kaj la gepatroj. Se miaj kunvojaĝintoj en la vagonara kupeo, kvankam mem ne-esperantistoj, tamen persiste petos enkondukon de esperanto-instruo al siaj infanoj, tiam ili forte helpas trabori la malbonan cirklon laŭ kiu ni rondiras.

De multaj flankoj oni jam klopodas tion:

D-ro M. Führung, konsilisto en la Instru-Ministerio de Aŭstrujo, klopodas rektan kontakton kun registaroj el aliaj landoj; krome li petas helpon grandamase de organizotaj Esperanto-amikoj. La islanda parlamento debatis pri oficiala enkonduko de Esp. en la lernejoj kaj la propono preskaŭ atingis la plimulton da voĉoj. La sveda registaro subvencias esperanto-kursojn al geinstruistoj. Dana urbestro subtenis la enkondukon, dirante, ke la popollernejo bezonas fakojn, kiuj povos fari ĝin alloga, kompare al la mezlernejo. En Nederlando jam denove oni instruas Esp. en 18 lernejoj al 654 gelernantoj. Tie oni fondis organizon en kiu kunlaboras ĉiuj organizitaj esperantistoj, preskaŭ ĉiuj profesiaj geinstruistoj de la unu-

agrada lernejo kun multaj amikoj de la junularo. Ĝi instalas oficejon „Esperanto ĉe la instruado” en kiu okazas la reala kunlaborado, praktike, morale kaj finance de entute pli ol 132000 nederlandanoj.

Por Esperanto kaj junularo, por praktika ebleco al internaciaj rilatoj. Kunlaboro inter la profesiaj edukistoj, la amikoj de la junularo kaj la junularo mem!! Tio estu nia devizo por la plej proksima estonto.

Al vi, D-ro Führung, ni deziras tutkore plenan sukceson. Al ni, esperantistoj, la devon, helpi la efektivigon de tiaj planoj per nia konscia celdirektita kunlaboro, nacie kaj internacie.

P. Korte.

SKOLTA RUBRIKO.

La 6-a Jamboreo okazos de 9-23 aŭg. '47 en Francujo, en Moisson, apud Mantes kaj Vermon (70 km. de Parizo). La 6-a Jamboreo estos la „Paca Jamboreo”. En skolta lingvo: „JAM”. — 60.000 skoltoj partoprenos inter kiuj 30.000 el ne-francaj landoj.

Skoltoj en Gdynia (Polujo) lernas Esperanton en komerca gimnazio kaj liceo (adr. Gimnazium i Liceum Handlowe, Gdynia, Morska 77.

La Asocio de hungaraj Skoltnaboj oficiale akceptis Esperanton. La nova asocio decidis organizi Esperanto-sekcion kaj alvokas la skoltojn, ke ili sciigu sian precizan adreson per poŝtkarto al la poreksterlanda gvidanto de la asocio, Budapeŝt V, Nagy Sándor-utca.

500 hungaraj skoltoj partoprenos en la venonta Jamboreo en Francujo, kaj multaj el ili lernas Esperanton por interkompreniĝi kaj interkorespondi.

La Skolta Esperantista Rondo en Szeged urbo festis sian 25-jaran ekziston.

En trupo de Mezöberén jam 25 skoltoj lernas Esperanton. Bonan instigon faris alvoko el Francujo al la Skolta Asocio, laŭ kiu francaj skoltoj lernas Esperanton por la okazonta Jamboreo.

En Ĉeĥoslovakujo funkcias Esperanto-fako ĉe Junak, asocio de ĉeĥoslovakaj geskoltoj. Ili volas korespondi kun geskoltoj en la tuta mondo pri skoltaj aferoj, speciale kun tiuj, kiuj intencas partopreni en la venonta Jamboreo. Skribu al Junak, asocio de Ĉeĥoslovakaj geskoltoj, Esperanto-fako, Praha II, Stepanska 61.

Franca skolto skribas: En pluraj francaj urboj la skoltoj ar-

anĝas Esperanto-kursojn, ĉar alproksimiĝas la Jamboreo. Mi esperas, ke mi sukcesos varbi ankoraŭ multajn amikojn por Esperanto. Kaj mi ĝojos gastigi kelkajn samideanajn skoltojn okaze de la JAM. Gaskoltoj, estu bonvenaj ĉe francaj esperantistaj skoltoj Partoprenontoj en la JAM skribu al skoltfrato: A. Jansson, 55, rue Général Compère, Chalons-sur-Marne, Francujo.

Belga skolto, Alain Scheldeman en Menin pretas prizorgi la skoltan rubrikon en „LJV”. Nĥ danke akceptis tion.

Skoltoj-Esperantistoj, kiuj partoprenos en la Jamboreo bonvolu tion kiom eble plej baldaŭ sciigi al la sekretario de TJO: M. v. d. Horst, Johān Idastr. 32, Rotterdam-N.



En Ipswich (Britujo) okazos 14-21 Aŭg. '47. Notu bone.

Por Ipswich anoncis sin: 63. Annie Leuning (14-j.), 64. Adri Teunissen (14-j.), 65. Gerri Jansen (14-j.), 66. Hennie Stoffels (12-j.), 67. Betsje Schouwink, (12-j.), 68. Bertha Kroese (12-j.), 69. Hennie Bokhove (12-j.), 70. Jopie Bokhove (13-j.), ĉiuj knabinoj el Hengelo, Ned.

Atentu bone, ke oni povas anonci sin nur ĝis 1 junio!

Leciono 31.

LA BIENO.



Post la siesto venas la afabla administranto kaj kvarope ili iras al la domo.

Kia domo! Ili iras tra salonoj kun dikaj tapiŝoj, silkaj kurtenoj, veluraj seĝoj, marmoraj tabletoj, silkaj kaj veluraj kusenoj, metalaj mebloj, kanaj mebloj, k.t.p.; kun sennombraj pentraĵoj, speguloj, bildoj, kristalaj vazoj. Kia lukso!

Ili iras tra la manĝo-ĉambroj kaj la ĉambro por fumantoj kaj venas al la kontoro kun skribtabloj, skrib-maŝino, telefon-aparato, libro-ŝrankoj. Post tio sekvas la labor-ĉambro de s-ro Miamo kun granda biblioteko, kun ledaj apogseĝoj, luksa skribtablo kaj ankoraŭ unu telefon-aparato.

Ili supreniras larĝan ŝtuparon kaj vidas sennombrajn dormo-ĉambrojn kaj banĉambrojn. Ĉiuj ĉambroj estas luksaj; la banĉambroj havas marmoran banujon.

Ankoraŭ unu ŝtuparo. Ĉi tie estas la dormejoj de la servistinoj, la kudrejo, kelkaj magazenoj kaj la subtegmento.

Ili rigardas tra la fenestroj: jen kuŝas la legom-gardenoj, la frukt-arbejoj, la vinberejoj, la grenkampoj. Ili vidas la paŝtejojn kun bovinoj kaj bovidoj, kun ŝafoj kaj ŝafidoj, kun ĉevalinoj kaj ĉevalidoj, kun porkoj kaj porkidoj en porkejo. Ili vidas la stalojn: la bovejojn kaj la ĉevalejojn.

Super la veturilejo loĝas la servistoj, super la aŭtomobilejo la ŝoforo kaj lia familio.

Kaj en tiu bela blanka domo loĝas la administranto.

la id-o

bov-o	bov-in-o	bov-id-o	kok-o	kok-in-o	kok-id-o
ĉeval-o	ĉeval-in-o	ĉeval-id-o	pork-o	pork-in-o	pork-id-o
hund-o	hund-in-o	hund-id-o	ŝaf-o	ŝaf-in-o	ŝaf-id-o
kapr-o	kapr-in-o	kapr-id-o	tigr-o	tigr-in-o	tigr-id-o
kat-o	kat-in-o	kat-id-o			

la ej-o

aŭtomobil-ej-o	frukt-arb-ej-o	pork-ej-o	
bov-ej-o	kudr-ej-o	vetur-il-ej-o	
ĉeval-ej-o	paŝt-ej-o	vinber-ej-o	
apog-seĝ-o	kusen-o	nombr-o	serv-ist-in-o
ban-ĉamb-r-o	labor-ĉamb-r-o	paŝt-i	silk-a
ban-uj-o	led-a	pentr-i	skrib-maŝin-o
bibliotek-o	libro-ŝrank-o	pentraĵ-o	skrib-tabl-o
dormo-ĉamb-r-o	luks-o	porcelan-a	spatul-o
fumant-o	luks-aĵ-o	pork-o	ŝaf-o
gren-kamp-o	lustr-o	radio-aparat-o	ŝofor-o
k(aj) t(iel)	magazen-o	salon-o	tabl-et-o
p(lu)	mang-o-ĉamb-r-o	sennombr-a(j)	tapiŝ-o
kontor-o	marmor-a	serv-i	telefon-aparat-o
kristal-a	metal-a	serv-ist-o	velur-a
kurten-o			

Gramatika enhavo: la sufikso: id; ripetado: ej, kia.

Leciono 32.

PRI FELIĈO.



„Ho!” diras s-ro Delmonto, „kia bieno! S-ro Miamo devas esti tre riĉa!”

„Jes!” respondas la administranto. „Li estas riĉega kaj estas „grande”¹⁾ de Hispanio. Antaŭ dek jaroj li heredis ĉi tiun bienon de la gepatroj. Car ĉi tie regas la majorato”²⁾ liaj gefratoj ne heredis, sed nur li, ĉar li estas la unua infano en la familio Miamo.

Post tri jaroj mortis frato. Li ne havis infanoN kaj s-ro Miamo denove heredis. Nun li akiris multaN monoN. Kaj antaŭ unu jaro mortis lia lasta frato, vidvo sen infanoj, kaj lasis al li diversajn posedajojn en Hispanio. Tial li nun estas en tiu lando."

„Li devas esti tre feliĉa, ĉar li estas riĉega," diras s-ro Delmonto.

„Ho ne!" diras s-ro Bonavolo, „li tute ne estas feliĉa; li estas avara, malafabla kaj li, tute ne sentas simpatioN por la servistaro, la laboristaro kaj la farmantaro. Krom tio ĉi mankas la harmonio ankaŭ en la familio: nek la *geedzoj*, nek la *gefiloj* amas unu la aliaN; ili ne vivas bone kaj kverelas multe."

S-ro Bonavolo rigardas al la knaboj.

„Mi montros al vi la birdaN kortoN," li diras.

Ili malsupreniras.

1a unu-a	20a dudek-a	333a tricent-tridek-tri-a
2a du-a	31a tridek-unu-a	768a sepcent-sesdek-ok-a
5a kvin-a	56a kvindek-ses-a	1000a mil-a
9a naŭ-a	200a ducent-a	1934a mil-naŭcent-tridek-kvara

adicii: $9 + 6 = 15$ naŭ *plus* (aŭ kaj) ses estas dek kvin
 $128 + 34 = 162$ cent dudek ok *plus* tridek kvar estas cent sesdek du

1 dika libro	1 verda libro
+ 1 dika libro	+ 1 ruĝa libro
2 dikaj libroj	2 verda kaj ruĝa libroj

1 verda libro
 1 verda papero

2 verdaj libro kaj papero

subtrahi: $17 - 4 = 13$ dek sep *minus* kvar estas dek tri
 $153 - 67 = 86$ cent kvindek tri *minus* sesdek sep estas okdek ses

adici-i	la farmant-ar-o	la majorat-o	riĉ-eg-a
akir-i	ge-edz-oj	mal-afabl-a	sent-i
avar-a	ge-fil-oj	mal-supren-ir-i	serv-ist-ar-o
birda kort-o	la harmoni-o	mank-i	simpati-o
ĉi tio-	hered-i	minus	subtrah-i
dev-i	krom	mort-i	tial
edz-o	kverel-i	plus	tio ĉi
edz-in-o	la labor-ist-ar-o	posed-aĵ-o	vidv-o
farmant-o	las-i	reg-i	vidv-in-o

¹⁾ „grande": la plej alta, hereda titolo de la hispana nobela klaso depost la 13a jarcento.

²⁾ majorato: hereda leĝo, laŭ kiu nur heredas la plej aĝa plej proksima parenco de la mortinto.

Si ne memoris

Suzanne ploras. Ŝia panjo demandas: „Kial vi ploras, Suzanne?”
Suzanne ploras ankoraŭ pli laŭte: „Mi ne plu memoras

J. N. Pottier (Quimper, Franc).

Maturigo.

Jean-Paul (3½-j.) alkuras el la ĝardeno, verda ĉerizo en mano.
Li krias al la patro (pentristo):

„Ho paĉjo! Kolorigu ĝin por ke ĝi estu matura!

J. N. Pottier (Quimper, Franc).

Sepjara knabineto en butikio.

„Mi deziras du pakojn da malfaruno (malofta varo).”

„Sed via frato jam venis por tio antaŭ tri minutoj, ĉu ne?”

„Ah? Mi ne scias!”

„Kaj por kiu vi petas tion?”

„Nu, por mia panjo.”

„Kiu estas via panjo?”

„Nu, ŝi estas sinjorino.”

„Kia sinjorino?”

„Sinjorino kun ĉapelo.”

„Kun kia ĉapelo?”

„Nu nu ĉapelo kian havas ĉiuj sinjorinoj

J. N. Pottier (Quimper, Franc).

Troigo.

Amerika ĵurnalo per grandaj literoj kaj multaj vortoj anoncis la morton de Mark Twain (konata amerika humoristo). La sekvan tagon ili ricevis telegramon de Twain mem: „Sciigo pri mia morto forte troigita!”

Lia deziro.

„Ho, se mi foje povus fari kion mi deziras, sen ke la patro kaj patrino ĉiam riproĉas!”

„Nu, kio do okazis?”

„La patrino ne permesas min stari surkape, kaj la patro ĉiam plendas, ke mi tro rapide foruzas miajn ŝu-plandojn!”

Allan Mehtonen, Oulu (Finl.).

Majo.

Nun estas printempo. En ĉiuj landoj de la norda duonsfero la floroj aperas. Ne nur ĝardenaj, sed ankaŭ sovaĝaj. Eĉ en la plej nordaj landoj. Se vi eniras la naturon, vi povos malkovri la plej belajn aferojn.

Iam, nun jam antaŭ multaj jaroj, mi iris kun malgranda grupo da infanoj en la kamparon. Ni venis al marĉo. Tie ni ne povis iri plu. Estis malvarma printempo. Nur tre malmultaj plantoj jam floris. Sed apud la marĉo ni vidis inter la herboj unu lekanteton. Belege blanka ĝi estis, kun flava koro. Ni restis starantaj ĉirkaŭ ĝi. La penso deŝiri ĝin ne venis al ni en la kapon. Ni mire demandis nin kiel lekanteto povas esti tiom bela.

Nun vi foje eniru la naturon kaj klopodu malkovri ion belan. Kompreneble vi povos skribi al mi pri ĝi, se vi tion volas. Belajn kaj interesajn komunikojn mi povos per la gazeto konigi en pli vasta rondo.

Rogiero.

Pejzaĝo.

Geknaboj, kiu el vi volas desegni pejzaĝon? Malfacile? Tute ne! Unue legu ĉi tion, tiam vi certe povos ĝin. Vi komencu per la horizonto. Ĉu vi scias, kio estas la horizonto? Tio estas la linio, kie tero kaj ĉielo ŝajnas kuniĝi. Iru nur eksteren, sur la kamparon, tiam vi ĝin vidos. Se la pejzaĝo estas ebena, la horizonto estas rekta, se ĝi estas monteta, vi vidas la horizonton ondolinia. Vi do desegnas linion sur la supran aŭ malsupran duonon de via papero. Ambaŭ eblas. Vi povas elekti. Kiam vi desegnas ĝin sur la supran parton, vi akiras bele grandan landon; kiam vi ĝin desegnas malsupre, la ĉielo fariĝos bele granda.

Jen, nun vi havas malplenan mondon. Tiun vi faru loĝata. De la tero, troviĝanta malantaŭ la horizonto, vi ne multe povos desegni. Kelkfoje vi vidas nur turo-pinton, arbovicon, fabrikokamejon, malproksimajn montojn, aŭ ion alian elstari super la horizonto. En la ĉielo vi povas fari la plej belajn nubojn: tiuj venas do super la horizonto-linio. La aliaj objektoj venas antaŭ la horizonto. Ĉi tie vi povas desegni, kion vi nur ŝatas: domojn, arbojn, barilojn, akvon, montojn, ruinojn, homojn, bestojn, florojn, ktp.

Sed ne timu. Persiĝu! Se io aspektas kurbe aŭ malrekte, daŭrigu la desegnadon! Kia ajn ĝi fariĝas, daŭrigu. Tiam via pejzaĝo fariĝas ĉiam beleta. Sed ne uzu liniilon. Desegnaĵo en kiu

ĉio estas rekta kaj sen viva ne povas esti bela. Kiam vi desegnis domon, aŭ arbon, aŭ ion ajn vi forigu la parton de la horizonto, kiu troviĝas malantaŭ ĝi.

Sed nun la infanoj, kiuj loĝas meze de altaj montoj: tiuj ne povas vidi la horizonton. Ĝi tamen ekzistas, sed la montoj staras antaŭ ĝi. Nu, tiuj infanoj desegnu tre malklaran linion, kaj poste tute forigu ĝin. Tiel vi tamen akiros bonan dividadon.

Kiam via desegnaĵo estas preta, alsendu ĝin. Kion mi per ili faros vi aŭdos poste. Tio restas provizore surprizo. Ju pli da ili mi ricevos, des pli amuze.



Sed — venas al mi en la kapon, ke vi ankoraŭ ne konas min: Rogiero estas mia nomo. Vidu, jen mi estas.

Cu vi scivolos, kio okazos per via desegnaĵo?

Cu jes? Vi restu provizore scivola! Imagu!

El ĉiuj partoj de la mondo mi ricevos pejzaĝojn. Tiujn mi ordigos laŭspece. Kaj tiam tion vi legos poste. Nur bone atentu. Kaj nun mi subskribas.

Rogiero.

Leterojn por Rogiero oni adresu al TJO-Centro, West-Graftdijk, Nederlando. Klare aldonu aĝon, sekson, adreson!

Geografia ludo. Ce ambaŭ ekstremoj de ludkampo oni strekas linion. La partoprenantoj dividiĝas en du samnombraj partioj. Ili ekstaras malantaŭ siaj propraj linioj. Unu el la partioj (per ĵeto de monero oni povas difini kiu partio komencu) elektas por si iun geografian nomon (ekz. nomon de lando, mondurbo, aŭ granda rivero). Post kiam ili interkonsentis pri la nomo, ili en rekta vico marŝas al la alia partio, haltas je distanco de tri paŝoj de ties limo, kaj diras la unuan literon de la elektita nomo. La kontraŭludantoj penas nun diveni ĉa nomon, kaj tuj kiam iu mencias la ĝustan nomon, ili devas ekkuri returnen al sia limo, sekvate de la aliaj. Ĉiuj, kiuj dum la forkuro estas kaptataj antaŭ kiam ili atingis la celon, devas aliĝi al la kontraŭpartio. Nun la vico estas al la alia partio elekti por si nomon, kaj la aliaj divenu, ktp. Post la antaŭe difinita ludtempo oni nombras la aĝojn, kaj la plej granda partio estas venkinta.

Allan Mehtonen, Oulu (Finl.).

Kiu volas ion scii?

Milojn kaj milojn da steloj vi vidas vespere sur la ĉielo. Mi diras: vidas, ĉar ekzistas ankoraŭ multaj, multaj pli, milionoj kaj milionoj. Sed tiuj estas tiom malproksimegaj, ke de ili vi nenion povas vidi. Nenion, eĉ ne la plej etan lumeron. Se vi tamen volas vidi ilin, vi devas rigardi tra teleskopoj. Tiu pligrandigas pli ol miloble, kaj tamen vi vidas nur etan punkteton. Kaj ĉiuj tiuj milionoj da steloj estas gigantaj fajro-globegoj. Kelkaj estas malpli grandaj ol la suno, kelkaj multoble pli grandaj. Kaj vi sciu, ke la suno jam estas centoble pli granda ol la tuta mondo.

Ĉu vi jam aŭdis pri la Granda Urso? Kaj pri la Nordpolusa Stelo? Plue ekzistas ankaŭ planedoj. Tiuj ne estas sunoj, sed mondoj. Kelkaj estas malpli grandaj ol nia tero, sed aliaj eĉ dekoble pli grandaj. Planedoj ne estas ardaĵoj kiel steloj, ili estas malvarmaj. Ili donas lumon, ĉar ili reĵetas la radiojn de la suno.

Unu el la planedoj nomiĝas Marso. Oni rakontas pri Marso strangajn aferojn. Per fortaj teleskopoj oni ekvidis kanalojn sur Marso, centojn kaj centojn da kanaloj. Kaj tiam oni pensis: Eble tiuj kanaloj estas fosataj de homoj. Rivero ja estiĝas nature, oni diĝis, sed kanalo devas esti fosita. Ĉu do loĝus homoj sur Marso? Homoj, same kiel sur nia tero? Homoj, kiuj al ni ŝajnus tre strangaj, se ni povus vidi ilin, sed kiuj tamen povas vidi kaj aŭdi kaj pensi kaj fosi kanalojn kaj konstrui urbojn. Ĉar oni pensis vidi ankaŭ rondajn punktojn sur Marso, kiuj povus esti urbejoj. Oni ne scias, oni dubas. Kelkaj scienculoj diras: Marso estas nelogata. Aliaj, kontraŭe, asertas ke treeble Marso estas loĝata. Ĉiam pli fortajn teleskopojn oni eltrovis. Oni nun vidas Marson kiel grandegan, ruĝan globegon. Sed tiom fortan teleskopon oni ne povos konstrui, ke viaj estaĵoj, se ili ekzistus, per ĝi estus videblaj.

Helpe de atomenergio oni poste eble povos flugi al Marso. Poste, ankoraŭ ne. Ĉar tio ne estas bagatelo. Tre malproksime estas ĝis tio. Imagu, ke oni eltrovus raketegon, kiu povus tute liberigi de la tero, kaj kiu povus flugi 1000 kilometrojn en horo. Kian distancon oni devus iri! Por flugi ĉirkaŭ la mondo, tia raketego bezonus nur kvardek horojn, sed al Marso daŭrus, kun sama rapideco, ses jarojn. Vi komprenos, ke tio estas tro longe. Kaj kiel oni povus kunporti manĝaĵojn por ses jaroj tien, kaj por ses jaroj returnen! Kaj cetere, kiu dediĉus al la afero tiom da tempo! Ne, prefere la raketego flugu almenaŭ dekmin kilometrojn en horo. Tiam estus

tamen grandega entrepreno, sed verŝajne troviĝus kelkaj homoj en la mondo, kiuj kunirus. Kaj kiam oni fine surterigiĝus sur Marso, kion oni trovas tie? Ĉu tie estus plantoj, bestoj, kaj eble pli kleraj homoj ol ĉi tie? Kaj, se ili ekzistus, kiel ili aspektus? Kiel ili akceptus nian viziton? Kiajn fortojn kaj kapablojn ili havus? Aŭ ĉu oni trovas nenion el ĉi ĉio, nur grandegan, sovaĝan dezerton? Kiu povos diri tion?

Kiu volas ion scii pri la steloj? Alsendu vian demandon! Sed nur pri ĉi tiu temo: pri la steloj, planedoj, aŭ la suno, aŭ la luno.

Se vi sendas ŝercaĵon, ankaŭ bone. Nu, geknaĵoj, mi atendas viajn sendaĵojn. Mi tre scivolas!

Rogiero.

TJO-RUBRIKO.

En interkonsento kun Floor Meydam, la estraro decidis kunigi la funkciojn de sekretario kaj kasisto. Floor restas kompreneble en la estraro.

Ipswich: Ĉiuj kiuj deziras iri al la Internacia Junular-Kunveno en Ipswich kaj ne scias kiel pagi la restadkostojn (la vojaĝkostojn oni povas pagi en propra lando) pro neeble kunpreni monon al Anglujo, povas pagi la restadkostojn al la landa ĉefperanto, kiu senprokraste informu pri tio la TJO-kasiston. Ni faros ĉion por helpi vin, ĉiujn. Vi do ne prokrastu la aliĝon!

Ni povas ricevi atentindan rabaton je la kostoj de l' vojaĝo ekde Nederlando, almenaŭ kiam ni komune faros la irvojaĝon. La plenaj kostoj por nederlandaj junuloj (ĝis 18-j.) estos f 68,23 (enkluzive restadkosto kaj vojaĝkosto de Hoek van Holland al Ipswich, kaj returnen). Por pli aĝaj personoj la kostoj sumiĝos f 89,55. Personoj pli aĝaj ol 18-jaraj ne povos vojaĝi per komuna pasporto.

La revojaĝo povos okazi individue antaŭ la paso de du monatoj post la irvojaĝo. Aliĝo antaŭ la 1-a de junio nepre necesas. Oni samtempe pagu la restadkostojn. Sciigu aĝon, sekson, kaj ĉu oni partoprenos la komanan vojaĝon. Ni nur ricevos rabaton, kiam ni havos certan kvanton da kunvojaĝantoj. Pluraj sciigoj aperos en la venonta numero.

La estraro decidis farigi filmon de la 3-a Internacia Junular-Kunveno, same kiel de Groet kaj Tervuren. Nia filmisto, s-ro Schut, ree okupos sin pri tio.

TJO-geamikoj, regalu nian vojaĝkason per donacoj por ebligi ankaŭ la partoprenon de tiuj, kiuj mem ne povas pagi la elspezon. La esperantista junularo ja estas parto de la granda rondo familia! Helpu do viajn junulojn! Pagu al la TJO-kasisto: M. v/d. Horst, Rotterdam, ĝirkonto 330139.

En Aŭstrujo kaj Germanujo ni kun ĝojo konstatas daŭran kreskon de la laboremo por TJO. Kore ni bonvenigas la novajn membrojn, speciale en tiuj landoj. Ankaŭ en Hispanujo oni pli aktivas. En Belgujo ree aliĝis 11 novaj aktivaj anoj. Ankaŭ en Ĉeĥoslovakujo ree kelkaj aliĝoj. Persistu!

Nun oni rikoltu la novajn adeptojn ĉie en la mondo. La prema vintro pasis, ĉio ree ekfloras, do ankaŭ TJO! Laboru serioze por la disvastigo de

nia TJO-devizo: Havigi al la junularo indan vivocelon, nome interfratigi la homojn per Esperanto.

. Aŭstroj bonvolu atenti, ke la TJO-kotizo estas 9 ŝil.

La januara kaj februara numeroj de „La Juna Vivo” elĉerpiĝis.

La germana ĉesperanto (R. Uhde, (23) Bremen, Kornstr. 156) en sia raporto urĝe petas Esperantomaterialon: lernolibrojn, vortarojn, gazetojn (eĉ malnovaj estos bonvenaj!). Ankaŭ skribpapiro tre malabundas.

Plue li proponas, ke eksterlandanoj abonu germanajn gazetojn aŭ fakajn revuojn. Oni povas pagi la abonkotizon al la ĉesperanto en sia lando. Estas rimedo por havigi la germanajn TJO-kotizojn al la kasisto. En landoj, kiuj ne povas sendi iel la monon al la ĝenerala kaso, la germanoj povus aĉeti esperantaĵojn aŭ paperon. Oni nur povas sendi presajojn al Germanujo trans Anglujo.

Geamikoj, helpu la germanan junularon!

KORESPONDADRESOJ

Ciu abonanto unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson. La saman rajton havas grupoj, kies gvidanto estas abonanto.

Britujo: 70 geliceanoj (aĝoj: 11-18) dez. alilandajn korespondantojn. Esperanto-fako, Hemsworth Grammar School, Yorks.

Peto de anglaj esperantistoj-kripluloj: Ni komencis elsendi niajn „Rondirantojn”, kiuj montriĝis sukcesplenaj. Volonte ni havos pli da anoj. Interesuloj turnu sin al: F. G. Tuck, West Walls House, Wareham, Dorset.

Cehoslovakujo: Pro kursfino 50 gekursanoj 15-40-jaraj deziras ricevi bildk. kaj let. Esp. Servo, Sumavska 250, C, Budejovice.

200 gekorespondantoj serĉataj por miaj lernantoj! K. Solc, Státe diplomata Esp. Instruisto, Ml. Boleslav 41.

Egiptujo: Karl Ludwig Weber, 19-j. germana militkaptisto, dez. kor. 1282, Ait, Woik, Coy (German P.O.W.), Middle East.-L.F.

Francujo: Esperantistaj Junular-gastejanoj dez. kor. kun ĉiulandaj gejunuloj. Skribu al H. Rolin, 4 rue Diderot, Troyes, Aube.

Germanujo: Novfondita Esperanto-grupo (junuloj) en Soveta zono, dez. kor. kaj interŝ. literaturajojn. Walter Rahn, bei Bühring, (3) Güstrow, Mecklg, Hageböckerstr. 44.

Kiu deziras germanajn korespondantojn turnu sin al R. Uhde, (23) Bremen, Kornstrasse 156.

Nederlando: D. Prins, lernejestro, Grijpskerk, dez. gekorespondantojn por siaj lernantoj (10-20-j.), komencantoj. Ankaŭ il. poŝtp.

16-jara knabo, Koos Jonker, Oost-Graftdijk, deziras korespondi kun la tuta mondo.

Usono: Barbara Hennon, 12-j. knabino volonte korespondus kun samaĝulo. Adr: 56 Sachem Street, Lynn, Massachusetts.

Grupo da geknaboj kaj instruistinoj bezonas por konvinki la estrojn multajn ilustritajn poŝtkartojn. Laŭeble ĉiu sendinto ricevos respondon. American Esperantist, 114 West 16 str., New York II, N.Y.

GENERALAJ SCIIGOJ.

Bulgarujo eldonas esperantan poŝmarkon! La bulgara ŝtato faris oficialan decidon eldoni en majo 1947 poŝmarkon, dediĉitan al la 60-jara jubileo de Esperanto, al la 30-jara datreveno de la morto de Zamenhof kaj al la 30-j. jubilea kongreso de bulgara esperantistaro. La pm. havos la valoron de 20 plus 10 levoj. Mendu ĉe Internacia Kulturo, Str. Graf Ignatiev 2, Sofia, Bulgarujo.

La hungara socialdemokrata partio dum sia 35-a kongreso (en la komenco de ĉi tiu jaro) oficiale akceptis Esperanton. Oni esprimis la deziron fondi en la partio grupon aŭ sekcion esperantan, kiu helpas por organizi korespondadon inter diverslandaj laboristoj kaj intelektuloj.

La hungara radio en Budapeŝt donos de nun regule ĉiulundnokte je duono antaŭ la unua (MET) dum 5 minutoj Esperanto-sciigojn. — Oni bonvolu sendi dankleterojn, kaj samtempe peti pli fruajn kaj pli longdaŭran elsendon! Kaj ankaŭ elsendon de literaturaj kaj artaj.

Esperanto en „Aero Fair 1947“. Dum la granda ekspozicio en Utrecht (Nederlando, 16-22 majo) Esperanto estos oficiala lingvo. La sekretario korespondas en Esperanto, estos speciala Esperanto-stando, kaj la servanta poŝt oficisto estos esperantisto.

En Gdansk (Polujo) okazos (denove post 700 jaroj!) internacia fioro. Estos grandegaj ekspozicioj, kaj ĉiaj festoj estas atendataj. Oni invitas la tutan Esperantistaron al la Patrujo de la kreinto de Esperanto! Zarząd, Miedzynarodowijch Targów, Gdanskich, Polujo.

RICEVITAJ ESPERANTAJOJ.

Premiaj romanetoj, eld. de Esp. Publishing Co., Rickmansworth, Britujo; 95-paĝa libreto; prezo 2 ŝ. 8 p (f 1,50). Enhavo: 23 verkaĵoj de diversaj aŭtoroj, premiitaj en konkurso.

Antonio kaj Kleopatra, eld. de Esp. Publishing Co., Rickmansworth, Brit; 90-paĝa libreto; prezo 2 ŝ 9 p (f 1,50). Ĝi estas tutproza traduko el la angla originalo de la dramo de William Shakespeare. Trad. de St. A. Andrew.

Kvara Rapsodio, eld. Eldona Societo Esperanto en Stokholmo; redaktis Ferenc Szilágyi; 48-paĝa libreto; prezo 2 sv. kr. (f 1,60). Enhavo: 24 verkaĵoj (prozaj kaj poeziaj, originalaj kaj tradukitaj) de konataj esperantistoj. Eta spegulbildo pri la vivo de Esperanto kaj ĝia ligo al la aliaj sociaj problemoj.

Konciza raporto pri la agado de la Nederlanda Centra Komitato, depost ĝia fondiĝo je la 22a de decembro 1945a ĝis la fino de decembro 1946a. Havebla ĉe la sekretario A. F. Leideritz, Vechtstr. 5, Amsterdam-Z.

Roter dama Urbokoro, eld. de la konsilejo por la rekonstruo de Rotterdam, Coolensingel 107, Rotterdam, Nederlando. Bonaspekta libreto, (kun il. kartoj raportanta pri la detruo de Rotterdam, pri la estiĝo de la bazoplano por la rekonstruo de la urbo, kaj pri la bazoj, sur kiuj la plano povos esti efektivigata. Oni tre ŝatas interŝangi opiniojn pri konstruo kaj rekonstruo, kaj do volonte ricevos samspecan materialon. Interesatoj turnu sin al „La Konsilejo por la rekonstruo de R'dam (vidu la adreson supre).





LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO“

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULDENO AŬ EGALVALORO.

Por progresintoj.

AL NIA GRANDA MAJSTRO.

Pacema familia rondo
Vivanta sen malam', milit,
En harmonia, bela mondo,
Jen la deziro de spirit'
De hom' genia, grandanima:
Vi, kara Majstro, portis ĝin.
El loko eta vok' translima
Eksonis, — kaj ni aŭdis vin.
Ideo nobla nin ĝojigis:
La lingvo kaj homara am'!

Ekstere nin la lingvo ligis,
Interne varma ĝojoflam'!
Jardekoj intertempe pasis.
Korp' via kuŝas en la ĉerk'.
Sed kvankam tiu nin forlasis,
Eterne vivos via verk'!
Kreskadas via amikaro
Al vi dankanta pro donac'
De vi kreita por bonfaro:
Por frata amo kaj por pac'!
Friedrich Hahn, Bremen (Germ.)

La eterneco.

Oni demandis al saĝulo, kiom longe daŭras la eterneco.

Kaj la saĝulo respondis:

Ie, en Hindujo, staras monto el diamanto. Ĝi estas longa unu kilometron, larĝa unu kilometron kaj alta unu kilometron. Kaj unufoje en cent jaroj venas birdeto poluri sur ĝi sian beketon. Kaj kiam la tuta monto estos for, estos pasinta unu sekundo de la eterneco

Urĝa peto!

Proponoj por la laborkunsido en Ipswich estu ĉe la sekretario antaŭ 1 julio.

SKOLTA RUBRIKO.

Skoltoj! Revivigu Skoltan Esperanto-Ligon en la kadro de TJO, kaj zorgu pri la skolta paĝo de „La Juna Vivo”. Ĉar la gazeto estas porjunulara, LJV multe taŭgus por esti organo ankaŭ de la skoltoj! — Kunlaboru!

P. Balkanyi, Budapeŝt, Hung.).

Cu skoltoj bezonas internacian lingvon?

Generale oni pensas, ke la angla lingvo regas dum la ĵamboreoj, kaj tio sufiĉas. Efektive la ĉiulandaj skoltoj klopodas lerni tiun lingvon antaŭ ol la tendarego trovos lokon. Sed kio okazas tie? Tion montru al vi la rakonto de d-ro Fred. Molnár, la hungara skolta eksĉefsekretario por eksteraj aferoj de la angla ĵamboreo, en 1929:

..... La por hungaraj knaboj nekutimaj manĝaĵoj ofte kaŭzis malagrablaĵojn. La nekono de kelkaj ingrediencoj, el kiuj la skoltkuiristoj devis pretigi la manĝaĵojn ofte postulis de ili multan pripensadon. Ĉiutage oni iris kun kelkaj knaboj al la subtendar-estrarejo por preni la nutraĵon, kiun oni poste disdonis en la apartaj tendaretoj (po 50 knaboj) en la hungara tendaro. Sed, ĉar la gvidanto ne tre bone sciis la anglan lingvon, ĉiam kuniris interpretisto.

Iun tagon la interpretisto forestis, kaj tiam la gvidanto iris sola kun kelkaj knaboj por transpreni la nutraĵojn. Ĉio staris jam preta sur longa tablo. Ankaŭ ĉeestis malgrandaj, rondaj konserv-skatoloj, kiuj enhavis ian paston. Ĉe la alia fino de la longa tablo samtempe norvegaj skoltoj akceptis sian nutraĵprovizon. La gvidanto rimarkis, ke tiuj ricevas ankaŭ aliformajn skatoletojn. Per jam ofte uzata „signolingvo” li petis, ke oni donu da ili ankaŭ por la hungaroj. Baldaŭ ili ricevis, kaj la skatoletoj venis ĉe la aliaj en la granda sako.

Ĉe la disdono unu trupo ricevis tiujn ĉi skatoletojn, sed la uzadmaniero estis same enigma, kiel tiu de la aliaj. Post interkonsilado kun la apuda ĉefkuiristo, oni decidis ŝmiri la enhavon de la skatoletoj sur panon. Tiel okazis, sed la knaboj tute ne entuziasmis pri la aparta manĝaĵo. Ili gustumis kaj gustumis, sed tute ne plaĉis al ili. Fine revenis la interpretisto. Oni montris al li la skatoletojn, por ke li klarigu la surskribon. Kaj je la ĝenerala terurigo li tradukis: „Bootpolish”: „Ŝuciro”

ESPERANTO INTER LA JUNULARO.

Sub ĉi tiu titolo mi skribis en la antaŭa numero de „LJV” kelkajn liniojn, kiuj akcentis la dezirindecon pri kunlaboro inter la edukistoj kaj la amikoj de la junularo kaj la junularo mem por akceli la kontakton inter Esperanto kaj la juna, venonta generacio. Mi pensas, ke ni en esperanto-medioj samopinias pri la neceso de Esperanto-instruo al la junularo, kaj ankaŭ pri tio, ke tia instruado devos okazi tiom, kiom eble en la kutima instruejo: la lernejo. Por atingi tion, du grupoj devos harmonie kunlabori en sama direkto: la instruistoj kaj la gepatroj por la bono de la edukatoj. Kune ili formos unu „rondon familian” konsistantan el elementoj, kiuj laŭnature apartenas unu al la alia. Tamen ĉi tiu deziro ne restu ŝvebanta; ni devos starigi ĝian realigon sur praktika bazo. Ni ĝojas, ke ni en ĉi tiu numero de „LJV” povas anonci tian bazon. Se ni interkonsentis pri la dezirindeco de ĉi tiu agadmaniero, kaj se reala bazo ekzistas, tiukaze ni devos konstrui sur ĝi. Nia kulpo, se la konstruaĵo ne atingos sufiĉan vastecon.

Kia estos tia bazo?

Intima kontakto inter la tri nomitaj grupoj per internacia organo, kiu povos helpi la studadon de Esperanto, gvidi la propagadon, stimuli la laborojn kaj centri la fortojn. Tia internacia organo povas fariĝi „La Juna Vivo” en nova formo.

La sekvonta julio-numero estos provo de tia sendependa kontakto inter junuloj ĝis 30-jaroj, amikoj de la junuloj kaj instruistoj. En ĝi aperos la oficialaj komunikoj de TJO kaj de la „Internacia Instruista Kunlaboro” (IIK).

La ĝenerala enhavo konsistos el:

1. Materialo por komencantaj kaj progresintaj junuloj, kiel ĝis nun.
2. Materialo por kaj informoj pri la propagando de „Esperanto en la lernejon tutmondan”.
3. Korespondrubriko por gelernantoj, „amikoj” kaj instruistoj.

La amplekso de la gazeto restos 16-paĝa kaj ĝi aperos 10 foje jare.

Eble ne ĉiuj junuloj interesiĝos pri la tuta enhavo; ili povos aboni nur la por ili plej interesan parton je tre malalta prezo: 1.— ned. guld. jare por 10 numeroj 8-paĝaj, sed tiam ni ekspedos la gazetojn grupe al unu adreso (ekz. kursgvidanto, instruisto), minimume 10 ekz.

La normala abonprezo estos 2,50 ned. guld. (5 ŝil, 110 fr.fr., 40 belg. fr., 4 sved. kr., ktp)

Jen *via* ŝanco jen *nia* ŝanco!!!

La redaktoroj estos f-ino N. Kool, la nuna redaktorino de LJV kaj P. Korte, la administranto de la antaŭmilita TAGE.

En la posta numero ni pli detale publikigos la tutan aranĝon.

Sed jam nun ni petas vian subtenon kaj kunlaboron por nia plano.

P. Korte.

NIA TUTMONDA FAMILIO.

Pri junularmovado, taskoj kaj devoj.

Post la unua mondmilito, multe kreskis la junularmovadoj. Junuloj mem gvidis tiujn movadojn kaj novaj gvidantoj kreskis en ili. Ĉiu ano kredis pri bona estonto. Venis la granda krizo. En ĉiuj junularmovadoj pli aŭ malpli rapide malaperis la spirito-fortoj, kaj la asocioj ne plu restis movadoj. Oni nur okupis la anojn. Movado aliĝis en junularprizorgadon. Post la dua mondmilito la junularmovadoj de la antaŭa mondmilito ne renaskiĝis. La malfido al la estonto kaj la malespero kreskis. Nur renovigita junularmovado povos trovi vojon el la haoso. Memagado kaj prizorgo estu la bazo por tia movado. Prizorga junularmovado nur plibeligas la junecan tempon. Oni aranĝas sportkunvenojn, dancgrupojn, ktp. por ke la junularo ne ĉiam vivu en la stratoj kaj kafejoj. Sed en junularmovado oni havu celon, idealon, krom la prizorgon. La junuloj ne nur ĝuu la prizorgon, sed ili mem laboru por atingi la celon. Tio donas pli grandan ĝojon. La junularmovado edukas la anojn al maturiĝo por la komunumo de plenaĝuloj, por ke ili tie agu por la samaj celoj.

Kio estas la celo de la esperantista junularmovado? La disvastigo de Esperanto, kaj do ankaŭ de la amo al la homaro. El la aparteno al movado estiĝas multaj taskoj kaj devoj por ĉiuj anoj, precipe dum la kunvenoj. Oni eduku unu la alian al amikeco kaj kamaradeco. Bona gvidanto ĉiam instruas unu aŭ plurajn estontajn gvidantojn, bona ano ĉiam helpas la gvidantojn. La pli aĝaj anoj estu ekzemploj por la pli junaj, ĉar la plej bona edukado estas bona ekzemplo. Nun ni venas al granda malfacilaĵo por la ĉirkaŭdudek-jaraj anoj!

Certe estas bele, kiam junul(in)o dum landa aŭ internacia kunveno trovas „la plej amindan” personon. Tamen se li (ŝi) estas

gvidant(in)o, li (ŝi) ne montru la amon dum la gvidanta tasko. Se tio okazas al ano, ankaŭ tiu ne estas libera: li estas en komunumo, do parto de tiu komunumo. Oni ne kunvenas por amindumi, sed por senti la internacian amikecon, la benon de Esperanto. Junul(in)o ne iru al kunveno por de-temp'-al-tempaj malaperoj kun sia „kortrezoro”. Tio mortigas la bonan sferon. Oni ne estas duope, sed multepe! Ja restos sufiĉe da tempo por personaj intereso. Bona gvidanto ĉiam donas kelkajn liberajn horojn. La malaperoj de kelkaj personoj, aŭ la formado de „klubaĉoj” malbone influas la pli junajn partoprenantojn.

Mi parolas el propra sperto, ĉar dum dek jaroj mi estis ano de junularmovado. Tie, kie la amikeco malvirtigas, malaperas la forto de la movado.

Gvidanto bone komprenu sian taskon. Li klopodu kompreni la junulojn kaj iliajn agojn. Li ne faru ĉion mem, sed aktivigu la anojn.

Ne nur la gvidantoj, sed ĉiuj anoj sentu sin respondecaj kaj komune oni serĉu la plej bonajn vojojn al la celo!

Jan Aarse, eks-ĉefestrarano de la J.V.O. (abstinencula junular-organizo) Amsterdam, majo '47.

SOMERKUNVENO SUR TEKSEL, NEDERLANDO, 2-9 aŭg. '47.

Ciu, kiu iam vizitis la pentrandan nederlandan insulon Teksel, neniame plu forgesos tion, kaj ĉiam sopiros reiri tien.

Apud De Koog, unu el la plej belaj lokoj de tiu insulo, okazos ĉijare la somerkampado por tiuj junaj TJO-anoj, kiuj pro la tro altaj kostoj ne povos iri al la internacia kunveno en Ipswich. Ni sukcesis lui tre taŭgan kampdomon kaj tendojn en la tuja proksimo. La domo staras apud la dunoj kaj kvin minutojn de la maro. Do certe idealo loko!

La kostoj por la tuta semajno estos nur f 20,— inkluzive de la vojaĝo, do ni esperas, ke multaj povos partopreni!

Oni anoncu sin antaŭ la 1a de julio al S-ino Jurriaans, Koningslaan 13, Bussum.

Esperable partoprenos ankaŭ eksterlandanoj!

Junaj eksterlandaj geamikoj, ni senpage gastigos vin! Kaptu la okazon partopreni en junular-kunveno en tiu bela parto de Nederlando! Pro diversaj cirkonstancoj ne eblis pli frue anonci ĉi tiun kunvenon, sed espereble vi ankoraŭ povos aranĝi vian vojaĝon! Turnu vin al S-ino Jurriaans (vidu supre).

LA REGALO.



Kvarope ili iras al la staloj, ĉar inter la diversaj staloj estas la birda korto. Ĝi estas granda korto kun grandega kokejo kaj kelkaj birdejoj. Unu birdejo similas grandegaN kaĝoN; en ĝi estas diversaj arbetoj kaj sur tiuj arbetoj saltas kaj kantas multaj birdetoj. Ili vidas kanariojN, fringojN, fringelojN, rubekolojN, papagetojN, kolibrojN kaj aliajn birdojN kun strangaj nomoj.

Sur la korto paŝas multaj grandaj birdoj: koko kaj kokinoj, meleagroj kaj kelkaj pavoj. La knaboj tre admiras la belajn birdojN kun la belega plumaro. Subite unu el la pavoj krias.

„He!” diras Pablo, „la bela pavo kantas malbele!”

Ili iras al la domo de la administranto. Sinjorino Bonavolo prenas du glasojN *de* vino kaj unu boteloN *da* vino. Baldaŭ ŝia edzo kaj s-ro Delmonto trinkas glasojN *de* vino. Post tio ŝi prenas du glasojN *de* limonado. Si verŝas siropoN el botelo *da* limonado kaj akvoN el la akvujo. La knaboj ricevas glasojN *da* limonado.

Post kvarona horo ili foriras. S-ro Delmonto kore dankas la administrantoN kaj la edzinoN. S-ino Bonavolo donas kelkajn sukeraĵojN al Joseo kaj Pablo.

Kiom ili ricevas? Ambaŭ ricevas saketon *da* dolĉaĵoj.


Kaj s-ro Bonavolo donacas al la knaboj moneroN por la ŝpar-
ujoj.

Du feliĉaj knabetoj sekvas sinjoroN Delmonto al la kamelo. Nun ili ne devas piediri. Li levas iliN; hup! Kaj per kamelo ili rajdas returne al Telde.

de - da

glasoj <i>de</i> akvo	glasoj <i>da</i> akvo	unu kilogramo <i>da</i> pomoj
glasoj <i>de</i> limonado	glasoj <i>da</i> limonado	unu hektogramo <i>da</i> kafo
glasoj <i>de</i> vino	glasoj <i>da</i> vino	unu funto <i>da</i> sukero
kestoj <i>de</i> oranĝoj	kestoj <i>da</i> oranĝoj	du pecoj <i>da</i> ĉokolado
sakoj <i>de</i> sukero	sakoj <i>da</i> sukero	du litroj <i>da</i> lakto
taso <i>de</i> kafo	taso <i>da</i> kafo	du sakoj <i>da</i> rizo

<i>Kiom da</i> pomoj?	Kelkaj pomoj	Kelke <i>da</i> pomoj
<i>Kiom da</i> mono?	Kelka mono	Kelke <i>da</i> mono
<i>Kiom da</i> mono?	Sufiĉa mono	Sufiĉe <i>da</i> mono
<i>Kiom da</i> oranĝoj?	Multaj oranĝoj	Multe <i>da</i> oranĝoj



Luiza faras komisionojn en la vilaĝo. Ŝi portas korbeojn. Ĉu ŝi ne faros erarojn? Ne! kvankam Luiza povas nek legi nek skribi, ŝi tamen povas kalkuli: adicii, subtrahi, multobligi kaj dividi. Patrino instruas tion al ŝi.

Ŝi iras al la spicisto. En la butikoj de s-ro Kest staras multaj kestoj, sakoj, boteloj, skatoloj, k.t.p. En la meza parto de la butikoj estas la butikaj tabloj kaj sur ĝi staras la pesilo kun la kupraj peziloj.

La butikisto servas la klientojn. Nun la vico estas al Luiza.

Ŝi mendas: „Kvar citronojn, du kilogramojn *da* faruno, du botelojn *da* oleo, unu botelon *da* vinagro, funto *da* alumetoj, kilogramo *da* makaronio kaj unu peseton *da* olivoj.”

Post tio ŝi donas la petrolojn al la spicisto kaj ŝi mendas: „Du hektolitrojn *da* petrolo.”

La butikisto ridas. „Sed Luiza, ĉu vi bezonas *tiom da* petrolo?”

Luiza ridas ankaŭ. Ne! *tiom* ŝi ne bezonas kaj ŝi mendas: „Du litrojn *da* petrolo.”

„Kiom mi ŝuldas?” demandas Luiza.

Ili nun kalkulas: kvar citronoj *po* dek centimoj: kvaroble dek estas kvardek centimoj, kaj du kilogramoj *da* faruno *po* unu peseto estas du pesetoj, kaj du boteloj *da* oleo *po* unu peseto dudek centimoj

multobligi: obl.		dividi: per.	
$1 \times 4 = 4$	unuoble kvar estas kvar	$12 : 3 = 4$	dek du <i>per</i> tri estas kvar
$2 \times 5 = 10$	duoble kvin estas dek	$18 : 6 = 3$	dek ok <i>per</i> ses estas tri
$3 \times 6 = 18$	trioble ses estas dek ok	$24 : 4 = 6$	dudek kvar <i>per</i> kvar estas ses

Kiom kostas ses oranĝoj *po* dek kvin centimoj?

Kiom kostas du kilogramoj *da* pomoj *po* okdek centimoj?

Kiom kostas kvin litroj *da* petrolo *po* kvindek centimoj?

Ekzerco: Skribu 6 vortojn kun la sufiksoj: uj, in, ej, ist, aĵ, id. —

Skribu 3 vortojN kun la sufiksoj: et, ar, eg, an, il, op, on. —
Skribu 3 vortojN kun la prefiksoj: ge, mal.
Ekzerco: Traduku kaj ree esperantigu jenajn vortojN: aŭtuno,
apetito, erupcio, preterpasi, apog-seĝo, malsupreniri, administran-
to, kompreneble, printempo, regiono, deklivo, ventumilo.

Pro spacomanko forrestis la vortoj sub la lecionoj.

Al Parizo!

Karlo kaj Minjo ludas en la ĝardeno. Ili sidas en malnova infan-
veturilo. Karlo diras: „Tio estas nia aŭtomobilo. Mi estas la ŝoforo,
kaj vi estas pasaĝero!”

„Bone!” diras Minjo, „Mi volas veturi al Parizo!”

„Tut! Tut-tut-tu-u-u-t! Ni jam iras!” krias Karlo. „Kiom rapide
ni iras! Ni flugas!”

„Infanoj! Infanoj!” krias la patrino. Sed la infanoj ne aŭdas
tion. Ili ja veturas jam malproksime!

Sed nun la patrino venas al la ĝardeno, kaj vokas: „Karlo kaj
Minjo, venu por manĝi! La patro jam estas hejme!”

Tion ili aŭdas! Tuj ili kuregas al la patro kaj rakontas pri la
bela vojaĝo al Parizo!

Traduku ĉi tiun ekzercon en vian nacian lingvon, kaj
poste retraduku ĝin en Esperanton.

Pri birdoj.

Ni havas belan, grandan ĝardenon. En tiu ĝardeno estas multaj
arboj kaj floroj. En la arboj loĝas multaj birdoj. En la mateno
mi ĉiam donas panon al la birdoj. Ili bone scias tion! Kiam mi
malfermas la pordon jam alvenas la paseroj kaj sturnoj. Estas
ankaŭ kornikoj kaj pigoj, sed ili ne venas al mi. La birdoj ne
kuraĝas manĝi el mia mano. Nun ili ne tre malsatas, ĉar ili povas
kapti insektojn, vermojn, ktp. Sed en la vintro, kiam estis mal-
varme, ili ĉiam sidis sur nia fenestro-breto. Kaj tiam ili rigardis
al ni, kaj pepis, kaj pepis. Per tio ili diris: „Ni malsatas! Donu
ion al ni!”

Kiam ni ne havas panon, ili ofte ricevas kaĉon. Ankaŭ tion ili
ŝatas. Por la paruoj ofte pendas peco da pano sur ŝnuro, ĉar ili
ne tre ŝatas sidi sur la tero. Ili estas tre amuzaj bestoj. Mi tre
ŝatas birdojn. Matene, kiam mi ankoraŭ estas en la lito, ili jam
kantas. Tiam mi baldaŭ iras el la lito, kaj al la ĝardeno!

Joĉjo (9-jara).

Kiu volas ion scii?

En la maja numero mi rakontis al vi ion pri la steloj. Kaj nun, ankoraŭ estas majo, mi jam verkas por la junia numero. Por gazeto oni ja ĉiam antaŭe devas verki, tion vi komprenos. Sed — nun mi ankoraŭ ne legis viajn demandojn, do ne povas respondi al ili. Tion mi faros en la julia numero, bone atentu!



Ankoraŭ mi volas reveni al la demando pri Marso. Ĉu tie loĝas homoj, aŭ ĉu tie ne loĝas homoj? Kaj se ili ekzistas, kiel ili aspektas? Ĉu ili havas figuron kiel ni, aŭ ĉu ili pli similas beston, aŭ eĉ planton? Ĉu eble ili povos flugi? En la apuda bildo Johanino Botema montras al ni, kiaj ŝi imagas la loĝantojn de Marso. Ĉar la aero estas pli maldensa, tie falas verŝajne pli da meteorŝtonoj ol sur nian teron. Tial ŝi pensis, ke la eventualaj loĝantoj havas iun organon, por eviti ilin.

Kion vi pensas pri la aspekto de la loĝantoj? Sendu al mi desegnaĵon pri tio! Mi tre scivolas!
Rogiero.

Ludi globetojn.

En ĉiu lando, jes, eĉ en ĉiu urbo aŭ vilaĝo, la infanoj ludas globetojn en alia, por tiu loko speciala maniero. En kelkaj lokoj ĉi tiu ludo estas tiel streĉa, ke vi povas ĝin ludi horojn kaj horojn sen enuo. Mi ja ne konas ĉiujn manierojn de globetludado, tute ne. Sed mi volonte scius pri ĉiuj, kaj vi povos min helpi ĉe tio. Ĉiu, kiu ŝatas tion, rakontu al mi, laŭeble klare, kiel oni en lia urbo aŭ vilaĝo ludas globetojn. Se eble, aldonu planon, skeman desegnaĵon. Se oni ludas globetojn ĉe vi laŭ diversaj manieroj, do bonvolu informi min pri ĉiuj. Ankaŭ sciigu al mi, kiam ĉe vi estas la tempo por globetludado. Venontan fojon mi rakontos al vi pri la ricevitaj leteroj, kaj kiujn manierojn de globetludado mi opinias plej belaj.
Rogiero.

Leterojn por Rogiero oni adresu al TJO-Centro, West-Graafthijk, Nederlando.

Floro

(Verkaĵo de Elsje v. d. Ploeg, kiam ŝi estis 9-jara).

En floro loĝis elfino. Estis somero. La floro estis blanka lekanto kun flava koro.

La elfino loĝis tie agrable kaj intime. Ŝi tre deziris edziniĝi kaj elektis virelfon.

Ili geedziĝis tiam. Estis bela geedziĝa festo.

La aŭtuno venis, kaj la elfoj devis foriri. Estis longa vojaĝo al la sudo, sed fine ili tamen alvenis tien.

Kaj kiam la somero ree estis en la lando, ili revenis.

Ili elektis novan lekanton kaj loĝis tie dum la bela somero. En la aŭtuno ili ree foriris.

Kie estas la kornoj de la bovo?

En la lernejo estas ekzameno. La instruisto demandas al Stefano: „Kie estas la kornoj de la bovo?”

Stefano, kiu ne estas la plej saĝa lernanto, rigardas time, kaj atendas ian helpon. La instruisto kompatas la knabeton, kaj por iom helpi al li, li montras al sia frunto. Tuj diras Stefano, ĝoja, ĉar li povas bone respondi: „Sur la frunto de sinjoro instruisto!”

Emeriko Balkanyi (14-jara) Budapeŝt (Hungarujo).

La Heliko.

Ciu heliko havas konkon. Kiu ne havas konkon, la nudaj, tiuj ne estas helikoj, sed limakoj.

Ciu heliko do havas konkon. Kelkaj havas blankan, kelkaj flavan, aliaj brunan aŭ nigran, aŭ verdecan. La konkoj de ĉiu speco de heliko havas siajn proprajn kolorojn. Kaj kien ajn iras la heliko, ĉiam ĝi kunportas tiun konkon. Fakte tiu konko estas ĝia eta domo. Tio estas amuza! La heliko portas sian domon sur sia dorso.

Kiam la vetero estas malbela, kaj pluvas ĝi iras eksteren. Kaj tiam ĝi portas sian domon ĉien, kaj ĝi frandas de la mola, sukoplenta verdajo. Tiun pluvon ĝi ege ŝatas. Sed kiam la vetero estas varma, kaj la suno brilas tiam ĝi iras internen kaj dormas en sia eta, malluma ĉambro.

Kiu komprenas kial?

Rogiero.

La sonĝo de abelo (Fabelo).

Vesperigis. Jam ĉiuj abeloj hejmenflugis, sed unu abelo, Pikulino ŝi nomiĝis, sidis ankoraŭ sur unu el la multaj petaloj de belega, blua cejano. Ŝi sentis sin laca. Ja mil florojn ŝi vizitis hodiaŭ. Kaj ĉie ŝi trovis la bongustan nektaron. Enpense ŝi vidis ankoraŭ ĉiujn tiujn belajn nektarsignojn. Nektarsigno fakte estas vojo. Ĝi estas la vojo laŭ kiu ni, insektoj, iras por atingi la nektaron. Tiel revis la abelo.

Mallaŭte la vento susuris. La cejano balanciĝadis supren kaj malsupren, kaj ree supren kaj malsupren. Iom post iom tute mallumiĝis kaj Pikulino endormiĝis.

Ŝi sonĝis pri mirige granda floro, kies nektarsigno fariĝis voĝejo. Ion tiel belan ŝi ankoraŭ neniam vidis. La larĝa meza strio estis flava, kaj ambaŭflanke de ĝi estis siringviola vojeto. Kaj ambaŭflanke de tiu tuto troviĝis la milda blanko de la petalo. Sur tiu meza vojstrio iris centoj da abeloj, unu ankoraŭ pli rapide ol la alia. Ĉiu volis laŭeble baldaŭ atingi la celon: la nektarfonton ĉe la fino de la voĝejo. Kia multmoveco, kia trafiko! La flankaj vojetoj estis por la malpli grandaj insektoj: kuloj kaj muŝoj kaj etaj oraj skaraboj. Fulmotondrovetera muŝeto rajdis sur la dorso de malafabla saltoskarabo. Ankaŭ Pikulino sin movis en la fluo. Post unu horo ŝi atingis la nektarfonton. Cent insektoj sidis ĉe la bordo kaj trinkis. Ŝi flankenŝovis dikan burdon kaj ankaŭ gustumis. Bongustega estis tio. Tiel rave dolĉa.

Subite ŝi skue vekigis. Kio estas tio? Jam tute mallumiĝis.

Ĉu ŝi ankoraŭ trovas la vojon al la kava arbo?

Rogiero.

La venĝo de la pastro.

Iu kamparano alportis kokinon al la pastro. Tiu ĉi invitis lin al manĝado. Post ok tagoj venis alia kamparano al la pastrejo. Sed li venis kun malplenaj manoj.

„Kiu vi estas? Kaj kion vi deziras?”

„S-ro pastro, mi estas la frato de tiu, kiu alportis kokinon al vi.”

„Do eksidu.”

En la postaj tagoj, unu post la alia venis kuzoj, parencoj kaj najbaroj de tiu, kiu alportis la kokinon, por manĝi supren en la pastrejo. Fine la pastro perdis la paciencon. Kiam ree venis vizi-

tanto, kiu estis nur parenco de la kuzo, de la bofrato de tiu, kiu alportis la kokinon, li donis al li nur pelveton da varma akvo.

„Kio estas tio?” demandis la servistino.

„Tio estas parenco de la kuzo de la bofrato de la buljono de la kokino!” respondis la pastro. Laŭ „Svisa Espero”.

LUDO.

Vortludo: Oni prenu vorton, ekz. maro. Ĉiu laŭvice devas trovi alian vorton, ŝanĝante ĉu la unuan, ĉu kiun ajn alian literon. Ekz: maro — mano — rano — rato — reto, ktp.

„Paco kaj Justeco”, Brugge (Belg.).

Aŭtobiografio.

Ĉu vi scias, kio estas aŭtobiografio? Tio estas priskribo de via propra vivo. Vi rakontas, kiam kaj kie vi naskiĝis, en kiuj lokoj vi loĝis, kiujn lernejojn vi vizitis, kaj pri aliaj aferoj el via vivo.

Vi ne bezonas skribi multon: duona paĝo jam sufiĉas. Kiam via letero estas preta, vi sendu ĝin al mi. Ne forgesu aldoni vian nunan adreson, nomon kaj aĝon. Aldonu respondkuponon. Tiun vi povas aĉeti en ĉiu poŝtoŝtanco. Nederlandanoj aldonu 10-cendan poŝtmarkon anstataŭ respondkuponon.

Ĉu vi scias, kion ni faros? Ni sendos ĉiun aŭtobiografion al alia knabo aŭ knabino, de proksimume la sama aĝo. Ĉu vi komprenas? Vi do ricevos la vivopriskribon de fremda knabo aŭ knabino, kaj alia ricevos vian.

Tuj kiam vi ricevis la gazeton, vi ekverku! Vi ja komprenas la celon, ĉu? Vi skribas leteron; leteron al la nova amiko aŭ amikino. Kaj ankaŭ vi mem kompreneble ricevos leteron.

Rogiero.

TJO-RUBRIKO.

La 24-an de marto kaj la 4-an de majo la estraro kunvenis en Amsterdam.

La referendumo: La aliĝo al IEL akiris 72 % de la votoj. TJO do aliĝos al IEL kiel faka organizo.

La aĝolimo por aktivaj anoj fiksiĝis je 14-30 jaroj. La malpli aĝaj estas aspirantaj anoj, la pli aĝaj subtenantaj anoj.

Nur 35 % estis por la aliĝo al Monda Federacio de Dem. Junularo.

30 % estis por la samtempa kaj samloka okazigo de la Internaciaj Junularkunvenoj kun la Universalaj Kongresoj. Ambaŭ proponoj do ne estas akceptitaj.

En ambaŭ estrarkunvenoj ĉeestis la presisto de „LJV”, kaj en la lasta ĉeestis ankaŭ s-ro Korte, reprezentanto de la Internacia Instruista Kunlaboro (IIK).

Ni priparolis, ĉu „LJV” povus esti la oficiala organo ankaŭ de IIK. En plena harmonio ni decidis fari provon. En la laborkunsido dum la Internacia Kunveno en Ipswich ni pli detale priparolu tiun aferon.

Car ĝis nun la preskostoj superis la abonkotizon, ni estis devigataj ŝanĝi tion. De nun por ĉiuj novaj pagoj validos jenaj prezoj: Kotizo, inkluzive de LJV: 2,50 guld. Kotizo por asp. anoj: 1.— guld. La lastaj ricevos malpli ampleksan organon, nome nur tiun parton el „LJV” kun por ili interesa enhavo. (Tiu prezo tamen nur eblas, se la gazetoj grupe povos esti sendataj). Abono je „LJV”: f 2,50.

La estraro de „Denaska Esperantistaro” oficiale petis kunlaboron kun TJO. Ni akceptis tion, kaj estas traktantaj la aferon.

* Nia belga ĉefperanto, Carlos Braet, reprezentos TJO-n en la Universala Kongreso en Bern. — Maartje Seilberger faros tion en la SAT-Kongreso en Aarhus.

Aperis artikoloj pri TJO kaj Ipswich en Svenska Esp. Tidningen kaj en Dansk Esp. Blad. — Krome eliris Belga TJO-Bulteno No. 9, Ned. TJO-Bulteno No. 8, kaj Juna Espero en Anglujo. — Ankaŭ la finna ĉefperanto serĉis kontakton kun la finna gazetarō. — Bonega laboro de vi ĉiuj gemikoj! Daŭrigu tion!



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

En Ipswich (Britujo).

Sin anoncis: 71. Corrie Briggeman (10-j.), Rotterdam; 72-128: 30 knabinoj en Birmingham, 18 knabinoj en Neath, 3 knabinoj en Newcastle, 1 knabino en Dorchester, 2 knabinoj en Leeds, 2 knaboj en Liverpool, ĉiuj en Britujo; 129. Jannie Konduus (23-j.), Kolhorn, Ned.; 130. Mary Kryt, A'dam, Ned.; 131. S-ino v. Veenendaal, Limmen, Ned.; 132-133. F-inoj A kaj N. Kool, West-Graafthijk (Ned.); 134. Lars Westman; 135. Hans-Erik Lund; 136. Bertil Johansson; 137. f-ino Valborg Caesar; 138. f-ino Dagmar Larsson, ĉiuj en Skövde, Svedujo; 138. Roger Bizet, en Menneville par Desvres, Francujo; 139. Gerbr. Timmerman (26-j.), Bergen; 140. Piet Klaver (22-j.), Oudkarspel; 141. Piet Keppel (23-j.); 142. Klaas v. Nienes (20-j.), ambaŭ en Nrd. Scharwoude; 143. Arie Blauw (17-j.); 144. Nan Goudsblom (25-j.); 145. Ans Kooy (19-j.); 146. Bertha Kuiper (21-j.); 147. Sonja Kruyer (25-j.); 148. Gré Stapel (23-j.); 149. Trijnie Stapel (27-j.); 150. Piet Vader (25-j.), ĉiuj en Heerhugowaard; 151. A. Verdam (24-j.); 152. C. Jacobs, ambaŭ en Haarlem; 153. M. Snijders, Purmerend; 154. Tr. Klomp (20-j.), Koedijk; 155. Theo Jung (15-j.), Scheveningen; 156. H. Cohen (16-j.), Venlo; 157-158 Willie kaj Henk Uittenbogaard (17 k. 26-j.); 159. Ben v. Moorst (17-j.); 160. W. de Jong (17-j.); 161. Marianne Telder (17-j.), ĉiuj en Hilversum; 161. A. Welters, Groningen. (Noj 139-161 ĉiuj estas nederlandanoj).

Ĉiuj partoprenantoj devos kunporti dormsakon, lankovrilon kaj tualet-artiklojn.

Sciigo de la nederlanda sekcio: Donacoj por nia vojaĝkaso: S. de G. en H.: f 50.—; J. M. en U.: f 5.—; H. S. en N.: f 50.—. Bonegaj ekzemploj! Kiuj sekvos? La ĝirnumero de la kasisto estas: 330139, M. v. d. Horst, Rotterdam!!!

La nederlandanoj bonvolu pagi al li la plenan koston (vojaĝon Hoek van Holland al Ipswich kaj returnen, plus restadkoston) antaŭ 31 julio (f 68,23 por infanoj ĝis 16-j.; f 72,50 por 16-18-j.; f 89,55 por la pli aĝaj).

Bedaŭrinde ni ne povos vojaĝi per komuna pasporto, do ĉiu mem zorgu pri pasporto.

Partoprenantoj ricevos ankoraŭ detalajn sciigojn.

Se vi ankoraŭ ne anoncis vin, FARU TION NUN!!!

GENERALAJ SCIIGOJ.

Amika Internacia Renkonto en Angers, Francujo (13-22 julio '47). Okazos: paroladoj, filmoj, vizitoj al urbaj vidindaĵoj, ekskursoj, i.a. al la vinberejo. La prezo estas malalta: 150 fr.fr. tage (komuna dormejo kaj manĝado), 200 frankoj tage por aparta ĉambro. Aligprezo nur 100 fr. Petu informojn de F-ino Nouais, 28 Boulevard Descazeaux, Angers.

Sep Fratoj. — Ni ricevis la sciigon de la eldonejo, ke la eldonota libro aperos en novembro 1947. Oni do iom paciencu!

Internacia Esperanto-Ligo (IEL) kaj Universala Esperanto-Asocio (UEA) kunfandiĝis. La oficiala nomo estos UEA, kaj ĝia organo nomiĝos „Esperanto“, Red. de H. Jacobs, Palais Wilson, Gneve, Svisujo.

Internacia Junular-Kunveno en Svedujo (12-15 julio). Svedujo invitas vin al internacia junular-kunveno en la bela regiono de Kolmarden/Jursla, apud la urbo Norrköping. Ĝi okazos tuj post la internacia somerkunveno en Skövde. La distanco inter ambaŭ urboj estas proksimume 200 km. Ĉiuj kostoj por la restado en Norrköping estos 15 sv.kr. (pr. 1 angla funto). Vi ricevos trifojn tage manĝaĵojn. La junaj partoprenantoj loĝos en tendoj, esperantista somerhejmo, provizora ligno-konstruaĵo aŭ ĉe esperantistoj en la ĉirkaŭaĵo.

Provizora programo: 12/7: Malfermo de la kunveno, amuziga programo, kanto, muziko, teatraĵeto, dancado, ludoj, kaj fine kampfaĵo. — 13/7: Antaŭtagmeze: ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo, banado kaj promenadoj. Posttagmeze: festprogramo — aktuala prologo. La eksterlandaj gejunuloj helpas en la programo. Vespere: Amika kunestado. — 14/7: Antaŭtagmeze: Laborkunsido. Posttagmezo libera por eventuale daŭrigi la laborkunsidon. Vespere publika festvespero. — 15/7: Praktikaj, amuzigaj lecionoj, ŝerc-ludoj, konkursoj. Vespere tre varia programo, en kiu kunlaboros svedaj kaj eksterlandaj gejunuloj. La vespero finiĝos per kampfaĵo.

Eksterlandanoj anoncu sin al S-ro K. E. Andersson, Jursla 5, Aby. Se vi volas kontribui al la programo, vi tion sciigu.

Sveda Esperanto-Federacio kaj la sveda TJO-sekcio.

Internacia Junstudenta Rondo. Por formi tian rondon inter lernantoj de l' mezgradaj lernejoj ni petas vian helpon. La celo estas formi firman ligiton inter la diverstendencaj studentoj per korespondado, reciprokaj vizitoj, ktp.

Sendu proponojn kaj sugestojn. Al ĉiuj mi respondos. La aldono de respndkuponon estos ŝatata. Antaŭe dankante, Petro Nyssen, Burg. de Roocklaan 35, Bergen op Zoom, Nederlando.

Internacia kunveno en Reutsperre, Svisujo (2-9 aŭg. '47). — S-ro Kobelt proponis plilongigi tiun kunvenon per unu tago, do ĝis la 9-a de aŭgusto. Pro tiu ŝanĝo la restadmono por la tuta kunveno fariĝos f 21.— (£ 2; 28 sv.fr.), enkalkulite la manĝaĵoj por la revojaĝo. La eksterlandanoj mem devos zorgi por svisa mono. Ni ne plu povas akcepti nederlandajn esperantistojn.

E. v. Veenendaal-Bouwes, Limmen (Ned.).

Bulgarujo: Je la 30-a de marto '47 fondiĝis en Sofio Junularo Fako ĉe Bulgara Esperanto-Asocio (Juf ĉe BEA). Celo: la disvastigo de Esperanto inter la ĉulgara junularo. — Oni i.a. deziras interŝanĝi artikolojn pri la junulara vivo internacia (ne nur esperantista). Petu informojn de Junulara Fako ĉe BEA, Str. Alabin 33, Sofia.

RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

La Vana Kanto, broŝ. versaĵaro, originale verkita de L. Thevenin. Eldono de „Kompreni”. Prezo: 60 fr. (6 resp. kup).

6' Diversaj kantoj kun muziko, sur kartono (Kanto de l' Migruloj, Tra la montoj, La Bohemo, Antaŭen, La kaprino, La Geranoj). Prezo 30 fr.fr. (3 resp. kup). Eldono de „Kompreni”. — Oni povas mendi la suprajn esperantaĵojn al: C. Chalas, 41, rue Tables Claudiennes, Lyon I, Francujo.

Socikredito (mallonga klarigo). Ĝia celo estas plibonigi la ekonomiajn aranĝojn. Socikredito postulas: La starigon de nacia kredito-departemento; la aplikon de preza diskonto; la distribuon de naciaj dividendoj. — Informojn oni povas peti de Miss Muriel Stewart, Secretary, Social Credit Co-ordinating Committee, Gordon House, Carrington Street, Nottingham, Britujo.

GRAVA PETO!

Por la plej multaj TJO-anoj kaj abonantoj je „LJV” finiĝos la kotiz/abonjaro je 1 julio. — Vi multe helpos nin, se vi antaŭ tiu dato pagos por la nova jaro, ĉu rekte al ni, ĉu al la ĉefperanto en via lando. Tiel vi multe plifaciligos nian administradon, kaj ŝparos al vi mem la kvitanckostojn. Vidu la liston de perantoj en la februara numero. Abonantoj nur bonvolu atenti, ke la abonkotizo ekde 1 julio estos f 2,50 (5br. ŝil, 100 fr.fr., 40 belg.fr., 9 aŭstr. ŝil, 5 dan. kr, 4 sved. kr, ktp). Se vi ne deziras daŭrigi vian abonon, bonvolu sciigi tion *antaŭ 1 julio!*

Ekde julio aperos parto el „La Juna Vivo” kiel speciala lerneja gazeto. Petu informojn!

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson. La saman rajton havas grupoj, kies gvidanto estas abonanto.

Aŭstralio: 12 gejunuloj progresantaj serĉas korespondantojn en ĉiuj landoj. Jack Couche, Anglesea Barracks, Hobart, Tasmania.

Britujo: Kvar anglaj infanoj dez. kor. kun nederl. inf. pri moroj, kutimoj, havenoj, polderoj, k.c. Komence per mallongaj leteroj kaj bildkartoj. Nomoj: Doreen Lock, Ida Harvey, William Pugh, Donald Roberts. Skribu al R. S. Hollier: 30 Woodstock Rd, Forest Gate E 7, London.

Bulgarujo: F-ino Maria Manolova, 18-jara, Dragaŭ Cankov 9, Sliven, dez. kor. kun ĉiuj landoj en la mondo.

Simeon Kr. Belev (21-j.), S. Bregovo, Vidingko, dez. kor. pri diversaj temoj.

Ivan Ign. Panĉev, ul. Kableŝkov 21, Pleven, dez. kor. pri tekniko kaj aliaj temoj. Li estas 21-jara.

S-ro Pavel Nikolov dez. kor. kun ĉiuj landoj per let., il. pk. Interŝ. poŝtm. Respondo certa. Rue 8em drugina 6, Tirnovo.

Ĉeĥoslovakujo: Studento kaj skolto dez. kor. kun la tuta mondo per let. kaj il. poŝtk. Resp. certa. Zdeněk Lisy, Praha VII, u Pruhonu 48.

Junaj esperantistinoj ŝatus korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo. F-ino Jaroslava Sichova, Opava, Reditelstvi poŝt, III-a.

Francujo: F-ino Jacqueline Le Page en seminario por instruistinoj en Quimper (Fin.), dez. kor. kun skoltoj, kiuj partoprenos la jamboreon.

Italujo: S-ro G. Dassenno, C. Carbonara 2, Genova, dez. kor. kun s-roj Direktoroj de Kooperativoj por ekzameni la eblecon starigi internaciajn kooperativajn esperantajn.

Nederlando: Sendu, mi petas, bildkartojn el ĉiuj landoj por propagandi en mia oficejo. J. G. Pieters Jr., Oostzaanstr. 77, Amsterdam.


Miaj gelernantoj (10-13-j.) dez. kor. kun junaj geesperantistoj en ĉiuj landoj. F-ino T. Putto, Parkweg 31, Ede (Gld).

Polujo: Dekdu 17-j. skoltoj dez. kor. kun gejunuloj en la tuta mondo. Esperanto-Rondo ĉe Sniadecki Gimnazio, Partyzacka 56, Pablianice.

INTERNACIA KULTURO	PROPAGANDU!!!
Kultura revuo de balkanlandaj Esperanto-Asocioj. Abonprezo por 16 numeroj f 6.— Abonebla ĉe TJO-Centro.	per la TJO-papero kaj kartoj! 50 folioj kaj kovertoj f 2,— 50 kartoj f 0,65
„LA VIVO“	STUDU!!!!
Monata Organo de „Amikoj de la Homaranismo“. Petu specimenon de s-ino v. Veenendaal, Limmen, Ned. Prezo 1 resp. kup.	per „La Juna Vivo“-lernolibreto (3-a eldono) prezo f 0,50 binditaj jarkolektoj „LJV“ de la jaroj '34/'35 kaj '36/'37 belaspektaj, ampleksaj libroj, prezo po f 1,—
Por unu guldeno oni ricevos de TJO-Centro 10 diversajn, internaciajn Esperanto-gazetojn (revuojn).	

L

LA JUNIA VIVO



ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. (5 ŝil., 114 fr. fr., 4 sv. fr.)

KARAJ GEAMIKOJ.

Ci tiu numero de „LJV” ne nur estas la unua de nova (la deka) jaro, sed ĝi samtempe estas provo de nova kunlaborado, nome kun la Internacia Instruista Kunlaboro (I.I.K.)

Por niaj aspirantaj anoj (ĝis 14-j.) aperos ek de nun parto el LJV kiel speciala (8-paĝa) organo por infanoj. Ĝi kostos nur 1.— guld. jare (2 brit. ŝil., 45 fr. fr., 2 d. kr., 17 b. fr., 1,40 sv: kr., ktp): Kondiĉo por tiu malalta prezo tamen estas, ke la landaj sekcioj aŭ grupoj mem prizorgu la administradon. Ni sendu la gazetojn, kiom eble, grupe.

La kotizo por la plena organo restos 2,50 guld. Instruistoj, kiuj estas TJO-anoj, kaj do de ni jam ricevas „LJV” bezonas pagi al la landa grupo de IIK nur la kotizon (1 guld.) se ili deziras aliĝi. Se, kontraŭe, ili aliĝis al instruista grupo, kaj pere de ĝi ricevas LJV, ili povas fariĝi subtenantaj TJO-anoj por nur f 1.—; Dank’ al la komuna organo oni do por f 3,50 povas esti ano de ambaŭ movadoj. — Oni ankaŭ povas simple aboni „LJV”. Jarabono kostas f 2,50.

Geomikoj, ni faras provon. La sukceso dependos de vi!

Ni havas la okazon kunigi du grupojn, kiuj laŭnature apartenas unu al la alia. Ni kaptu ĝin! Se vi, same kiel ni, sentas ke momente la cirkonstancoj estas favoraj por enkonduki Esperanton en la ler-

nejon, eklaboru! Varbu anojn, por ke ni grandamase surprizu la inertan mondon! Se ni nun ne uzas la okazon, ni poste bedaŭros tion! En ĉiuj landoj ni propagandu samtempe! Se ĉiu plenkonscie kaj plenforte kunlaboros, ni devos sukcesi.

Verku ankaŭ por la enhavo de LJV. Junaj geamikoj, multaj edukistoj legos nian revuon. Montru al ili, ke vi ne estas „la senenhava postmilita junularo, kiu nur emas al dancado, ktp”, kiel „oni” tiom ofte asertas. Montru, ke ankaŭ vi estas konsciaj, ke vi staras pretaj por la batalo, kaj ke vi postulas en ĝi vian propran lokon!
VERKU! VARBU! VENKU!

IPSWICH (daŭrigo).

..... Dum tiuj malproksimaj tagoj de la 13a jarcento, kiam Ipswich prosperis sub la influo de siaj kvin monaĥejoj, oni starigis la unuajn Ipsviĉajn gastejojn. El tiuj gastejoj, kiuj do restis sub la samaj montrotabuloj dum pli ol kvar jarcentoj, la plej konata sendube estas „The Great White Horse” (La Granda Blanka Cevalo). Fondita en proksimume 1518 ĝi estas eble unu el la gastejoj, uzitaj de pilgrimoj. Multaj eminentaj homoj loĝis sub ĝia tegmento, ekz. la reĝo Georgo IIa, reĝo Louis XVIIIa de Francujo, Lordo Horation Nelson, ktp.

Sed ne estis pro iu glora persono ke „The Great White Horse” iĝis bonkonata. Por trovi la veran kialon oni legu la 22-an ĉapitron el „The Pickwick Papers” de Charles Dickens, en kiu estas rakontata pri la ridigaj aventuroj de la aminda s-ro Pickwick kaj la sinjorino portanta la flavaj frizpapirojn.

La rivero Orvell ne nur estas bela kaj larĝa estuaro (riverbuŝo) sed dum pasintaj tempoj ĝi havis romantikan historion; speciale rilate al la kontrabandistoj. Ankoraŭ oni povas vidi sur la suda bordo de la rivero la tiel nomatan „Cat House” (Katodomon), malgrandan konstruaĵon okflankan. Oni donis al ĝi tiun strangan nomon pro la fakto, ke oni starigadis en la fenestron remburitan katon kiel signalon por la kontrabandistoj. Eĉ nun estas tia kato ĉe la fenestro — ĉu la sama, mi ne povas diri!

Plej apude estas stranga kvadratforma turo „Freston-Turo” (Freston estas la nomo de la plej proksima vilaĝo). Laŭ onidiro ĝi estas konstruita de iu Lordo de Freston kiel studloko por lia filino Heleno. Oni aranĝis ĉiun ĉambron en la turo por la studado de unu speciala temo. La plej malalta ĉambro estis por „bon-

faremo dum la akcepto kaj helpo al la malriĉuloj", la dua por tekstapetofarado, la tria por muziko, la kvara por literaturo kaj la sesa, kiu enhavis astronomiajn instrumentojn fiksitajn al la tureto, por astrologio.

Certe la vizitontoj trovos Ipsviĉon interesplena urbo!

J. Heath, Ipswich, Brit.

SKOLTA RUBRIKO.

Dimanĉon, la 10-an de aŭgusto, estos Skolta-Esperantisto-Kongreso en la Jamboreo! Skoltoj!!!! Partoprenonte en la Jamboreo bonvolu tion kiam eble plej baldaŭ sciigi (donu vian plenan adreson!) al skoltrfrato Scheldeman Alain, Rue Wahis 186, Menin, Belgujo.

Skoltrfratoj kiuj deziras havi la „JAM“-kanton skribu al la sama adreso.

En la jamboreo estos: La granda cirko „AMAR“, kun 5.000 lokoj; kinejo kun 300-500 lokoj; areno kun 10.000 lokoj kaj subĉiela teatro kun 25.000-30.000 lokoj. Cion, kio estas en moderna urbo, vi trovos en la JAM.

Fratoj-esperantistoj! Okaze de la jamboreo ni prizorgu la fremdajn vizitantojn-samideanojn, skoltajn aŭ ne! Ciu el vi jam korespondu kun partoprenonto de la internacia tendaro. Daŭre havu bonajn rilatojn kun ili!

Eble vi jam invitis vian korespondanton, kaj poste vi klopodos viziti lin, kiam la cirkonstancoj estos favoraj.

Linko kun ruletoj.

El Ĉeĥoslovakujo: Ni kore salutas la esperantistan junularon de la tuta mondo. Ni skoltoj-esperantistoj de la skolta organizo Junák restarigis nian Esperanto-Fakon kaj ni kreskas de tago al tago. Jam en pli ol cent lokoj ni havas „peranton“ kiun ni instigas per cirkuleroj al plua laboro por ESPERANTO. Lia devo estas grupigi la aliajn. Pli bonan sukceson havas niaj slovakaj skoltrfratoj kiuj jam aperigas ek de la unua numero de sia skoltgazeto Esperanto-kurson. Ankaŭ pluraj slovakaj infangazetoj aperigas Esperanto-kurson. — Per niaj alvokoj en diversaj E-gazetoj ni sukcesis interrilati kun kelkaj landoj: Volonte ni ankaŭ interrilatas kun: Grekujo, Jugoslavujo, Bulgarujo, Rumanujo, kun la demokrataj junularoj de Hispanujo kaj Portugalujo, kun pioniroj de nia nova slava najbaro de SSSR. Nia intenco estas krei kun ĉiuj vere Familian Rondon per nia kara lingvo ESPERANTO.

Esp. Fako de Junák PRAHA II, Havlickovo, nám 28.

Bone notu! De 1-22 aŭgusto TJO-Centro estos fermita. Dum tiu tempo oni ne sendu korespondaĵojn.

La sekvonta numero de „La Juna Vivo“ aperos en septembro. Pro spaco-manko diversaj artikoloj kaj sciigoj ne povas aperi.

Propagandu la lernejan gazeton „LJV“: 8 paĝan ilustritan revuon. Jarkotizo nur f 1.— (2 ŝil., 45 fr.fr., 16 b.fr., 1,62 sv.fr.).

Internacia Ekspozicio de Infanaj Desegnaĵoj.

La Esperanto-Societo de Lyon preparas tian ekspozicion. La celo estas montri, kiel infanoj vidas sian landon. Tial la desegnaĵoj prefere prezentu tipajn pejzaĝojn, aŭ scenojn, Formato 21 × 27 cm. La aĝo de la infanoj estu maksimume 14 jaroj. Sub ĉiu desegnaĵo oni klare menciu: nomon, aĝon, adreson, kaj eventuale la lernejon.

La ekspozicio okazos en la venonta aŭtuno, en „Palais du Conservatoire”, kie okazas ĉiuj artaj ekspozicioj. Grandaj tabuloj klarigos, kiel Esperanto permesis la kolektadon. Poste la societo metos la tutan materialon je la dispono de aliaj esp. grupoj.

Sendu la desegnaĵojn al la prezidanto de la Liona Esp. Societo, Richard Levin, 55 Avenue Félix-Faure, Lyon, Francujo.

Leciono 35.

KION VI FARUS?



Fine ili estas pretaj. „Vi ŝuldas dek tri pesetojn kaj okdek kvin centimojn,” diras la spicisto.

Luiza serĉas la monujoN en la korbeto. Kie ĝi estas nun? Ŝi ne povas trovi ĝiN. Ŝi serĉas kaj serĉas kaj estas nerva.

„Ĉu vi ne havas monoN ĉe vi?” demandas la butikisto. „Tio ne estas grava, Luiza. Vi ankaŭ povas pagi morgaŭ!” „Sed mi kunprenis miaN monujoN,” respondas Luiza. „Mi metis novaN monbiletoN en ĝi. Kie ĝi estas? Mi tre esperas, ke mi ne perdis la monujoN, ĉar tio estus granda perdo!”

„Ankaŭ mi bedaŭrus, se vi havus domagoN, Luiza,” diras s-ro Kest. „Sed eble vi trovos ĝiN.”

„Se vi perdus monujoN, kioN vi farus tiam?” demandas Luiza. Siaj vangoj estas malsekaj pro la larmoj. KioN diros Panjo?”

S-ro Kest kompatas ŝiN. „Se mi ne povus trovi miaN monujoN, tiam mi pensus,” li diras. „Ĉu vi vere kunprenis ĝiN?”

„Ho jes!” respondas Luiza. „Pri tio mi estas certa.”

„Do vi forlasis la domoN kun la monujo! KioN vi faris tiam?”

„Tiam mi iris al la vilaĝo kaj mi mendis fiŝoN ĉe la fiŝovendisto.”

„Do vi ne pagis. KioN vi faris post tio?”

„Tiam mi iris al via butikio.”

„Luiza! Luiza!” Maria Delmonto aperas sur la sojlo de la butikio.

„Ĉu vi havas monoN ĉe vi? Vi forgesis viaN monujoN ĉe ni!”

Ho! Tio estas vera! Luiza iris al la najbarino kaj pagis kelkajn monojn al ŝi. Kaj Luiza lasis la monujojn sur la tablo ĉe la najbaroj. TioN ŝi tute forgesis!

Luiza ĝojas. Rapide ŝi pagas al la afabla butikisto.

S-ro Kest ankaŭ ĝojas pro Luiza.

„Jen estas du oranĝaĉoj por vi,” li diras al la du knabinoj.

„Korajn dankojn, s-ro Kest!”

Leciono 36.

LA ĈAGRENO DE LUIZA.

En la granda ĉambro la lampo brilas hele. La kvar junaj infanoj jam dormas, sed Luiza kaj Felipe sidas ĉe Patrino apud la tablo. La virinoj kudras kaj aŭskultas Felipon: li silabas lecionojn de malnova lernolibro.



De post kelkaj tagoj Pablo kaj Anito iras al la lernejo: ili sidas en la klaso de fraŭlino Plumnova. Ĉar Patrino nepre deziras, ke Felipe ripetu kaj ekzercu kaj ĉar ne estas lernejo por li, Patrino mem donas al li taskojn kaj kontrolas ilin.

„He!” sopiras Luiza subite, „se ni nur estus riĉaj, sed ni estas malriĉaj.”

„Kial vi pensas, ke ni estas malriĉaj, Luiza?” demandas Patrino.

„Ĉar ne estas mono por bona lernejo, ĉar vi devas kudri dum la tuta tago, ĉar en februaro ni ne iris al la karnavalo, ĉar mi ne ricevis novaĵon, ĉar mi ne povas iri al la lernejo. Mi estas stulta kaj mi restos stulta dum mia tuta vivo.” Ŝi ploras.

„KioN vi farus, Luiza, se vi estus riĉa?” demandas Felipe.

„Se mi estus riĉa, mi irus al la lernejo kaj mi legus belajn librojn kaj mi skribus longajn leterojn. Kaj mi aĉetus novaĵon, belajn bluan robon. Kaj mi donus monojn al vi, Panjo. Tiam vi ne bezonus kudri por la sinjorinoj kaj vi povus resti ĉi tie ĉe ni. Kion vi farus, Felipe?”

„Ho, mi acetus aŭtomobiloN kaj mi veturus tra la tuta mondo.
Kaj mi irus al la kino kaj mi acetus piedpilkoN kaj kaj”
„KioN vi farus, Panjo?”
Patrino ridas. „Eble mi acetus ses kontentajn infanojn!” ŝi diras.

Mia fratineto.

Mia fratineto estas malgranda. Ŝi estas tri-jara. Nun ŝi ploras.
Ĉu vi scias kial? La kato gratis ŝin. En nia ĝardeno estas multa
sablo. Tie ĉiam ludas mia fratineto. Sed nun kuŝis nia kato tie.
Ĝi dormis. Manjo volis ludi kun ĝi. Ŝi tiris la voston de la kato.
Tiam la kato estis kolera kaj gratis. Tial nun ploras Manjo. Sed
jam venas la patrino. Eble ni ricevos kuketon. Mi tre ŝatas tion.

Traduku ĉi tiun ekzercon en vian nacian lingvon kaj poste
retraduku ĝin en Esperanton.

La Naturo.

La naturo estas la plej bela, kion vi povas imagi. Estas tiom
dolĉe. Ni nun vidas kreski ĉiujn florojn. Kaj nun ni ree vidas aperi
la insektojn. Ju pli bela la vetero, des pli da insektoj venas. Kaj
kompreneble ankaŭ floroj. Sed tio estis pri la bestoj kaj plantoj.
Sed nun pri la infanoj. La infanoj kompreneble ankaŭ tre ĝojas.
Kaj ankaŭ ili trovas la naturon belega. La infaneto de s-ino Smit
ankaŭ jam trovas la naturon bela. Ĝi sidas en la infan-seĝo kaj
krias pro ĝojo. La vetero estas tiel bela! Kaj kiun ŝi tie vidas? Kun
fasko da belaj floretoj? Jeh, tio estas franjo! „Ta, ta!” krias la
etulo. Tio signifas „havi!”

Verkajo de Trien van Dort, kiam ŝi estis 9-jara.

Ludo.

Portrelludo: Unu el la kunludantoj forlasas la ĉambron. La aliaj
dume elektas la „portreton”. Ĝi povas esti objekto, nomo de per-
sono, ktp. Eĉ io, kio ne estas en la ĉambro. Tiam la „viktimo”
revenas. Per demandoj li klopodas diveni la „portreton”. Li ek-
zemple demandas: Ĉu la portreto estas persono? Ĉu objekto? Kie
ĝi estas? Ĉu ĝi estas granda? Ĉu el ligno? Lado? Ktp. Li ankaŭ
rajtas fari 3 „rektajn” demandojn. Ekz.: Ĉu estas sinjoro B? Sed
kiam li post tiuj 3 rektaj demandoj ne scias la „portreton”, li per-
dis la ludon, kaj la aliaj elektu alian „portreton”. Se li divenis
bone, li mem rajtas elekti „portreton”, kaj la aliaj divenu.

„Paco kaj Justeco”, Brugge, Belg.

Skvama Inko-fungo (Coprinus comatus). Fabelo.

Ci tio estas speco de fungo, sed ĝi estas eksterordinare bela. Ĝi estas pale griza, kelkfoje preskaŭ blanka. Kaj ĝi havas belegajn skvamojn. Foje mi tenis mian orelon apud skvama inkofungo kaj tiam mi aŭdis ĝian voĉeton. Tre, tre malfortan. Ĝi estis maljuna inkofungo, ĉar jam tute nigra.

„Mi estas maljuna,” ĝi diris, „mi jam vivis tri tagojn. Ĉu vi volas aŭdi la historion de mia vivo, vi homido?”



„Jes,” mi diris, „volonte!”

„Do aŭskultu. Mi estis ankoraŭ juna. Havis eble nur dudek horojn. Kaj tiam mi aŭdis voĉon, kiu vokis min.

„Mejo, Mejo!” mi aŭdis. Ĉu mi bone aŭskultis? Ĉu oni vokis min?

„Mejo, Mejo!”

Jes, certe oni vokis min.

„Kiu vokas min?” mi demandis.

„Mi estas Dejudidejo, alia skvama inkofungo. Mi loĝas malproksime. Atendu, mi venos al vi!”

Kiom rava tio estis!
Nun mi havis amiketon!
Mi rigardis ĉirkaŭ mi. Kiel

belete mi staris ĉi-tie. Mia ĉapelo elstaris ĝuste super la herbo. Estis ankoraŭ pli da skvamaj inkofungoj, sed ili estis tre malgrandaj, eble nur dek horojn aĝaj. Ĉu Dejudidejo ankoraŭ ne venis? Mi leviĝis el mia korpo. Nun mi subite estis elfidino, fungo-elfidino. Mi vidis min stari inter la herboj. Kiel granda mi jam estis, kaj tiom bele griza! La malsupra parto de mia ĉapelo estis iom ruĝa.

„Saluton, Mejo,” mi subite aŭdis. Mi vidis alian elfidon. Estis Dejudidejo.

„Vi estas tre bela, li diris, belega! Via ĉapelo estas tiom bela. Kuniru, tiam vi povos vidi ankaŭ min.”

Ni flugis trans herbejon kaj trans arbaron, kaj laŭ rivero. Dejo-
didejo staris apud arbaro. „Kia mi estas?” li demandis.

„Belega,” mi diris. „Ankaŭ via ĉapelo estas iom ruĝa malstyre.”

Kaj tiam Ho, tio estis mia plej feliĉa horo! Tiam ni
geedziĝis.

Nun ni ambaŭ estas maljunaj. Ambaŭ ni fariĝis nigraj. Dum nia
tuta vivo ni gutigis inkon. Tio estis tiom bela! Kaj tiom longa
estis nia vivo! Tri tagojn. Tri tutajn tagojn! Kaj multan pluvon
ni havis. Unufoje eĉ fulmotondris. Rava estis tio!

Sed lasu min sola. La lastajn minutojn de mia vivo mi volas
esti sola. Mi havas ankoraŭ kelkajn gutojn da inko. Kaj tiam mi
volas morti.”

Rogiero.

Kiu volas ion scii?

Kelkaj demandis al mi kio estas tio: la vireto sur la luno.

Tio estas amuza! Vireto sur la luno. Ĉu vere estas vireto? Tute
ne! Tio nur ŝajnas. Mi klarigos por vi.

Kiam estas plenluno, vi vidas sur ĝi du okulojn, nazon, kaj
buŝon: Ili ŝajnas formi vizaĝon. Tion ni nomas la vireto sur la
luno. Sed efektive tiuj okuloj, nazo kaj buŝo estas montaroj. Sur
la luno estas montoj kun alteco de pli ol kvinmil metroj. Kiam
kelkaj el tiuj montoj staras kune, ili kelkfoje similas okulon, nazon,
aŭ buŝon. Kiam ni rigardas per teleskopo, ni vere vidas montojn,
ombrojn de montoj, kaj abismojn.

Kaj la lunleporeto, kio estas tio? La lunleporeto konsistas el
kvin maroj. En tiuj maroj ne estas akvo. Ili estas sekaj. Ili estas
grandegaj senakvaj valoj.

Iru vespere rigardi al la luno! Ju pli longe vi rigardas, des pli
multe vi vidos sur ĝi. Ĉu vi havas teleskopon? Tiu faras ĉion an-
koraŭ pli interesa.

La sekvan fojon mi respondos la aliajn demandojn. Ankaŭ pri
la loĝantoj de Marso. Ĉu estas ankoraŭ infanoj, kiuj volas ion scii?
Sendu viajn demandojn al mi! (Adresu al TJO-Centro).

Rogiero.

Granda ĝojo.

Hieraŭ mi iris al la dentisto, kaj mi havis grandan ĝojon!

Kion vi diras? Ĝojo ĉe dentisto? Kiel tio eblas???

Kiam mi envenis sidis la dentisto sur la seĝo, kaj lia helpanto
eltiris denton de li!

Allan Mehtonen, Oulu, Finnlando.

Ce la mango-tablo.

La knabineto, sep-jara, ne havas forkon. Si ekstaras kaj diras:
„Mi mem alportos forkon, ĉar mi ne havas unu.”

La patrino diras: „Kunprenu ankaŭ forkon por la plado!”

La knabineto (indiferente): „Ho, ankaŭ la plado iru mem!”

Jean-Noël Pottier (48-j.), Quimper, Francujo.

La „Atalanto”.

Flugetis papilioj tra l'arbar'

Sed belega estis unu:

La bela atalanto

Kun la numeroj 18 81.

Manjo If (9-jara) trad. de Rogiero.

Zoologiaj Enigmoj.

Ni estas ĉevaloj, azenoj kaj zebroj.

Ni havas 4 u-ojn. Kio ni estas?

Rogiero.

Estas du malgrandaj bestoj:

La unua havas ĥe. La dua havas ma.

La unua havas ko. Ankaŭ la dua havas ko

La unua havas li. La dua havas ankaŭ li.

La unua havas domon. Sed la dua ne havas domon.

Kiuj bestoj ili estas?

(Se vi bone legis la rakontojn en la antaŭa numero vi certe trovos la solvon!)

Rogiero.

Inter tiuj; kiuj bone solvis ambaŭ enigmojn, ni lotumos du premiojn. Sendu la solvojn al TJO-Centro, W. Grafdijk, Nederlando, antaŭ 1 septembro '47.

Tekselo (nederlanda insulo).

Tekselo estas bela.

Foje mi vidis Tekselon en ŝtormo kaj pluvego tiom bela, tiom mirinde, mirinde bela, kun la monteta ondlinio de tero kaj dunoj, kaj malklare ruĝa, elstaranta tegmento, ke mi ne plu povis elporti tion. Mi fermis la okulojn. Tiom da belo estis tro por mi. Kaj mi pensadis: „Mondo, kiom bela vi estas!”

Rogiero.



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

En Ipswich (Britujo). 14-21 aŭg.

1. Ni tre bedaŭras, ke ni devis ŝanĝi la daton, sed por grupoj estas neeble vojaĝi sabate.

2. Oni ricevos la kutiman civilan porcion da manĝaĵo.

3. Ĝis nun ni sukcesis akiri 143 litojn (kanvasajn kaj sen matracoj), kaj ni esperas ke ni havos sufiĉajn por ĉiuj antaŭ la komenco de aŭgusto. Ĉiu kunportu dormsakon, litkovrilojn kaj tualetartiklojn. (Ne forgesu sapon, ĉar ĝi estas porciunmita en Anglujo!)

4. Ni intencas starigi specialan „angulon” kie oni povos aĉeti poŝtkartojn, poŝtmarkojn, ktp.

5. Estas tre malfacile akiri filmojn en Anglujo; ni do konsilas ke oni kunportu tiujn, kiujn oni bezonas.

6. Se vi povas ludi iun instrumenton, aŭ solkanti, danci, ktp, tuj anoncu tion al f-ino Rees, por ke oni povu aranĝi erojn por la programo, kiun ni intencas presi kiel memoraĵon.

7. Kelkaj partoprenantoj deziras resti en Londono kaj petis, ke ni serĉu por ili malkaran loĝejon. Pro la fakto ke estas somera ferio-sezono tio estas tre malfacila, preskaŭ ne ebla. Ekzemple en Londona gastejo la kostoj por lito kaj matenmanĝo estas 6 ŝil. Komparu tion kun nia restadkosto: 30 ŝ. por tuta semajno kaj notu la malkarecon!

8. Eksterlandaj vizitantoj ricevos specialajn porciumkartojn kiam ili surteriĝos en Anglujo; bonvolu kunporti ilin al Ipswich, kie ni kolektos ilin. — La anglajn partoprenantojn oni informos pri la dato antaŭ kiu ili devos sendi ilin al f-ino Rees.

9. Se oni posedas nacian kostumon, bonvolu kunporti ĝin!

10. La finajn detalojn ni sendos al la landaj ĉefperantoj.

11. Tiuj, kiuj intencas tendumi, bonvolu informi s-ron Heath, por ŝpari litojn. Necesas, ke oni kunportu propran tendon.

12. Ni deziras salutleterojn de ĉiuj TJO-anoj, kiuj ne povos partopreni la kunvenon. Adresu ilin al S-ro J. Heath, 74, Dales View Road, Ipswich, Suffolk, Britujo.

J. Heath.

Ankoraŭ anoncis sin: 162. Jan Jonker (26-j.), St. Maarten; 163. A. de Nieuwe (25-j.), 164 Theo Kroon, ambaŭ en Haarlem (Ned).

TJO-RUBRIKO.

Ankoraŭ eblas ensendi proponojn por la laborkunsido de TJO en Ipswich. Nur aktivaj anoj kaj funkciuloj havas tiun rajton.

Ĉiuj ĉefperantoj bonvolu ensendi raportojn pri la agado kaj financoj. Krome ili informu nin pri la nombro da membro-atestoj kiujn ili bezonas por la nova organiza jaro.

Ni ricevos protokolon pri la fondiĝo de Junulara Komitato ĉe Hungar-

landa Esp.-Societo. Ili salutas TJO-n kaj la kontakto kun ili estas multpromesa.

Ankaŭ en Germanujo fondiĝis Junulara Sekcio de G.E.A. El la protokolo ni eksciis ke oni ankaŭ traktis TJO-n. La kunveno akceptis ke Reinhardt Uhde, la TJO-ĉefperanto, traktos ĉiujn aferojn de la Junulara Sekcio rilate al TJO. — Amikoj, ni deziras al vi sukceson!

Nia ĉefperantino en Egiptujo plendas pri la neaktiveco en sia lando. Klopodadu kaj petu helpantojn! Geamikoj ĉie en la mondo, instigu viajn egiptajn korespondantojn al pli da aktiveco!

Notojn pri TJO ni legis en Bulteno de Denaska Esperantistaro, Hungara Esperantisto, en germana bulteno, kaj en Svisa Esperantisto.

TJO-amikoj, ĉie kaj ĉiam vi klopodu propagandi niajn idealojn, nian organizon kaj nian gazeton. La tempo estas matura por elkonstrui nian organizon. Laboru!!!

Al multaj skoltaj adresojn ni sendis cirkuleron. Skoltoj, traktu ĝin en viaj kunvenoj kaj dum la Jamboreo. Komune ni povas atingi multon, kie memstaraj grupetoj estas senpovaj!

Sendu al ni ĉion, kio pri TJO aperas, por ke ni sciu!

Aliloke en ĉi tiu numero ni presigas la adresaron de niaj ĉefperantoj. Estonte ni nur aldonos la adresŝanĝigojn kaj novajn perantojn, ĉar ni urĝe bezonas la spacon en „LJV”. Bonvolu do mem kopii la liston kaj regule notu la ŝanĝojn.

M. v. d. Horst.

Lastmomente envenis jena propono de la hungara ĉefperanto: TJO aliĝu al la Monda Federacio de Demokrata Junularo.

I.I.K.-KOMUNIKOJ. Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Nederlando. — Centra informejo de I.I.K.: Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo.



Al la instruistaro.

Ĉi tiu numero estas provo de nova gazeto en Esperantujo, en malnova formo. Permesu al mi kelkajn vortojn pri ĝiaj principo kaj celo.

Antaŭ la milito ekzistis internacia organizo por geinstruistoj esperantistaj (TAGE) kun anoj en multaj landoj. La oficiala organo de la asocio estis la Internacia Pedagogia Revuo. Dum la milito la asocia laboro de TAGE haltis, ĉar la germanoj malpermesis la ekzistadon kaj konfiskis la posedaĵojn.

Post la milito mi turnis min al kelkaj eksterlandaj gekolegaj por ekzameni ĉu la internaciaj rilatoj ankoraŭ estas restarigeblaj kaj ĉu tio estas dezirinda. Montrigis, ke la francaj kaj anglaj kole-

goj jam komencis la starigon de landaj grupoj, kaj petis saman agadon en aliaj landoj. El kelkaj landoj atingis min petoj pri la restarigo de TAGE kaj ĝenerale montriĝis la deziro rekomenci la laboron en instruistaj rondo. — La demando estis: Ĉu TAGE povos reviviĝi en sia antaŭa formo? La internaciaj rilatoj kaj personaj ambicioj ja ŝanĝiĝis tiom dum la kruelaj militaj jaroj. Precipe la anglaj kaj francaj gekolegoj opiniis, ke ni tute ne perforte starigu ion, kio verŝajne montriĝos netaŭga por nia nuntempa socio. Ĉu internacia fakorganizo kiel TAGE havos ekzistorajton aŭ ne, tion instruos al ni la estonto.

La decido de la du plej fortaj instruistaj grupoj trankvile atendi la naturan evoluon, estas laŭ mi tre prudenta. Nur tiam, kiam la diverslandaj grupoj stariĝos sur firma bazo, oni povos ekzameni la demandon pri ia internacia organizo. Al tiu decido tre forte ligita estas la demando pri reeldono de iu internacia fakorganizo, kia estis la antaŭmilita I.P.R. La angloj kaj francoj opinias: nur se firma bazo de abonantoj ekzistas kaj se la redaktado de tia revuo povos esti tia, ke ĝi staras sur la sama alta nivelo, kiel nacia fakorgano. Nur tiam la revuo signifos fortan propagandon por nia afero inter la ne-esperantista gekolegato, kaj ĝi povos servi niajn internaciajn fakinteresojn. Tiun etapon ni ankoraŭ ne atingis. Tamen mi daŭre ricevas leterojn de antaŭmilitaj asocioj, kiuj petas pri restarigo de ia internacia kontaktigilo. Multaj estas la baroj kaj malhelpoj; inter tiuj la financaj estas la plej gravaj. Sed oni prave insistas pri eldono de iu komunikilo. Pro diversaj kialoj.

Mi opinias, ke ankaŭ por ni, ĝeinstruistoj, „Heroldo” rajtas averti: „Nun aŭ neniam!” La cirkonstancoj por la enkonduko de Esperanto en la lernejon nun estas favoraj. Ni bezonas por nia laboro komunan agadon, almenaŭ scion pri kio en aliaj landoj kaj lokoj okazas, por akordigi niajn proprajn ideojn kaj labormetodojn kun tiuj de aliaj. Antaŭ ĉio ni dum ĉi tiu evolua periodo de Esp. ne nur bezonas ĉies forton kaj kapablojn, sed komunan konscian agadon al la sama difinita celo. Kaj mia opinio tiu celo devas esti: la lernejo. Pro tio ni unualoke bezonas la laboron de la instruistaro. Tamen ni daŭre ankaŭ petos la helpon de ĉiuj aliaj samideanoj. En tiu laboro ia internacia kontaktigilo povos forte helpi. Sed kiel akiri gazeton, kiam la cirkonstancoj ankoraŭ ne permesas la eldonadon de speciala fakorgano? Tio nur eblas, se ni komencos sur simpla bazo, tamen utiligante ĉian eblon. Tiam bazon ni nun trovos, se mi ne eraras, en „La Juna Vivo”.

Komence de Aŭgusto ĉijare aperos ĉe la esperanto-eldonejo
J. Muusses, Purmerend, Nederlando:

„Sub la Verda Standardo”

Esperanto-instruo al infanoj laŭ la rekta metodo,

verkita de P. KORTE,

estro de lernejo por unuagrada daŭriga instruado en Nederlando.
La metodo konsistas el Gvidilo por la instruisto (la parola parto)
kaj Laborlibroj por la lernanto la skriba parto.

La du Laborlibroj enhavas proksimume 400 ilustraĵojn, speciale
desegnitaj por ĉi tiu metodo.

Oni povas jam mendi pere de la reprezentantoj de I.I.K., la oficialaj
Libro-servoj aŭ rekte al la eldonisto:

Gvidilo	f 2.50,	frfr 100,	ŝil 4/6,	Sv.kr. 3.50
Laborilo I	„ 0.90,	„ 40,	„ 1/9,	„ 1.25
Laborilo II	„ 0.90,	„ 40,	„ 1/9,	„ 1.25
Memorigilo	„ 0.50,	„ 20,	„ 1,	„ 0.75

Krome ĉiu instruisto kaj kursgvidanto povos ricevi senpage detalan
prospekton de la metodo. Ili petu pro tio al la eldonisto.

INTERNACIA KULTURO

Kultura revuo de balkanlandaj Esperanto-Asocioj. Abonprezo por
16 numeroj f 6.—
Abonebla ĉe TJO-Centro.

„LA VIVO”

Monata Organo de „Amikoj de la
Homaranismo”. Petu specimenon
de s-ino v. Veenendaal, Limmen,
Ned. Prezo 1 resp. kup.

PROPAGANDU!!!

per la TJO-papero kaj kartoj!
50 folioj kaj kovertoj f 2.—
50 kartoj f 0,65

STUDU!!!!

per „La Juna Vivo”-lernolibroto
(3-a eldono) prezo f 0,50
binditaj jarkolektoj „LJV” de la
jaroj '34/'35 kaj '36/'37 belaspek-
taj, ampleksaj libroj, prezo
po f 1,—

Por unu guldeno oni ricevos de TJO-Centro 10 diversajn, interna-
ciajn Esperanto-gazetojn (revuojn).



La oficialaj komunikoj, per kiuj ni efektivigos la kontakton internacian, tiel povos aperi sub la okuloj de ĉiuj interesigantoj. — La enhavo ne ekzistos el teoriaj rezonadoj, sed el praktikaj raportoj, faktoj, sugestoj, kiujn ĉiu kolego bezonas en sia propagando por „*Esperanto en la lernejon*”. — Krome la gazeto enhavos legomaterialon por la lernantoj. Tiu parto estos aparte abonebla, kaj tio stimulos la starigon de infangrupoj.

Fine korespondrubrikon. — Laŭ mi ĉion, kion kolego bezonas, kiu volas instrui Esperanton kaj propagandi tion.

Ĉi tiu ŝanco havigos al ni, gekolegoj, la urĝe bezonatan kontakton kaj materialon; same al la gejunuloj kaj ties „amikoj”: gepatroj kaj gvidantoj.

Profitu ni do ĉi tiun ŝancon ĝisfunde! Abonu, abonigu kaj kunlaboru redakte, tiel ke, se la afero malsukcesos, tio almenaŭ ne estos via kulpo!

P. K.

Internacia kontakto por geinstruistoj.

Sub ĉi tiu nomo ni komprenas la jenon: Principe ni ne apartenas al iu ajn internacia organizaĵo. Nia kunlaborado estos tute memstara kup la sola celo servi al la lernejo kaj Esperanto. Ni laboros inter geinstruistoj de ĉiaj kategorioj kaj sen konsidero de personaj konceptoj en privataj aferoj.

1. INTERNACIA INSTRUISTA KUNLABORO estas la nomo de nia provizora komitato, kies membroj nunaj estas f-inoj Nixon (Britujo), Dedieu (Francujo), s-roj Korte (Nederlando) kaj Dahl (Svedujo), kiel delegitoj de siaj landaj geinstruistaj organizaĵoj.

Tasko. Komune gvidi la kunlaboron, interkonsiliĝi pri farataj, decidi pri tiaj demandoj, kiuj rilatas la geinstruistajn kaj lernejajn aferojn, kaj prosperigi la funkciadon de la internacia geinstruista kunlaborado, stimuli la fondon de novaj landaj geinstruistaj asocioj, instigi al enkonduko de *Esp. en la lernejon*.

2. CENTRA INFORMEJO estas la provizora firmpunkto de nia kunlaborado. Ĝia adreso estas: Internacia Instruista Kunlaboro, Centra Informejo, UDDEVALLA Svedujo. Afergvidanto: Einar Dahl.

Tasko: Akcepti informojn pri lernejo kaj Esperanto. Kolekti valorajn pedagogiajn spertojn rilate al Esperanto-instruado. — Pri labori kaj kompili la ricevitajn materialon. — Distribui ĝin al la komitatoj landaj kaj aliaj personoj, institucioj, gazetoj ktp, kiuj interesigas pri nia afero, kaj kapablas eluzi la informojn por la bono

de nia afero. — Peri koresponddezirojn de geinstruistoj kaj lernantoj. — Registri la reprezentantojn de IIK en landoj, kie ne ekzistas geinstruistaj esperanto-asocioj. — Respondi je demandoj, kiuj rilatas la celojn de nia kunlaborado. — La elspezojn ni kovru per subtenoj ĉiuspecaj.

3. NIA ORGANO. Redaktoro kaj prizorganto de la detaloj estos s-ro Korte. Provizore niaj oficialaj komunikoj aperos en la komuna gazeto „La Juna Vivo”.

4. NIAJ REPRESENTANTOJ. En landoj, kie ankoraŭ ne estas landa geinstruista asocio, kiu kunagas en la komitato de IIK, ni klopodos havigi kontaktulojn, kiuj reprezentos nian kunlaboron kaj kiuj estas emaj funkcii kiel niaj paroliloj. Tiuj reprezentantoj agitos inter la geinstruistoj de siaj landoj kaj medioj kaj provos efektiviĝi niajn planojn. Tiuj reprezentantoj estu — prefere kaj se eble — profesiaj instruistoj, sed ankaŭ tiuj, kiuj havas aŭtoritatecon antaŭ la lerneja „publiko” estus aprobataj. P. K.

Migranta Propagandisto.

Tuj post la ferioj eliros Rogiero, nia propagandisto, por fari serion da prelegoj. La legantoj de LJV konas Rogieron per liaj rakontoj, ludoj kaj fabeloj, kiuj estas freŝaj kaj originalaj, kaj kies celo estas instigi la junularon verki respondojn aŭ originalaĵojn. Li estas profesia pedagogo kaj aŭtoro de diversaj modernaj lernolibroj.

Komence Rogiero prelegos en elementaj lernejoj; li tamen ankaŭ venos en mezgradaj lernejoj, kunvenoj de instruistoj kaj gepatraj vesperoj. La konataj TJO-filmoj de la internaciaj kunvenoj en Groet kaj Tervuren igos la kunvenojn pli interesaj; novaj filmoj estas en preparo.

Kvankam Rogiero provizore propagandos nur en Nederlando, li kun plezuro propagandos por Esperanto en la lernejo ankaŭ en aliaj landoj, se la tieaj samideanoj tion deziras. Ĉiu klubo, grupo sekcio aŭ privatulo deziranta la kunlaboron de Rogiero turnu sin al s-ino v. Veenendaal, Molenweg, Limmen, Nederlando.

La alparoloj, same kiel la filmoj estas interesaj por samideanoj kaj ne-Esperantistoj, por infanoj kaj instruistoj, por junuloj kaj plenkreskuloj. La propagandvaloro jam montriĝis multloke. Ankaŭ vi, kaj via grupo havos propagandan profiton per la prelegoj de Rogiero kun la filmoj. Jam nun turnu vin al Molenweg, Limmen, por ke vi estu certa ke vi jam en la komenco de la aŭtuno povos aranĝi propagandan kunvenon.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Britujo: Inspektisto ĵus permesis devigan kurson en mia lernejo. Bonvolu sendi kartojn, informojn, bildojn, pm., ktp. Nepre respondos unu el la 36 knaboj. J. R. Taylor, Lady Boswell's School, Sevenoaks, Kent.

Mi deziras interŝanĝi ilustr. gazetojn kaj literaturaĵojn kun ĉiuj landoj. William Still, 11 Colville, Rd, London W. 3.

Richard Osborne, 151 Tachbrook St, Londono, S.W. 1, deziras renkonti geanojn de TJO okaze de la Internacia Kongreso en Bern.

Ĵenaj partoprenontoj en la kunveno en Ipswich dez. kor. antaŭ la kunveno kun nederlandanoj: Maureen Winstanley (12-j.), Noreen Teare (13-j.), Marjorie Banks (12-j.), Marion Fleming (14-j.), s-ino Nancy Hesketh, Jenny Rowlinson (20-j.), (ĉiuj inoj); Michael German (12-j.), David Lawrenson (13-j.), Leonard White (14-j.), Peter Banks (15-j.), Harōld Leadbetter (12-j.), Campbell Allan (13-j.), Donald Lyons (13-j.). Skribu al: S-ro G. Teare, Halewood, C. E. School, Halewood, Liverpool. Al la sama adreso oni povas peti korespondadon kun Patricia Fleming (18-j.) kaj Margaret Winstanley (11-j.). La lastaj ne iros al Ipswich.

Cehoslovakujo: 15-j. studento kaj skolto dez. kor. kun la tuta mondo. Interŝ. pm. Resp. certa. Milan Karvánek, Praha VII, u Pruhonu 48.

Ĉinujo: F-ino Anlin, 17-jara ĉina junulino, kiu interesas sin pri pentro-arto kaj literaturo dez. kor. pri tio kun samaĝuloj. Ŝi dez. ankaŭ kor. pri demokratraj pensoj. Adr. P. O. Box 77, Chengtu.

Francujo: La franca organizo de geinstruistoj esp. treege ŝatus pro la propaganda valoro de Esp., interkorespondadon kun eksterlandaj gekolegoj kaj gelernantoj. En Francujo la situacio estas matura por atingi gravajn sukcesojn por la enkonduko de Esp. Sed oni devas disponi pri materialo, kiu montras praktikajn rezultatojn pri la uzo de Esperanto. — Ni urĝe petas, bonvolu turni vin pro ĉio, kio rilatas la korespondadon kun Francujo al la tiea korespondservo. Adreso F-ino Jeanne Dedieu, 3 rue Arzac, Toulouse.

Mi estas 22-jara, kaj dez. kor. kun tutmondaj gesamideanoj pri div. temoj. Interŝ. pm. Roger Bizet, Menneville-par-Desvres, P. d. C.

Hispanujo: Arturo Sancher, San Jaime de Enveja, Tarragona, dez. ricevi poŝtmarkojn el la tuta mondo. Li resendos samajn nombrojn da hispanaj.

Hungarujo: s-ro Karlo Vazekas, Kossuth-tér. 22, Gyula, dez. kor. kun la tuta mondo. Interŝanĝas pm. kaj pk.

Nederlando: Miaj du lernantinoj (11 kaj 12-j.) dez. kor. k. inf. en skandinavaĵ landoj, Belg., Brit., Franc., Sved., M. Koopmans, Kortenaerstr. 2, Zwolle.

S. W. Laffertu, lernejestro, Wildervank, I 50, petas alsendon de il. bildk. el Ĉ.l. Aŝfranku bildfranke. Respondo certa.

Polujo: 13-j. knabino. Lucino Arszemikowna, Zacisz-Palmowà N. 16 Warszawa — Praga 24, deziras korespondi.

Svedujo: Sveda teksistino (arta manproduktado) dez. kontakton kun meĥiistoj kaj teksartistoj por interŝ. ideojn, modelojn, ktp. Mi vizitos la kunvenon en Ipswich. F-ino Valborg Caesar, Risängen, Vamb, Skövde.

TJO-PERANTOJ KAJ KOTIZOJ.

(la unua sumo rilatas la kotizon por asp. anoj (ĝis 14-j.), la dua por aktivaj (14-30-j.) kaj subt. anoj, kaj abonantoj).


Aŭstrujo: J. L. Germela, Thongasse 5/3/12, Wien III/40	4 aŭstr. ŝ	9 ŝ
Belgujo: Carlos Braet, Esseboomstr. 1, Brugge Gironumero 4770.86	16 b. fr.	40 b. fr.
Brazilo: M. Angélica de Oliveira, Rua Haddock Lobo 58, Rio de Janeiro	7 kruc.	17.50 kruc.
Britujo: N. Rees, Derwydd, Seven Sisters, Neath	2 ŝ	5 ŝ
Cinujo: Zekun, P.O. Box 77, Chengtu (kot. laŭ angla valoro).		
Cehoslovakujo: Fr. Masek, Trida krále Jiriho 17, Karlovy Vary	19 kĉs	47 kĉs
Danujo: Kaj Pedersen, Chr. Hansenvej 4, Hol- baek	2 kr.	5 kr.
Egiptujo: S-ino Schmidova, 3 rue Caia Gohar, Alexandrie	2 ŝ	5 ŝ
Finnlando: Allan Mehtonen, Isokatu 67, Oulu ...	50 fmk	125 fmk.
Francujo: S-ino M. Turin, Trepot, Doubs. Giro- numero 287.02 Dijon	45 fr.	114 fr.
Germanujo: R. Uhde Junv., Kornstr. 156, (23) Bremen (kot. laŭ angla valoro).		
Hispanujo: Octavio de Diego, Baltazar Gracian 12-3°, Zaragoza, kaj F. Montserrat, Str. Pro- venza 75, 2°, 3°, Barcelona	4 pes.	11 pes.
Hungarujo: Aleks Kassai, Berkocsi -u. 5, Buda- fok	4½ flr.	11 flr.
Italujo: Prof. Camuffo Armando, v. Bartolomeo d'Alviano 4, IV, Trieste	85 l	212 l
Nederlando: TJO-Centro, West-Graftdyk. Giro- numero 382363	f 1.—	f 2.50
Polujo: T. Toczyski, Morska 77, Gdynia	38 zl.	95 zl.
Portugalujo: A. P. da Silva, Quinta do Ferra, Rua b 28-2° D-to, Lisbono	9 esc.	23 esc.
Svedujo: Karl-Erik Karlsson, Upplandsgatan 69°, Stockholm. Gironumero 262674	1.35 kr	3.50 kr.
Svislando: f-ino Mon, Haupstr., Rheineck	1,62 fr.	4 fr.

IIK-PERANTOJ.

- Britujo:** F-ino N. Rees, Derwydd, Seven Sisters, Neath, Glam. (Kot. 5 ŝ).
Francujo: F-ino Jeanne Dedieu, 3, Rue Arzac, Toulouse. (Kot. 114 fr.).
Nederlando: S-ro J. Meyer, H. d. S., Muiderberg, ĝironumero 192041 (Kot. f 2,50).
Svedujo: S-ro Einar Dahl, Centra Informejo IIK, Uddevalla. (Kot. 3,50 kr).



LA JUNA VIVO



ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. (5 ŝil, 114 fr. fr., 4 sv. fr.)

NIA TUTMONDA FAMILIO.

Certe vi-memoras la junan knabon Provslov Filipovic *), kiu en malgranda Serba vilaĝo diligente studadis nian lingvon, kaj abonadis „La Juna Vivo”n. Mi estas lia patro, kaj kun bedaŭro mi sciugas vin, ke Provslov perdis sian junan vivon la 20-an de decembro en la jaro 1944. Kvankam li ne estis pafmortigata, nek pendigata, tamen la milito kaŭzis lian morton, kaj li estis viktimo, same kiel multaj aliaj. Mi kaj la aliaj familianoj bonsanas kaj salutas vin.

M. F. Filipovic, Kragujevac, Jugosl.

*) La malnovaj legantoj de „LJV” certe memoros la artikolon kaj foton pri li en la unua jarkolekto (p. 187), majo '35. (Red).

Koresponda jubileo.

Antaŭ precize dek jaroj mi ricevis la unuan leteron je mia anonco en la juna numero de „La Juna Vivo”, de la tiam 15-jara fraŭlinó Trynie Kuiper en Valkoog (Nederlando). Eble pli ol cent leterojn kaj aliajn poŝtaĵojn ni de tiam interŝanĝis. Nia amikeco fariĝis tiom forta, ke ni eĉ pensis pri geedziĝo. Sed tiam venis la terura milito. Mi soldatiĝis. Sed malgraŭ tio, ĝis la jaro 1940 ni skribis fidele ĉiusemajne. Kvankam oni en la kazerno severe malpermesis al mi. Fine oni enkarcerigis min pro tio, kaj nur tiam ni

ĉesis. Al 14 landoj mi venis dum la milito, sed al la plej sopirata Nederlando mi ne venis.

Nun ni ambaŭ geedziĝis kun alia persono, sed ni ankoraŭ korespondas. La 29-an de marto naskiĝis ŝia filineto Sylvia. Tio estas por ni Esperantistoj tial sciinda, ĉar ŝi promesis, ke ŝiaj infanoj jam ek de la naskiĝo lernos Esperanton. Ŝia tri-jara fileto Henkic jam estas membro de „Denaska Esperantistaro”.

Karaj geamikoj, fariĝu kaj restu ankaŭ tiom fidelaj al viaj ge-korespondantoj, kaj zorgu, ke viaj infanoj jam en la plej juna aĝo lernu nian popolinterligan lingvon!

Alois Postl, Wien, Aŭstrujo. (Julio '47).

La Münhena Internacia Junular-Manifestacio.

En Münheno okazis de 28 junio ĝis 7 julio granda Internacia Junular-Manifestacio, sub la nomo „Voko al la Germana Junularo”. Ĝi estis la unua internacia junularkunveno en Germanujo post la milito. Multe da famkonataj verkistoj, pedagogoj, kaj junulargvidantoj partoprenis, i.a. Jef Last, Maurits Dekker, André Gide, Jean Rovan, S-ro Morreau, d-ro Walter, ktp. Kaj ankaŭ multaj junuloj venis el Egiptujo, Belgujo, Bulgarujo, Danujo, Sud-Ameriko, Anglujo, ktp. Inter ili ankaŭ estis Esperantistoj.

Je la 28-a de junio komenciĝis la manifestacio per la paroladoj de la eksterlandaj gastoj. Profesoro Thüerer, la ĉefo de la svisa helpo, diris, ke Eŭropo ĝis nun ankoraŭ estas dinamitfabriko por mondmilitoj. Ni estu ne nur „kunhomoj”, sed „kunpopoloj”. Li opinias, ke la unuiĝo de Eŭropo estos plej bona por ni.

S-ro Brailsford el Anglujo alportis salutojn el Anglujo kaj de sia amiko Victor Gollauĉ.

Jef Last diris, ke ni vivas en mondo plena de timo kaj teruro, kaj ke mankas la ĝojo. La homoj en la tuta mondo funebras. Li esperas, ke baldaŭ oni ĉie povos diri tion, kion oni pensas.

D-ro Tha el Hindujo alportis salutojn de Mahatma Gandhi. „Kredu je la ideoj de la vero, la amo kaj la devo. Se ni amas unu la alian ni neniam plu bezonos militojn.”

S-ro Ullmann konatigis telegramon de la franca militministro, kiu liberigis dudek kvin germanajn militkaptitojn.

Dum tri tagoj la eksterlandaj gastoj vivis kune kun germanaj junuloj en junularhejmoj. Je la 4-a de julio la eksterlandaj gastoj forveturis al Frankfurt. Tie okazis la tria parto de la manifestacio.

Günther Schaedel, München, Germanujo.

Varbu TJO-anojn! Propagandu la 8-paĝan lernejan gazeton (l.g.).

Kion konstruas la bulgara junularo dum 1947?

La tutmonda milito finiĝis, sed ĝi lasis siajn postsignojn. Ankaŭ la malgranda Bulgarujo ne malmulte suferis. Tuj post la tutpopola ribelo, 9-IX-'44, nia ekonomia bonstato kaj nia industrio komencis renoviĝi. Sed ĉio estis preskaŭ senplana.

Nun en 1947 estas ellaborita dujara plano, por 1947/1948. En tiu plano, kiel plej granda entrepreno, aperas la Junulara Brigado (80.000 anoj).

La brigadista movado ne estas nova. Post la granda milito la gejunuloj en Ĉeĥoslovakujo, Polujo, Rumanujo, kaj aliaj landoj, organizis brigadojn por renovigi siajn landojn. En Jugoslavujo la junularo konstruis fervojlinion, 90 km longa; ankaŭ en Bulgarujo estis brigado (2000 anoj), kiu konstruis trapasejon.

Dum 1947 estos kolektata brigado de 80.000, dividita en kvin batalionoj. La unua bataliono laboros por konstrui fervojlinion Sofio-Bernik, 50 km longa. Ĝi ligos la ĉefurbon Sofio kun la plej granda karbo-minejo Pernik. La malnova linio estis tro ne-oportuna, pro ĝiaj krutaj deklivoj. Por la konstruo de la nova linio laboros 26000 junuloj, en kvar grupoj: la unua (2000 gejunuloj de 1/4-31/5; la dua (8000) de 1/5-30/6; la tria (8000) de 1/7-31/8; la kvara (8000) de 1/9-31/10. Por la ellaboro de la plano oni devas:

1. Elfosi 1300.000 kubajn metrojn da tero. — 2. Konstrui 38 pontojn kaj akveduktojn, entute 24000 kub. m. da masonaĵo. 3. Fari tri tunelojn (suma longo 1912 metroj). 4. Meti la 50 km da fervojlinio; (tiucele oni bezonos. 5.750 tunojn da reloj, 72000 lignajn trabojn kaj 95000 kubajn metrojn da balasto.)

La dua bataliono konsistas el 18000 gejunuloj, kaj estas dividita en tri grupoj de 6000 homoj. Ĝi konstruos ŝoseo-trapasejon, kun longeco de 32 kilometroj. Tiucele oni elfosos 700.000 kub. m. da tero.

La tria bataliono faros la plej grandan digon la „Rosica“, irigacilon. La kvara bataliono konstruos la digon „Kofrinka“, ankaŭ irigacilon. La kvina bataliono konstruos elektrokondukilon, 155 km longan.

Ĉiuj konstruaĵoj havos grandan ekonomian signigon: la fervolinio Sofia-Pernik taŭgos por la alportado de karboj al Sofio. La trapasejo estos la plej mallonga vojo inter norda kaj suda Bulgarujo. La du digoj ne nur irigacos milojn da hektaroj da tero, sed ili ankaŭ produktos elektro-enercion.

Nia junularo laboros senpage, bonvole, po du monatoj: Ĝi konstruos por Bulgarujo, por si mem, ĉar la estonto estos por ĝi. La entuziasmigita junularo enskribiĝas amase por la Brigado. Tutaj klasoj el la gimnazioj kune kun la instruistoj iras brigaden. Studentoj, ĉu medicinaj, ĉu historiaj, ĉiuj iras por hardiĝi en la vivo. Tie en la komuna laboro, en kiu ĉiuj laboras por la popola bono, tie naskiĝos pli bona mondo.

Pri kio vi pensas?

La Progresema Junulara Sekcio de la Esperanto-Grupo Bremen, deziras ricevi vian opinion pri interesa temo, aŭ raporton pri via ĉiutaga vivo, pri viaj pensoj, pri okazaĵo en via vivo, aŭ io ajn.

Ni intencas ĉiumonate fiksi temon, pri kiu oni povos diskuti. Ni publikigos la temon en „LJV”. Ĉiu, kiu partoprenas en la diskuto ricevos resumon pri la diversaj opinioj.

Jen la unua temo: „Ĉu poŝmark-kolektantoj povas esti samideanoj?”

Sendu vian opinion al la prezidanto: R. Uhde, (23) Bremen, Kornstr. 156, Germanujo. Aldonu, al kiu(j) asocio(j) vi apartenas.

Ankaŭ tiuj, kiuj sendas al ni Esperanto-gazetojn (eĉ malnovaj estos bonvenaj!) ricevos resumon.

Kunlaboru!

R. Uhde.

La tendaro sur Tekselo, organizita de la nederl. TJO-Sekcio.

Ĝi estis gaja grupo, kiu je la 2-a de aŭgusto staris ĉe la haveno de den Helder. Ĉeestis ankaŭ franco kaj danino. Entute 65 personoj.

Jam la ŝipo! Kaj jen --- Tekselo!

Neforgesebla fariĝis por ni tiu insulo! Maro, dunoj, herbejoj, amasoj da birdoj — belega naturo!

Ni loĝis en tendoj kaj en simpla kampdomo, sen ia ajn komforto, sed kastelo ĝi estis pro sia hejmeco!

Rapidege sin sekvis la okazintaĵoj: La migradoj tra la dunoj. Nia vizito al la vasta soleco de „De Sluffer” — La popoldancado sur la marbordo — La gajaj vesperaj programoj — La nokta promenado laŭ la marbordo — La ŝtormo! Sed — kiom malbone ĝi traktis la tendojn! Kiom malsekegaj la knaboj revenis! Negrave! Onklo Jaap regalis ilin per varmega teo. Sekajn vestojn ili facile povis akiri.

Granda familio ni ja estis! Tion bone sentis la multaj vizitantoj, kiuj serĉis ŝirmejon en nia kampdomo. Tio klare montriĝis laŭ la laŭdaj vortoj de niaj najbaroj ĉe la adiaŭo ja la 9-a de aŭg.

Intence ni propagandis per flagoj kaj steloj, sed pli bona propagando estis la nepriskribebla sfero de simpla amikeco, kiun sentis ĉiu vizitanto. Verda radio en la malserena mondo!

Ĝis la venonta jaro!

N. K.

La plej bona urbo en la tuta mond'!

Jes, vere! Tio estis por ni Ipswich, tiu urbo en Anglujo, kies nomo antaŭ duonjaro estis nekonata al multaj el ni.

La urbo Ipswich estas plena de trafiko kaj butikoj, sed ne tial ĝi estis por ni la plej bona.

Veturado tra Ipswich montras al ni belegajn panoramojn ĉe krutaj deklivoj. Tamen ankaŭ ne tial ĝi estis por ni la plej bona.

Kial do? Ĉar en Ipswich ni renkontis niajn plej bonajn amikojn, ĉar en Ipswich ni formis unu grandan familion. Ho, mi ne povas memori la nomojn de ĉiuj gefratoj en Ipswich, sed mi lernis ion de ili: Nun mi scias, kiom bela estas gastamo, kiom bonvenaj afableco kaj koreco, kaj kiom ĝojigaj povas esti kora vorto de amiko, spontanea helpo, ĝentileco, ktp.

Nun mi scias, kion mi povos doni al aliaj homoj, al aliaj ĝenaroj en lernejo aŭ laborejo.

Estonte mia loĝloko estos same bona kiel Ipswich. Ĉiun tagon mi kantas, laŭte aŭ kaŝe: „Jen mi estas en! Plej bona urbo en la tuta mond'. Jen mi estas en!

Henk Uittenbogaard.

TJO-RUBRIKO.



Internacia Junular-Kunveno: Rapidege la kunveno en Ipswich pasis, kvazaŭ sonĝo! Nome de ĉiuj partoprenintoj ni ankoraŭfoje dankas niajn britajn ĝeamikojn, kiuj organizis por ni tian belan feston! Ja ne estas bagatele, en la nuna tempo gastigi pli ol 200 homojn! Sed ili brile sukcesis. La lernejo estis ideala kunveno. La kuiristinoj estis perfektaj, kaj vere dorlotis nin. La tuta programo estis bonega:

La ekskursoj per aŭtobusoj, la promenadoj, la fest-vesperoj, la kantado de la Ipsviĉa horo, la danĝrupoj! Ne eblas priskribi ĉion. Sed la filmo, kiun faris s-ro Schut, montros ĝin. Kaj — multaj junuloj promesis sendi verkajon por „LJV”, do ni atendu!

Ankaŭ en la laborkunsido regis plena harmonio. En ĉi tiu numero mankas loko por detala raporto. Jen jam kelkaj punktoj: S-ino v. Veenendaal fariĝis honora prezidantino de TJO — La estraro restis — La raportoj estis akceptataj — La belga sekcio prizorgos la gazetarservon — Denaska Esperantistaro aliĝos al TJO. Provizore s-ro Robertson mem prizorgos la administradon. Ili havos propran rubrikon en LJV (duonpaĝan) — La ĝenerala opinio estis, ke TJO ne aliĝu al la Mondfederacio de Demokrata Junularo, ĉar tiu ne estas Esperanto-movado. TJO'anoj en ĉiuj landoj kiom eble plej propagandu TJO'n kaj Esperanton en kunvenoj de la Fed. de Dem. Junularo. — La loko de la venonta I.J.K. ankoraŭ ne estas elektita. Oni esploras la eblecojn en Francujo kaj Ĉeĥoslovakujo.

La nova filmo: Oni jam povas mendigi kopion de la Ipsviĉ-filmo. Prezo 6 £. Atentu la novan adreson de la filmservo: S-ro H. J. Schut, Donkerbroek (Fr.), Nederlando.

Niaj ĉefperantoj: F-ino. de Oliveira (Brazilio) aktive eklaboris, Kvankam

ŝi mem estas iom pesimisma pri la rezultato, ŝi anoncis jam 17 novaĵn ĝemikojn. Dankon kaj gratulon!

František Masek (Ĉeĥoslovakujo) organizas monatajn konkursojn inter lokaj perantoj: Pro ĉiu varbita ano oni ricevas 2 poentojn, por abonanto unu poenton. Ĉu ne imitinda ekzemplo?

Kaj Perderson (Danujo) sendis propagandan cirkuleron al ĉiuj danaj Esperanto-kluboĵ. Certe ankaŭ imitinde!

Allan Mehtonen reprezentis TJO-n en la somerkurso de la Esperanto-Instituto en Finnlando. Li elektigis en komitato, kiu esploras la eblecojn por landa junularmovado.

Karl Erik Karlsson elektigis en la estraro de Svenska Esp. Asocio.

Ankaŭ la germana sekcio ĉiam pli aktivigas. (Vidu la artikoleon de R. Uhde!) — Preskaŭ senescepte la C. P. propagandis TJO-n en la landa gazetaro. Generale ĉiu faras sian eblon. Kompreneble la metodoj dependas de la landaj cirkonstancoj. Ĝemikoj, daŭrigu! La aŭtuno estas la propaganda tempo! Streĉu viajn fortojn! Atentu ankaŭ la lernejan parton de „LJV"! Ĝi estas malkara! Varbu grupojn per ĝi! Vizitu instruistojn, kaj instigu ilin lerni Esperanton kaj enkonduki ĝin en la lernejojn!

La Peranto inter la Perantoj. La lasta numero aperis antaŭ la I.J.K. Ĝi enhavas la jarraportojn de la sekretario-kasisto, la novaĵ regularon, la proponojn por la laborkunsido en Ipswich, ktp. Restis ankoraŭ kvanto, do la TJO-anoj, kiuj havas intereson pri ĝi povas peti ekzempleron al TJO-Centro. Ne-TJO-anoj povas ricevi ĝin kontraŭ unu respondkupono.

SKOLTA RUBRIKO.



Kiam ni aŭdis, ke la Pac-ĵamboreo okazos en Francujo, ĉiuj trupoj komencis elpensi skoltajn herooĵojn. Ili estas bonaj rimedoj por pligrandigi la klopodemon. Nur 10.000 francaj skoltoj povos partopreni la ĵamboreon, sed pli ol la trioblo deziras partopreni. Do la francaj skoltestroj decidis elekti la partoprenontojn inter la plej viglaj skoltoj. Mi rakontos al vi, kion kelkaj patroloj faris.

Patrolo de Montargis konstruis aerostaton (balonon). La laboro daŭris tri monatojn. Pensu do: ĉion oni faris el gluita papero kaj tafto. Mirinde, kiam la tago de la herooĵo alvenis, la aparato bone funkcis antaŭ la komisaroj. Ĝi eksaltis ĝis ses metroj. Tiam ĝi iris oblikve maldekstren kaj frakasigis kontraŭ malgranda muro.

Patrolo en Arras tradukis libron de Guy de Larigaudie: „Etoile au Grand Large” (La Stelo en la Granda Marmezo). Guy de Larigaudie estis la modelo por la francaj skoltoj, kaj eĉ por la aliaj. Li foriris de la ĵamboreo en Nederlando kaj veturis ĝis Saigon trans Eŭropon kaj Azion per malnova aŭtomobilo. Vi eble deman-

dos, en kiun lingvon la patrolo tradukis la libron. La skoltoj tradukis ĝin en brajlon. Oni do kombinis heroaĵon kun utila ago.

Patrolo en Arras esploradis la katakombojn de ĉi tiu urbo. Letero de iu akademio sciigis, ke tiuj skoltoj alportis gravan sciencan helpon.

„La Mevoj”, patrolo de la 12-a trupo en Versailles, iris de tiu urbo ĝis le Mans, per rul-kuriloj. Vojaĝo de pli ol 200 kilometroj. La Mevoj kunportis leteron de la episkopo en Versailles al tiu en le Mans.

Skoltoj en Strasbourg konstruis aŭtomobilon per malnovaj pecoj, kiujn ili trovis sur apuda bataalkampo. Per tiu aŭtomobilo ili esperas veturi al la ĵamboreo.

Patrolo de Bordeaux pilgrimis ĝis Oradour sur Glanes, kaj konstruis kapeleton apud la ruinoj de la preĝejo. Oradur sur Glanes estas vilaĝo, kie la germanoj murdbrulis ĉiujn vilaĝanojn en la preĝejo.

Geskoltoj, ni ĉiam estu pretaj!

Franca Skolta Ligo Esperantista.

Leciono 37.

PRI MALRICECO.



„Sed”, daŭrigas Patrino, „ni ne estas malriĉaj, Luiza! Tute ne! Vi ne scias, kio estas malriĉeco. Ni loĝas en bona, vasta domo. Ni havas legomĝardenoN, do ni ne bezonas aĉeti terpomojn kaj leĝomojn. Ni havas ovojn de niaj kokinoj, laktoN de nia kaprino. La klimato ĉi tie estas bonega, do ni bezonas varmajN vestaĵojN aŭ karboN. Tio ŝparas multe da mono. Kaj ni povas ĝui la belecoN de la naturo: en la printempo la tuta insulo estas florparadizo; en la aŭtuno estas belegaj koloroj. Tiam estas multegaj fruktoj; ili estas malkaraj, do ni povas aĉeti iliN. Mi kudras por aliaj personoj; tiel mi gajnas kelke da mono kaj ni povas havi iom da lukso. Mi tute ne deziras riĉecoN. Ni ne povas aĉeti ĉioN, sed tio ne estas grava. Ni estas sanaj kaj feliĉaj kaj ni gajnas sufiĉe da mono por vivi simple sed bone. Saneco, kontenteco kaj feliĉo estas tre gra-

vaj, Luiza! Kaj honesteco, afableco kaj ĝentileco en nia konduto al aliaj homoj! Ankaŭ tio estas grava!

Mi tamen povas bone kompreni, Luiza, ke vi volas lerni. Mi tre bedaŭras, ke tio nun ne estas ebla. Mi promesas al vi, ke mi helpos viN *ĉiel* kaj ke mi klopodos trovi vojoN por via instruado.

Patro estas ĉe la najbaroj. Ili parolas pri politiko, pri la malnovaj problemoj de la homaro: libereco, egaleco kaj frateco.

Leciono 38. LETERO EL SEVILJO (SEVILLA).

Seviljo, julio 1934a.



Karaj fratino kaj bofrato,
KoraN dankoN pro via letero de majo. Mi ĝojas, ke vi ĉiuj estas sanaj kaj feliĉaj kaj ke vi povas vivi sen grandaj zorgoj.

Hieraŭ mi ricevis leteroN de nia frato Jacinto el Barcelono (Barcelona). Li estas feliĉa, ĉar li trovis fine laboroN ĉe la Hispanio-Ameriko-Kompanio. Li estas nun maŝinisto sur la „Isabela de Kastilio“. En julio li forveturos al diversaj iandoj *trans* la Atlantika Oceano: Al Brazilo, al Argentino, kaj eble ankaŭ al Cilio. Li vidos la grandajn urbojn de Sud-Ameriko, vizitos fremdajn landojN kaj popolojn.

Mi envias liN, ĉar mi tre deziras vojaĝi. Se mi estus riĉa, mi vojaĝus. Sed mi ne vojaĝos *ekster* mia patrujo, ĉar mia profesio ligas miN al ĉi tiu regiono kaj ĉi tie la junteroj¹⁾ kaj la laboristoj vivas en granda mizero. Vi scias, ke post la morto de mia kara edzino miaj geamikoj Pedro kaj Sara Delkampo venis al mi; ke ili nun loĝas en mia domo kaj ke mi laboras *kune kun* ili. Kvankam ni triope laboras dum la tuta tago ni ne gajnas sufiĉe por vivi. Krom tio ni havas grandajn elspezojn pro la malbonega stato de la domo kaj de la bariloj de la kampo. La terposedanto ne riparas *ioN*; li nur postulas monoN.

Ni havas ankoraŭ aliajn zorgojN: mi tre timas, ke la ter-posedanto forpelos miN de la farmo-bieno. Imagu tioN, fratino! Kvankam niaj gepatroj, niaj geavoj kaj niaj *pra*-geavoj ĉiam laboris en la farmo-bieno, mi tamen devas timi, ke oni forpelos miN. Ni junteroj ne havas rajtojn! Koj kioN fari tiam? En Andaluzio kaj Estremadura regas granda senlaboreco kaj malriĉeco: viro gajnas du pesetojn por unu tago *da* laboro; virino gajnas nur unu peseton.

¹⁾ juntero — senhava laboristo, kiu en „libera“ laboro prizorgas la teron. Li mem kunportas jugon da muloj (malriĉuloj: azenoj), ilaron kaj la helpon de siaj familianoj.

En kelkaj Andaluzaj vilaĝoj estas mil viroj sen laboro dum la tuta jaro!

Karaj fratino kaj bofrato, mi ĉesas. Eble mi sentas ĉion tro profunde kaj mi ne volas perdi la kuraĝon. Mi esperas denove skribi al vi baldaŭ. Estu sanaj kaj feliĉaj kaj ricevu korajn salutojn de via frato.

Gulio La Tero

Infanurbo.

En Hungarujo ekzistas infanurbo.

Ĉu vi povas imagi tion? Urbo, kun nur infanoj. La solaj plenaĝuloj estas kelkaj geinstruistoj. Ĉar ili volonte volas lerni ion. Ili nun ankaŭ komencis studi Esperanton.

Sed oni bezonas tie multon. Precipe vestojn. La urbestro (12-jara) skribis al mi, ke li ankaŭ bezonas ŝarĝ-aŭtomobilon. Tion vi ne povas sendi. Sed etan paketon ĉiu povas doni, ĉu ne?

Rogiero.

Kiu volas ion scii?

„La falo de stelo, kio tio fakte estas?” oni demandis al mi.

Nu, aŭskultu! En la universo ŝvebas ĉie pecoj el ŝtono. Tio estas la restaĵoj de steloj, aŭ planedoj, kiuj pereis. Oni nomas ilin meteorŝtonojn. Kelkaj estas grandaj, sed la plej multaj estas nur tre malgrandaj. Ordinare ili ne estas videblaj. Unue, ĉar ili estas tro malproksime, kaj due ĉar ili ne disradias lumon. Kun granda rapideco ili ŝvebas tra la universo. Nu, kelkaj el tiuj meteorŝtonoj venas en nian atmosferon. La atmosfero estas la aero-tavolo, kiu estas ĉirkaŭ nia tero.

Kiam tia ŝtono flugas en ĝin, ĝi ekardas. Tio okazas pro la frotiĝo kun la aero. Ĝi tiam postlasas lumantan strion. Ege bele! Kaj la homoj diras: „Vidu, jen stelo falas! Nun vi rajtas ion deziron!”

Rogiero.

Cion, kio estas destinita por Rogiero, oni sendu al TJO-Centro, West-Grafdijk (NH), Nederlando.

Ludo.

La blindulo kun la bastoneto. Al unu el la ludantoj oni metas tukon antaŭ la okulojn, kaj bastoneton en la manojn. La aliaj formas rondon ĉirkaŭ la blindulo. Ili kantas kaj dancas. Subite ili silentas, kaj tiam la blindulo per la bastoneto frapas iun. Tiu persono devas teni la bastoneton kaj diri frazon. Kompreneble li rajtas aliĝi la voĉon. La blindulo devas diveni la nomon de tiu, kiu parolis. Se li sukcesas, ĉi alia devas anstataŭi lin.

„Paco kaj Justeco”, Brugge, Belgujo.

Mia Aŭtobiografio.

Mi estas juna, angla fraŭlino. Mi loĝas en Plaistow. Tio estas parto de Londono. Mi loĝas en la sama domo, kie mi naskiĝis. Mi naskiĝis la dek sesan de majo 1931, do mi estas dek ses jara.

Mi iras al gimnazio, kies nomo estas „Plaistow Grammar School”. En la plej proksima semajno (14-19 julio) ĝi estos dudek unu jara. Tie mi lernas la francan lingvon. Mi forlasos la gimnazion en aŭgusto, kaj mi estos floristino. Mi iros al la tendaro en Ipswich.

Mi havas unu fraton, li estas maristo, kaj li estas dudek-jara.

Miaj gepatroj vivas. Mi havas unu hundon kaj du katojn, ĉar mi ŝatas bestojn. Mi ankaŭ ŝatas muzikon kaj librojn.

Miaj flank-okupoj estas kolekti poŝtmarkojn kaj fotografaĵojn de eksterlandaj geamikoj. Mi tre ŝatas skribi leterojn. Mi havas amikon en Hungarujo, kaj amikon en Ĉeĥoslovakujo, kaj amikino en Francujo. Mi ŝatus multe da amikoj, aŭ amikinoj (mi ŝatas amikinojn) en aliaj landoj, por skribi multajn leterojn. Mi sendus gazetojn, kaj poŝtmarkojn, aŭ kion la geamikoj ŝatus.

Mia nomo estas Jacqueline Beasley, sed miaj amikinoj diras „Jacky”.

Mia adreso: F-ino J. Beasley, 6, Richmond St., Plaistow, London E. 13 Britujo.

Kiu sendas leteron al Jacky????

Nova temo!

Tio estas amuza! Ĉiu leganto kaj legantino sendas temon al mi. Vi povas elekti, kion vi ŝatas. Ekzemple: „La floroj”, aŭ „La radio”, aŭ „La profundmaraj fiŝoj”, aŭ kion vi nur deziras. Pri kiu temo vi volus legi ion? Bone pensu pri tio! Tiam vi simple sendas leterkarton, sur kiun vi skribis la temon. Se vi estas ano de grupo, oni povas meti la diversajn temojn sur unu karto, aŭ en unu letero. Aldonu vian nomon, adreson, aĝon kaj sekson.

Cu vi scias, kion ni faros? Venontan fojon ni rakontos al vi diversajn aferojn. Kiujn temojn preferas la knabinoj, kaj kiujn la knaboj. Kiel la temoj dependas de la aĝoj.

Sed ĉiu partoprenu! Sendi leterkarton ja estas malgranda peno! Do: kiam vi legas ĉi tion, vi tuj agu.

Kaj la plej interesan temon ni traktos en la rubriko: „Kiu volas ion scii?”

Rogiero.

„Bonfarulo”.

Al malavara pastro foje venas sinjoro kun brila oĝa ĉeno de poŝhorloĝo sur la vesto. Li diris al la pastro: „Permesu al mi rakonti pri tre ĉagrena cirkonstanco. Mi parolas pri granda familio. Ĝi loĝas en mansardo de granda domo en antaŭurbo. Antaŭ mallonga tempo mortis la patro. La patrino estas tiel malsana, ke ŝi ne povas labori. La infanoj mortas pro malsato. Kaj mi ankoraŭ devas diri, ke baldaŭ ili restos sen loĝejo. Pro luo ili ŝuldas entute 18 rublojn kaj 45 kopekojn. Kaj se ne iu pagos por ili tiun sumon, la dommastro forpelos ilin.”

„Jes, tio estas terura!” diras la bonkora pastro. Kaj li prenas kelkajn monerojn el skatolo kaj donas ilin al la gasto.

„Jen, portu la monon al la malriĉuloj. „Sed,” li diras subite, „rakontu al mi, kiu vi estas. Kaj kial vi tiel zorgas pri la sorto de tiuj mizeraj homoj?”

„Mi estas la mastro de la domo, en kiu loĝas la malriĉa familio” respondas la gasto.

El la rusa lingvo tradukis Vadim Gruŝinskij, Nikolaev, Ruslando.

Trompaĵo.

„Ni garantias, ke tiu lana ŝtofo estas perfekta!”

„Kiel? Sur la karteto staras „Pura kotono”.

„Jes, vere, sed tiu servas nur por trompi la tineojn!”

El „Svisa Espero.

La saĝulo.

Alpa paŝtisto estis tre maljuna. Oni demandis al li:

„Kiom aĝa vi estas?”

„Mi ne scias”.

„Ĉu vere vi ne scias vian aĝon?”

„Mi kalkulas miajn ŝafojn kaj mian monon, ĉar mi timas, ke oni ŝtelos ilin. Sed miajn jarojn oni ne ŝtelos, do ilin mi ne bezonas nombri!”

Enigmo.

Kiu parenco per aldono de „h” iĝas propraĵo?

Rorb.

Solve de la zoologiaj enigmoj en la antaŭa numero:

1. Unuhufulpj. 2. Heliko — Limako.

Parolas miaj kajeroj.

Kelkfoje mi aŭdas, ke miaj libroj parolas. Ofte mi aŭskultas al ili. La kajero de aritmetiko diras al mi: „Kial vi premas min tiel? Ĉu vi ne vidas, ke vi makulas min? Tamen aritmetiko plaĉas al vi! Vi mem diris al via panjo: Kiom plaĉas al mi aritmetiko! Ĝi estas la plej bela kaj la plej facila fako.”

Sed jen komencas la kajero de Esperanto. Ĝi diras: „Estas bone, ke vi skribas tradukojn en min. Sed ne tiel skribaĉu, ne!”

Nun sekvas pli laŭta voĉo, de la kajero por verkotaskoj: „Jes! Via skribo estas bela, sed ne premu min tiel! Ankaŭ via instruisto diras tion al vi! Sed nun vi skribis en min sekreton: viajn meritotojn! Pri tio mi estas fiero.....”

La tagokajero tiam interrompas: „Mi estas fiero! En min vi skribas viajn sekretojn, viajn pensojn, viajn travivaĵojn.”

Sed la agendo ne povas diri vorteton. Ĝi ploras. Certe ĝi devus plendi pli ol la aliaj. Niĉjo Minnaja (9-jara), Romo, Italujo.

Kiu timigis?

Servisto de hispana nobelo laboris en la ĝardeno. Subite li forkuris al la domo.

„Ho sinjoro! Sinjoro!” li kriis time.

„Kio estas?” demandis la nobelo.

„Ho sinjoro! Donu al mi ĉevalon! Mi urĝe bezonas ĉevalon! Mi tuj devas rajdi al Madrid!” La viro ŝvitis pro timo.

„Sed kial?” demandis la sinjoro mire.

„Ho, mi laboris en la ĝardeno, kaj subite la Morto staris malantaŭ mi!”

La viro aspektis tiom malfeliĉe, ke la sinjoro decidis doni la ĉevalon. Kaj la servisto tuj forrajdis.

Poste la nobelo iris al la ĝardeno por rigardi. Kaj je lia granda miro tie ree staris la Morto.

„Sed, sinjoro Morto, kial vi estas ĉi tie?” li demandis, „Kaj kial vi tiom timigis mian serviston?”

„Timigi vian serviston? Kontraŭe! Li timigis min. Mi ricevis la ordonon akcepti lin en Madrid, hodiaŭvespere, kaj nun li estis ĉi tie!”

La varma somero.

La belega somero ree pasas. Iom post iom la aŭtuno ree alproksimiĝas. En kelkaj landoj estis treege varme dum ĉi tiu somero. Kiu povas skribi al mi pri tio? Sendu multajn leterojn!

Rogiero.



I.I.K.-KOMUNIKOJ. Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Nederlando. — Centra informejo de I.I.K.: Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo.

En la someraj ŝvitigaj tagoj, kunvenis niaj gekolegoj en Angers kaj Bern por pridiskuti temojn, kiuj rilatas la internacian organizaĵon de geinstruistoj kaj la ĝeneralan enkondukon de Esperanto en la lernejon.

I. Angers (Francujo). Ĉeestis gekolegoj el 7 diversaj landoj. Sub la lerta gvidado de koleĝino Dedieu, la prezidantino de la franca grupo de geinstruistoj esperantistaj, oni kunvenis dum tuta semajno. La ĉeestantoj pre-

legis pri la ĝenerala situacio de la instruado en propra lando kaj interŝanĝis ideojn.

Montriĝis, ke oni tre ŝatas ĉi tiun novan kontakton post la milito. Por I.I.K. kaj la nova kunlaboro inter gekolegoj sur internacia tereno parolis k-o Korte. La ĉeestantoj forte substrekis la dezirindecon de tia kontakto, same pri la centrigita agado por la enkonduko de Esperanto en la lernejon. Ili aprobis la nunajn formojn de „La Juna Vivo” kiel komunan parolilon por la instruistaro, junularo kaj junularamikoj. Precipe oni ĝojis pri la fakto, ke la lernantoj povos aboni apartan gazeton je malalta kotizo.

2. En Bern, dum la U.K. kunvenis dufoje ĉ. 60 gekolegoj el 12 landoj, sub la gvidado de k-o Dahl. K-ino Dedieu funkciis kiel sekretariino. Ankaŭ tie oni preparolis la internacian kontakton, antaŭ kaj post la milito, kaj energie pledis por la enkonduko de Esperanto en la lernejon. En diversaj landoj la esp.-instruo al infanoj iom post iom restariĝas. Prezidanto Dahl preparolis la neceson de la instruado de Esperanto en la instruistaj seminarioj kaj la eldonon de modernaj lernolibroj. La konata Esperanto-pioniro d-ro Stamadiadis el Atego komunikis, ke li instruis Esperanton en 10 gimnazioj kaj du seminarioj al pli ol 1000 lernantoj.

Oni substrekis la grandan valoron de internacia korespondado inter lernejoj.

La dana f-ino Noll sciigis, ke oni intencas organizi internacian semajnon por geinstruistoj dum la venonta universala kongreso en Malmö.

Fine oni akceptis la ĉi-suban rezolucion, kiu tamen pli similas „konstaton” aŭ „deklaracion”:

„Geinstruistoj el 12 landoj, kunvenintaj en Bern, Svisujo, la 28-an de julio 1947, decidis akcepti la jenan rezolucion, direktatan al la tutmonda geinstruistaro, registaroj kaj pedagogiaj instancoj.

Ni konstatis, ke la multlingveco estas granda baro por interpopola kompreno kaj kaŭzo de diversspecaj malfacilaĵoj, miskomprenoj kaj malavantaĝoj.

Por proksimigi homon al homo, popolon al popolo, rason al raso la naciaj lingvoj ne sufiĉas. Ili reprezentas nacian superecon, kiu neniam estas akceptata kaj krome ilia malfacileco malebligas por la grandaj popolamasoj ĝisfundan ellernadon. Ni spertis, ke la internacia helplingvo Esperanto dank' al siaj simpleco, logiko kaj internacieco sur ĉiuj kampoj kaj en ĉiaj rilatoj estas uzebla kiel internacia komprenilo.

Esperanto estas la lingvo de la lernejo.

Esperanto servas kiel praktika pedagogia helpilo kiam temas pri la lernado de la gepatra lingvo.

Esperanto donas al la lernantoj bonan fundamenton je ekstudado de fremdaj lingvoj.

Esperanto estas bona perilo de geografiaj, folkloraj, historiaj kaj aliaj scioj. Esperanto havas internacian vortprovizion, kiu estas tre valora por la lernoj de la malgrandaj nacioj.

Esperanto donas en facila maniero kaj post mallonga studado al la lernantoj necesan eblon por kompreni homojn kaj vivon trans la lingvaj limoj.

Ni apelacias al ĉiu serioza kaj celkonscia instruisto kaj pedagogo ĉiel subteni la instruadon de Esperanto.

En la nomo de la estonteco de la homaro ni devas nun post la terura mondmilito kun ĝiaj konsekvencoj krei firman fundamenton de harmonia edukado kaj evoluo.

La pedagogia kaj psikologia valoro de Esperanto estas depost multaj jaroj dokumentita en diversaj landoj.

Ni eluzu sur la lerneja kampo la eblojn, kiujn donas Esperanto, konsciante ke la enkonduko de Esperanto en la lernejon donos al la disigita homaro ŝancon krei interkonsenton, fratecon kaj pacon, baze de la plejmultoj inter la nacioj.

Ni kaptu la intereson de la gelearnantaro, kaj ni povos esperi pri bonaj pedagogie valoraj rezultoj.”

La fina impresoj pro ambaŭ kunvenoj estas, ke:

la geinstruistaro sopiras internacian kontakton; oni ĉie agnoskas la dezirindecon de enkonduko de Esperanto en la lernejon; la ge-kolegoj inklina al praktika kunlaboro.

Al tia kunlaboro en la kadro de nia I.I.K. pere de LJV ni vokas vin, nun post la libertempa ripozo, kaj ne forgesu nian redakcian adreson.

Korekto: En la antaŭa numero de LJV staras, ke geinstruistoj por 3.50 gld. povas esti anoj de landa sekcio de I.I.K, kaj de TJO. Oni legu tion: Por 3.50 g. nederlandaj geinstruistoj povas esti anoj de la ned. instruista grupo, kaj de TJO.

EN LA VERDA MONATO CIU ESPERANTISTO ACETAS LIBRON!

RICEVITAJ ESPERANTAJOJ.

Kongreslibro de Flandra Ligo Esperantista, eld. okaze de la kongreso en Mechelen, 24-26 majo '47. 44-paĝa libreto, bonaspekta. Enhavo interesa ankaŭ por ne-kongresanoj. Prezo 2 resp. kup.

„**Vivo kaj Arto de Goya**” de A. da Silva, eldono de Portugala Eldona Rondo. 24-p. libreto, priskribanta la vivon de fama hispana pentristo F. Goya. La verketo estas trad. el la portugala lingvo de V. Mendes. Prezo 0,35 guld.

„**Povo sukcesi**”, verkita de H. Th. Hamblin, trad. de F. W. Hipsley; 28-paĝa broŝuro pri la „vera interna signifo de sukceso”. Prezo 4 resp. kup.

Dua esperanta informilo pri la Sokol-festoj en Praha 1948 ĵus aperis, kaj ĝi estos senpage liverata al ĉiu petinto. Oni samtempe postulu pli detalan ilustritan broŝuron. Sokolsky slet, Praha III, Tyršov dum.

„**La pejzaĝoj sur la novaj aŭstriaĵ postmarkoj**”, kun bildklarigoj en kvin lingvoj. — Eldono de „Tramondo”. Prezo 1 resp. kup. Mendu al „Tramondo”, Vieno I, Neutorgasse 9, Aŭstrujo.

GENERALAJ SCIIGOJ.

Germana Esperanto-Asocio starigis dum la kunveno en Frankfurt a. M. (12-13 aprilo '45). En ĝi kuniĝas la neŭtralaj kaj laboristaj esperantistoj de la tri okcidentaj zonoj.

La germana akademia junularo sukcesis starigi Esperanto-Lektoraton kaj Esperanto-Instituton ĉe la Universitato en München. Ĝi estas la unua germana Universitato kiu enkondukis E-ton kiel oficialan fakon. — Oni petas kunlaboron kaj la alsendon de libroj kaj revuoj. Oni direktu sin al d-ro Siegfried Ziegler, Engelbertstr. 7, (13b), München-Pasing, Bavario, US-Zono, Germanujo.

Antologio. Je la sama adreso (München-Pasing) oni kolektas originalajn verkaĵojn por eldoni tutmondan antologion pri nia „familia Esperanto-Vivo”. Petu informojn al Engelbertstr. 7, München-Pasing.

La „Bulteno de la Entomologia Societo de Mulhouse” prove akceptis la uzadon de Esperanto. Oni deziras interŝanĝi kun natursciencaj fakrevuoj en la tuta mondo. Gesamideanoj, helpu en tio! Serĉu adresojn de naciaj organoj, kaj propagandu Esperanton! Petu informojn de S-ro A. Lienhardt, 24, faubg. de Riedenheim, Mulhouse, Francujo.

• **Bonvolu resendi!** Kiu erare kunprenis la Internacian Kantaron (muzikan eldonon) de Marie Snijders (de la scenejo en la festsalono en Ipswich) bonvolu resendi ĝin al ŝia adreso: „Avondzon”, Purmerend, Nederlando.

Al la partoprenintoj en Ipswich: Bedaŭrinde s-ro Parker ne povis akiri sufiĉe da ekz. de „Evening Star”, en kiu aperis la foto de la diverslandaj reprezentantoj. Sed li ricevos la kliŝon, do poste la foto aperos en LJV. La jam ricevitajn monon li donis al TJO.

Aĉetante viajn esperantaĵojn ĉe TJO-Centro vi subtenas la internacian junularmovadon!

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto, aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Al ĉiuj geinstruistoj ni petas kunlaboron, por ke la rubriko estu valora.

Belgujo: Philippe Cullus (19-jara), 3, Grand Place, Braine-le-Chateau, dez. kor. kun ĉ.l. pri artoj kaj interŝanĝi popolkantojn.

Brazilo: S-ro Lazlo Zinner, Caixa Postal 3677, Rio de Janeiro, Skulptaristo, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Nur pri arto.

Bulgarujo: Stojan Stojanov, C. Samuil 49, Sliven, interŝ. 25-60 belaspektajn pm. kontraŭ sama kvanto da balkanlandaj, rusaj, k.a.

Nikola Ivanov Haĝiev, studento, str. Rakovska No. 80, Sofio, dez. kor. kun gesamideanoj en la tuta mondo. Respondo garantiata.

Ceĥoslovakujo: „Neŭtrala Esperantista Societo“ en Dolni Suchá, 163, Silezio, aranĝas E-ekspozicion. Bonvolu tiusele sendi ĉiajn E-ajojn.

23-jara junulo volas korespondi pri interesajoj. Ladislav Koptik, Semily II/202.

Eugen Grich, lernejestro, Poproč, poŝta Jasov, dez. kor. kun instruistoj de ungradaj lernejoj en Francujo k.a.l. Interŝ. eĉ poŝtkartojn.

Francujo: Roger Bizet, Wierre au Bois — par Samez, P. de C. deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Hispanujo: Enrique Serra, Martinez de la Rosa 25, 1^o, 2^a, Barcelona, dez. kor. pri literaturo, arto kaj muziko. Interŝ. let. pk. kaj revuojn.

Martin Buscató, Avda José Antonio 284, 3^o, 2^a, Barcelona, dez. kor. kun ĉ.l. pri ĉiuj temoj (ne politikaj). Interŝ. let., ilustra. poŝtkartojn.

José Gaus, Provenza 31-33, Barcelona, dez. kor. kun ĉ.l., pri ĉiuj temoj (ne politikaj). Interŝanĝi leterojn kaj ilustritajn poŝtkartojn.

Hungarujo: Adalberto Gázi, Battonya, I. Atila str. 317 (20-jara) dez. kor. kun eksterlandaj geesperantistoj.

„Esperanto-Grupo de la Szegedaj Skoltoj“ deziras korespondi kun tutmondaj geskoltoj kaj gejunuloj pri ĉ.t. Szeged, Kárász u. 9.

17-j. studento (lernanto) dez. kor. kun la tuta mondo, interŝ. pm. Resp. certa. Zoltán Kiss, Nyiregyháza, Eötvös 4.


Nederlando: Rie Kramer, Oostdijk 4, N. Beemster (NH), dez. kor. kun ĉiuj landoj pri diversaj temoj.

Jan Bos (16-j), Mr. N. F. Wilkenstr. 6, Veendam, dez. kor. k. interŝ. poŝtm.

Svedujo: Letervesperon aranĝos en nov. 1947 Lunds Esperanto-Klubb, Svedujo. Skribu multnombre al: Erik Dahlbergsgatan 3b, Lund.



LA JUNIA VIVO



ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. (5 ŝil, 114 fr. fr., 4 sv. fr.)

Gejunuloj kaj geinstruistoj: Atentu! Atentu!

Cu vi la venontan jaron ŝatus vivi dum du semajnoj en Esperantujo? Tiam bonè pripensu la T.J.O.-planon: Ĉiu kursgvidanto iros en 1948 dum unu semajno kun sia grupo al alia lando, kaj dum unu semajno li kun sia grupo akceptos eksterlandajn infanojn! Kion vi pensas pri tiu plano? Jam nun komencu la aranĝojn! Pritraktu la aferon en viaj grupkunvenoj. La infanoj mem skribu leteron, en kiu ili sciigas, al kiu lando ili prefere irus. Ili sciigu aĝon, sekson, ktp. Ni serĉos por ili kontakton kun infanoj en la koncerna lando, por ke ili jam nun komencu korespondi. — La celo ja estas, ke la infanoj loĝu ĉe samaĝaj gekorespondantoj. Por ni, esperantistoj, tia aranĝo ja estas tre facila! Ni havas unu lingvon, do ne ekzistas lingvaj malfacilaĵoj. Ni tion montru al la tuta mondo! Cu vi povas imagi pli bonan propagandon? La kostoj ne fariĝos tro altaj, ĉar oni nur bezonas pagi la vojaĝkoston.

Volonte ni aŭdos vian opinion pri nia plano. Ĉi tio estas nur plano, helpu en la efektivigo! Se vi havas aliajn planojn aŭ proponojn, ni komune pritraktu ilin. Certe multaj grupoj da plenaĝuloj pretos helpi en la aranĝoj, por ke en ĉiuj lokoj estu allogaj programoj por la junaj gastoj. Propagandu la planojn en via nacia gazetaro. La koresponda adreso por ĉi tiu afero estas: S-ro W. Bant, Instruisto, Wagemakersweg A 154a, Groet (NH) Nederlando.

Parto el letero de ĉeestinto en la Ipswich-Kunveno.

..... Pri la ĵus pasinta kunveno mi havas kaj laŭdojn kaj kritikojn. Komprenoble, post iu ajn afero oni facile povas kritiki, sed oni nur rajtas fari tion, se oni bone konas la zorgojn, necesajn por organizi tian kunvenon dum tiuj ĉi krizaj tagoj. Ankaŭ kritiko ĉiam devas enhavi konstruopovon. Detrua kritiko neniel helpas. Certe estas, ke la kunveno en Ipswich estis bone organizita. Fakte — laŭ mia opinio la programo estis tro organizita, kaj ne lasis okazon por elmontri — ĝis la lasta vespero — la talenton de la ĉeestantoj. Do — laŭ mia opinio estus bone, se la dua aŭ tria vespera programo ne estus aranĝita antaŭe, kaj ke estrarano havu la taskon ĝin organizi post varbado inter la ĉeestantoj.

En Ipswich ni havis bonan lokon en moderna lernejo. Tio multe helpis, sed se ĉio ne estus bone aranĝita kaj zorgita antaŭe, la kunveno povus fiaski. La britaj organizintoj povas esti laŭdataj pro la prepararangoj. Cio iris glate.

Pri TJO mem: Pere de la jarraportoj, kaj laŭ la jarkunveno, mi povas konstati, ke praktike TJO bone kaj multe progresas. Sed — ĉu estas en la estraro sufiĉe da junaj, viglaj homoj, kiuj ĉiam emas antaŭenigi la celojn de TJO? Mi timas ke ne. Do momente la organizo — laŭ mia opinio — progresas sufiĉe bone laŭ praktika vidpunkto, sed cele kaj ideale ĝi ne progresas sufiĉe. Por la plena vivo en TJO ni bezonas kaj korpon, kaj spiriton, ĉu?

En Ipswich mi vidis, ke malmultaj homoj tro multe laboris! Estonte la kunven-komitato aranĝu tiel, ke ĉiu plenkreskulo havu taskon dum unu aŭ pluraj tagoj. Multaj manoj faras la laboron malpeza! Ekzemple unu aranĝas kaj kontrolas la manĝservadon en la manĝejo, alia respondecas pri la dormĉambroj, tria organizas la purigadservon. Kvara aranĝas la vesperajn programojn, ktp.

Nia kunveno estas bona sukceso, pri tio ni ne dubas. Do nur necesas iomete plibonigi la aranĝojn. Per tio ni helpas krei la veran sferon. Se la celo nur ĉiam estas antaŭ ni, kaj antaŭ la tuta anaro!

L. Symes, Minchinhampton, Britujo.

Fotoj pri la kunveno en Ipswich! Ciu, kiu faris foto(j)n ne forgesu sendi unu al s-ro Heath (74, Dales View Rd, Ipswich) kaj unu al f-ino N. Rees, Derwydd, Seven Sisters, Neath, S. Wales). Ili urĝe petas fotojn por fari memorigan albumon. Geamikoj, sendu multajn fotojn al niaj afablaj gastigintoj!

Ce la ĉaro de l'glaciajisto.

(Surstrata sceno. Skizis en nederlanda lingvo Bennie v. d. Hulst (11-jara). Tradukis: Petro Rulofido).

La glaciajvendisto estas ege okupita. Oni preskaŭ krias liajn orelojn for de lia kapo.

„Hej, ulo! Nun, fine, donu al mi glaciajaĵon¹⁾; de kvin²⁾”.

„Panjo, donu al mi glaciajaĵon.”

„Ah bubo je ne tedu tiel per via petado. Jam du glaciajaĵojn vi forglutis. Ĉu do nun ankoraŭ pli vi volas? Vi ne havos. Sufiĉas jam!”

Alia petadadas la patron. Sed antaŭ la patro ili ordinare estas iom singardaj.

Longa, malgrasa, elsekiĝinta „tabaksako” alproksimiĝas. Tabakmaĉbulon malantaŭ la vangodentoj.

„Hej, longulo! Nun unue donu al mi glaciajaĵon. Jam unu horon mi staras tie ĉi!”

Sed „la longulon” tio ne tuŝas. Kviete li plu donadas glaciaĵon al ĉiu laŭvice. Kaj post kvaronhoro ankaŭ la tabakmaĉulo ricevis sian glaciajaĵon. Grumblante li foriraĉas.

Antaŭ sia vico, tamen, neniu ricevas glaciaĵon.

¹⁾ glaciaĵo estas la substanco; oni vendas ĝin en porcioj, ordinare briksformaj, inter du vafltoj, aŭ plenigas per ĝi pokalforman vaflon. Tian tuton mi nomas „glaciajaĵo”.

²⁾ = de kvin cendoj.

SKOLTA RUBRIKO.



El Ĉeĥoslovakujo: En Ĉ.S.R. estas granda skolta grupo, kiu havas proksimume 300.000 anojn. La skolta movado en Ĉ.S.R. (Junak), estis fondata en 1914 de A. B. Svojsik.

La bohemiaj skoltoj faras pezan promeson, kiu estas deviga dum la tuta vivo de la skoltoj. Kaj estas leĝo! Ĉiu skolto devas obei leĝon, kiu havas dek partojn. Skolto konscie ŝirmu la liberecon. Li batalu por la libereco, eĉ oferu sian vivon por ĝi.

La skoltoj en nia lando tre volonte vojaĝas kaj korespondas, kaj tiel ligas ĈSR kun fremdaj landoj.

Estas multaj fakaj ekzamenoj, ekz. pri „serĉado de postsignoj”, „tendumado”, ktp. Ni ankaŭ havas fakan ekzamenon pri Esper-

anto. La unua ekzameno estas „Monda frato”. Ĝi postulas, ke skolto en unu jaro povas korespondi kun skoltoj aŭ amikoj en fremda lando.

Ni petas la skoltojn en aliaj landoj; ke ili baldaŭ ekrilatu kun ni. Ni certe respondos. Skribu al Zd. Lisy, Praha VII, u Pruhonu 48. Ni estos ĝojaj, kiam vi baldaŭ skribos al ni, kaj helpos al ni fari novan grandan ekzamenon.

Atendante multajn respondojn de skoltoj en fremdaj landoj, ni salutas vin.

Estu pretaj!

Pri skoltoj (Responde al J. Pottier: LJV aprilo '47).

Geskoltoj emas interkonatiĝi spite de la landlimoj. Ili nepre bezonas facilan interkomprenilon. Ni Esperantistoj devas al ili montri la praktikecon de nia lingvo.

Jam kelkaj skoltoj uzas la Zamenhofan lingvon. Ili grupiĝas en S.E.L. (Skolta Esperantista Ligo). La universalan Kongreson en Bern (julio-aŭgusto '39) ĉeestis reprezentantoj de SEL el kvar diversaj nacioj. Kvankam mi ne estas skolto, mi havis la plezuron pasigi tiujn tagojn kune kun ili. La bernaj skoltoj sub gvidado de f-ino G. Merz organizis la restadon kaj afable akceptis la alilandanojn. Cetere la kunvenon prezidis la norvego: Berggreen.

La tendejo situis ĉe la bordo de la rivero Aar en malgranda kampo inter du altaj pontoj konstruitaj super la profunda valo. Apud la tendejo staris la komforta ligna domo de la bernaj skoltoj. Tie ni loĝis meze de la urbo tute proksime de la kongresejo kaj tamen en la vera naturo. — Neforgeseblaj tagoj! Ĉiumatene ni saltis en la freŝan akvon de la rivero. La fluo forportis nin rapide. Poste ludis kaj babiladis senĝene holandanoj, hungaro, norvego kaj mi, franco.

Alvenis la 1-a de aŭgusto, kiu estas nacia festotago en Svisujo. Tiam la svisaj skoltoj pretigis grandan kukon, sur kiu ili per ruĝaj rúbusoĵoj kaj freŝa kremo desegnis la svisan standardon. Ni manĝis tiun simbolan frandaĵon kun la sama pia seriozezo, kiun eksentis la disĉiploj dum la Sankta Mango!

Alian vesperon okazis kampofajro, kiun ĉirkaŭis multaj samideanoj de la kongreso. Tre malfrue en la nokto ni kantadis esperantaĵojn.

Mi ankaŭ memoras rave belan veturon sur la rivero Aar. Sipetoj portis nin laŭ longa kurbo tra la ĉefurbo kaj poste tra kampoj kaj

arbaro. Multaj fotoj faritaj tiun tagon atestas nun pri la plezuro de ĉiuj.

Kio okazis al vi, karaj skoltamikoj, post la adiaŭa kanto?

„Feliĉan tempon la malnovan — Ne forgesu ni!”

Milito tuj ekstondris

„Pasintaj tagoj ne revenos — Sed memoros ni!”

Tamen venos novaj gejunuloj kun samaj kantoj al sama Stelo!

Turin, Trepot, Francujo, Junio '47.

EN LA MATENO.



En la dormo-ĉambro de la gepatroj la vekhorloĝo montras la sesan horon. Patrino vokas: „Luiza, leviĝu! Felipe, leviĝu!”

Felipo leviĝas. Li frotas la okulojn, oscedas, streĉas la brakojn, oscedas serĉas la pantalonon kaj surmetas ĝin, oscedas, serĉas la ŝuojn kaj klopodas surmeti ilin. Sed li ne povas surmeti la ŝuojn. Kial ne? Felipe ne prenis siajn ŝuojn!

Kies ŝuojn li havas en la mano? Kompreneble de Pablo! Felipe ridas. Nun li surmetas siajn ŝuojn. Post tio li prenas la mantukon kaj iras al la banejo. Tie estas kelkaj siteloj

kun akvo kaj tie li lavas sin per akvo kaj sapo, kombas siajn harojn kaj surmetas sian bluzon.

En sia dormo-ĉambro Luiza demetas sian noktan robon, surmetas sian subjupon kaj siajn ŝuojn. Tiam ŝi iras al la banejo. Felipe jam estas preta kaj malsupreniras. Nun Luiza lavas sin. Per kombilo ŝi kombas siajn harojn antaŭ speguleto. Post tio ŝi surmetas sian robon kaj estas preta.

Luiza iras al la granda ĉambro kaj zorgas pri la matenmanĝo. La gepatroj, Pablo kaj Anita ankaŭ venas. La du grandaj infanoj jam estas pretaj. Patrino ne povas vidi ĉu la infanoj lavis sin aŭ ĉu Luiza lavis ilin.

Ili matenmanĝas sesope. Post tio Patro kaj Felipe foriras kaj Luiza supreniras por zorgi pri la malgrandaj infanoj. Ŝi kondukas ilin al la banejo kaj helpas Gracian: ŝi lavas, kombas kaj vestas ŝin. Ramono povas helpi sin: li jam surmetis sian pantalonon kaj siajn ŝuojn. Sed li ne lavis sin bone, do Luiza denove lavas

liN kaj kombas liajn harojN. Nun Ramono devas ankoraŭ surmeti siaN bluzoN. Luiza inspektas liN bone. Ŝi estas kontenta, do la infanoj povas malsupreniri por la matenmanĝo.

AL LAS PALMAS.



Kvankam Pablo kaj Anita de post kelka tempo iras al la klaso de fraŭlino Plumnova, ili ne lernas multe, ĉar ties instruado ne estas bona. La tre maljuna fraŭlino estas ofte

tiel laca, ke ŝi ekdormas. Tiam la infanoj ekridas; ili ekstaras kaj ekludas. Ili ekkrias, faras bruon kaj tiel vekas la instruistinoN. Tiam la infanoj tuj eksidas kaj eklaboras, sed fraŭlino Plumnova kompreneble estas kolera, punas iliN kaj ofte sendas iliN for. Tiel ŝi povas ripozi trankvile kaj ekdormi denove.

Hodiaŭ la infanoj eĉ ne iras al la lernejo, ĉar fraŭlino Plumnova estas malsana. Ĉar Patrino iras al Las Palmas, Pablo akompanos ŝiN.

Jen alvenas la aŭtobuso! Ili eniras. Patrino aĉetas biletojn ĉe la konduktoro kaj ili eksidas.

La aŭtobuso veturas sur bela vojo; ili preterveturas la „Caldera de Vandama”, atingas la vilaĝoN Ginámar, sekvas nun la marbordoN. La veturilo haltas sur la placo en la mezo de la urbo Las Palmas, ĉar tie estas la haltejo. Ili eliras kaj iras saluti SinjorinoN Majaflor. Ŝi estas amikino de Patrino kaj ili ĉiam manĝas kaj tranoktas en ŝia domo dum la restado en la urbo.

Post la tagmanĝo Patrino iras viziti siajn klientojN. Tiam Pablo estas libera ĝis la vespero. En tiu tempo li vagas tra la urbo, vizitas la foirejoN, iras al la parko aŭ promenas al Puerto de la Luz. Kvankam Pablo tre ŝatas la havenoN, li nun preferas resti en Las Palmas, ĉar la vojo al Puerto estas longa ses kilometrojN kaj li estas laca.

Morgaŭ li iros kun s-ino Majaflor al la vilaĝo Tatira, do en ĉi tiu semajno li ne vidos la havenoN.


Si sciis.

„Mia patro estas libro-tenisto”, diris la malgranda Paŭlo fiere.

„Jes, mi scias,” diris la eta Estero, filineto de la pastro.

„Li tenas ĉe si multajn librojn, kiujn li prunteprenis de mia patro!”

A. Mehtonen, Oulu, Finnlando.



LA BOVOĈAR' (DIE OSSEWA)

SUD-AFRIKA POPOLKANTO



Ve-nu al la ma-is-kamp', ki-e pre-tas bo-vo-
Dol-ĉe i - ru sen-ra-pid' - , Pro del bo-vo la-



ĉar' - ; Ve-nu al la ma-is kamp' - , La
ciĝ' - ; Dol-ĉe i - rusen-ra-pid' - ; Ja



bo-vo-ĉar' ŝarĝ-ig-is jam! In u vi, bo-vo-ĉar', in- u
bal-daŭ est-osiĝ-re-vid'!



vi, In u vi, bo-vo - ĉar', in- u vi ; Sci-as



mi pri vi-a cel' ; Al la hej-mo vi- a pel' . In- u



vi , bo-vo - ĉar' , in- u vi , In- u vi bo-vo-ĉar' in- u vi

Mia ferio.

Mi iris kun la Esperanto-klubo al Teksel. Kun Kor Dekker ni iris al Alkmaar. De Alkmaar per aŭtobuso al Den Helder. Kaj de Den Helder per ŝipo al Teksel. Ni alvenis en Oude Schild, kaj de tie ni iris per ŝarĝ-aŭtomobilo tra Den Burg al De Koog: La knabinoj devis dormi en kampdomo, kaj ni iris al la tendarejo por starigi la tendojn. La sekvan matenon estis dimanĉo. Tiam ni promenis al arbaro. Ni tre ĝojis, kaj la abioj tre bonodoris. Poste ni iris al la marbordo. Ni banis kaj ludis. Kaj tiel la tagoj rapidege pasis! Ni naĝis kaj promenis. Kaj subite ree estis sabato. Antaŭ ol mi komprenis tion, ni jam devis iri hejmen. Jam tre frue ni ellitiĝis kaj enpakis la aĵojn. Kaj jam je duono post la deka ni foriris.

Jaap Bas (12-jara), O. Grafdijk, Ned.

Li ne timis.

Sinjoro devis iri al la urbo. La vojo estis longa, kaj la vetero estis tre varma. La sinjoro tre ŝvitis, ĉar li portis surtuton. Subite li pensis: „Mi povas meti mian surtuton sur ĉi tiun arbo-trunkon! En la vespero mi ja revenos laŭ ĉi tiu vojo. Tiam mi ree povos surmeti ĝin.”

Antaŭ ol li foriris li per grandaj literoj skribis sur pecon da papero: „Mi estas premiita boksisto”. Tiun paperon li fiksas sur la surtuton. Kaj li pensis ruze: „Nun certe neniu kuraĝos ŝteli ĝin!”

En la vespero li revenis. Sed lia surtuto estis for.

Sur la arbotrunko nur kuŝis la papero. Kaj sur tiu papero nun staris: „Mi estas premiita vetkuranto!”

Rakontludo.

Unu ludanto diras la unuan vorton. La persono, kiu sidas apud li, aldonas novan vorton. Tiel oni laŭvice daŭrigas la rakonton. Ofte la frazoj fariĝas tre amuzaj. Sed oni atentu, ke la frazoj formu iun rakonton. Estas konsilinde, antaŭe fiksi temon. Oni ankaŭ povas uzi kunmetitajn vortojn.

A. Mehtonen, Oulu, Finnlando.

Kiu volas ion scii?

Gi okazis dum nokta promenado sur Tekselo (nederlanda insulo). Dudekope ni marŝis laŭ la bordo de la norda maro. Estis

mallume, sed sur la ĉielo staris miloj kaj miloj da steloj. La maro frapadis kaj lumis. En la komenco ni babilis kaj ridis, sed iom post iom ni fariĝis silentaj. Ĉar la nokto estis grandioza. Ni vidis la stelojn kaj ĉiuj tiuj steloj fakte estas sunoj. Ni pensis pri tiu granda miraklo. Ĉiuj tiuj steloj estas fajraj globegoj. Subite dekvar-jara knabino demandis: „Kio fakte estas kometo?”

Jes, kio estas kometo? Kometoj estas plej grandaj mirakloj, el mirakloj! Kometo estas astro kun vosto. Kometon ni vidas tre malofte. Ĝi aperas sur la ĉiela arkaĵo ĉiun kvindekan aŭ sesdekan, aŭ alian jaron, kaj kiam ĝi aperas, granda kaj belega, multaj homoj timas. Ili supozas, ke ĝi estas signo. „Eble”, ili pensas, „la tero pereas.” Sed tio ne estas vera, tute ne vera. Kometo faras vojon ĉirkaŭ nia suno kaj post multaj jardekoj ĝi revenas. Ĉiufoje ĝi foriras tre, tre malproksimen, kaj tamen ĝi revenas. Sed kelkfoje kometo ne plu iras returnen. Kaj tiam tiam ĝi faras senfinan vojaĝon tra la universo Kien? Kien?

Rogiero.

Atentu! La sekvan fojon mi rakontos ion al vi pri la desegnaĵoj, kiujn mi ricevis.

Ĉu vi pensis pri la nova temo? Ĉu vi memoras? Por la rubriko: „Kiu volas ion scii?” (Vidu la septembran numeron).

Rogiero.

Aŭtuna Revo.

Estis aŭtuno. Mi vagis sola tra la kampo en la norda parto de nia malnova Ĥinujo. Mi tremis. Pro kiu kaŭzo mi tremis do! El la dezerto blovis malvarma vento. La suproj de la morusujoj bruetis. La somero, kiu forpasis, estis varmega, sed nun venas la vintro. Mi marŝetis sur la palruĝa tero. Ĉu mi sonĝis? Ĉar mi aŭdis voĉon. La kampo estis granda kaj soleca, kaj ĉie staris la moruso-arboj. Mi tremegis kaj mi aŭdadis voĉon. Serpento kun homa kapo proksimiĝis. Ĝi havis la zigzagan linion de vipuro kaj ĉe ĝia homa kapo la flavon de la veneno. Ĝi haltis, levis la kapon kaj siblis: „Vi estas homido, ĉu ne?”

„Jes,” mi flustris, „mi estas ido de homo, jes.”

„Vi sekvos min,” ĝi daŭrigis, kaj ĝia voĉo estis akra kiel de homa sorĉistino.

„Kien do?” mi time demandis.

„Kiĉn? Nenien kaj ĉien,” ĝi siblegis. „Nur sekvu min!”

Mi rampos al la lando de la nenio, la absoluta nenio, sed ankaŭ al la lando de la ĉio, la absoluta ĉio.”

Mi ne komprenis ĝin, mi ankaŭ ne povis kompreni ĝin, kaj mi timis treege.

Ha! Subite aperis eta ina estaĵo. Evidente ŝi estis elfino, tia, kia vivas en aliaj landoj.

„Parolu,” ŝi direktis, „parolu do!”

„Kion mi devas paroli!”

„Yoku la homojn per la universala lingvo, per la lingvo, kiun ĉiu komprenos”.

Kaj mi vokis, mi vokis, mi vokis. Mi vokis tiel, ke miaj gorĝo kaj okuloj preskaŭ rompiĝis. Sed la serpento kun la homa kapo forkuris kaj la feliĉaj homoj venis en senfina vico. Ili iris tra la mondo, kaj la mondo fariĝis ĝoja.

Kun Ek Sun.

Aŭtobiografio.

Jen estas mia aŭtobiografio: Mi estas 20-jara kaj naskiĝis en Glasgovo, kie mi ankoraŭ loĝas. Mi vizitis la lernejon ĝis mi estis 14-jara. Kiam mi estis 15-jara mi komencis labori en asekura oficejo. Dum la pasintaj kvin monatoj mi estis en hospitalo, ĉar mi havas malsanan genuon. — Mi interesiĝas pri klasika muziko, politiko, skoltmovado kaj filmoj. — Mi dezirus skribi al junulo de la sama aĝo kiel mi. Mia adreso estas: David Lang, 31 Gardner St., Glasgow, W.I. Britujo.

Enigmo.

- Mi konsistas el kvar literoj. Kiam mia unua litero estas *v* mi kuŝas inter montoj; kiam mia unua litero estas *s* mi taŭgas por gustigi multajn manĝaĵojn; kiam ĝi estas *m*, mi signifas la kontraŭon; per *b* mi estas kunveno, kie oni dancas.

Solve el No. 117: Avo — Havo.

Propagandu per la TJO-poŝtpapero! Prezo: 50 folioj kaj kovertoj por 2.— g.; 50 kartoj por 0,65 g.

Varbu vian korespondanton por „La Juna Vivo”!

TJO-RUBRIKO.

(sekretario: Joh. Idastr. 32, Rotterdam, Nederl.).



La estraro kunvenis 28-9-'47 en Amsterdam. La plej grava decido estas, ke TJO oficiale akceptis la interkonsenton rilate LJV (vidu „La Peranto Inter la Perantoj” de aŭg. '47). Nur la sekr.-kasisto estis kontraŭ.

Nia belga ĉefperanto Carlos Braet transloĝiĝos al Belga Kongo. Ni elkore dankas lin pro lia sindona laboro por TJO kaj deziras al li multan bonon.

La nova ĉefperanto por Belgujo estas Philippe Culus, 3 Grand' Place, Braine la Chateau. Car li ĝis nun prizorgis la korespondservon lia nomo jam estas konata en la belga sekcio!

Nia aŭstra ĉefperanto Johann Germela edziĝis. Ni tutkore gratulas lin!

Ciu TJO-ano posedu membro-ateston kaj regularon. Petu al via ĉefperanto!

Laboru por TJO, kaj ne forgesu nian libro-servon!

M. v. d. Horst.

Raporto de la TJO-Laborkunsido en Ipswich 20-8-'47.

1. Ceestis la ĉefdelegitoj, la delegitoj, la TJO-estraro kaj anoj de TJO. Inter la gastoj estis la prezidanto de Denaska Esperantistaro, s-ro Robertson, Anglujo.

2. Oni preparolis la jarraportojn. S-ro Maertens, Belgujo, opinias, ke estas konsilinde, ke tro multe da laboro estu en la manoj de malmultaj funkciuloj. Li krome deziras, ke en estontaj TJO-kunvenoj la loka organiza komitato havu dum la daŭro de la kunveno la ĝeneralan gvidadon. Li proponas, ke la belga sekcio transprenos la gazetarservon de TJO, kion la kunveno akceptas. S-ro Symes, Anglujo, atentigas, ke mankas ĉe la financa raporto la atesto de la kaskontrola komitato. La kasisto respondas, ke pro libertempo de la Kontrolkomitato la raporto aperos en venonta numero de La Juna Vivo. — Post preparolo la kunveno aprobas la jarraportojn de la sekretario, kasisto, de la film- kaj libroservoj.

3. Pri la Regularo de TJO. Kvankam ĝi jam estas aprobita per la Referendumo la kunveno en Ipswich esprimas sian plenan konsenton pri ĝi. —

4. La kunveno reelektas la estraranojn, kiuj laŭregulare devas ekzigi. S-ro Finch ŝatus vidi pli junajn estraranojn. La estraro konsentas pri tio, sed atentigas pri la malfacilaĵoj en tutmonda organizo, kies tuta estraro se eble

loĝu en la sama lando por povi regule kunveni. La ĉefdelegitoj en la diversaj landoj formas la pli vastan estraron kaj ili estas sufiĉe junaj.

Proponoj. 1. TJO pli intense okupu sin pri efektiva junular-laboro. — Akceptita. S-ro Soros (Hungarujo) rekomendas doni al ĉiuj membroj ian funkcion. S-ro Maertens aldonas, ke la belgaj grupoj jam faras tion.

2. S-ro Soros deklaras, ke la hungara sekcio reprenas la proponon pri la aliĝo de TJO al la Monda Fed. de Dem. Junularo. S-ro Karlsson (Svedujo) diras, ke estas pli bone fari propagandon ol aliĝi al ne-esperanta asocio.

3. Denaska Esperantistaro prezentis al TJO proponitan kontrakton pri intima kunlaborado; komuna gazeto; estonta kunfandiĝo. S-ro Robertson, prez. de D. E. diras, ke D. E. havas pli ol 200 membrojn en 25 landoj. Post voĉlegado de la proponita kontrakto la kunveno akceptas la tutan proponon.

4a. La Referendumo. La belga sekcio rekomendas kè en la Universala Kongreso okazu fakkunsido de TJO. — Akceptita.

b. La Juna Vivo por infanoj (8-paĝa eldono). La redakcio laŭeble ornamu tiun infangazeton per bildoj. — Akceptita. S-ro Robertson proponas por speciala infangazeto la nomon „La Burgona Vivo”. — La kunveno lasas la decidan al la redakcio.

c. Ĉiuj Junular-organizoj, kiuj uzas Esperanton, devas trovi lokon en TJO. — Akceptita.

d. Agolimo en TJO: Akceptita kiel deziresprimo.

e. Vidu proponon 2.

f. Subteno fare de plenkreskulaj Esp. organizoj. — Akceptita.

g. Specialaj kursoj por TJO-gvidantoj. Provizore la Peranto inter la Perantoj plenumu tiun taskon. Ĝi estu abonebla por 1.— guld. S-ro Maertens proponas, ke dum TJO-kunvenoj okazu kelkaj seriozaj prelegoj de kompetentaj oratoroj. — Akceptita. — S-ro Parker atentigas, ke estas utile kaj rekomendinde, ke ĉiu, kiu deziras partopreni en Internacia Esperanto-kunveno antaŭe akiru de la landa aŭ loka TJO-sekcio ateston pri lingva kapableco. — Akceptita.

h. Internacia TJO-Kunveno en 1948. Se eble en Francujo aŭ Ĉeĥoslovakujo. La kunveno komisiis la estraron aranĝi la kunvenon tie, kie la cirkonstancoj estas plej favoraj.

5. S-ro Soros pledas por migranta propaganda komisiono. — Akceptita. S-ro Soros klopodu organizi ĝin.

Ce la fino de la kunsido la kunvenintaro aklame nomas s-inon E. v. Vee-
nendaal-Bouwes honora prezidantino de TJO. Raportis M.K.

„Subskribintoj deklaras, ke ili kontrolis la librojn kaj kason de la kasisto de TJO, kaj komparis ilin kun la publikigita financa raporto en „La Peranto”. Ili trovis ĉion en bona ordo.

Rotterdam, 9-9-'47.

A. C. Obbes.
M. Seilberger.

Manuskriptoj por „La Juna Vivo” estu en la redaktejo antaŭ la 20-a de la monato!

III-RUBRIKO.

Seminario por esperantistaj geinstruistoj en Francujo.



En „Regiona Centro de Popola Edukado” okazis de la 25-a de aŭgusto ĝis la 14-a de septembro 1947 unuafoje en nia lando „Provtempo” de esperantistaj geinstruistoj, organizita de G.E.E. (nia enlanda asocio de esp. instruistoj) kun permeso de la Ministerio (de Junularo, Arto kaj Popola Edukado). La celo estas instrui pri la pedagogio de Esperanto, ne nur teorie, sed ankaŭ praktike. Prelegoj, lekcionoj, lecionoj al infanoj okazas ĉiutage same kiel en ordinara porinstruista seminario. La partoprenantoj perfektigas en Esperanto, ili ellernas la lingvon kaj ĉeestas dum kolego instruas al 11-

14-jaraj infanoj. Tiel ili ricevas la kuraĝon por siavice roli kiel instruanto. La kritiko de la kolegoj kaj gvidantoj estas utila al ĉiuj.

Ni esperas reokazigi similan seminarion ĉiusomere, por ke baldaŭ estu en la tuta lando aro da lertaj gvidantoj instruantaj Esperanton en sia lernejo.

Represo estas petata.

J. Dedieu, 3 rue Arzac, Toulouse.

Praktika propagando kun pedagogia valoro.

La franca progresema edukmovado „Presarto en lernejo” havas Esperanto-fakon kaj organizas kolektiván internacian korespondadon por la lernantoj, kiuj ankoraŭ ne konas Esperanton.

Temas nur pri praktiko. La instruistoj de la korespondantaj lernejoj faras la necesajn tradukojn, kiuj ebligas la interŝanĝon de dokumentoj. De antaŭ unu jaro ni rilatigis 20 francajn lernejojn kun 20 eksterlandaj. El la ricevitaj raportoj ni kun ĝojo konstatas ke ni trafe laboris. La inspektoroj interesiĝis pri la dokumentoj, valoraj laŭ pedagogia vidpunkto; la lernantoj entuziasmiĝis pri tiuj interŝanĝoj, kiuj kreis ĉe ili la deziron lerni. (Gravega estas tiu punkto!) Angla ĵurnalo eĉ sufiĉe amplekse raportis.

Tiamaniere Esperanto estas pli konata; ĉiu konscias pri ĝia

utilo kaj favora klimato por enkonduko en la lernejojn estas kreata.

Tre malmulte da laboro postulas nia sistemo: unu sendo ĉiumonate laŭ difinitaj kondiĉoj. Pro tio ĉiu kolego povas kaj devas kunlabori. Nia konvinko estas, ke el tiu praktiko povas rezulti multe.

Kiu hezitas pro iu ajn motivo, povas kunlabori alimaniere, nome per interŝanĝo de ĉiumonataj veterraportoj. Ni povus citi reton de kvin lernejoj en Nederlando, Francujo, Svedujo, Anglujo, Italujo, kiuj reciproke sendas raporton pri temperaturo, pri dato de foliado kaj florado de diversaj plantoj, ktp.

Temas pri utila Esperanto-praktiko. Volonte mi interkontaktigos vin kun alilandaj gekolegoj.

Lentaigne, Instruisto, Balaruc les Bains (Hér.), Francujo.

Societo de Britaj Esperantistaj Geinstruistoj (SBET).

Eble niaj gekolegoj en aliaj landoj volas aŭdi iom pri nia agado, kaj reciproke ni esperas lerni de ili.

Dum naŭ jaroj ni ekzistas kaj nun atingis anaron de pli ol 200, el kiuj la pliparto estas profesiaj geinstruistoj en ŝtataj lernejoj, ĉiuj specaj, inkluzive gimnaziojn; en universitatoj kaj privataj lernejoj je diversaj gradoj. Nia ĉefa celo estas enkonduki Esperanton en la lernejojn, se eble per persona instruado.

En niaj vicoj ankaŭ estas aliaj kategorioj: tiuj (ofte tre spertaj), kiuj gvidas Esperanto-kursojn en vesperaj lernejoj kaj tiuj edukistoj (ĉu Esperantistoj aŭ ne), kiuj aktive subtenas nian celon; ekzemple la estro de lernejo, kiu permesas instruadon de Esperanto; ankaŭ iu eduka aŭtoritatulo (se ni povus kapti tian); kaj eksciĝintaj (pro diversaj kialoj) geinstruistoj.

Vi eble diros, ke 200 ne estas granda nombro dum naŭ jaroj. Efektive ĝi ne estas, kaj ni ne estas kontentaj. Tamen jaron post jaro ni pligrandiĝas.

Ni varbas niajn anojn diversmaniere, sed la plej efika rimedo estas la persona influo. La Brita Esperantista Asocio ankaŭ multe helpas, ĉar kiam instruisto (post koresponda kurso) aniĝas al BEA, tiu informo estas sendata al nia Societo kaj post iom da tempo ni sendas inviton al tiuj personoj. Anoncoj kaj raportoj en gazetoj ne helpas! La laboro kaj influo de unu persono en la estraro de gravaj societoj edukaj multe pli valoras ol multekosta reklamado kaj alvokoj de nia societo mem. Kompreneble, se ni estus grandnombraj ni povus fari pli. Ni sukcesis akiri la konsenton de 18 eminentuloj en la eduka mondo esti niaj honoraj konsilantoj kaj ni enlistigis iliajn nomojn sur nian oficialan skribpaperon, kiu estas bonega varbilo.

Frue en nia ekzisto ni konsciis, ke la geinstruistoj mem ne havas sufiĉe da lingvoscio aŭ parolpovo. Do ni starigis somerlernejojn, kun kreskantaj bonaj rezultoj. La partoprenantoj iĝas kutime niaj plej entuziasmaj kaj kapablaj membroj. Niaj „lernejoj“ daŭras nur unu semajnon ĉiujare, do ni akceptas nur tiujn, kiuj scipovas la elementojn de la lingvo. Unu tre grava faktoro en niaj lernejoj estas la ĉeestado de sufiĉe da personoj, spertaj

lingve kaj profesie. Tio konservas altan nivelon. La nuna forta komuna sento en nia komitato kaj societo devenas grandparte de la komuna sperto de tiuj lernejoj.

Ni penas kolekti kaj ordigi la rezultojn de la instruado de Esperanto en lernejoj por havi sufiĉe da informoj por interesatoj. Dum longa tempo ni enketas pri la vortprovizo bezonata de junaj gelernantoj 11-14-j. kaj ni daŭrigas la laboron. Rilate tion, la fakto, ke kelkaj geinstruistoj en mezgradaj ŝtataj lernejoj preferas uzi siajn proprajn metodojn sen alies lernolibro sendube portos al ni treege gravan informon.

Mi ne nun priskribas niajn internaciajn kontaktojn, ĉar mi jam skribis sufiĉe. Vi sendube rimarkos, ke ni direktas niajn fortojn al la praktikaj celoj pli ol al propagando ekstera, ĉar la kerno de progreso estas en la geinstruistoj mem. Sen ili flenio! La plej bona propagando estas vigla lerneja klaso, kiu havas lingvoscion kaj povas uzi ĝin por vivi en internacia medio, kiel junaj mondĉivitanoj, eĉ se ili ne ĉiam konscias pri tio en la juna aĝo!

V. C. Nixon, 183, Woodlands Park Rd, Bourneville.

De la redaktoro: Mi dankas la gekolegojn, kiuj pruvis, ke Esperantujo ne tute estas „lando senĉa“ kaj sendis al mi sugestojn kaj kritikojn. Sed, karaj, mi bezonas pli da ili. Alie mi ne povos plenigi miajn paĝojn laŭ via gusto. Ĉu mi diros, kion mi plu bezonas??? Nu:

1. Raportojn el via lando pri ĉio, kio rilatas „Esperanto kaj la junularo“: kiamaniere oni propagandas en instru-medioj; kiujn rezultatojn oni atingis; kia estas la sinteno de la aŭtoritatoj. (Sed, bonvolu atenti: precipe freŝdaŭraj novaĵoj).

2. Tradukaĵojn aŭ originalaĵojn por la infanrubriko: la enhavo estu interesa por geknaboj; la lingvo kaj stilo estu simplaj; la rakontoj estu mallongaj.

Ankaŭ niaj gekolegoj povos pli ol ĝis nun instigi la gelernantojn al kunlaborado

Kiu el vi volas kaj povas verki (ne tro longan) interesan artikolon pri spertoj kaj rezultatoj de interlerneja korespondado???

Rezolucio

(akceptita de la 12-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista).

La Kongreso: 1. Sincere ĝojas pri la reunuiĝo de la neŭtrala internacia Esperanto-Movado; 2. Esprimas la deziron ke UEA akceptu Flandran Ligon Esperantistan kiel plenrajtan landan Esperanto-Asociacion; 3. Ree instigas ĉiujn internaciajn Esperanto-Organizaĵojn, neŭtralajn kaj ne-neŭtralajn, pristudi la starigon de tutmonda Esperanto-Instanco kiu reprezentu senescepte ĉiujn esperantistojn; 4. Decidas komuniki tiun ĉi rezolucion al la Esperantogazetaro por ke ĝi veku ĝeneralan aprobon kaj simpatian.

D-ro T. v. Gindertaelen, prez. Fl. L. E.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Belĵujo: Luc Van den Briele, Groenestr. 18, Boezinge (W. Fl.), 17-j., dez. kor., interŝ. il. PK, PM kaj gazetojn kun gejunuloj. Li ĉiam respondos.

Brazilo: Mi kolektas naciajn mangajreceptojn. Ĉu nederl. kuirist(in)o volas koresp. kun mi? Erika Linz, Caragüatutuba, Estado de São Paulo.

Danujo: Geory Lisbjerg, Udsigten 23, Kolding, dez. interŝ. naciajn espe. rantlingvaj gazetojn, revuojn, turistbroŝurojn, ktp.

Hispanujo: S-ro Juan Mancheno Jimanes, Viteri 22, Renteria, dez. seriozan interŝangadon de poŝtmarkoj kun nederl. filatelisto.

Nederlando: Ing. B. B. de Regt, Eendrachtsweg 26-27 Rotterdam, dez. por siaj 13-16-j. lernantoj samaĝajn korespondantojn en la tuta mondo.

17-j. lernanto de mezgrada lernejo dez. kor. kun samaĝuloj pri radio kaj aliaj temoj. Tammo Kanter, Lombokstr. 2, Leeuwarden.

M. Emmer, P. L. Takstr. 8, Zaandam, dez. kor. kun ĉiuj landoj pri akvaj fiŝoj kaj vegetaĵoj, kaj pri birdoj.

Jaap Oldenburger (10-j.) dez. kor. kun tutmondaj geknaboj. Interŝangas poŝtmarkojn. Lumeŝtr. 41^{na}, Amsterdam-W.

F. J. Krüger, R. Claeszenstr. 49, Amsterdam-W. dez. kor. kun geinstruistoj de unua- kaj mezgradaj lernejoj pri filol. problemoj.

Wim Selhorst (19-j.) dez. kor. kun knabino en Svedujo pri diversaj temoj. Resp. garantiata. Adr. Voorweg C 128, Schoorl.

Syf de Leeuw (26-j. fraŭlo), Kanaalkade E 49, Schoorl, dez. kor. kun ĉiuj landoj kaj pri ĉiuj temoj. Resp. garantiata.

Polujo: Noworol Franciszek, Rzeszów, ul. Syrokomi 4/3, dez. kor. pri Esp. movado, literaturo, tursismo, geografio, naturo, ŝakludo, k.a.t.

LEERT ESPERANTO. Arte desegnita reklamafiŝo (35 × 50 cm). Klara verda preso sur neŭtrala fono kun modestaj simboloj pri la moderna tekniko kaj komunikiloj kiuj interligas la homojn de la tuta mondo. — Prezo: 0,30 guld. — 10 ekz. por 2,50 guld.

INTERNACIA LERNOLIBRETO „LA JUNA VIVO” — 3-a eldono. Belspekta, ilustrita libreto, enhavanta 16 lecionojn, simplan legajon, kantojn, kaj ludojn. Tre moderna lernilo! Prezo 0,50 guld. (1 ŝ; 24 fr.fr., 10 b.fr.; 0,75 sv.fr).

Speciale por Esperanto-instruo en la popollernejo Sinjoro P. Korte verki...




LA VERDA STANDARDO

Per la g... la memorigilo, la metodo estas uzebla en ĉiuj landoj. Petu senpage detalan prospekton. Mendible ĉe J. MUUSSES, eldonisto, PURMEREND, Nederlando kaj ĉe ĉiuj libro-servoj.



LA JUNIA VIVO



ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. (5 ŝil, 114 fr. fr., 4 sv. fr.)

MI ESTIS EN LA EDENO (de Tibor Sekelj).

La argentina esperantisto kaj esploristo Tibor Sekelj, rakontas en „Argentina Esperantisto”, ke li vizitis „la Edenon”.

— „Post mallonga vizito al la teritorio de la Savantoj, la plej teruraj indianoj, loĝantoj de Mato Grosso en Brazilo, mia kamaradino Maria kaj mi vizitis la Edenon. Certe, la afero ne estis tiel simpla.

Dum dudek kvin tagoj ni remis tra la rivero Aragvajo, por alveni al la bananinsulo, 1200 kilometrojn pli norden; poste ni ekmarŝis tra la insulego mem, serĉante la indianojn nomitajn javae', pri kiuj ni sciis nur, ke malmultaj blankuloj ĝis nun vizitis ilin. Dek kvar tagojn ni rompis vojon tra la praarbaroj en senesperiga fortostreĉa marŝado. Ni jam estis elspezintaj ĉiujn rezerveojn de manĝaĵoj, vivante nur per ĉaso kaj fiŝkaptado. Ankaŭ la esperoj estis elĉerpiĝintaj, kiam

Iun posttagmezon, tute ne atendite, ni ekvidis aron da bronzkoloraj homoj moviĝantaj maltrankvile sur la plaĝo de la rivero, en la distanco de 200 metroj de ni. Ili estis nin rimarkintaj antaŭ momento, kaj alarmitaj, nun la viroj estis kunigintaj siajn armilojn — arkojn kaj sagojn — dum la virinoj kuradis por kunigi siajn infanojn kaj kaŝi ilin en la proksima arbaro. Evidente, ilia unua penso estis: milito.

Por konfesi la veron, mi diros ke nia situacio ne estis la plej agrabla. Neniu el ni kvar iris tien ĝuste por perdi sian vivon per stulta indiana sago. Alvenis al mi tiam brila ideo. Mi ekkriis laŭtege:

„Tori au-beaoa!” kio en lingvo ilia kaj de najbaraj indianoj signifas: „Ni estas viaj amikoj!”

La vortoj havis neatenditan efikon. Ĉiuj tribanoj restis senmovaj sur sia loko. Kaj kiam mi ripetis la krion, la viroj kuniĝis por kelk-minuta interparolado. Fine ĉiuj ĵetis siajn armilojn sur la sablon, per elmontra gesto, kaj unu el ili ekmarŝis renkonte al ni, tiel nuda kia li naskiĝis, kaj marŝante tiel libere kvazaŭ li estus vestita per frako kaj promenus tra luksa salonego.

Post momentoj ni sigelis la pacon per ĉirkaŭbrako kaj li — Utaria estis lia nomo — kondukis nin al sia vilaĝo. Post la elmontro de nia amikeco pere de donacetoj, viroj, virinoj kaj infanoj ariĝis ĉirkaŭ ni, kvazaŭ ni estus muzeaj aĵoj kaj regalis nin per viando de testudo kaj lacertoj, ovoj de testudo kaj arbara mielo.

Ni regalis ilin per viando de tapiro, kiun ni estis ĉasintaj la antaŭan tagon kiun ili avide formangiĝis pro la salo per kiu ni spicis ĝin. La medio fariĝis tre amika, malgraŭ la fakto ke tiuj primitivuloj estis vizititaj de blankuloj nur unufoje antaŭ ni, kaj ni devis por ili aspekti sufiĉe strange.

Nun ni povis plene uzi la lingvon kiun ni estis lernintaj kun la indianoj karajaj, kiujn ni estis vizitintaj antaŭe. La konversacio estis senĝena. Ili demandis pri niaj nomoj, kaj ni pri iliaj. Tiel mi malkovris, ke mi havis tie preskaŭ samnomulon: Tibo' estis la nomo de unu el la plej simpatiaj junuloj de la tribo.

Li demandis min, kiel nomiĝas mia vilaĝo. Malfacila demando. La urbon, en kiu mi naskiĝis, mi preskaŭ ne konis. En alia mi pasigis la infanaĝon; en tria mi finis miajn studojn; kvara fariĝis tre kara al mi. Fine mi decidiĝis: „Buenos Aires” mi diris, kaj la vorto flugis de buŝo al buŝo aliformita en diversaj sencoĵoj. „Kiom da kabanaj ĝi havas?” estis la sekvinta demando.

Denove mi troviĝis en embarasa situacio. Kiel mi klarigu al mia nova amiko, ke en „mia vilaĝo” ne ekzistas kabanaj, sed domegoj dek- kaj dudek-etaĝaj? Kiel mi klarigu al li la kvanton? Bone mi sciis, ke en ilia lingvo la plej alta nombro estas „dudek”, nombro al kiu ili alvenas montrante la fingrojn de la manoj kaj poste de la piedoj, disigante ilin kun egala facileco. Fine alvenis al mi sav-ideo. Mi montris la fingrojn de miaj manoj kaj de miaj pied-

oj, kaj poste tiujn de la manoj kaj de la piedoj de la indiĝeno.

„Tiom da kabanaj ĝi havas” mi diris.

„Aaahhh” aŭdiĝis ĉiuflanke. La ekkrio signifis miregon. Ili ne povis al mi kredi ke ekzistas tiel grandegaj vilaĝoj. Vere mi montris nur kvardekon, sed ĉio kio superas dudekon, estas por ili tiom multe, ke ĝi superas ilian imagkapablon, kaj certe ili rigardas min granda mensogulo.

lun vesperon mi rimarkis ke unu el la indianoj estas malkonstruanta sian kabanon faritan el palmfolioj. Mirigita pri la afero, mi demandis la homon, kial li faras tion. Li respondis tute trankvile:

„Mi rekonstruos la kabanon en alian direkton, ĉar matene la suno levigas de tiu ĉi flanko, kaj mi deziras, ke la unuaj sunradioj veku min morgaŭ enirante en mian kabanon.

Tiu ĉi respondo montris la feliĉan senzorgecon de tiuj primitivuloj.

La materialon por konstrui la kabanajn, donas al ili la multnombraj palmoj je kiuj estas plenaj la arbaroj; pri vestaĵo ili tute ne bezonas zorgi, ĉar la naturo vestis ilin per ilia edena nudeco, kiun ili lernis porti kun vera praarbara eleganteco. Ilia sola zorgo estas la nutraĵo, sed ankaŭ tiun ili akiras lude, ĉar en la riveroj svarmas bongustaj fiŝoj kaj testudoj kaj la arbaro preparas por ili multspecajn fruktojn.

Kiam la sunsubiro pentras la ĉielon je purpuro, per longaj ombroj kovras la arbaro la vilaĝon. Kvieto regas la medion. Nur dum la plenlunaj noktoj eĥas kanto tra la aero, memorante antikvajn kredojn de malproksimaj avoj, kies vivo en nenio diferencis de tiu de la nunaj javaeoj.

Je fajrolumo mi observas la reflektajn sur la glata kaj longa hararo de arbarloĝantoj, nun miaj fratoj, kaj melankolio ekpremas mian koron. Mi pensas pri la proksima epoko, kiam la civilizo atingos tiun ĉi trankvilan, forgesitan lokon, por doni al tiuj simpluloj kelkajn ĉifonojn kaj kelkajn manĝaĵojn, kies devenon ili ne komprenos, kaj por forpreni de ili la plej grandan trezoron, kiun ili havas: ilian feliĉon.

Ĉar fine, la feliĉo estas nenio alia ol la rilato inter la deziroj, kaj ilia realigo. Kaj ili deziras tiom malmulte!

El „Argentina Esperantisto”.

TEMPESTO SUR LA BALKANO

(Brigadista rondodanco en la vilaĝo Gorsko Kosovo).

Aŭtobuso veturigas min al la vilaĝo Gorsko Kosovo. Tie oni konstruas digon. Nun oni esploras la grundon, kaj faras helpkonstruaĵojn. Stala kablo, kiu helpas en la verŝado de betono jam estas muntita. Ankaŭ betonkirliloj kaj kranoj. Kanaloj kaj tuboj estas pretaj kaj atendas la alfluron de akvo por irigaci la proksimajn kaj malproksimajn kampojn. En la nove konstruita vilaĝo antaŭ la digo ekloĝas unu post la alia la familioj el la vilaĝo, kiu restos sur la fundo de la nova lago (220.000 kub. m da akvo).

Mi rigardas en unu el la profundaj truoj, elfositaj 15-20 m en la teron. La estonta lago devas havi firmajn fundamentojn, tial oni fosas, ĝis oni atingas argilan grundon.

La brigadistoj, kun muskolaj, atletaj ŝultroj, elĵetas la teron. Dum pluvo kaj vento, sub brilanta suno kaj dum nokta mallumo, la brigadistoj fosadas. En la Plevena regiono mi vidis, ke 16 ordinaraj brigadistoj kun larĝaj ŝoveliloj en du horoj plenigis 96 vagonetojn per ŝtonoj, kaj koto. Kaj ... kantante ili reiris al la tendaro, kie ili certe rondancos!

Antaŭ la brikaĵ konstruaĵoj de la brigadistoj serpentumas la rondodanco, la brigadista rondodanco. Kelkaj dekduoj da gejunuloj, antaŭ unu horo anstataŭitaj de la nokta grupo, firme tenas sin ĉe la zonoj kaj dancas senhalte.

Sed kiam la rivero Rosica malrapide sed certe subakvigas paŝtejojn kaj grenkampojn, kaj etendiĝas al la kortoj de la malnova vilaĝo, la brigadistoj sagaciĝas. Rapide ili faras provizoran bardigon. Ĝi ne longe helpas. La unuaj domoj apud la vilaĝo estas inunditaj. La akvo alportas tablojn kaj litojn, trajojn kaj ŝtonojn. La brigadistoj savas la homojn el la inunditaj domoj, la meblojn kaj garbojn. Ĉirkaŭ la muro de la digo estas febra laboro. La noktmezo jam pasis. La brigadistoj staras ĝis la ventro en la akvo, en la ŝlimo. Ĉion, kion oni povas kapti, oni transdonas de mano al mano, kaj metas ĝin sur altan sekan teron.

„Savu la pumpilojn!” sonas krio, kaj tuta grupo ĵetas sin al la fundamento de la digo. — Ŝtonoj kaj koto fortrenas unu brigadiston — Krio — Savanta mano etendiĝas — La piedoj retrovas firman teron — Manoj palpas — Ekkaptas la motoron kaj ne plu lasas ĝin. — Ankoraŭ paro da manoj, ankoraŭ — la pumpilo estas savita sur seka kaj sekura loko. La brigado venkis la naturan elementon. Multekosta materialo estas savita.

La estraro de la digo oficiale esprimas per radio-elsendo sian dankon, pro la brava sindona agado de la unua Rosica-konstrua taĉmento „Georgi Denkovski”, de la tria konstrua bataliono „V. Kolarov”.

La vestoj ankoraŭ ne estas sekaj, kiam la brigadistoj denove komencas forigi la alfluitan ŝlimon.

Hodiaŭ ĉio estas en ordo. La postsignoj de la inundo estas forigitaj. La laborado daŭras, daŭras kun pli granda obstino, kun pli forta ardo. Kaj vespere, en la krepusko, la rondodanco serpentumas pli gaje

Mi rigardis rondodancon de spertaj ludistoj, de artistoj. Sed tiu rondodanco de la brigadistoj, post kiam ili dum ok horoj fosadis dekojn kaj dekojn da kubaj metroj da tero, post kiam ili puŝadis plenplenajn vagonetojn, post kiam ili tutan tagon vadis en la ŝlimo — tio estas vera tempesto! Tempesto, kiu serpentumas super nia lando. Kiu komencas de la fervojlinio Pernik-Volujak, pasas tra la irejo de la respubliko, iras al la digo Rosica, kaj lokigaŝas en la urbo Dimitrovgrad. Ĉu vi povas imagi tian rondodancon? Nigraj gigantoj, sane fortaj, muskolaj brigadistoj saltas alten en la aeron, kaŭras apud la tero kiel kozakoj kaj denove ekflugas, forte piedpremas la malmolan teron, ektimigitan de tiu junulara tempesto: La nacia, konstruanta brigado „Georgi Dimitrov”.

Junulara Fako de B.E.A. Sofio, Bulgarujo.

Voĉoj de niaj legantoj.

..... En multaj aferoj estas bono kaj malbono neŭtraleco estas neebla. Oni subtenas la malbonon se oni ne kontraŭas ĝin. Do, kvankam organizaĵo ne devas esti ano aŭ subtenanto de ia politika partio aŭ movado, ĝi kontraŭu ĉian malliberigan sistemon de politiko kaj ĉian maljustecon en la vivo de la popolo.

Kiel esperantistoj ni nature interesiĝas pri la cirkonstancoj en ĉiuj landoj de la mondo, kaj devus batali kontraŭ la maljusteco kaj mallibereco ĉie. La fama angla verkisto John Ruskin skribis: „Tiu, kiu ne estas age malkruela, estas kruela.” Tio, miaopinie estas vera inter bono kaj malbono, justeco kaj maljusteco, ktp. Kio, do, estas la neŭtraleco?

La junularo de hodiaŭ estas progresema kaj tre moderna! Ĉu la junular-gazeto ne devus esti ankaŭ progresema kaj moderna? Antaŭ nelonge mi renkontis junan ne-esperantiston, kiu demandis, ĉu estas bona organizaĵo por la junularo en Esperantujo. Mi tuj pen-

sis pri TJO. Ĉu ankaŭ estas bona gazeto? Mi time montris al li LJV. Li ridis, kaj mi konsentis kun li, ke la gazeto ja estas ridindaĵo. Ĝi estas treege malmoderna kaj certe ne alloga. La junaj Esperantistoj bezonas tre modernan, bonaspektan gazeton kiu eĉ allogas ne-esperantistajn junulojn. Ĝi montru al ili ke la Esperantista junularo ja estas progresema

D. Faux, The Bungalow, Painswick, Anglujo.

..... En ĉijara propagando-parolado mi montris malnovajn numerojn de „LJV”, kaj nomis ĝin „la plej bonan infangazeton, kiun mi konas”

Erika Linz, Caraguatatuba, Est. São Paulo Brazilo.

Legantoj, jen diversaj opinioj. Volonte ni scius la opiniojn de vi ĉiuj! Ni ŝatas aŭdi vian kritikon (prefere konstruan). El tio ni multe lernas. LJV volas speguli la nuntempan junularon, sed por tio necesas, ke la junuloj montru sin! Skribu pri viaj pensoj kaj planoj, por ke aliaj lernu per ili! Se vi sentas mankojn en LJV klopodu plenigi ilin! Ne nur kritiku, sed ankaŭ konstruu! — Red.



SKOLTA RUBRIKO.

Skoltismo en Tuniso (de Pierre Carrier, skoltestro).

La skoltaro en Tuniso konsistas el Franca kaj Tunisia skoltaroj. La Tunisia dividiĝas en mahometana kaj izraelida skoltaroj kaj la Franca en neŭtralaj, katolikaj, protestantaj kaj izraelidaj geskoltoj.

La skoltoj en Tuniso ne faras la samajn laborojn kiel la skoltoj en Francujo, ĉar la klimato estas malsama. La vetero estas bela, kaj faciligas ekskursojn. Do estas malfacile teni la geknabojn en la klubejo. La jaŭdaj kunvenoj okazas grandparte sub la libera ĉielo kaj ĉiuj trupoj ekskursas ĉiun duan dimanĉon. En la regiono de Tuniso oni kampadas dum ĉia vetero.

La neŭtralaj francaj skoltoj povas disponi pri „Hamman Lof”, 16 kilometrojn de Tuniso, kun fonto, tri domoj kaj tujo-arbaroj.

La montosupro „Bon-Kornine” (La Dukorna Monto) estas nur 500 m alta. Ĉar ĝi staras ĉe la marbordo, oni tamen konsideras ĝin monto. La vidaĵo de ĝia supro estas belega, kaj ni ŝatas ekskursi al tiu monto.

Somere ĉiuj trupoj el Tuniso kuniĝas en Nordaj Montoj, ĉe „Ain-Draham” (La Arĝenta Fonto) aŭ ĉe „Ain Soltana” (La Reĝa Fonto). Ili estas altaj 800 metrojn kaj kuŝas 250 km de la urbo Tuniso. La kampado daŭras tri-kvar semajnojn, sub korko-kverkoj. Aŭ sub „Zéens-kverkoj”, pli altaj kaj dikaj ol la plej belaj kaŝtanoj en Francujo.

La pasintan jaron ni ree kampadis en Francujo. 80 el ni iris eĉ al Germanujo. Ĉi tiun jaron, pro la jamboreo, pli da tunisiaj skoltoj veturos¹⁾ al Francujo. La rover-skoltoj vizitos la Francajn Alpojn, la lupidoj kaj skoltingoj verŝajne restos ĉe la lago Bodensee.

La milito igis la tunisiajn skoltojn malpli grandnombraj. Multaj al ni montris konduton tute imitindan, plurfoje eĉ heroan.

¹⁾ Verkita antaŭ la jamboreo.

Laŭ „Esperantisto Slovaka”.



TJO-RUBRIKO.

(Sekretariejo: Joh. Idastr. 32, Rotterdam, Ned).

Kvara Int. Jun. Kunveno de TJO en 1948: Niaj francaj geamikoj ne jam povis decidi. Car. nia ĉeĥoslovaka ĉefperanto intertempe jam informis nin, ke la kunveno povos okazi en Karlovy Vary (Karlsbad), ni esperas ke ni baldaŭ povos diskonigi la decidon, por ke ĉiuj povu eklabori.

Kiel vi ĉiuj povis legi en la lasta „LJV” ni eklaboris pri nova plano, nome grupa vizitado de lernejoj, gvidataj de instruist(in)o aŭ kursgvidant(in)o al alia lando. Ĉiuj, kiuj interesiĝas pri tio kaj intencas viziti aŭ inviti, tuj kontaktu kun ni. Kompreneble nur temas pri gejunuloj kiuj efektive estas lernejoj kaj jam praktike povas uzi Esperanton.

En ĉiuj zonoj de Germanujo TJO nun havas anojn. Ili ĉiuj interrilatu kun R. Uhde, Kornstr. 156, Bremen. Kune ili aranĝu la laborojn.

Pro la altaj kostoj ni ne povas fariĝi tiom da kliŝoj, kiom ni neziras. Tial ni petas tiujn, kiuj povas havigi al ni kliŝojn, nepre fari tion. Eble s-ro Karlsson povas sendi tiun pri Ipswich, kiun li presigis en Svenska Esperanto-Tidningen.

La ĉefperantoj daŭre informu la sekretarion pri ĉiuj landaj novaĵoj, starigite de TJO-grupoj, -kursoj, ktp.

Ĉiu uzu nian poŝtmaterialon. Propagandu per ĝi por TJO!

La TJO-libroservo havigas ĉiujn esperantajn eldonaĵojn. Mendu ĉe nia propra libroservo, tiel vi subtenas nian organizon.

Varbu konstante por TJO!

M. v. d. Horst.

Svedoj bonvolu atenti, ke la ĝironumero de la ĉefperanto, s-ro Karlsson, Upplandsgatan 69^a, Stokholmo, estas 252674.

La julio-aŭgusto-numero de LJV elĉerpiĝis.

Francoj, atentu! Nova adreso de s-ino Turin: 43 rue Emil Magnin, Pontarlier, Doubs.

Radio-elsendoj: La 9-an de oktobro la TJO-grupo en Kimrujo partoprenis en la radio-programo de B.B.C. Unue f-ino R. Rees parolis, poste la grupo kantis, tiam oni parolis pri la kongreso en Ipswich, kaj fine oni kantis la „TJO-kanton”.

La 18-an de oktobro la B.B.C. elsendis paroladeton de Joy Bolton el Dorchester. — Kiuj sekvos?

Kiu ankoraŭ ne sendis siajn fotojn pri Ipswich al f-ino Rees kaj al s-ro Heath, eble nun povas malhavi la kliŝojn? Bonvolu sendi ilin al F-ino N. Rees, Derwydd, Seven Sisters, S. Wales, Britujo, por ke ŝi mem fariĝu la fotojn! Si pretas pagi la kostojn!

Lastmomente ni ricevis la sciigon, ke la franca sekcio en 1948a ne povos organizi la Internacian Junularkunvenon. Ni do nun atendu detalojn de la ĉeĥaj geamikoj!

EN LAS PALMAS.



Pablo do promenas tra la urbo, rigardas al la butikoj, al la katedralo kun la du turoj, al la belaj hoteloj, al la turistoj, al la floroj sur pontoj, muretoj kaj antaŭ fenestroj.

Li atingas la fiŝo-foirejoN. Sur ŝtonaj benkoj kuŝas la fiŝoj-sennombraj fiŝoj: la fiŝoj numero 365a. Tiel la homoj nomas iliN, ĉar oni povas aĉeti kaj manĝi ĉi tiujN fiŝojn dum 365 tagoj de la jaro.

Li ekvidas FernandoN. Tiu ĉi ankaŭ vidas liN kaj venas al Pablo.

„Haló!” li diras. „Ĉu vi kuniras?” „Bone,” diras Pablo.

Ili iras tra la urbo. Ili preterpasas teatroN. Afiŝoj en belaj kolo-roj logas la homojN. „Ĉi tie dancas hispanaj dancistinoj”, rakontas Fernando. „Mi vidis iliN hieraŭ.” Li aĉetas dolĉaĵojN kaj pagas per duro. Pablo ricevas kelkajN bombonojn.

„Je dimanĉo estos batalo kontraŭ bovoj,” daŭrigas Fernando. „Mi iros vidi tioN kun miaj gepatroj. Ĉu vi iam vidis tioN?”

„Ne!” diras Pablo. — Ili iras al la Bombé (Bombay)-magazeno.

„Eniro libera,” legas Fernando. „Ĉu vi povas legi tioN?”

„Ankoraŭ ne,” diras Pablo, „sed mi iras al la lernejo.”

„Pu!” diras Fernando. „Via lernejo estas lernejaĉo; tie vi lernas nenioN. Mi iras al bona lernejo. Sed mi ne restos tie, ĉar ni iros al Egiptio. Ni ekvojaĝos en aŭgusto. Tie loĝas miaj geavoj, la gepatroj de Patrino. Kaj mi havos guvernistoN tute por mi. Li vojaĝos kun ni.” — Li aĉetas glaciaĵojN por si kaj Pablo kaj pagas denove per granda monero.

La desegnaĵoj.

Mi ricevis multajn desegnaĵojn de diversaj lernejoj en Danujo, Anglujo, Hungarujo kaj Nederlando. Ankaŭ malgrandaj infanoj de la infanurbo Hajduhadhaza en Hungarujo sendis desegnaĵojn al mi. Inter ili estas de ses- kaj sep-jaraj infanoj. Tiuj desegnaĵoj estas tre belaj. Ĉiujn desegnaĵojn mi konservas kaj dum kongresoj, mi ekspozicias ilin. Sed nur originalajn! Antaŭ mi kuŝas pejzaĝo de P. B. Banks, 14-jara knabo en Anglujo. Ĝi prezentas arkiponton kun kelkaj arboj. Banks, ĉu via desegnaĵo estas originala, aŭ ĉu vi kopiis ĝin? Ĉu vi skribos tion al mi?

Kiu volas fari desegnaĵon pri „En Holando staras dom”? Tio estas beleta temo! Vi desegnu unue la domon, tiam la sinjoron, poste la sinjorinon, ktp!

Rogiero.

Kiu volas ion scii?

Iu demandis: „Kio estas la lakta vojo?”

Cu vi foje vidis la laktan vojon? Ĝi ne estas vojo el lakto! Ho ne! Tute ne! Cu vi supozas tion?

Sur la ĉielo oni rimarkas larĝan strion, kiu etendiĝas de horizonto ĝis horizonto. Ĝi ŝajnas nebulo, sed fakte ĝi konsistas el miliardoj da steloj. Pro la grandega distanco ni ne povas distingi la unuopajn stelojn, ĝi estas nur la lumajo, kiun ni vidas. Kaj ĉiuj tiuj steloj formas la lumantan strion, la „laktan vojon”.

Nun ni pritraktos novan temon. Ni ricevis diversajn temojn por ĉi tiu rubriko. Kaj ni elektis: „Kiun aĝon atingas la bestoj.”

Ekzemple, kelkaj mambestoj fariĝas tre aĝaj, aliaj, kontraŭe, vivas nur mallonge. Kiu sendos demandon pri tiu temo???

Rogiero.

Batavio, la 1-an de Oktobro '47.

Kara Sinjoro Instruisto

Per ĉi tiu letero mi sciigas al vi, ke mi bone alvenis. Mi havis plezurhan vojaĝon. Matene je la naŭa kaj duono ni forflugis de Shiphol per Yorkmaŝino, angla aeroplano. Je la tria kaj duono ni alvenis en Tuniso. Tie ni ricevis anglan manĝaĵon. Precize je la kvara kaj duono ni denove forflugis. Sed la aviadilo restis dum horo en la suno, kaj oni facile povus friti ovon sur ĝi. Ĉirkaŭ la unua kaj duono nokte ni alvenis en Kairo. Per tre stranga alta

aŭtobuso ni veturis de la flugtereno al la Palace-hotelo. La lasta estis antaŭe palaco. Le reĝino Astrid iam loĝis tie dum kelka tempo. La sekvan matenon je la 10-a ni foriris al Bagdad, kie ni alvenis je la 2-a. Tie ni povis denove manĝi.

Post tio ni flugis al Karaĉi, kie ni alvenis je la 8-a vespere. Ni restis tie dum 17 horoj. Mi havis grandan profiton, ĉar mi iom parolas la anglan lingvon. Vespere ni ekflugis al Kalkuta, kie ni frumatene alvenis. Ni restis tie dum unu horo por daŭrigi tiam nian flugadon, unue al Bankok kie denove ni haltis dum proksimume unu horo. Vespere ni alvenis en Singapur. En hotelo tie la plimulto de la homoj ankoraŭ tagmanĝis. Ni tamen estis tro lacaj kaj preferis ekdormi tuj. La sekvan matenon ni devis ellitiĝi jam ĉirkaŭ la tria por fari nian lastan tagvojaĝon al Batavio. Ni surteriĝis en Kemajoran, kie mia patro havas sian laboron. Sed kiun ajn ni vidis, ne la patron! Fine li alvenis. Tiam montriĝis, ke oni rakontis al li, ke ni alvenos plej frue je la deknua kaj duono. Kaj jam ni estis tie je la deka.

Kiam ni estis hejme ni unue manĝis bananojn. Tiam ni rigardis nian novan hejmon. Nur tiam ni ekripozis. Vi komprenas, kiom da novaĵoj mi devis rakonti al la patro. Sed ankaŭ li havis tre multe da sciindaĵoj por rakonti al ni.

Nu, kara sinjoro Instruisto, alian fojon mi rakontos iom pri la vivo en ĉi tiu terangulo. Koran saluton al ĉiuj amikoj esperantistaj de
fluginta Rinus (13-jara).

(La supran leteron ricevis s-ro Krüger en Amsterdamo, de lerninto lia, kiu flugis kun la patrino kaj du gefratoj al Indonezio. Sufiĉe rimarkinda fakto, ĉar temas pri simplaj laboristaj homoj. Antaŭ kelkaj jaroj ni ne pensus pri tio. La mondo teknike progresas, ĉu ankaŭ spirite???)

Lingvaj problemoj.

Du artistoj vojaĝis tra Hispanujo. Dum longa promenado ili perdis la vojon. Fine ili venis en malgrandan vilaĝon. La du sinjoroj estis tre lacaj. Ili iris en kafeon, kaj volis peti iom da lakto por trinki. Sed bedaŭrinde neniu el ili povis paroli la hispanan lingvon. Kion fari? Subite unu ekhavis bonan ideon. Li prenis paperon kaj krajonon kaj desegnis tre belan bovinon. La alia montris monon.

La mastro de la kafejo mire rigardis al la bovino kaj al la mono. Li profunde pensis. Tiam li subite ŝajnis kompreni la deziron. Li diris ion al la servisto, kaj la knabo tuj forkuris. La sinjoroj aten-

dis duonan horon. Fine la knabo revenis. Li spiregis pro la kuregado, sed kun ĝojo li montris du enirbiletojn por bovobatalo („taŭroludo”).

RONDLUDO.

5 . 5 | 1 1 | 2 2 | 1 . | . 5 . 5 | 1 1 | 2 2 |
En Ho - lan - do sta - ras dom'. En Ho - lan - do sta - ras

1 . | . 3 . 4 | 5 5 | 5 3 | 4 4 | 4 4 |
dom' En Ho - lan - do sta - ras dom, jes, jes Kaj

3 3 3 | 3 3 | 2 2 | 2 5 . 5 | 3 3 | 4 4 |
unu du ĉingla kvar kvin ses, En Ho - lan - do sta - ras

5 . | 6 . 6 | 5 3 | 3 2 | 1 . | . ||
dom', En Ho - lan - do sta - ras dom'.

En la domo loĝas sinjor'	Al la hundo venas kat',	k.t.p.
En la domo loĝas sinjor'	Al la kato venas mus',	k.t.p.
En la domo loĝas sinjor', jes, jes,	Nun la muson forpelas ni,	k.t.p.
Kaj unu du ĉingla kvar, kvin ses,	Nun la katon forpelas ni,	k.t.p.
En la domo loĝas sinjor',	Nun la hundon forpelas ni,	k.t.p.
En la domo loĝas sinjor'.	Nun la pupon forpelas ni,	k.t.p.
	Nun la infanon forpelas ni,	k.t.p.
Al la sinjoro venas edzin',	Nun la edzinon forpelas ni	k.t.p.
Al la edzino venas infan',	Nun la sinjoron forpelas ni	k.t.p.
Al la infano venas pup',	Nun la domon bruligas ni,	k.t.p.
Al la pupo venas hund',	Nun la domon konstruas ni	k.t.p.

La infanoj formas grandan rondon, kaj kantante rondiras. Ĉe la dua strofo la gvidanto metas unu infanon en la mezo de la rondo, la aliaj daŭrigas la kantadon kaj dancadon. Ĉe la tria strofo la infano en la mezo elektas edzinon. Ktp.

Ĉe la strofo „Nun la muson forpelas ni” la infanoj en la mezo repelas la muson al la granda rondo, ktp. Kiam neniu plu estas en la mezo, ĉiuj infanoj per brakmovo ŝajne bruligas la domon, kaj poste, ĉiam kantante, ree konstruas ĝin! — Tiam la ludo povas rekomenciĝi.

Rogiero.

Kanto de Sankta Nikolao.

(traduko de la konata nederl. infankanto „Zie ginds komt de stoomboot”)

Revenas vaporŝipo el Hispani',	La nigra servisto ridadas
Alportas Nikolaon la Sanktan	[al ni:
[al ni.	Bonuloj ricevos donacojn de li.
La blanka ĉevalo saltetas	Ho sankta Nikolao, pardonu
[kun ĝoj',	[vi min,
Flagetoj ornamas la ŝipon, ahøj!	Obeos mi ĉiam al mia patrin'.
	Onklo Pit.

Enigmo.

- .. X .. blanka trinkaĵo, kiun donas la bovinoj.
- .. X .. pinta armilo.
- .. X .. la sento, kiun ni havas, kiam ni faris malbonon.
- .. X .. knaba nomo.
- .. X .. malgranda, saltanta insekto. Oni ofte trovas ĝin en bakejoj.

Ciuj vortoj konsistas el 5 literoj. La mezaj literoj formas verbon. Se vi ofte faras tion, vi fariĝos bona kaj gaja Esperantisto!

Sendu la solvojn al TJO-Centro antaŭ la 1a de januaro. Inter la solvintoj ni lotumos du premiojn!

Ludo (Kio mi estas?)

Ciu ludanto havas sur la dorso karton, sur kiu staras kion li prezentas, ekz. konatan personon, sovaĝan beston, objekton, aŭ ion similan. La portanto kompreneble ne scias, kio staras sur lia karto. La ludantoj miksas sin kaj demandas unu al la alia ekz.: „Ĉu mi estas besto? Ĉu mi estas objekto? Ĉu ĝi estas metala? Oni rajtas respondi nur per „jes” aŭ „ne”.

La unua kiu divenis sian „titolon” gajnas la plej multajn poentojn. Li prenas la karton de sia dorso, sed restas inter la aliaj por respondi al la demandoj.

La novaj amsterdamaĵ infankluboĵ.

En Amsterdamo ni komencis grandan agadon por instrui Esperanton al la infanaro. Jam de sia sesa vivojaro geknaboj venas al niaj kluboj. Dank' al nia nova metodo eĉ la plej junaj partoprenantoj facile lernas Esperanton. Ĉiumonate ni represos unu aŭ kelkajn infanludojn (ekz. „En Holando staras dom”), kiujn ni instruas al diversaĝaj infanoj. Se oni instruos tiujn lud-

kantojn ne nur en Amsterdamo, sed ĉie, tiam la infanoj de diversaj landoj povos ludi unuj kun la aliaj. Informojn pri tio volonte donos Rogiero, Alb. Cuyprstr. 123, Amsterdam-Z., Nederlando.



IJK-Komunikoj. Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Nederlando. — Centra Informejo de IJK: Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo.

Esperanto por gimnazianoj

(de d-ro W. J. A. Manders)

La pasintan jaron mi gvidis Esperanto-kurson por gimnazianoj de la 3-a, 4-a kaj 5-a klasoj. Ĉar la gimnazia programo ne lasas multan liberan tempon al la lernantoj, mi antaŭe sciigis, ke la kursanoj ne faros skribajn taskojn kaj ne bezonos multe studi por lerni la lingvon. Mi volis fari eksperimenton pri rekta metodo, kaj de la komenco mi instruis nur per helpo de legolibro kaj simpla vortaro. En la unuaj lecionoj mi legis nur kelkajn liniojn, ĉar mi klarigis ĉiun gramatikan formon kaj ĉiun renkontitan afikson, sed jam post kelkaj horoj precipe la lernantoj de la 4-a kaj 5-a klasoj tradukis sufiĉe rapide kaj kun granda intereso. Kvankam mi neniam postulis ke ili preparu la lecionojn, multaj kursanoj tiom entuziasmiĝis, ke ankaŭ hejme ili daŭrigis la legadon. Baldaŭ mi povis elekti ses lernantojn, kies progresoj estis plej grandaj. En antaŭaj kunvenoj mi preparolis kun ili la tradukotajn tekstojn, klarigis la malfacilaĵojn kaj konversaciis. Poste ĉiu el ili funkciis kiel gvidanto kaj instruanto de malgranda grupo da kursanoj. La grup-sistemo ebligis, ke ĉiuj kursanoj aktive partoprenis al la lecionoj kaj la konversacio, kiu iom post iom anstataŭis la legadon. Por la triaklasuloj tiu metodo montriĝis ne taŭga, sed cetero ĝi bonege efikis. Post kvin monatoj fondiĝis klubo. La membroj laŭtlegis la tradukojn kaj paroladojn, organizis letervesperon kaj komencis korespondi. Ni abonis gazetojn kaj aĉetis librojn por la biblioteko. Du membroj jam spertis la praktikan valoron de Esperanto: unu partoprenis la kongreson en Ipswich, la alia ĉeestis la ĵamboreon. Ambaŭ revenis plenaj de entuziasmo.

Nun mi gvidas du kursojn: unu por progresintoj kaj unu por komencantoj. Ĉar la novuloj estas ĉefe triaklasanoj, ĉifoje mi instruas laŭ gramatika metodo, sed ankaŭ nun mi intencas kiel eble plej baldaŭ formi konversaciajn rondojn.

Pri la utilo de Esperanto-instruado por gimnazioj povas esti nenia dubo. Jen kelkaj avantaĝoj:

1-e: La pli aĝaj gimnazianoj kapablas lerni la lingvon en mallonga tempo. Kun relative malmulta peno ili akiras sufiĉan scion por povi legi, korespondi kaj konversacii. Tio estas grava en si mem, sed havas ĝuste por ili la kroman valoron, ke ili kutimiĝas esprimi sin en fremda lingvo kaj do malpli hezitas eventuale uzi ankaŭ alian fremdan lingvon.

2-e: La interesiĝo pri ĉiaj lingvaj problemoj grandiĝas. Guste gimnazianoj volonte demandas pri la kialo de la Zamenhofaj reguloj. Ili scivolas pri la deveno de Esperanto-vortoj, pri ilia ortografio, pri la signifo de la afiksoj, ktp., kaj ili havas sufiĉan lingvan scion por solvi mem la plimulton de tiaj problemoj. Tio instigas al plua pensado pri etimologiaj kaj aliaj problemoj en la gepatra, klasikaj kaj „modernaj” lingvoj.

3-e: Esperanto estas racia lingvo, kiu postulas ĉiaman rezonadon pri la elektotaj vortoj kaj formoj. Nek la klasikaj, nek la „modernaj” lingvoj tiom devigas la gimnazianojn al akurata analizado de la frazo kaj vortsignifo. Estas vere, ke la lingvoj latina kaj greka estas senkompare pli malfacilaj kaj ke por lerni ilin oni bezonas pli da intelekto kaj pli grandan memorkapablon, sed finfine oni nur lernas kiel la grekoj kaj romanoj esprimas la ideojn, kaj sufiĉas alproprigi al si tiujn tipajn esprimmanierojn. La esperantisto devas adapti la esprimon de siaj ideoj ne al la lingvaj kutimoj de unu speciala popolo, sed al la komprenpovo de la tuta homaro. Lernante Esperanton la gimnaziano akiras tute novan, pli abstraktan ideon pri la funkcio de la homa lingvo, li liberigas sin de la formoj kaj komprenas, ke fremda lingvo ne estas nura komplekso de strangaj idiomaĵoj. Li malkovras, ke li eraris juĝante stranga kaj neregula ĉion, kio ne kongruas kun la gepatra lingvo.

GENERALAJ SCIIGOJ.

El Gdansk (Polujo): Dum la Internacia Foiro okazis Internacia Esperanto-tago, kiun ĉeestis preskaŭ 100 samideanoj el ĉiuj partoj de Polujo. — En la Foiro estis belega Esperanto-Stando, konstruita de du lernantinoj de la Liceo de Belaj Artoj. — En la poŝtoficejo oni uzis Esperanto-stampilon.

En Gdynia, en la Liceo de Belaj Artoj, Esperanto estas deviga en du klasoj (kune 70 lernantoj). Ankaŭ en la Komerca Stata Gimnazio kaj en la Liceo okazas Esperanto-kursoj.

La 33-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Malmö, Svedujo, 31/7-7/8 '48. Oni jam nun povas anonci sin al la ĝenerala sekretario (33-a Un. Kongr. de E-to, Malmö). Kongreskotizo (ĝis 31/12 '47): 20 sv.kr. (geedzoj 30 kr); ĝis 31/3 '48: 25 (geedzoj 40); poste 30 kr (geedzoj 50). Loĝejo: Ĉambroj en hotelo: 7-11 kr; Ĉambroj ĉe privatuloj: 4 kr; amas-restejo en lernejo: 2 kr (por unu nokto). Nutradon ĉiu kongresano mem prizorgu. Okazos multaj belaj ekskursoj.

Esperanto-Filmgrupo fondiĝis en Bergen op Zoom (Ned.). La celo estas eldoni filmrubandojn (normalformato, 18 × 24 mM) kun klarigaj tekstlibretoj en Esperanto. La filmrubandoj estos uzeblaj en ĉiu taŭgaj lumbildaparatoj, kaj tre taŭgos en grupaj kursvesperoj. Ĝis nun jam aperis: Tra antikva Grekujo (58 bildoj): guld. 6,85; Inter la Araboj en Arabio (39 bildoj): g. 5,25; Lando kaj Popolo de Siamo (54 bildoj): g. 6,25. — Filmstrioj sen tekstlibroj ne estas liverataj. Oni petu detalojn de E. F. G., Antwerpsestr. 45, Bergen op Zoom, Ned. Eventualaj sugestoj estos bonvenaj.

RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ

„Novaj Esperanto-Historietoj”, de diversaj aŭtoroj. Eld. Dansk-Esperanto-Forlag. La 70-paĝa, broŝurita libreto enhavas 70 (grandparte amuzajn) rakontetojn. Lingvo kaj stilo estas bonaj kaj simplaj. La verko estas mendebla ĉe TJO-Centro, prezo 1,75 guld.

„Arboj de arbaro kaj kampo” de Frank Booth. Ilustraĵoj de E. R. Turlington. La nomo de la tradukinto mankas. Eld. Esperanto-Publishing Co. Ltd. — 40-paĝa, broŝurita libreto, kiu enhavas tre klaran priskribon de ses arbo-specoj: frakseno, plantanacero, fago, karpino, ulmo, kverko. Tre rekomendinda verketo. Mendebla ĉe TJO-Centro. Prezo: guld. 1,05.

„Historio de Usono” de Aug. da Silva, trad. el la portugala lingvo de Manuel Freitas. Eld. Portugala Eldona Rondo (en la serio „Enkonduko en la Kulturo”). 28-paĝa broŝurita verketo, skizanta la historion de Usono de la 16-a jarcento ĝis la nuna tempo. Prezo 35 c.

„Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj 1947” kompilita de Hugo Steiner, dir. de la Esperanto-Muzeo en Vieno. La libro enhavas proksimume 8000 adresojn (bedaŭrinde ne ĉiuj plu ĝustas). La verko estas mendebla ĉe la kompilinto, Wien I, Hofburg, Aŭstrio, prezo 2,60 guld.

Dua Esperanto-informilo pri Sokol-festoj en Praha, 1948 aperis. Petu senpagan ekzempleron de Sokolsky Elet, Praha III, Tyršuv dům, Ĉeĥoslovakujo. Samtempe oni petu pli detalan ilustritan broŝuron pri SOKOL.



Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Britujo: F-ino Robotham, 14 Wencley Rd, Stockton-on-Tees, dez. korespondantojn en la tuta mondo por siaj 16-jaraj lernantinoj.

S-ro Harry Simpson, 60 Shackleton Rd, Ipswich, dez. ricevi korespondaĵojn de ĉiulandaj gejunuloj por komencantoj, 14-20-jaraj.

Ĉeĥoslovakujo: S-ro Veroslav Bartl, Karlovy Vary, Tr. Krále Jiriho 35. deziras korespondi.

S-ano Jaroslav Černý, Karlovy, Moskevská 54, dez. interŝangi poŝtmarkojn kaj ilustritajn poŝtkartojn.

Danujo: Jens Christiansen, Bredgade 22, Silkeborg (20-jara skolto) volas korespondi pri skoltaj aferoj, muziko, ktp.

Francujo: Liceanoj dez. interŝ. bildkartojn, poŝtm. kun junaj geesperantistoj. Adr: s-ro Thiollet, 103 Rue St. Jacques, Angers (M. et L.).

Germanujo: Gunther Rieckhoff* (18-jara) (24a) Geesthacht, Dunebergerstr. 11, dez. kor. pri ĉiuj temoj.

S-ro Günther Jacob, Ansbach/Mittelfr., Friedrichstr. 15, dez. kor. k. l.t.m. pri spertoj ĉe la propagando de Esp. interŝ. il. pk., glumarkojn.

Hungarujo: Hungaraj gestudentoj dez. kor. kun studentoj en la tuta mondo. Sendu il. poŝtk. aŭ let. kun detaloj (nomo, adreso, aĝo, sekso, fakultato, lernejo, ktp.) ● S-ro Kovács Gusztáv, Budapest, VIII, Ullői-ut 20. Oni povas kor. en esperanta, angla, franca germana aŭ alia lingvo.

Nederlando: (korekto) M. Emmer, P. L. Takstr. 8, Zaandam, dez. kor. kun ĉiuj landoj pri akvaraj fiŝoj kaj vegetaĵoj kaj pri birdoj.

S-ro A. W. Withoos, Venkelstr. 15, Eindhoven, interŝ. E-to-gazetojn. Li petas recipe: Esperanto, Esp. Internacia, Heroldo, Esp. Katolika.

J. de Vries (16-j.) ĉe s-ro J. Schirm, Nieuwburen 38, Lemmer, Fr., dez. interŝ. poŝtmarkojn kun eksterlandaj filatelistoj. Ĉiam respondos.

14-jara gimnaziano dez. kor. kun gejunuloj el ĉiuj landoj. Skribu al Helmi Veldhuyzen, Hof v. Delftlaan 19, Delft.

ESPERANTO-DONACOJ

okaze de Kristnasko kaj Sankta Nikolao!

M.E.B.-libretoj. Plena serio (10 ekz. enhavanta i.a. la Kongresajn paroladojn de D-ro Zamenhof) 2,65 guld.

Unuopaj ekzempleroj 0,35 guld.

Binditaj jarkolektoj La Juna Vivo, belaspektaj proks. 200-p. libroj 1.— guld.

Kantaroj LJV (kun muziko) 0,50 guld.

Skriba Kurso LJV (inkluzive senpagan korekton) 4,00 guld.

Schidlof-vortaro 2,25 guld.

Blok-vortaretoj 0,20 guld.

TJO-Poŝtpapero 50 folioj kaj 50 kovertoj 2,00 guld.

TJO-poŝtkartoj 50 ekz. 0,65 guld.

TJO-Centro liveras ĉiujn romanojn, stud. kaj legolibrojn. Subtenu la Internacian Junular-laboron! **Mendu ĉe TJO-Centro!!**

SUB LA VERDA STANDARDO

Nova Esperanto-lernilo, laŭ la rekta metodo verkita de s-ro Korte (lernejestro), eld. de J. Muusses, Purmerend. La plena metodo konsistas el: Gvidilo (nur por la instruisto): 2,50 guld., Laborilo: 0,90 guld. kaj Memorigilo: 0,50 guld. Mendu ĉe TJO-Centro. Petu detalan prospekton!


INTERNACIA KULTURO

La progresema, demokrata revuo eldonata de la Balkanlandoj. Grandformata, ilustrita, enhavanta bonstilajn interesajn artikolojn. Abonkoto por la 3-a jaro (1948) 5,50 guld. Abonu ĉe TJO-Centro!

17-1, dez.
magasin, d'Alman



LA JUNIA VIVO



ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. (5 ŝil, 114 fr. fr., 4 sv. fr.)

KIAN UTILON HAVAS LA KONO DE LA NATURO?

La montoj, la valoj, la kampoj, herbejoj, erikejoj, la arbaroj, suno, luno, steloj, aero, plantoj, bestoj, homoj, riveroj, lagoj, maroj, koncize ĉio, kion ni vidas, gustumas, flaras, palpas aŭ aŭdas, kion ni ĉiutage vidas kaj spertas, tio ĉio apartenas al la granda naturo. La naturo havas siajn fortojn, fenomenojn, trezorojn. La energio de la riverakvo kaj de la akvofaloj funkciigas muelilojn kaj maŝinojn. Per la varmo de la fajro ni kuiras niajn manĝaĵojn, per la varmo de la suno ni kulturis niajn plantojn, per la helpo de elektro ni povas telefoni, telegrafi, lumigi niajn domojn. Ĉi tiujn fortojn ni povas uzi por niaj propraj celoj, ĉar ni konas ilin. Sed se ni pli malkovros la grandan naturon, ni povos eĉ pli profiti ĝin.

La naturo ne nur je tio taŭgas, ke ni havu ion por manĝi, trinki, ĝi donas al ni ne nur vestojn kaj loĝejojn, sed krome ĝi multe utilas al ni.

Ekzemple: multaj homoj tre ŝatas sin amuzi kaj ĝui la vivon. Ili elspezas multe da mono por tio. Ili iras al amuzejoj, gastejoj kaj ĉien, kie ili imagas trovi amuzajn aferojn. Kiu disponas pri sufiĉe da mono, tiu vere povas viziti ĉiujn amuzajn lokojn kaj multaj malriĉuloj envie rigardas la ĝuadon de la riĉuloj. Sed — ĉu oni estas riĉa aŭ malriĉa, oni ĉiam povas havi plezuron kaj ĝuon el la granda naturo. Tiu valoras pli ol ĉiuj balsalonoj aŭ amuzejoj

de la mondo. La gaja printempo kun siaj plaŭdantaj riveretoj kaj birdokantoj, kun la florantaj kampoj kaj verdaj arbaroj; la varma somero, kun sia bunta kolorpomo, kun la zumado de mil kaj mil skarabetoj kaj la kanto de la najtingalo; la riĉa aŭtuno kiu donas tiom da fruktoj, kiu ŝanĝas la kolorojn de la folioj kaj herboj; la blanka vintro, ĉiuj donas al ni amason da ĝojo kaj plezuro, kaj eĉ se ni posedas ne unu moneron, ni povas senti nin riĉaj kaj feliĉaj ĝuante la donacojn kaj belecon de la granda naturo. Ju pli ni ĝin ekkonos des pli ni ĝin ŝatos, kaj des pli nin naŭzos la restado en gastejoj aŭ en la polvoplenaj stratoj.

Dio kreis la naturon granda, ĉiuj havas lokon en ĝi. Ĝi estas ankaŭ riĉa, por ke ĝi povu nutri nin ĉiujn, kaj ĝi estas bela, por ke ni trovu en ĝi kaj per ĝi ĝuon kaj plezuron. La nura kondiĉo por akiri tiun feliĉon estas, ke ni kiom eble plej bone ekkonu la grandan naturon. La naturo estas mem la perdita paradizo, kiun ni povas reakiri, ĝin konante.

Libere tradukita el la hungara lingvo.



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

La pasintan dimanĉon ni havis komitatan kunvenon de la loka esperantista klubo, kaj la tuta klubo promesis al mi helpon en ĉiuj aferoj. Mi havos helpon ankaŭ en la Loka Nacia Komitato, kaj do povas akcepti la aranĝadon de la IJK. Ĝi do okazos en Karlovy Vary (vi verŝajne nur konis la germanan nomon Karlsbad). Nia urbo estas mondkonata banurbo kaj mi skribos pri ĝi por „LJV”, same kiel oni faris pri Ipswich.

Nun pri la tempo: Laŭ niaj klubanoj la plej oportuna tempo ekzemple estos de la 20-a ĝis la 27-a de julio. Ĉar kelkaj samideanoj, kiuj certe multe helpos al mi, veturos al la kongreso en Malmö, de la 31-a de julio — la 7-a de aŭgusto. Due, la pli „riĉaj” samideanoj el Sudeŭropo, kiuj iros al la UK en Malmö, povos veni kelkajn tagojn pli frue al Ĉeĥoslovakujo, por viziti la IJK.


Mi estas certa, ke preskaŭ ĉiuj gesamideanoj en ĈSR invitos kamaradon aŭ kamaradinon el eksterlando al si, por montri la belajojn de nia respubliko, por ke ili povu vidi pli multe senpage. Mi mem faros tion, kaj veturos kun ŝi aŭ li al Sudbohemo, aŭ al Moravio.

Fr. Masek, (ĉeĥosl. ĉefperanto).

S-ino v. Veenendaal petas nin sciigi, responde al multaj informigoj, ke ŝi pro familiaj cirkonstancoj momente ne povas labori. Tio estas ankaŭ la kaŭzo, ke ĝis nun „La Vivo” ne aperis!

La junularo de Svit salutas vin!

Certe vi unuamomente estas iom embarasitaj legante la titolon. Vi tute pravas. La novan subatran industriaran metropolon vi ankoraŭ ne trovas sur la landkarto. Tie, kie antaŭ 10-12 jaroj estis nuraj ŝtonaj montarherbejoj kun ŝafoj kaj bovoj hodiaŭ ĉieleniĝas grandegaj, pluretaĝaj fabrikaj konstruaĵoj. Sur la tereno ĉirkaŭ la fabriko ariĝas modernaj hotelo kaj domoj por gefraŭloj kaj familioj.



Hodiaŭ mi volas priskribi al vi la vivon de la junaj gelaboristoj en la fabriko, ĉar tio certe interesos vin. La fabriko havas sian propran lernejon por sia laborista junularo 14-18-jara, kun trika, mehanika, hemia kaj komerca klasoj. La junuloj laboras 35 horojn en la fabriko kaj tiel perlaboras sian vivtenadon. 24 horojn semajne ili vizitas la lernejon. Ili perlaboras de 400 ĝis 700 ĉehoslovakajn kronojn semajne (40-70 ŝ, 21-35 guld). El tio ili pagas por loĝado 20, por manĝaĵoj 100, kaj por la instruado 15 kr. La restantan monon ili devas ŝpari. Ili loĝas en belaj, kaj moderne ekipitaj domoj. Je ilia dispono estas legejo, ludejo kaj konversaciejo. Vespere, je duono post la naŭa ili devas enlitiĝi. Nuntempe estas en la lernejo ĉirkaŭ 700 gejunuloj. Ili devas purigi kaj ordigi la ĉambrojn. Dum la tuta jaro ĉiaj sportoj estas praktikataj.

Do vi vidas, ke la junuloj estas bone edukataj de la nacia entrepreno Bata Svit, kie ili produktas artefaritan silkon, tolaĵojn, ŝtrumpojn kaj ŝtrumpetojn. Var Svit planas novan stacidomon, kovritan naĝejon kaj grandan sportejon. Kaj plue funkcias instituto de studoj ekde septembro, kun fakaj kaj lingvaj kursoj.

En Svit ankaŭ estiĝas esperantista vivo inter la laboristoj kaj gejunoj, kaj ni esperas, ke komenciĝos vigla korespondado inter vi, legantoj de LJV, kaj la junularo de Svit. Tion ni deziras des pli, ĉar Svit estas la centra elirpunkto al la altaj Tatroj. Povas esti, ke kelkaj el vi estonte venos al ni en Slovakio, al Svit, kaj poste vi estos nia bonvena kamarado. Do, ĝis almenaŭ skriba revido!

Dr. Ed. Sahliger, Svit, Slovakio, Ĉeĥoslovakio.

Por la infanoj.

EN LA GRANDA MAGAZENO.



Ili eniras la grandaN magazenoN. *Neniam* Pablo vidis *tiom da* varoj; *neniam* li aŭdis paroli *tiom da* homoj. Li ne komprenas la sonojn, ĉar estas multaj fremduloj en la magazeno. Li vidas arabojN, hindojN, hinojn, amerikanojn, anglojn, francojn, belgojn kaj nederlandanojn. Kelkaj sinjorinoj aĉetas puntaĵojN de Tenerifo kaj hispanajn ŝalojn. Sinjoroj aĉetas tabakoN, havanajn cigarojN, cigaredojN kaj eburajn cigaredingoN.

Aliuloj aĉetas hinaN silkoN, japanajn kimonojn kaj pantoflojn; aŭ ebonajn elefantetojn, lignajn skulptaĵojN, persajn tapiŝetojn, kuprajn kandelingoN, kaj porcelanajn vazojN, ĉiajn ornamaĵojN, orientajn parfumojN, hindajn murtukojN, turkajn dolĉaĵojN, k.t.p.

Neniam Pablo vidis *tiom da* riĉuloj; la monbiletoj flugas el la paperujoj kaj mansakoj. -- Fraŭlino kondukas blindaN sinjoroN.

La fraŭlino faras aĉetojn; trankvile la blindulo atendas. — Kelkaj nigruloj portas keston al la unua etaĝo.

Fernando deziras foriri, do ili eliras el la magazeno.

PRI MALNOVA POPOLO.



Pablo kaj lia kunulo iras denove en la stratoj. Alvenas du pastroj kaj monaĥo.

Jen iras Pastro Miĥaelo", diras Fernando. „Li estas la *estro* de nia paroĥo. La alia pastro estas Pastro Severino; li estas la *estro* de la ĥoro de nia preĝejo. Kaj Frato Cipiano estas la ĉefo de monaĥejo.

La paroĥestro, la ĥorestro kaj la monaĥjestro malaperas en la katedralo.

Ili preterpasas la KanariaN MuzeoN. „Ĉu vi iam vizitis ĝin?“ demandas Fernando. Pablo neas.

„Pu!“ diras Fernando. „Vi scias nenioN. En la muzeo estas multaj objektoj el malnovaj tempoj: bataliloj, vestaĵoj, ornamaĵoj kaj manĝil-

laro de la „*Guanches*“. Ĉu vi scias, kiuj estis la „*Guanches*“? Ne? Antaŭ multaj jarcentoj ili vivis sur nia insularo. „*Guan*“ estas „homo“; „*Chenerfe*“ estas „Tenerifo“; „*Guanches*“ estas do „Tenerifo-homoj“. Ili estis la unuaj homoj ĉi tie kaj vivis en kavernoj. Ili posedis kaprinojn kaj portis la felojn de tiuj bestoj. La hispanoj batalis kontraŭ la *Guanches* kaj fine venkis iliN en la jaro 1946a. TioN mi lernis en mia lernejo“, li aldonis fiero.

Ludo (Simileco kaj malsimileco).

Oni sidas en rondo. Ĉiu flustras al sia dekstra najbaro la nomon de iu objekto aŭ afero en la orelon; en la orelon de sia maldekstra najbaro li flustras la nomon de alia objekto aŭ afero.

Tiel ĉiu do scias du nomojn. Laŭvice nun ĉiu devas diri, kiun similecon kaj malsimilecon havas la du objektoj. Ekzemple: suno kaj pelto. Simileco: ambaŭ varmigas. Malsimileco: la suno varmigas somere, la pelto vintre.

Allan Mehtonen, Oulu, Finnlando.

RABISTO ESTAS EN ARBAR' (Ludkanto por etuloj).

5 | 5. 6 5 4 3 2 | 1 1 1 ||
Ra - bis - to es - tas en arbar', ar - bar'

La rabisto sin kaŝas kaj la aliaj infanoj kantas, irante tien kaj reen. Subite la rabisto aperas, kaptas unu kaj kondukas ĝin al sia kaŝejo. La ceteraj infanoj daŭrigas la kantadon „Rabisto estas en arbar', arbar'”, ĝis la rabisto revenas, ktp.

Oni povas variigi ĉi tiun ludkanton diversmaniere, ekz.:

Rabisto dormas en arbar', arbar' — Rabisto loĝas en arbar', arbar' — Rabisto marŝas en arbar', arbar' — Rabisto kuras en arbar', arbar' — Sorĉisto estas en arbar', arbar' — Du ursoj estas en arbar', arbar' — Sakalo estas en arbar', arbar' — Du lupoj kuras en arbar', arbar' — Simio grimpas en arbar', arbar' — Serpento rampas tra l' arbar, arbar' — Pantero saltas el arbar', arbar' — Leono vagas tra l' dezert', dezert' — Du agloj flugas el montar', montar' — Tri falkoj flugas de la tur', tur', tur' — Vesperto flugas de l' tegment', tegment' — Baleno naĝas en la mar', mar', mar' — Fantomo vagas tra la dom', dom', dom' — ktp. Rogiero.

Enigmoj (la solvojn vi trovos alilokè).

- (1) Infano de l' patro — Infano de l' patrino — Kaj tamen nenies filo.
- (2) Filo de miaj gepatroj tamen ne estas mia frato.
- (3) Kvankam mi estas ilo, multaj homoj manĝas min.

Du samtemaj rimaĵoj.

Ho, donu al mi malgrandan indikon,
Kiu do estas la plej forta hom', hom', hom'?
Ho facile, mi vidis etan helikon:
Ĝi marŝis kun dom', dom', dom'!

Estas ja forta ermito,
Ĝi marŝas kun domo kaj lito.
„Kra, kra,” krias la nigra korniko,
„Ĝi estas la eta heliko!”

Rogiero.

Kiu faros desegnaĵon ĉe tiuj ĉi rimaĵoj? Pro la plej bela desegnaĵo ni donos premion. Faru vian eblon!!!! Nur infanoj malpli aĝaj ol 15-jaraj rajtas partopreni. Sendu ĉion al T.J.O.-Centro.

Ekzercu vian langon! Ĉu vi tre rapide povas paroli? Do diru kvinfoje (sed rapidege): 1. „La poŝtisto purigas la poŝtpakaĵ-tenilon”; 2. „La bierfabrikisto fabrikas tri barelojn da bruna biero”; 3. „Brosoj kuŝas apud broĉoj, apud broĉoj kuŝas brosoj”.

Kiu volas ion scii?

Nu, kiun aĝon atingas la bestoj? Mi parolas nun pri la mambestoj kaj vi sendu demandojn pri la aliaj bestoj.

Generale la grandaj mambestoj atingas grandan aĝon, kaj la malgrandaj mortas post nur mallonga vivo. Ĉevalo kaj azeno iĝas ne pli aĝaj ol 45 jarojn. Kvardekjara ĉevalo aŭ azeno estas maljuna, kaj ĝi ne plu povas labori. Kvinjara ĉevalo aŭ azeno estas plenkreska. La pli malgranda ŝafo atingas aĝon de ne pli ol 15 jaroj; la granda elefanto, kontraŭe, povas atingi aĝon de 150 jaroj. Tridekjara elefanto estas junulo, kaj elefanto, kiu havas dudek jarojn, estas ankoraŭ nur infano. Kamelo, la ŝipo de la dezerto, iĝas preskaŭ 50-jara, kaj ordinara bovo en Eŭropo 25-jara. Leono kaj tigro iĝas proksimume 20-jaraj; hundo 14- kaj kato 12-jara. La urso, kvankam ĝi ne estas tre granda, iĝas pli aĝa, nome preskaŭ 50-jara. Leporo atingas aĝon de ok jaroj, kaj kuniklo sepjaran aĝon. Sepjara kuniklo estas tre maljuna; duonjara kuniklo estas infano, sed kiam ĝi estas unujara, ĝi estas plenkreska kuniklo-viro aŭ -virino. La malgranda sciuro tamen iĝas sufiĉe aĝa: ĝi atingas la grandan aĝon de 12 jaroj.

Kiom aĝa fariĝas la eta muso? Kiu scias tion?

Rogiero.

La demandon de la grupo en Kimrujo ni respondos en la venonta No.

La muŝeto (fabelo por deklami).

Estis tre aminda muŝeto. Ĝi flugis ekstere, preter la fenestroj. Ĝi havis verdan korpeton kun oraj strioj kaj ankaŭ ĝiaj flugiloj estis preskaŭ oraj. Ho, ĝi estis tiom bela. Antaŭe ĝi havis amikojn kaj amikinojn, sed neniuj estis tiom bela kiom ĝi. Nun ĝi estis sola. Ĝi flugis, flugadis kaj estis malĝoja pro la vespero. Ĉar ĝi estis nur ok-hora kaj naskiĝis matene. Estis la unua fojo, ke ĝi vidis la vesperon. Pro tio ĝi estis tima. Ah, la vento estis tiom malvarma! Ankaŭ ekpluvis. Kaj kial estiĝis mallume? Ĉu ĝi mortos nun? Ĉu ĝi venos nun en la landon de la mortintoj? Kien kaj kiom longe ĝi ankoraŭ devos flugi? Ĝi ne sciis.

Subite ĝi sentis varman aerfluron. Fenestro malfermiĝis. La muŝeto enflugis en la helan ĉambron. Aliaj muŝetoj flugis ĉirkaŭ la lampo. Aliaj muŝetoj, sed same etaj, same oraj kaj same belaj kiel ĝi. Ili dancis supren kaj malsupren kaj zumetis: „Ni estas nun naŭope, -ope, -ope, naŭope estas ni”

Ha, tiom ĝoja ĝi fariĝis! Ĝi aliĝis al ili, kaj ankaŭ ĝi dancis en la brila lumo de la lampo. La geamikoj ĉirkaŭflugis kaj afable salutis ĝin. Unu el ili krietis: „La deka, la deka, ĝi estas la deka!” Post tio ĉiuj ekdancis kaj zumetis: „Ni estas nun dekope, -ope, -ope dekope estas ni”

Rogiero.

Malamikino de ŝuldoj.

Marinjo devas kalkuli en la lernejo. Si lernas subtrahi. Si devas depreni 15 de 23.

„Nu”, diras la instruisto, „5 de 3 ne eblas. Vi do devas prunti de la 20.”

„Ne, tion mi certe ne faros!” respondas Marinjo.

„Kial ne?” demandas la instruisto mire.

„Ĉar miaj gepatroj instruis al mi, ke mi neniam rajtas prunti ion, kie ajn!”

Ruzuloj.

Du sinjoroj havis koĉeron. Ambaŭ koĉeroj tre malamis sian mastron. Sed ili ne kuraĝis rekte ofendi lin. Longe ili pripensis, kiel ili povos puni la sinjorojn. Fine unu havis genian momenton.

Foje ambaŭ sinjoroj eliris en veturilo, kaj ili renkontis unu la alian. La koĉero en la unua veturilo subite per la vipo batis la sinjoron en la alia veturilo.

„Fiulo!” tuj kriis la alia koĉero. „Ĉu vi kuraĝas vipi mian mastron! Tiam mi batos vian sinjoron!” kaj li batis dufoje al la unua veturilo. — Tuj la alia sinjoro ricevis tri batojn.

„Ĉu tri!!! Mi donos kvin!!!” „Ok!” „Dek!”

Kiam la sinjoroj fine venis hejmen, ili estis tute ruĝaj kaj bluaj ... Saĝulo kun melankolia rideto rimarkis: La koĉeroj estas la reĝoj, la sinjoroj la popoloj

Solvoj: Filino — Mi mem — Angilo.

Cu vi jam varbis viajn korespondantojn por „La Juna Vivo”?

La malgranda knabino kun la alumetoj.

La vetero estis tranĉe malvarma, neĝis, kaj la vespero, la lasta vespero de la jaro proksimiĝis. Malriĉa knabino iris en la malvarma krepuskò kun nudaj piedoj kaj kapo. Kiam ŝi foriris de la hejmo, ŝi havis pantoflojn, sed ŝi ne ĝuis ilin dum longa tempo. Iam ŝia patrino uzis ilin, kaj ili estis por la knabino tro grandaj. Kiam la malgranda knabino volis iri de unu flanko de la strato al la alia, ĝuste pasis du kaleŝoj kun grandega rapido. Ŝi eksaltis pro timo kaj perdis ambaŭ pantoflojn. Unu el ili malaperis, kaj kun la dua forkuris knabaĉo. Li primokis la malgrandan knabinon, ke li iam uzos la pantoflon kiel lulilon por siaj infanoj.

Nun iris la eta knabino do nudpiede, kaj ŝiaj piedetoj estis buntaj kaj bluaj pro la malvarmo. Ŝi portis kelkajn faskojn da alumetoj en sia malnova antaŭtuko kaj faskon da alumetoj ŝi tenis en la maneto. Dum la tuta tago ŝi vendis neniom. Neniu donis al ŝi eĉ etan moneron. Malsata kaj rigida ŝi vagis tra la stratoj. Kiom malgaja aspektis la etulino! La neĝeroj falis sur ŝiajn blondajn harbuklojn, sed ŝi tion tute ne rimarkis.

En angulo, inter du domoj, ŝi ekkaŭris. Ŝi prempuŝis siajn piedetojn unu al la alia, sed ŝi ĉiam pli kaj pli sentis la teruran malvarmon. Ŝi ne kuraĝis iri hejmen, ĉar ŝi vendis ankoraŭ neniom da alumetoj. Kaj ŝi ankaŭ ne almozpetis laŭ la ordono de sia patro. Se ŝi nun venus hejmen, li certe frapus ŝin. Kaj ankaŭ hejme estas malvarme. Ĉar, kvankam ili per pajlo kaj ĉifonoj plenŝtopis ĉiujn fendojn de la subtegmentejo, kie ili loĝas, la vento tie libere faras siajn vizitojn kaj forpelas eĉ la plej malgrandan varmecon el la ĉambreto.

La manetoj de la malgranda knabino estis tre malvarmaj kaj preskaŭ rigidaj. Ah se ŝi kuraĝus bruligi nur unu alumeton, tio certe estus agrabla Ŝi povus iom varmigi la manojn. Ŝi tiris unu alumeton el la fasko. Ruĉs!!!! Kiel ĝi lumis kaj kiom da fajreroj disflugis! La flameto estis varma kaj kiam ŝi alproksimigis sian maneton, agrabla sento ekkaptis ŝin. Ŝi imagis, ke ŝi sidas hejme ĉe la forno, la fajro forte brulas kaj ĝi bonege varmigas ŝin. La etulino etendis la piedetojn, ke ankaŭ ili iom varmiĝu, sed en la sama momente la lumo estingiĝis. Malaperis la forno, la fajro, kaj ree ŝi sidis en la mallumo kaj malvarmo, kun peceto da finbrulinta alumeto en la mano.

Ŝi denove frotis alumeton tiu ekbrulis. Ĝia lumo falis sur la muron kaj jen la muro fariĝis travidebla kaj diafana, kiel

vualo. Si ĝuste povis rigardi en ornamita ĉambro. Si vidis belege kovritan tablon. Sur la blanka tablotuko estis brilaj porcelanaj vazoj kaj en la mezo de la tablo bonodoris rostita ansero, kaj ĝi estis tute plenigita per prunoj kaj pomoj. Sed ĉu vi scias, kio eĉ pli ravis ŝin? La ansero saltis de la plado sur la plankon kaj ankoraŭ kun la forko kaj tranĉilo en la dorso ĝi iris rekte en la direkto de la malriĉa knabino. Kaj tiam estingiĝis la alumeto kaj ree estis videbla nenio, nur la malvarma, nuda muro.

Si ekbruligis novan alumeton. Jen, nun ŝi sidis sub belega kristnaskarbo. Ĝi estis eĉ pli bela kaj pli granda ol tiu de la riĉa komercisto, kiun ŝi pasintjare povis vidi tra la fenestro. Sur la verdaj branĉoj brulas miloj da kandeloj kaj la abio estas ornamita per buntkoloraj bildoj. La bildoj estas belegaj. Tiajn oni povas vidi nur en la montrofenestroj de la plej elegantaj vendejoj.

La malgrandulino etendis siajn manetojn kaj tiam estingiĝis la alumeto. La kandeloj malaperis ien en la aeron kaj ŝi vidis nur la malproksimajn stelojn. Unu el la steloj falis, tiris longan fajran strion sur la ĉielo. „Nun mortas iu,” diris la etulino, ĉar la mortinta avino, la sola persono, kiu por la malgranda knabino ĉiam estis afabla, kaj kiu tre amis ŝin, ĉiam diris: „Se stelo falas, tiam iras ies animo al la ĉielo kaj anoncas sin ĉe Dio.”

Si ree ekbruligis alumeton kaj jen, en la brilo de la lumo staris la maljuna avino, rava, gracia kaj kara. „Avinjo,” vokis la infaneto, „Ho, prenu min kun vi. Mi scias, ke vi foriros, kiam mia alumeto ne plu brulās, same kiel la varma forno, la rostita ansero kaj la belega kristnaskarbo malaperis!” Si rapide bruligis ĉiujn alumetojn, kiuj ankoraŭ estis en la fasko Si ne volis, ke la avino forlasu ŝin kaj la alumetoj brilis tiel klare, kiel la plej brilaj sunradioj. Neniam estis la avinjo tiom granda, tiom belega. Ŝi levis la knabinecon, metis ŝin sur sian brakon kaj ili kune flugis for. Kaj tiam la malgranda knabino sentis nek malvarmon, nek timon, ili estis ĉe Dio.

Kaj en la angulo, inter du domoj, trovis la homoj la sekvan matenon la malgrandan knabinecon kun palaj vangetoj, sed kun ridetantaj lipoj. Si frostmortis dum la lasta punkto de la malnova jaro.

„Si volis sin varmigi”, oni diris, kaj montris al la forbrulintaj alumetoj. Tamen neniu sciis pri la feliĉo, kiun ŝi sentis, kiam ŝi foriris kun la avino al la plezuroj de la ĉiama Novjaro.

Laŭ fabelo de Andersen.



SKOLTA RUBRIKO.

Ĉu skoltoj bezonas internacian lingvon?

Okazis iam, ke hungaraj skoltoj vizitis bulgaran tendaron. Frumatene oni vokis ilin, por transpreni la matenmanĝaĵojn. La estro ankoraŭ dormis, kiam oni vokis la kuiristojn. La bulgara skolto, kiu vekis ilin, ne povis komprenigi al la du knaboj, kion ili kunportu. Ili do iris al la alia fino de la tendaro kun nur unu granda kaserolo.

Kiam ili alvenis tien, ili devis stari en vico por akcepti la aĵojn. Oni puŝis ilin de loko al loko. Ĉe unu loko ili ricevis en la kaserolon lakton, ĉe la dua bulkojn, ĉe la tria teon. Ili havis nur unu kaserolon, kaj ne eblis meti porcion aliloken, ĉar ili ne povis forlasi la vicon. Venis la kvara loko: en la kaserolon oni metis porcion da fromaĝo, kaj fine — kvanton da prunoj.

Kiam la knaboj revenis en sia tendaro, la hungaraj skoltoj staris ĉirkaŭ la kaserolo por diveni, kio estas tiu stranga miksaĵo. Sed manĝi — nu, tiun matenon ili ne matenmanĝis!

Ĉu do Esperanto necesas ĉe eksterlanda interrilato?

P. B. (El la hungara skolta revuo: Czerkészfűk).

Skoltoj, kie restas viaj artikoloj por ĉi tiu rubriko????



TJO-RUBRIKO.

Italujo: Oni restarigis „Italan Esperantistan Junularon”, kiu entute decidis aliĝi al TJO. Bonvenon, geamikoj!

Nederlando: Ĉar por multaj okcident-eŭropaj TJO-anoj la vojaĝo al Karlovy Vary fariĝos tro multekosta, kelkaj anoj proponis organizi ankaŭ Internacian Kunvenon en Nederlando.

Ni ankoraŭ atendas sciigojn de la ĉeĥoslovaka ĉefperanto. Eble ni en la januara numero povos pli detale informi. Se eble okazos nacia kunveno sur „de Veluwe”. Detaloj aperos en la Bulteno de la Nederlanda Sekcio.

Per la nove eldonita organo „De Esperantist” (nederlandlingva, sendependa, dumonata propagandorgano) ni kolportados kaj klopodos varbi simpatiantajn anojn.

Danujo: S-ro Niels Balle en Kolding konsentis esti loka TJO-peranto. Li estas esperantisto de 1940, aktiva UEA-membro, ano de CDEL, kaj de la klubo en Kolding. — Amiko, ni kore bonvenigas vin! Espereble vi estos bona helpanto por la ĉefperanto!

Hungaroj bonvolu atenti, ke la kotizo por abonantoj kaj TJO-anoj estas 11 frt. Oni povas pagi al s-ro P. Balkanyi, Budapeŝt 507.



IJK-Rubriko. Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Nederl. — Centra Informejo de IJK: Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo.

Al la francaj anoj de G.E.E. Ni petas niajn anojn en Francujo sendi ĉiujn artikolojn por LJV al nia perantino: F-ino J. Dedieu, 3 Rue Arzac, Toulouse, antaŭ la 10a de ĉiu monato.

Progresoj: S-ro M. George, profesoro en la porinstruista seminario en Besançon, skribis al ni: „La ministro pri Nacia Edukado permesis al mi instrui Esperanton ĉe ambaŭ porinstruitaj seminarioj en nia urbo. Temas pri nedeviga kurso kaj ni ne turnos nin al la gelernantoj, kiuj laboregas por la abiturienta ekzameno, sed al tiuj, jam sukcesintaj, kiuj nuntempe lernas kaj ekzercas pedagogion. Sed notinde estas, ke por la unua fojo en nia lando la Esperanto-kurso enskribiĝas tute normale en la dumsemajna kurstabelo. Paŝon post paŝo! Mi esperas, ke tiu ĉi okazigos novajn en nia lando, eĉ alie.”

Ni samopinias kun vi, kara kolego, ke ĉi tiu paŝo estas tre grava. Koran gratulon pro via sukceso!

— Samtempe ni gratulas en Francujo k-on G. Thiollet, 103 Rue St. Jacques, Angers. En la oktobra numero de LJV ni raportis pri la internacia instruista interrenkontiĝo en ŝtata knaba liceo en Angers. La direktoro ne estis esperantisto kaj en la komenco iom skeptika pri la valoro de nia komuna „lingvo”. Tamen post la dumsemajna konferenco li esprimis sian simpatian al nia afero. Kaj nun k-o Thiollet skribas: „De tri semajnoj mi komencis kurson en la liceo en Angers. Ĉeestis 22 lernantoj kaj ili estas devigataj, ĉar tio okazas dum unu hore ĉiusemajne dum „Activités dirigées”. Mi esperas sukcesi kaj mi petas: sendu al mi ilustritajn poŝtkartojn por ke mi donu ilin al miaj lernantoj, kiuj volas korespondi tuj.”

Karaj legantoj, bombardu Angers per kartoj el ĉiuj partoj de la mondo por ke la direktoro malfermu ĉiujn pordojn de sia liceo por nia lingvo!

Danujo. — La dana lernejo Nørskov Skole, pr. Farre, enkondukis Esperanton kiel devigan fakon. Alia dana lernejo, la Teknika lernejo en Augustenborg enkondukis Esperanton kiel instru-fakon.

Hungarujo. — La urbestro de Budapest denove aranĝis je kostoj de la urbo Esp.-kursojn en la Edukscienca Instituto por geprofesoroj kaj geinstruistoj de la ĉefurbo. Ankaŭ la Popoleduka Centro anoncis en kelkaj vesperaj lernejoj de Budapest inter la lingvo-kursoj Esp.

— Al ĉiuj gekolegoj, kiuj deziras korespondadon kun franca kolego por siaj gelnantoj (eĉ se ili ne scipovas Esp) aŭ por si mem pri fakaj aferoj, instruistaj temoj aŭ io ajn, skribu al la prezidantino de la aktiva franca asocio de geinstruistoj-esperantistoj, la G.E.E. Adr: F-ino J. Dedieu, 3 Rue Arzac, Toulouse.

Esperanto-Instruo al infanoj.

Ne pri la sukceso de tia instruado, ne pri ĝiaj pedagogiaj aŭ didaktikaj valoroj, sed nur pri la karaktero, la formo, la teknika flanko de tiu laboro en niaj klasejoj mi volas ion diri.

Ĉiu kolego, kiu staras antaŭ sia klaso kaj volas komenci la instruadon pri iu fako, demandas al si: Kion mi volas atingi kaj laŭ kiu vojo mi plej bone povos iri al la celo?

La celo de lingvo-instruo ĝenerale estas: doni al la lernantoj la kapablon kompreni la lernotan lingvon kaj komprenigi sin buŝe kaj skribe, laŭ tiu grado, kiu rilatas la aĝon kaj instruitecon de la lernanto. Sed almenaŭ tiom, ke la lingvo-scio havas valoron en la kontakto kun aliaj homoj.

La vojo, kiu kondukos al tiu celo devas esti kiom eble plej mallonga, simpla kaj natura.

Tio validas ankaŭ por nia instruo en la Esperanto-lingvo. Lingvo estas antaŭ ĉio: sono, ne signo; parolo, ne skribo. Ne-kulturitaj popoloj uzas ian lingvon kaj konversacias pli-malpli simple, sed ankoraŭ tute ne skribas, aŭ almenaŭ treege bagatele. Tia lingvo estas heredaĵo, kiun unu generacio transdonas al alia per buŝa uzado. Nur dum posta, pli altnivela evoluoperiodo oni fiksas la karakterizajn trajtojn skribe kaj kompilas gramatikajn regulojn. Tamen, gramatiko ne ordonas, nur konstatas; ne pliriĉigas la lingvon, nur apogas korektan kaj konscian uzadon.

En la gepatra lingvo 6-jara infano jam bone povas konversacii, posedas konsiderindan vortprovizon, sed ne povas skribi. Ĝi lernis la lingvon aŭskultante kaj imitante. Tia lernado de iu ajn lingvo estas la plej natura, ankaŭ se temas pri fremda lingvo. Ĝi estas necesa, eĉ por tiu, kiu lernis fremdan lingvon laŭ gramatika metodo, se li bone volas regi la alinacian idiomon.

Tamen oni instruas en la lernejoj plej ofte fremdajn lingvojn unue laŭ gramatikaj reguloj kaj ekzercas nur poste pli-malpli la parolan uzadon. — KIAL? Ĉar:

la implikaj sistemoj de la naturaj lingvoj postulas tro da tempo kaj peno por konversacia instruado;

la nelogikeco de la strukturo malhelpas memkonstruadon laŭ analogio; la ortografio ofte alportas siajn apartajn malhelpojn.

Laŭgramatika instruado estas kontraŭ-natura, ne estas sufiĉe interesa por

la lernantoj, kaj la instruisto ne atingos, ke ili povos sin esprimi: „kuraĝe kaj elegante”. Por atingi tion la parola uzado (uzado, ne traduko) staru sur la unua loko.

En la instruado de nia Esperanto, tio povas okazi. Ĉar:

la lernanto povas imiti kaj laŭ analogio plivastigi sian konon vastskale; la gramatiko estas simpla kaj ĝiaj reguloj sekvas facile el la buŝa uzado; la ortografio estas sufiĉe fonetika.

Tia instruado ne postulas multe pli da tempo, se la konversacia leciono tuj estas sekvata de skriba parto. Nepra kondiĉo estas, ke la skribaj taskoj ne estas kutimaj traduktaskoj, sed ke ili tuj rilatas la parolan uzadon kaj subtenas ĝin.

Alia avantaĝo de tia konversacia instrumaniere estas, ke ĝi estas pli „pura”, en pli intimaj rilatoj kun la ecoj de la lingvo, ĉar oni eliras el la propra specifika karaktero de la lingvo mem kaj ne proksimiĝas al ĝi laŭ kromvojoj de tradukoj el la gepatra lingvo, aŭ laŭ komparo kun ekvivalentaj esprimoj. Tiuj esprimoj neniam estas samvaloraj. Oni esprimas ideon laŭ speciala, en ĉiu lingvo alia, maniero. Oni devas kutinigi la lernanton al rekta pensado en la lernota lingvo, kaj tion oni ne facile atingos per gramatikaj reguloj. Tia metodo, kiu sekvas la naturan vojon kiom eble plej efike kaj do instruas sur la bazo de parola uzado de la lingvo, povas esti pli internacia ankaŭ rilate al la uzotaj libroj. Ĉar en ili tute povos malesti esprimoj en iu nacia lingvo. La instruisto estas la perilo tie, kie necesas inter la fremda kaj la gepatra lingvoj dum la konversacio. Por Esperanto tio havas kelkajn kromajn avantaĝojn, praktikajn:

La debito por iu Esperanto-lernilo destinata por infanoj estas ĝis nun malgranda, kaj la risko de la eldonisto tro granda. Iu lernilo kompilita laŭ la supraj postuloj estas internacie uzebla, kaj do povos ampleksi pli grandan kvanton. La riskoj fariĝas malpli grandaj kaj la eldonisto povos pli bone ekipi la librojn ol se la supozita vendado restos malpli vasta.

Fine ni ne forgesu, ke la lernantoj en diversaj landoj, instruitaj laŭ la sama maniero, almenaŭ en la komenco pli bone povas interkorespondi kaj interkompreniĝi. Tiu komenco ofte estas tre grava kaj decida por la entuziasmo de la juna Esperantisto.

La aŭtoroj de legolibroj por infanoj (almenaŭ por komencantoj), pli bone povos trovi bazon sur kiu ili povos konstrui. Unu el la plej urĝaj „zorgoj” por ni esperantistoj en la proksima estonto estas, ke por niaj junaj samideanoj ekzistu sufiĉa kaj konvena legomaterialo. La ĉie okazantaj kursoj por junuloj, en- kaj eksterlernejaj, devigas nin al tio. P. K.

La „Infaninterŝanĝo”.

Ĝis nun mi ricevis tri leterojn responde al mia alvoko en la oktobra numero de LJV:

De Alois Hilkersberger el Landeck, Tirol, Aŭstrio. La grupo „Verda Junularo” povos gastigi 10 infanojn kun ilia gvidant(in)o. La infanoj estus tre ĝojaj, kiam eksterlanda grupo vizitus ilian belan landon. Ili mem ankoraŭ ne povas vojaĝi eksterlanden, ĉar la vojaĝo estas tro multekosta. Sed ili tamen volonte ekceptos grupon!

La dua letero estas de s-ro Albin Neušil, el Olomouc, Nové Sady, en Ĉeĥoslovakujo. Li havas similan planon.

La tria letero venis el Neath, en Kimrujo, de f-inoj Rees. En Neath oni povos gastigi naŭ knabinojn kun ilia gvidant(in)o. La knabinoj el Neath volonte vizitus Nederlando. Momente la britoj ne rajtas vojaĝi eksterlanden, sed espereble tiu malpermeso baldaŭ nuligos. — La ideo pri interŝanĝo vivas do en diversaj landoj. Perantoj kaj ĉefperantoj, ekzamenu la eblecon! Instigu la kursgvidantojn. Skribu al jena adreso: W. Bant, instruisto, Groet (NH), Nederlando.

GENERALAJ SCIIGOJ.

Ĉiutage esperantlingvaj elsendoj ĉe la franca radio. Pierre Delaire, kiu jam gvidas Esperanto-Kurson ĉe la nacia radio nun ankaŭ atingis, ke ekde la 15-a de decembro ĉiutage okazos esperanto-elsendoj je ondolongo 41.21 m, kiuj estos aŭdeblaj en la tuta mondo. Tempo: de kvaronhoro post la 18-a, ĝis duono antaŭ la deknaŭa (laŭ franca tempo; t.e. de kvarono post la 17-a ĝis duono antaŭ la 18-a laŭ Greenwich-tempo). — Ciu leganto propagandu ĉi tiujn elsendojn inter siaj esperanto-geamikoj kaj en la nacia gazetaro, kaj tuj skribu al: Radiodiffusion Francaise, Emissions espérantistes vers l' étranger, 118, Champs-Elysées, Paris 8, Francujo; por danki kaj gratuli la radiogvidantojn.

Internacia Junular-Kunveno en la Alpoj. De la 18-a ĝis la 24a de majo 1948 la junular-sekcio de la Germana Esperanto-Asocio invitas ĉiujn junulojn partopreni en la I.J.K. en la Alpoj. La partopreno kaj vojaĝo en Germanio estos por la eksterlandaj geamikoj tute senkostaj. La elspezojn por ili portos la Germana Esp. Asocio. Por germanaj partopresantoj ekzistas la aĝolimo de 25 jaroj. Perfekteco en Esperanto estas necesa.

Turnu vin tuj al la Germana Esperanto-Asocio, München 23, Postfach 47, Germanio, kun la rimarko: „Internacia Junular-Kunveno.

H. Klieman, Prez. de la Jun. Sekcio de GEA.

SOKOL-kongreso. Ĉiujn Esp. eldonantojn pri SOKOL kaj pri Ĉeĥoslovaka Respubliko vi ricevos senpage, se vi anoncos vian intereson, skribante al SOKOL-Kongreso, Praha I, Národní 3, Ĉeĥoslovakujo. Estas en preparo pluraj interesaj kaj valoraj eldonadoj.

Afbla peto!

Ree ni estas en la fino de jaro — Tio signifas por multaj, ke ili devas pagi sian kotizon por „La Juna Vivo”. Geamikoj, vi multe plifaciligos nian administradon, se vi faros tion ĉiom eble plej baldaŭ! Al la nederlandanoj ni prezentos kvitancon post 15 januaro '48. La anoj ekster Nederlando, kiuj devas pagi, trovas en ĉi tiu numero liston de ĉefperantoj.

Kiu ne deziras renovigi sian abonon bonvolu sciigi tion rekte al la administrado: TJO-Centro, West-Grafdijk. Komprenu bone: ĉiu numero kostas monon! Se la revuo ne plu interesas vin, sciigu tion ĝustatempe. Por ke ni ne vane sendu la gazeton!

^o Sed espereble vi ĉiuj ne nur pagos, sed varbos ankaŭ novan abonanton! Komencu bone en la nova jaro! Nur kiam la abonantaro sufiĉe kreskas, ni povos plibonigi „La Juna Vivon”!!!

Atentu. Baldaŭ aperos nova eldono de la internacia kantaro „Ja Juna Vivo”. Se vi scias taŭgajn kantojn (kun muziknotoj) bonvolu sendi tiujn al TJO-Centro en W. Grafdijk, Nederlando. — Volonte ni ricevos konsilojn!

KORESPONDADRESOJ

Ciu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Beljujo: S-ro Lambert, R, 2 rue du Prévôt, Bruselo: Miaj 14 gelnantoj (20-40-j.) dez. kor. k.ĉ. landoj. Certa respondo.

Bulgarujo: Nikola N. Gandev, pl. „h. Dimitr.” 22, Sliven, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Interesiĝas pri poŝtkartoj. Certe respondos.

Nikola Nikolov, kv. Geo Mjlev 1019, Sofio 13, telefonisto Veterinaro-Medicina fakultato, dez. kor. pri politiko, vivkondiĉoj, junularaj aferoj.

Ĉeĥoslovakujo: Drmola Drahoslav, studento, Ostrava XIV, Meziveská 150, deziras korespondi.

Egiptujo: Malnova egipta samideano, 30-jaraĝa, serĉas ian ajn okupon en iu ajn lando. Volas kunlabori por vigligi la Esperanto-movadon, Gvidos Ĉseh-kursojn, D-ro Tadros Megalli, C. Del. IEL, P.K. 450, Kajro.

Hungarujo: Ludoviko Csonka dez. kor., prefere kun skoltoj, kiuj partoprenis la jamboreon; interŝ. pk. il., k. skoltinsignojn. Dobo u 55, Szeged.

20-j. abiturienta fraŭlo dez. kor. kun gefraŭloj per bildk. aŭ leteroj. Respondo certa, Bánati István, Battonya, II K. 16 sz. Csanádm.

Dez. kor. pri modo-desegnado juna f-ino, mododesegnistino kun l.t.m. Anikó Mayer, 18-j., Nyiregyháza, Szent István u. 22.

Junaj hungaraj komencantoj dez. kor. k.l.t.m. pri ĉiuj temoj. Nyiregyháza, Katobikus Gimnázium.

Nederlando: Egbert Sterenberg (17-j.), Sarastr. 24, Veendam (Gr.), dez. korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

F-ino Ans Kooy, Middenweg B 93, Heerhugowaard, NH, dez. kor. k. ĉiuj landoj.

NENIU LINGVO POVAS VIVI SEN LITERATURO!

Tial akceptis ĉiu vera esperantisto kun ĝojo la reaperon de „Literatura Mondo”, la beletra revuo en Esperanto. Aperas provizore ĉiun duan monaton sur 32 paĝoj. Jara-bono 2,50 USA-dolaroj aŭ egalvaloro. Abonu ĝin pere de TJO-Centro.

PROPAGANDU PER LA TJO-POSTPAPERO!

50 folioj kaj 50 kovertoj: 2,00 gld.
50 kartoj: 0,65 gld.

SUB LA VERDA STANDARDO

Nova Esperanto-lernilo, laŭ la rekta metodo verkita de s-ro Korte (lernejestro), eld. de J. Muusses, Purmerend. La plena metodo konsistas el: Gvidilo (nur por la instruisto): 2,50 guld., Laborilo: 0,90 guld. kaj Memorigilo: 0,50 guld. Mendu ĉe TJO-Centro. Petu detalan prospekton!

17-1, dez.
copagan, dultian

